

EVERARD T'SERCLAES

Enkonduko

Johano IV, duko de Brabanto, duko de Limburgo¹, sinjoro de Mehlino, mortis en 1355 sen rekta vira sukcedonto post 43 jaroj da glora regado. Li havis la grandan doloron postvivi siajn tri filojn, kaj tial, jam antaŭ sia morto, li nomumis sian plej aĝan filinon Johana sia sukcedantino.

Tio estis ebla, ĉar per akto de 1204 Filipo de Ŝvabio, imperiestro de Germanio, decidis, ke estontece Brabanto estu grafejo transdonebla ankaŭ en la virina linio. Per riĉa mondonaco Johano kompensis siajn du aliajn filinojn, Margareta, kiu edziniĝis al Ludoviko van Male, grafo de Flandrio, kaj Maria, edzino de Renaldo, grafo de Geldrio. En 1354 la reprezentantoj de la 38 Brabantaj urboj konfirmis lian decidon. En 1356 Johana kaj ŝia edzo, Venceslao de Luksemburgo, estis solene akceptitaj en Loveno kiel la novaj gedukoj de Brabanto. Ĉar Venceslao estis fremdulo, kiu ne konis la Brabantajn tradiciojn kaj kutimojn, la urboj kredis devi preni antaŭrimedojn por protekti siajn rajtojn kaj postulis, ke la gedukoj subskribu pakton, konatan sub la nomo 'Blijde Incomst' (Ĝoja Eniro), kiu estis fakte konstitucio, la tute unua en la mondo!

Sed Ludoviko van Male, grafo de Flandrio, dezirante mem fariĝi duko de Brabanto – precipe pro la haveno de Antverpeno –, rifuzis akcepti la aranĝon de sia bopatro kaj invadis Brabanton kun granda armeo en la sama jaro. Venceslao, kiu tiam troviĝis en Maastricht, direktis urĝan peton al sia frato, Karlo IV, imperiestro de Germanio, dum la militistaroj de Bruselo kaj Loveno rapidis renkonte al la invadinto. La batalo okazis la 17-an de aŭgusto en la domaro Scheut, inter Anderlecht kaj Molenbeek, proksime de Bruselo. Trompita per ruzo, la Brabantanoj, gvidataj de la grafo van Berg, faris la nesingardaĵon eliri de post la remparoj de Bruselo por persekuti la Flandrojn, kiuj estis ŝajnigintaj malstarigi sian tendaron por retiriĝi kun siaj rabaĵoj. Sed la tempo, kiam la komunumaj militistaroj povis rivali kun profesiaj soldatoj, estis pasinta. Sufiĉis, ke taĉmento de Flandraj soldatoj, kaŝitaj en najbara arbareto, atakis la flankon de la Brabantanoj por malordigi iliajn vicojn. La grafo van Berg provis restarigi la ordon, sed la retiriĝa movo rapide ŝanĝiĝis en panikon, kaj la

venkintoj eniris la urbon pelmele kun la venkitoj tra la pordego Sankta-Katarina. Dukino Johana havis nur sufiĉan tempon por forlasi la palacon Coudenberg kaj fuĝi al sia bieno de Binche en Henegovio, akompanata de kelkaj damoj kaj kavaliroj.

Tiu katastrofa tago, kiu konserviĝis en la memoro de la Bruselanoj kiel la 'Quaden Goensdag' (Malbona Merkredo) sufiĉis al la grafo de Flandrio por ekposedi la tutan dukejon. Multaj Bruselanoj kaj Lovenanoj mortis sur la batalkampo, kaj la rezisto de la Brabantanoj estis rompita. En Maastricht Venceslao ankoraŭ ĉiam, sed vane, atendis la helpon de sia frato, la imperiestro. Ĉiuj urboj malfermis siajn pordegojn al la nova duko.

Sed la grafo de Flandrio ne longe ĝuis tiun triumfon. Brusela patricio, Everard t'Serclaes, entreprenis la liberigon de sia patrio. Sciante, ke li povas kalkuli je la helpo de siaj kunurbanoj, kiuj pene toleris la Flandran superegon, li unuigis en la nokto de la 24-a de oktobro kelkajn decidemajn virojn, grimpis kun ili trans la urban muregon proksime al la kapelo Sankta-Laŭrenco kaj ekde la loko, kie staris sia propra domo ĉe la fino de la strateto Eetengat (nun la strato Berlaymont), kaj tra strato, kiu ekde tiam ricevis la nomon 'rue de l'Assaut' (strato de la Atako), li malsupreniris al la Granda Vendoplaco. Danke al la mallumo li penetris nevidate en la Steldomo kaj forigis la Flandran flagon de la fasado, dum liaj kunuloj disvastiĝis tra la stratoj kriante "Brabanto al la granda duko!" Ĉie la loĝantoj kaptis siajn armilojn kaj persekutis la Flan-drojn, kiuj vidis alproksimiĝi la malamikojn de ĉiuj flankoj kaj eĉ ne havis la okazon regrupiĝi. Timigitaj de la krioj de la hom-amaso, ili fuĝis al la pordego Sankta-Katarina, tra kiu malfermis sin la vojo al Flandrio. Sed la kunuloj de t'Serclaes jam okupis la pordegon. Al la Flandrojn ne restis alia ebleco ol salti de la murego malsupren aŭ demeti la armilojn.

La liberigo de Bruselo estis signalo por ribelo en la aliaj urboj, kies loĝantoj forpelis la Flandrojn. Post la Sanktulara Festo Johana kaj Venceslao estis denove akceptitaj en Loveno kaj Bruselo. Sed Ludoviko van Male ne provis rekonkeri Brabanton kaj kontentigis sin per la okupacio de Antverpeno kaj Mehlino.

La fame konata Flandra romanisto Hendrik Conscience [pron. Konsjâns] (*Antverpeno 1812 kaj +Bruselo 1883) estis la filo de Franca patro kaj Flandra patrino. Li estis perfekte dulingva. Li oficis kiel aktuario de la Art-Akademio de Antverpeno. Sian unuan romanon li verkis en la franca, sed liaj amikoj, ĉiuj flandraj artistoj, inter kiuj Wappers, la pentristo de reĝo Leopoldo I, konvinkis lin verki

¹ Ne temas pri la nuna belga provinco Limburgo, kiu tiutempe nomiĝis Lono.

en la nederlanda lingvo. Li aliĝis al la Flandra Movado, kiu luktas por egalaj rajtoj por la Flandroj, interalie por la rekono de la Nederlanda lingvo, tiutempe nomata 'Flandra lingvo', en la nova lando, kie la Franca lingvo estis la unika oficiala lingvo. En 1838 li akiris grandan famon pers sia verko 'De Leeuw van Vlaanderen', kiu estis tradukita en multajn lingvojn, ankaŭ en Esperanton sub la titolo 'La Liono de Flandrio'. Reĝo Leopoldo I kuraĝigis lin daŭrigi sur tiu vojo, konsilante lin uzi nur vere Nederlandajn vortojn. Sed la franc-lingvanoj, kiuj havis grandan politikan kaj ekonomian influon en Antverpeno, tiel kalumniis lin, ke li devis forlasi Antverpenon. Tial la reĝo nomumis lin komisaro de la arondismento Kortrejko, kien li transloĝiĝis. Poste, en 1868, li transloĝiĝis al Bruselo, kie li estis nomumita konservatoro de la muzeo Wiertz.

Lia ampleksa literatura produktaro, kiu konsistas precipe el historiaj kaj idiliaj romanoj, havigis al la vastaj Flandra loĝantaro bonan kaj valoran legaĵon, kiu estis ankaŭ ŝatata en la eksterlando. La temojn de siaj historiaj romanoj li serĉis en la riĉa historio de Flandrio kun la celo konsciigi la Flandran popolon pri ĝia glora pasinteco kaj vekti en ĝi nacian fierecon. La influo de liaj verkoj estis tiel granda, ke oni diris, ke li instruis legadon al sia popolo. Lia plej konata verko estas sen ia dubo 'De Leeuw van Vlaanderen' (La Leono de Flandrio) (1838), en kiu li priskribis la liberigan lukton de Flandrio, komence de la XIV-a jarcento, kontraŭ la Franca superregado. Aliaj historiaj verkoj estas 'Jacob van Artevelde' (1849), 'De Boerenkrijg' (La Kampula Milito) (1853), 'De Kerels van Vlaanderen (La Viroj de Flandrio) (1870), 'Everard t'Serclaes' (1870) k.c. Sed li ankaŭ verkis samtempajn kaj kamparajn rakontojn kiel 'Blinde Rosa' (Blinda Roza) (1850), 'De Loteling' (La Konkripto) (1850), 'Baas Ganzendonck' (Mastro Ganzendonck) (1850), kiun oni konsideras kiel lian plej bonan verkon, k.c.

Kvankam la romano 'Everard t'Serclaes' estas tipe romantika literaturaĵo, kun abundaj preskriboj de sentoj, tute laŭ la tiutempa literatura modo, ĝi elstaras per ĝia perfekta konstruo. En ĝi la verkisto montras sin ne nur bonega rakontisto, sed li ankaŭ skrupule respektas ĉiujn historiajn faktojn.

Laŭ legendo sankta Goriko, ĉefepiskopo de Kameriko (Cambrai en norda Francio) trairis ĉirkaŭ 580 p.K., riskante sian vivon, la arbaron Zonio. Li konstruis modestan kapelon sur malgranda insuleto en la rivero Zeno. Sur la sama insuleto poste estis konstruita kastelo-fortreso, kiun oni nomis 'Broeksala', signifanta

'domo en la marĉo'. Ekde de la X-a jarcento komercistoj ekloĝis en la valo de la rivero Zeno sur la dekstra bordo en la proksimeco kaj sub la protekto de kastelo-fortreso sur la insulo Sankta-Goriko. Fine de la X-a jarcento la grafo de Loveno akiris la grafejon en kie situis la nova aglomeracio. Dum la sekvanta jarcento la nova urbo rapide disvastiĝis sur ambaŭ bordoj de Zeno, sed precipe dekstre ĝis sur la montetoj kiuj etendiĝas paralele al la rivero. Tiel la urbo atingis la monteton sur kiu oni konstruis la preĝejon Sankta-Miĥaelo kaj Sankta-Gudula (ekde 1047) kaj alian monteton, Coudenberg, sur kiu la grafo konstruis kastelon en la XII-a jarcento. Kvankam la plej malnova ĉarto, donita de Henriko I, duko de Brabanto, datiĝas el 1229, la unuaj privilegioj de la urbo estas multe pli maljunaj. En 1154 Bruselo elektis siajn proprajn skabenojn. En la XII-a jarcento oni ankaŭ ĉirkaŭis la urbon per larĝaj remparoj kaj fosajoj. La estiĝo de la floranta drapindustrio multe kontribuis al la evoluo kaj prospereco de la urbo kaj necesigis la konstruon de novaj kvartaloj en kaj ekster la remparoj. La gvidado de la ekonomia vivo, same kiel la regado de la urbo, estis tute en la manoj de la patricioj, nomataj la 'gentoj', konsistantaj el la plej malnovaj familioj. Nur en 1421 la popolo sukcesis per revolucio akiri por la metioj la rajton kunregi la urbon. Sekve de la milito de 1356 inter Flandrio kaj Brabanto novaj multe pli altaj remparoj estis konstruitaj inter 1357 kaj 1379. Ĝis en la tridekaj jaroj de la dek-naŭa jarcento ili formis la limojn de la urbo.

Pieter Jan Doumen

I

Bruselo, la nuna floranta ĉefurbo de Belgio, havis nur tre malvastan amplekson en la dek-kvara jarcento, kvankam jam tiam ĝi estis konata kaj glorata en la tuta mondo pro sia grandnombra kaj diligenta loĝantaro kaj kiel rezidejo de la potencaj dukoj de Brabanto.

Ĝiaj remparoj komenciĝis apud la duka palaco sur Coudenberg etendiĝis de tie tra la nuna Reĝa strato ĝis la vojo al Loveno, mal-supreniris malantaŭ la preĝejo Sankta-Gudula al Wolvengracht, turniĝis malsupren per rekta angulo malantaŭ la preĝejo Sankta-Katarina kaj reascendis iomete pli malproksime preter la monaĥinejo de la Nigraj Fratulinaj, la pordego Steen kaj la strato Ruysbroeck, ĝis malantaŭ la preĝejo de Coudenberg, kie ĝi denove atingis la dukan palacon kaj fermis la ringon de la urbaj fortikaĵoj.

Se la tempo ŝparis kelkajn konstruaĵojn de la malnova Bruselo, ĝi ankaŭ detruis multajn, eĉ el tiuj al kiuj algluiĝis por ni glorplenaj memoroj.

Tiel antaŭ ok jarcentoj la nuntempa strato Berlaymont estis nur mallonga strataĉo, nomata Eetengat, borderita en ambaŭ flankoj per malaltaj lignaj domoj kaj fermita ĉe ĝia fino per la granda ŝtona domo de la sinjoroj t'Serclaes, bonhavaj kaj influriĉaj civitanoj, kies nomo brilas sur multaj paĝoj de la historio de Brabanto.

La alta fasado de tiu ĉi konstruaĵo, farita el brunaj sabloŝtonoj, imponis nur per siaj solideco kaj pezeco, kio estis ankoraŭ akcentata per du elstaraj turoj. La enirpordego estis mallarĝa kaj fortika. Kvar rondarkaj fenestroj, en la mezo dividitaj per dikaj kolonoj, lasis nur malfortan lumon penetri enen. Kelkaj paftruoj gaxis tie kaj tie ĉi, kaj la tegmento estis borderita per dentoformaj kreneloj. Tio ĉi donis al la ŝtondomego la aspekton de militista kastelo.

En tiaj fortaj kasteloj loĝis plej ofte nur membroj de la Sep Gentoj¹ de Bruselo, per kiu nomo oni indikis iujn maljunajn privilegiantajn burĝajn gentojn, patriciojn, en kies manoj ripozis la tuta regado de la urbo, kaj kies membroj solaj povis okupi iujn oficojn kaj honoroficojn. Interalie la sep urbaj skabenoj povis esti elektitaj nur el tiuj gentoj².

Estis iu mateno de aŭgusto en la jaro 1356. La suno jam alte brilis en pura ĉielo: ĉio, almenaŭ en la naturo, promesis belan, varman tagon. Antaŭ la lignaj domoj de Eetengat staris sur du, tri lokoj kelkaj grupetoj da viroj kaj virinoj. Iliaj vestaĵoj estis tre simplaj, sed ne montris signojn de mizero. Kontraŭe, iuj el ili – precipe kelkaj knabinoj – estis vestitaj kun ia afekteco kaj en nekutimaj koloroj, kiel laboristoj en festvestaĵoj, kvankam estis nur mardo.

Io grava aŭ minaca okazis aŭ estis okazonta, ĉar en la diversaj grupetoj oni kunmetis la kapojn kaj parolis kun ia retenita impeto pri tre gravaj aferoj. La virinoj iam kaj iam paliĝis ĉe timiga vorto aŭ levis la manojn supren kun lamento, dum la vortoj “Ve! Ve! Dio helpu nin!” sonis kiel preĝo de iliaj lipoj. La fortaj viroj grumblis kaj pugnigis la manojn pro bedaŭro kaj kolero.

Subite knabino ĝoje ekkriis:

“Vidu! Vidu! Jen de la monteto Sankta-Miĥaelo venas Jan la oraĵisto. Li iris al la fortreso por novaĵoj kaj certe scias ion!”

“Kia stultulino! Ŝi povas ridi en tia malagrabra tempo!” murmuris alia knabino.

“Mi komprenas tion,” rimarkis pli aĝa virino. “Kiam Goeleke vidas sian oraĵiston, ŝi povus ridi, eĉ se ŝi starus per unu piedo en la tombolo!”

“Tio ne koncernas vin, klaĉulinoj,” eksplozetis la patrino de Goeleke, “ili baldaŭ estas geedziĝontaj.”

“Ĉu geedziĝontaj? Se ni ankoraŭ vivos post sep tagoj, ekkriu: ‘Danke al Dio!’ Kiu scias, ĉu tiam unu ŝtono kuŝos ankoraŭ sur alia en nia malfeliĉa Bruselo!”

Intertempe Jan la oraĵisto alproksimiĝis kaj iris rekte al la juna Goeleke, kies manon li premis kun serioza kaj maltrankvila mieno.

“Nu, nu, kiel malĝoja vi aspektas! Ĉu vi havas malbonan novaĵon?” ŝi demandis.

“Novaĵon mi ne havas, Goeleke,” li respondis, “la situacio estas ankoraŭ ĉiam same malbona. Aĥ, amikoj, de sur la turo ĉe la pordego Sankta-Katarina oni vidas en la malproksimeco nur supreniri nuboj de polvo. La vilaĝo Dilbeek kaj ĉiuj ĉirkaŭantaj farmbienoj brulas. Oni diras, ke Lennik, Asse kaj la precipaj vilaĝoj de ĉi tie ĝis Ninove kaj Aalst estas tute detruitaj de la flamoj.”

“Ve! Ve al ni, mizeraj homoj!” ĝemis la virinoj. “Kia terura sorto minacas nin! Ho, kompatema ĉielo, protektu la mizeran Bruselon!”

“Prefere plendu la povrajn farmistojn en la kamparo,” diris maljuna voĉo, “ili estas pri-rabitaj de ĉio, sen tegmento, sen nutraĵoj!... Ili certe fuĝos en granda nombro al Bruselo!”

“Ili ne povas,” respondis la oraĵisto. “La grafo de Flandrio troviĝas ja kun sia armeo sur la Hoge Kouter, norden de Anderlecht, sed per rondirantaj korpusoj li gardas ĉiujn vojojn fermitaj.

“Ĉu la Bruselanoj tiom senkuraĝiĝis, ke ili staras tremante malantaŭ siaj remparoj kiel kunikloj en sia kavaĵo?” muĝis fortmuskola forĝisto kun nigraj manoj kaj nudaj brakoj. “Kial ne sturmi el la urbo kiel kuraĝaj viroj kaj fuĝigi la grafon de Flandrio?”

“Jes, vi ja bone parolas, Pieter,” rimarkis la oraĵisto, “sed nia indulgema duko Venceslao kuris al Maastricht, por tie kolekti soldatojn. Oni atendas lian revenon.”

“Li faros multe!” mokis junulo. “Festi, ludi, aŭskulti trubadurojn kaj malŝpari nian dure perlaboritan monon, tion li povas fari plej bone.”

“Li revenos, post kiam Bruselo estos prirabita aŭ ŝanĝita en cendrojn, same kiel nun la malfeliĉa Dilbeek. Forigu lin la ...! Mi ne volas diri la vorton, sed vi ja komprenas.”

“Li ne estas nia duko! Li estas nur la edzo de nia dukino Johana. Nia legala regantino estas ŝi. Nur ŝin ni amas kaj honoras.”

“Kaj ĉu tio estas kialo por permesi, ke la tuta dukejo estu detruita fajre kaj glave kaj rigardi tion senfare ekde niaj remparoj, ĝis kiam la

² En 1375 tiuj Sep Gentoj kune nombris ducent kvardek kvin membrojn.

sama sorto trafos nin? Kiu scias, ĉu Bruselo ne jam estos sturmita morgaŭ?”

“Ne, tio ankoraŭ ne estas timenda,” intervenis la oraĵisto. “La grafo de Flandrio atendas siajn ramojn, kiuj devas veni de Gento, kaj antaŭ ol tiuj estos alvenintaj kaj starigitaj...”

“Nur pliaj kialoj por doni al li tempon... Niaj skabenoj estas malkuraĝuloj, stultuloj aŭ perfiduloj!” ekkriis la forĝisto.

“Vi ne bone scias, kion vi diras, Pieter,” replikis la oraĵisto. “Kelkaj rifuĝintoj, kiujn oni enlasis, diras, ke la trupoj de la grafo nombras certe cent mil virojn.”

“Sensencaĵo! Nur timo igas tiel paroli!”

“Kial ajn estas: kion ni povas fari kontraŭ tia grandnombra armeo da bone trejnitaj militistoj? En la urbo ni havas nur nian pafistgildon, la mastrojn de la drapistgildo, kiujn oni armis, la pafistojn de Loveno kaj la soldatoj de la duko sub la komando de la grafo van Berg. Eble ankoraŭ ne ses mil viroj! Tiu nombro ne sufiĉas por defendi nian urbon.”

“Tiam oni donu armilojn al la metiistoj! Tiel ni estos sufiĉe fortaj por forpeli la malamikon nerezisteble el la dukejo.”

“Vi ja pravas, Pieter. Oni parolis pri tio plurfoje dum tri tagoj dum la skabenkunveno. Mi scias tion de unu el la urbaj kurieroj. Ŝajnas, ke sinjoro t'Serclaes forte insistis, ke oni armu la metiistojn, sed la aliaj skabenoj malakceptis sian proponon.”

“Tiuj malkuraĝuloj! Ili timas, ke ni uzos poste tiujn armilojn por liberigi nin de ilia tiraneco!”

“Tiel estas, Pieter!”

“Kaj por sekurigi siajn interesojn, por plifortigi sian mastrecon super la popolo, ili ofertas la patrimon. Kiu sur la tero povas rifuzi al libera civitano doni sian sangon por savi sian naskiĝurbon?”

“Sed, Pieter, vi, kiu scias ĉion: kiujn kialojn havas la grafo de Flandrio por prirabi kaj murdi en Brabanto?” demandis juna virino.

“Se mi scius tion, mi lasus min diskvaronigi!” grumbliis la forĝisto. “Oni diras, ke li faras tion, ĉar nia duko ne volas pagi siajn ŝuldojn... sed ĉu tio estas vera?”

“Ne, tio estas tute ne vera,” respondis alia viro. “La grafo de Flandrio estas la edzo de la fratino de nia dukino Johana, kaj pro ĵaluzo ŝi incitas sian edzon kontraŭ nia dukino, ŝia propra fratino! Tio krias al Dio por venĝo!”

“Ion alian rakontis al mi Genoveva, la filino de la spronfaristo,” diris unu el la virinoj, “kaj mi kredas tion, ĉar ŝi interrilatas kun la filo de la pordisto de la Skabenejo. Laŭ ŝi nia duko estus dirinta al la duko de Flandrio dum turniro en Maastricht, ke li estas nenio alia ol humila filatulo de la reĝo de Francio. Tion la grafo de Flandrio volas nun venĝi.”

“Nu, nu, ĉar tiuj grandaj sinjoroj insultas sin reciproke, la malriĉa popolo devas nun esti prirabata kaj murdigata!” oni murmuris en ĉiuj flankoj.

“Sed silentu do! Neniu el vi scias ion pri tio,” diris la oraĵisto. “Aŭskultu, mi eksplikos al vi per kelkaj vortoj la kaŭzon de tiu malfeliĉa milito. Se mi ne diras la tutan veron, mi ne kulpas pro tio. Kiam nia indulgema duko Johano IV estis mortonta, li testamentis al sia plej aĝa filino Johana la dignecon de dukino kaj la tutan dukejon kaj komisiis ŝin pagi kiel heredaĵon konsiderindan monsumon – mi ne scias kiom – al ŝiaj du fratinoj. Fraŭlino Margareta edziniĝis al la grafo de Flandrio, kaj tiu ĉi postulis en la nomo de sia edzino la heredaĵon ŝuldata al ŝi. Post longa hezitado kaj eluzinte ĉiujn rimedojn por prokrasti la pagon, nia duko Venceslao finfine konfesis, ke li ne kapablas pagi sian ŝuldon. La grafo de Flandrio koleriĝis pro tio kaj deklaris al li la militon.”

“Kion ni povas fari kontraŭ tio?” muĝis la forĝisto. “Ĉu ni ankoraŭ ne sufiĉe ŝvitis? La impostoj fariĝis netolereblaj. Kien do malaperis nia mono?”

“La duko malŝparis ĝin per turniroj kaj kavaliraj festoj, tion diras ĉiuj.”

“Sed ĉu ne estas vere,” rimarkis virino, “ke Bruselo, Loveno kaj Antverpeno ofertis pagi la ŝuldojn de la duko aŭ almenaŭ garantii por ili?”

“Efektive, sed la grafo de Flandrio krome postulis, ke trionon de la dukejo estu cedita al li, kaj tion la urboj, precipe Bruselo, ne volis akcepti.”

“Nu, nu, mi estus akceptinta tion, prefere ol verŝi tiom da senkulpa homa sango,” diris la virino.

“Sed, Agnete, tion vi ne povas pensi serioze,” grumbliis la forĝisto. “Ĉu ni do metu la manojn sur la genuojn kiel timemaj senkuraĝuloj kaj lasu disŝiri nian belan landon en pecojn?”

“Vidu tien!” ekkriis knabino. “Jen venas kuriero al Eetengat!”

“Ha, mi konas lin. Estas Urbaan. Li alportas mesaĝon al la ŝtondomo de t'Serclaes,” diris la oraĵisto. “Eble estas novaĵoj. Mi demandos lin.”

Kiam la urba kuriero preterpaŝis ilin, ĉiuj kuris al li kaj kriis malorde:

“Kio okazas? Ĉu vi havas novaĵon, mastro Urbaan? Ho, diru ion al ni! Ĉu Dilbeek ĉiam brulas? Ĉu oni provos fari atakeliron? Ĉu la duko venos?”

“Lasu min preteriri! Mi scias nenion kaj mi ne havas tempon.”

Jan iris post li, kaj kun tiu ĉi li interŝanĝis kelkajn mallaŭtajn vortojn, ĝis li atingis la pordegon de la ŝtondomo de t'Serclaes. Tiam la oraĵisto reiris al siaj kamaradoj, kiuj forpuŝis

sin ĉirkaŭ li, kaj demandis kun incitita sci-volemo:

“Kion vi scias? Ĉu li parolis kun vi? Kion li diris?”

Metante fingron antaŭ sian buŝon, la orajisto respondis mallaŭte:

“Mi ne scias multe: ne estas novaĵoj. Sed li tamen diris ion al mi. Hieraŭ vespere la Skabenaro decidis sendi tre frue ĉi-matene kvar skabenojn al la grafo de Flandrio kun la mision intrertrakti kun li kaj ekzameni, ĉu ne estas ebleco fini la sieĝon de Bruselo. Tiu senditaro ĵus revenis en la urbon, kaj oni venas mesaĝi al sinjoro t'Serclaes, ke li devas iri al la Skabenejo por aŭdi, kiel fartis la intertraktintoj.”

“Kaj kiel ili fartis? Kion diris al ili la grafo?”

“Tion la kuriero mem ne scias... Li ankaŭ diris, ke, se la vetero restos bela, nia indulgema dukino promenos morgaŭ je la tagmezo sur la remparoj por inspekti la pafistojn kaj la soldatojn. Mi iros rigardi tion.”

“Mi iros kun vi!”

“Mi ankaŭ!”

“Ni ĉiuj iros kunel!”

En tiu momento la urba kuriero reaperis sur la strato. Silentaj ili postrigardis lin. Post kiam li malaperis piede de la monteto Sankta-Miĥaelo, virino rimarkis:

“Sinjoro t'Serclaes do ne estis membro de la senditaro! Pro kiu kaŭzo? Li tamen estas skabeno!”

“Tio estas io kion vi ne povas kompreni,” respondis Jan. “Sinjoro t'Serclaes multe amas nian patrimon, sed li estas tro populara. Se li sola estus la mastro, ĉio irus alie, sed la singarduloj, la timemuloj konsistigas la plimulton en la skabenaro.”

“Se nur ne estu perfiduloj inter ili!” rimarkis la forĝisto. “Oni jam vidis, ke la grandaj sinjoroj de la gentoj vendis nian patrimon...”

Subite familiara bruo trafis iliajn orelojn, kaj ĉiuj turnis la rigardon kun espimo de respekto kaj afekcio al la ŝtondomo de t'Serclaes, kies pordego knaris sur siaj pezaj hingoj.

Du servistoj aperis sur la sojlo, kaj pasante inter ili, maljuna viro forlasis la domon per malrapidaj paŝoj. Per sia alta staturo, sia griza hararo, siaj profundaj brunaj okuloj kaj vizaĝtrajtoj plenaj je impona trankvileco, tiu ĉi civitano devis nepre inspiri respekton, eĉ al iu kiu ne konis lin. Li portis talaron el fajna nigra drapo, sub kiu oni vidis brili maĉkirason. Ĉe lia flanko pendis, krom leda saketo, longa glavo, kaj ĉar servisto, sekvanta lin je iu distanco, portis post li feran kaskon, oni povis nur pensi, ke tiu ĉi civitano direktis sin al batalo aŭ almenaŭ tenis sin batalpreta.

Dum li, videble pensante pri ion, sufiĉe rapide paŝis tra la Eetengat, la maljunuloj kaj la virinoj respektete ranĝis sin kontraŭ la domojn

kaj murmuris saluton, profunde klinante sin. La junuloj kaj la viroj kontraŭe faris kelkajn paŝojn antaŭen kaj forte kriis:

“Armilojn! Donu al ni armilojn! Ni volas riski nian vivon por la libereco de Bruselo! Armilojn!”

“Kara amikoj,” estis la respondo, “pacienciĝu iomete kaj restu pacamaj. Mi scias, ke vi, kiuj ĉiutage ŝutas vian ŝviton por la ĝenerala prospero, ankaŭ same kuraĝe verŝus vian sangon por la defendo de nia amata naskiĝurbo, sed la skabenaro timas, ke vi ne plu redonus la armilojn post la malapero de la danĝero, se oni enmanigus ilin nun al vi.”

“Je la unua ordono de la skabenaro, Sinjoro, aŭ je via sola parolo, ni redonus ilin ĝis la lasta peco.”

“Nu, fidu min kaj havu bonan esperon: mi vidos, kion mi povos fari.”

“Vivu sinjoro t'Serclaes! Vivu la amiko de la polpolo! Dio estu kun vi!” ĝojkriis la dankemaj homoj.

La maljuna t'Serclaes malproksimiĝis ĉiufoje ĝentile klinetante la kapon al la homoj, sed li tuj reprenis siajn zorgoplenajn pensojn, kvazaŭ la postulo de la laboristoj estus parto de ili jam antaŭe.

Nur kiam li alvenis ĉe la piedo de la monteto Sankta-Miĥaelo kaj levis la rigardon al la bela templo dediĉita al sankta Gudula, kiu superregis kiel giganta koloso de tie la urbon, fajrero de fiereco brilis en liaj okuloj kaj hela rideto gajigis lian vizaĝon.

Tiu ĉi majesta konstruaĵo, kiu estis vekonta la admiron de la posteularo dum la venontaj jarcentoj, certe estis la vera pompa simbolo de lia amata gepatra urbo Bruselo, de ĝia artemo, ĝia pieco, ĝia volforto kaj ĝia riĉeco. Lia brusto ankaŭ ŝvelis, kiam lia rigardo sekvis de la grundo ĝis inter la nuboj la finkonstruitan turon aŭ vagis sur la staturiĉa puntaĵo de la enorma fasado.

Sento de bedaŭro preskaŭ tuj poste vualis lian vizaĝon: la dua turo de la katedralo, konstruita nur ĝis duona alteco, estis ankoraŭ ĉirkaŭita per skafaldoj, sur kiuj nun estis videbla neniun laboristo. Antaŭ nelonge tie ankoraŭ resonadis la martelfrapado de la skulptistoj, la bruetado de la truloj de la masonistoj, la grincado de la gruoj kaj pulioj, la kriadado de la laboristoj por mortero kaj ŝtonoj... Nun ĉio estis silenta kaj dezerta! Ĉu la nunaj gravaj cirkonstancoj, eĉ la malvenko kaj humiligo rompis la povon de Bruselo tiagrade, ke la majstroverko de la Brabanta konstruarto estis restonta nefinita?

Tiu ĉi malgaja penso igis t'Serclaes eligi ĝemon. Skuante la kapon li daŭrigis sian vojon kaj baldaŭ forlasis la strato Berg. Ĉi tie, inter butikoj, konstruitaj el ligno kaj brikoj, staris multaj grandaj kaj famaj gastejoj kiel *de Valk*,

de Spiegel, de Vier Emmers, 's Hertogenbosch kaj aliaj, krom kelkaj fortaj ŝtondomoj, rezidejoj de kavaliroj apartenantaj al la Sep Gentoj de la patricioj de Bruselo.

La strato Berg estis unu el la grandaj vojoj kiu ebligis supreniri de la bordoj de Zeno al la supra urbo. Kutime la strato estis obstrukcita per granda nombro da veturiloj, kaj oni vidis tie komercistojn kaj veturilkondukistojn svarmi antaŭ la gastejoj. Sed nun, sekve de la milito, ĉia komerco en Bruselo estis suspendita, kaj la alie tiel vigla strato Berg estus nun tute soleca, se civitanoj, precipe virinoj, ne formus grupetojn tie kaj tie ĉi apud la domoj tute kiel en Eetengat.

Kie t'Serclaes preteriris, oni salutis lin kun respekto.

Ĉe strato kiun oni nomis Mandenmakershofstad, staris grupo da laboristoj, el kiu sonis koleraj krioj:

“Armilojn! For la gentojn! Ni volas armilojn!”

T'Serclaes rigardis ilin kun severa mieno kaj skuis la kapon, kvazaŭ por komprenigi ilin, ke ili agas malbone, kriante kontraŭ la gentoj.

“Armilojn! Armilojn!” ili ripetis.

“Se oni ne donos ilin al ni, ni sturmos la armilejojn!” kriis unu sola voĉo.

La maljuna skabeno preteriris.

Ankaŭ el la plej multaj kavaliraj ŝtondomoj oni sendis al li signalon de amikeco. Sed ne el ĉiuj, ĉar, kvankam li ne rimarkis tion, malantaŭ du aŭ tri fenestroj grimacis rido de malŝato, de malamo aŭ de kolero kontraŭ li. Verŝajne multaj kavaliroj tenis lin respondeca pro la malamikaj krioj de la popolo.

Ĉe la fino de la strato Berg t'Serclaes eksekvis la straton Spiegelbeke³, tiel nomata laŭ mallarĝa rojo, kiu fluetadis meze de la strato. Tiu placo, malpli vasta ol nun, estis krome obstrukcita tiutempe per pli ol cent tendoj kaj lignaj butikoj, en kiuj oni vendadis en normala tempo ĉiajn penseblajn varojn, sed kiuj ŝajnis tute forlasitaj tiutage.

Sur la loko, kie nun staras la belega kaj mondfama urbodomo, staris de la strato Guldenknop ĝis la strato Sterre kelkaj ŝtondomoj, sur kies elpendaĵoj oni povis legi *de Moor, Rodenburg, 's Papen Kelder, de Meersman, de Wilde Ever* kaj finfine *de Meerte*, vasta kaj peza konstruaĵo, en kiu kunvenadis la skabenoj kaj kiun oni nomis la skabenejo.

T'Serclaes penetris en tiun konstruaĵon rekte tra amason da halebardistoj kaj urbaj kurieroj kaj eniris ĉambron, kie kuŝis sur benkoj laŭlonge de muro kelkaj glavoj kaj arbalestoj. Li malzonis sian glavon kaj diris al la servisto, kiu sekvis lin:

“Mi alvenis iomete tro malfrue: la aliaj jam estas ĉi tie. Metu mian kaskon sur tiun ĉi benkon. Iru al *de Sterre* kaj trinku intertempe poton da nigra biero.”

Tiam li paŝis plu tra la koridoro. Urba servisto malfermis por li la pordon de la kunvensalono. Tie ĉi sidis ĉirkaŭ peza kaj larĝa tablo dudeko da personoj. Unue la skabenoj, membroj de la gentoj. Oni povis rekoni ilin per ilia pli riĉaj vestaĵoj. Tiuj kiuj apartenis al la kavalira rango, portis sian blazonon, broditan en kolora silko, sur la brusto de sia maŝkiraso. Unu el ili estis la ĉefskabeno. Ĉe lia flanko sidis du urbaj skribistoj, kiuj notis la decidojn de la kunveno. Ĉe ilia flanko sidis respektive la dojeno kaj la subdojeno de la Gildo de la Drapistoj, kaj trans la tablo la Ok de la Metioj, kiuj estis la elektitoj de la negocoj kaj kiujn oni allasis al la kunveno de la skabenoj nur en gravaj cirkonstancoj kaj kun konsila voĉo.

Ĉiuj tiuj ĉi viroj ŝajnis tre trankvilaj, sed iliaj seriozaj mienoj perfidis zorgon kaj maltrankvilecon. Ili sendube antaŭvidis, ke hodiaŭ oni decidus pri la sorto de Bruselo kaj la dukejo.

Kutime la amano⁴ laŭrajte prezidis la sesiojn de la skabenaro, sed tial ke tiu alta oficisto forestis pro grava malsano, li estis anstataŭigita de la plej maljuna skabeno, t'Serants. Tiu ĉi kavaliro, kies dorso kurbiĝis sub la premo de la jaroj, malfermis la kunvenon per martelfrapo, tuj kiam li konstatis, ke t'Serclaes, interŝanĝinte saluton kun siaj kolegoj, okupis ĉe la tablo la fotelon destinitan al li. Li alparolis la kunvenon tiel:

“Sinjoroj Dojenoj de la gildo de la drapistoj kaj Sinjoroj la Ok de la Metioj! Antaŭvidante, ke la minaca situacio de niaj aferoj povus devigi la skabenaron fari gravajn, jes superajn decidojn, ĝi invitis vin al sia kunveno por ekkoni vian opinion kaj ricevi vian saĝajn konsilojn. Nia urbo Bruselo estas ĉirkaŭita de fortega malamika armeo kaj ĉia liverado de ekstere al ĝi tranĉita. La grafo de Flandrio nur atendas siajn gigantajn ramojn por perforte ataki nian urbon. Certe, ni ĉiuj estas pretaj verŝi nian sangon por la defendo de niaj propraĵoj, niaj familioj kaj nia libereco. Sed vidante niajn etajn fortojn kaj la mirige grandan nombron de niaj malamikoj, ni devas demandi nin, ĉu ne estus tro aŭdace kapti tiel necertan ŝancon – eĉ per grandaj financaj oferoj – aŭ eviti la neegalan bataladon kaj protekti nian gepatran urbon kontraŭ sturmado kaj prirabado. Tiu konsidero instigis nin aliri la grafon de Flandrio por ekkoni liajn postulojn. Dum nia kunveno de hieraŭ vespere, ni do decidis sendi ambasadorojn al la malamika armeo kaj komisiis per tiu misio la sinjorojn Clutinc, Van Heetvelde, Vederman kaj

³ Nuntempe la Grasmarkt.

⁴ Urbestro.

Meerte. Tiuj ambasadoroj plenumis sian taskon kaj estas pretaj doni raporton pri tio. Tial mi donas la parolon al sinjoro Clutinc.”

“Mia raporto estos tre mallonga, Sinjoroj,” diris sinjoro Clutinc. “Kion mi havas direnda estas ja simpla, sed tre malĝojiga. Kun vindaĵo sur la okuloj laŭ milita kutimo oni kondukis nin antaŭ la grafon de Flandrio, kiu akceptis nin inter siaj armeestroj kaj kavaliroj. Ni respektoplene eksplikis al li la celon de nia misio kaj proponis paĝi al li la plej grandan parton de la ŝuldo de la duko, certigante lin, ke Bruselo garantios la plenan pagon fare de la aliaj urboj de la duko. Sed ni postulis kompreneble samtempe, ke la sieĝo de urbo estu tuj ĉesigita kaj la teritorio de la tuta duko malokupita. La grafo de Flandrio trovis ofenda por li, ke ni en tia situacio kuraĝis ankoraŭ meti kondiĉojn al li, kaj respondis nin kun kolero kaj moko. Tuj kiam liaj ramoj estos alvenintaj, li diris, unu tago sufiĉos al li por ekokupi Bruselon. Li postulas la senkondiĉan kapitulacion de la urbo kaj trudos al ĝi sian volon. Kiajn ajn kialojn ni validigis kaj kiajn ajn ofertojn ni proponis, li senkompate kaj malŝate rifuzis ĉion. Sinjoro Van Heetvelde kuraĝis diri al li – sendube en sia propra nomo –, ke la Bruselanoj sentas malmultan afekcion por siaj gedukoj, kaj certe kun amo kaj danko akceptus la grafon de Flandrio en Bruselo, se li volus konsenti respekti la propraĵojn kaj rajtojn de la loĝantaro. La alparolo de sinjoro Van Heetvelde estis tre humila, eĉ senhonoriga por ni miaopinie... kaj tamen la grafo kaj liaj kavaliroj priridis lin...”

Raŭkaj murmuroj kaj malklaraj krioj resonis tra la salono. Precipe la Ok de la Metioj montriĝis incititaj, grincis per la dentoj kaj pugnis la manojn

“Vi ne diras ĉion!” krude diris Van Heetvelde kun apenaŭ retenita akreco.

“Ne, mi ne diras ĉion,” reprenis Clutinc. “Malĝojaj, profunde ofenditaj kaj denove kun vindkovritaj okuloj ni estis rekondukitaj el la tendo de la grafo, silente paŝante antaŭ la gardistoj por kaŝi nian honton. Subite mesaĝisto venis al ni, dirante, ke sinjoro Van Heetvelde sola devas reiri al la grafo. Nin oni kondukis en tendon kaj igis nin atendi tie. Kion la grafo de Flandrio diris al nia samfunkciulo, li povos komuniki al vi pli bone, ol mi.”

“Sinjoro Van Heetvelde, al vi la parolo!”

Van Heetvelde estis alta kaj maldika viro kun etaj, brilaj okuloj. Lia vizaĝo ŝajnis malkaŝi malhumilecon kaj nervozan senpaciencon, ĉar antaŭ ol la vortoj falis el lia buŝo, liaj maldikaj lipoj tremetis, kvazaŭ interna febro malserenigis lin.

“Jes, la grafo de Flandrio revokis min sola en sian tendon,” li diris. “Mi rigardis min honorita

per tia distingo kaj vidis tion samtempe kiel bonsanĉon por Bruselo. Nian senditaron la grafo efektive akceptis kun kolero kaj moko, sed al mi li deklaris, ke li estos preta respekti niajn propraĵojn kaj liberecojn, se, antaŭ ol dudek kvar horoj estos pasintaj, ni demetos niajn armilojn, malfermos la pordegojn kaj salutos lin kiel nian sinjoron... Vi murmuris kaj ŝajnas kolera, miaj Sinjoroj? Sed ni ne estas ĉi tie por pasigi nian tempon per neutila montrado de kuraĝo! Al kio povos konduki nin vanaj vortoj aŭ sensencaj provoj. Al spektaklo de Bruselo en fajro kaj flamoj, al perdo de niaj propraĵoj kaj eble de nia vivo!”

“Sed, sankta ĉielo, ĉu vi do konsilas nin transdoni la urbon sen fari ion ajn por ĝia defendo?” ekkriis t’Serclaes kun forta sento de indigno, kiun li vane provis mastri. “Ĉu akcepti fremdan princon kiel landan sinjoron?”

“Ba, vi scias tiel bone kiel mi, ke nia duko Venceslao ne meritas, ke ni metu nian belan Bruselon pro li en la danĝeron esti bruligita aŭ prirabita.”

“Ne temas ĉi tie pri duko Venceslao,” reprenis t’Serclaes, “sed jes pri nia kara dukino Johana, la heredintino de niaj maljunaj dukoj, kies bonfaroj devigas nin defendi per nia sango ilian lastan idon!”

“Grandaj kavesonaj vortoj,” interrompis lin Van Heetvelde, “kiujn oni prononcas ĉi tie nur por flati la popolon kaj paradi kiel heroo.”

“Ha, mi flatas la popolon?” replikis t’Serclaes, ofendita. “Kaj kion do faras vi kaj tiuj kiuj samopiniis kun vi? Per via malbona konsilo kaj via timo vi forprenas la kuraĝon al la alie tiel kuraĝa loĝantaro de Bruselo kaj instigas ĝin al malŝato de sia devo.”

“Mi malŝatas tiajn akuzojn,” estis la respondo de lia kontraŭulo. “Al mi estas egale, kion oni opinias pri mi sur la vendoplaco kaj stratoj. La konservon kaj la bonfarton de nia urbo mi rigardas kiel mian plej altan devon.”

“Sed,” reprenis t’Serclaes, “memoru do, kiel vi ĵuris kune kun ni al nia karmemora duko defendi sian infanon kontraŭ ĉia malamiko je perdo de via vivo kaj propraĵoj. Apud la mortlito de la duko vi eĉ renovigis tiun ĵuron ne petite. Nun vi volas rompi tiun sanktan vorton. Nia dukino, fidanta nian afekcion kaj nian fidelecon, restadas inter ni. Kaj nun vi konsilas nin liveri la povran dukinon inter la manojn de ŝia malamiko, jes, malkuraĝe kaj perfide vendi ŝin por eskapi imagitan danĝeron.”

“Kia bela afero!” mokis Van Heetvelde. “Ĉu la sturmo kaj prirabo de Bruselo estas imagita danĝero?”

“Tio ne estas kion plej timas homoj de via speco,” respondis t’Serclaes pli trankvile. “Mi eĉ pretas kredi, ke vi kaj viaj amikoj kredas elekti la solan bonan vojon. Sed vi eraras.

Konfesu do: tio kion vi volas eviti eĉ je perdo de nia honoro kaj nia libereco, estas la liverado de armiloj al la metiistoj. Vi rezistas la patrian krion de la urbo. Vi restas surdaj al la ripetataj petegoj de nia dukino, kiu opinias, ke la kuraĝo de la loĝantaro povos savi ŝin. Kial do tiu danĝera obstineco? Vi timas, ke la metiistoj povos denove ribeli kontraŭ la gentoj por malpliigi niajn privilegiojn. Sed tiaj kalkuloj estas neĝustatemaj, kiam nur la forta brako de la popolo povas defendi la urbon kaj la patrion. Kial ajn vi oponas tiun ideon, bezono devigas nin armi la metiojn!”

“Jes, jes, vere, necesas armi la popolon! Tio estas la sola rimedo kiu restas al ni!” kriis la Ok de la Metioj.

Tiu aprobo de la vortoj de sia kontraŭulo vundis Van Heetvelde tre profunde kaj li paliĝis pro bedaŭro.

“Mi parolas kiel libera viro kaj estas stimulata nek de ambicio nek de egoismo,” li diris kun amara moko. “Sed mi konas popularajn heroojn kies troa amo al nia dukino havas nenian alian fonton ol ilia espero je malavara rekompenco: ekzemple ricevi la altan dignecon de amano...”

“Ĉu vi parolas pri mi? Mi amano?” ekkriis t’Serclaes, indigniĝinta. “Neniam mi pensis pri tio. Sed mi kontraŭe konas virojn, kiuj faris ĉiajn ajn klopodojn, ekde la senespera malsano de sinjoro Jan Van Crainhem, nia amano, esti nomumita en tiu alta ofico kaj kiuj elkraĉas nun sian malamon kontraŭ niaj gedukoj, ĉar iliaj petegoj estis malakceptitaj.”

La ĉefskabeno, kiu timis, ke tiu persona disputo – se oni lasus ĝin daŭri –, ankoraŭ pliakriĝus, tiel forte frapis per la martelo sur la tablo, ke li superis ĉiujn aliajn bruojn kaj altrudis ĝeneralan silenton. Tiam li diris:

“Pro Dio, Sinjoroj, ni ne forgesu, ke ni estas kune ĉi tie por interkonsiliĝi pri niaj plej karaj interesoj. Ĉesigu, mi petas vin, tiujn personajn disputojn kaj koncentriĝu je la grava punkto pri kiu ni devas decidiĝi hodiaŭ. Mi ne plu toleros, ke oni ankoraŭ deviu de ĝi, kaj al tiu kiu ankoraŭ faros tion, mi tuj forprenos la parolon... Ni sendis ambasadorojn al la grafo de Flandrio. Se ni resumas, kion ili raportis al ni, ni povas nur elekti inter du ekstremaj rimedoj, nome aŭ malfermi niajn pordegojn kaj submeti nin sen rezisto kun la firma espero, preskaŭ certeco, ke oni respektos niajn propraĵojn kaj liberecojn... aŭ atendi la sturmon kaj obstine defendi niajn remparojn kun la espero – la malgranda espero – elteni ĝin ĝis nia indulgema duko alkuros kun armeo el Limburgo por helpi nin...”

“La duko ne havas monon kaj vane provas kolekti armeon en Maastricht,” rimarkis Van Heetvelde. “Oni amas lin tie same tiel malmulte

kiel ĉi tie. Ĉu ni ne scias, ke li ankoraŭ ne kunigis du mil virojn?”

“Sekve de tio, Sinjoroj,” daŭrigis la ĉefskabeno, “ni devas nun decidi, ĉu ni kapitulacos ĉe la malplej duraj kondiĉoj, aŭ ĉu ni rezistos ĝisekstreme... ĉar kun la malgrandaj fortoj pri kiuj ni disponas, ni ne povas konsideri ataki la malamikon en aperta kampo.”

“Ĝuste tie sidas la nodo de la situacio,” diris t’Serclaes. “Armu la metiojn, kaj subite vi fariĝos same tiel forta, kiel la malamiko. La grafaj bandoj konsistas nur el ĉiaj kunigaĉitaj militistoj kaj aventuristoj, jes, eĉ el resto de la fifamaj prirabintoj, la Blankaj Bandoj, kiuj servis kiel dungitaj soldatoj sub reĝo Karlo de Navaro en Francio. Ĉu ni, kiuj havas por defendi niajn legalajn gedukojn, nian patrion, nian honoron kaj nian liberecon, ĉu ni ne batalus kun pli da kuraĝo kaj sentimeco ol aventuristoj kaj dungitoj, kiujn instigas nur deziro al prirabado? Mi diras: al ni mankas nek armiloj, nek ramoj: la turoj de niaj remparoj, la ĉambroj super la pordegoj estas plenaj je ili. Ni armu la popolon, la kuraĝan popolon...”

“Jes, ĉar ne estas alia rimedo, ni armu la popolon!” konfirmis kavaliro Clutinc.

“Neniam, tio neniam!” intervenis van Heetvelde kolere.

“Ne, al tio ni neniam konsentos!” kriis alia skabeno el la gentoj.

“Mi petas la parolon!” diris unu el la Ok, granda kaj muskola viro kun larĝaj ŝultroj kaj ruĝa vizaĝo.

Kiam oni permesis al li paroli, li diris preskaŭ malafable:

“Mi estas buĉisto. Mia metio estas buĉi oksojn. Tranci viandon kaj fari kolbason mi scipovas pli bone ol paroli, sed ĉiu birdo kantas laŭ sia beko... Mi ĉiam konfuziĝas en miaj vortoj. Kion mi volas diri, Sinjoroj, estas, ke vi devas rapide doni armilojn al la membroj de nia metio. Ili scias, ke vi decidis pri tio hodiaŭ. Se vi rifuzos, ili sturmos hodiaŭ posttagmeze la armilejojn.”

“Tio estas vera!” kuraĝis aldiri la delegito de la ŝufaristoj. “Ĉiuj metioj, la tuta popolo de Bruselo volas rezisti ĝisekstreme kaj krias por ricevi armilojn. Ĝis nun, ni povis trankviligi niajn virojn, ĉar ili ĉiam esperas je favora decido. Sed pro via propra sekureco, Sinjoroj, atentu, ke vi ne trompu tiun esperon! Niaj viroj opinias, ke nur la gentoj volas malhelpi ilin defendi la urbon. Se la popolo devus vidi la komencon de la sturmo, ne estante armita, ĝi pensus, ke la urbo estas perfidita kaj, estu certaj, rojetoj da sango fluus interne de niaj remparoj!”

Tiuj vortoj forte impresis la skabenojn de la gentoj. Nur Van Heetvelde restis neŝancelebla. Sur liaj lipoj ŝvebis mokrideto.

“Kiel do viro povas esti tiel blinda!” diris t’Serclaes. “Via plej fervora deziro – same kiel la mia – estas, ke la gentoj konservu sian legalajn aŭtoritatojn kaj privilegiojn. Se nun la popolo ribelus kontraŭ ni kaj sange venĝus sin al niaj amikoj kaj parencoj, ĉu tiam via celo estus atingita? Kaj se tiu ribelo povus esti subpremita kaj vi transdonus la urbon al la malamiko aŭ eĉ vane defendus ĝin, ĉu la popolo, kiu rigardus nin kiel perfidulojn kaj vendistojn de la urbo kaj de la patrio, ne malbenus kaj eterne abomenus nin? Jes! La gentoj restus makulitaj per malhonoro kaj pereus sub la pezo de nia malfideleco kaj malkuraĝeco.”

“Ni balotu!” kriis iu skabeno.

“Jes, jes, ni balotu! Ĉio estas dirita kaj sciata. Ni jam perdis sufiĉe da grandvalora tempo diskutante, dum granda danĝero minacas nian karan urbon. Ni balotu! Ni balotu!” ripetadis la dojenoj de la gildoj kaj la Ok de la Metioj.

Van Heetvelde, timante, ke oni faros decidon kontraŭan al sia opinio, provis ankoraŭ kontraŭargumenti, sed la ĉefskabeno forprenis al li la parolon, dirante:

“Bone, Sinjoroj, ni procedu al balotado. Pri la eventuala armado de la popolo oni decidus poste. Nun mi unue proponas al balotado la demandon, ĉu ni malakceptos la postulojn de la grafo de Flandrio kaj defendos nian urbon ĝisekstreme.”

La ĉefskabeno turnis sin al Van Heetvelde. Tiu forte ekkriis:

“Ne!”

La dua skabeno esprimis la saman nean opinion, sed ekde tiam preskaŭ ĉiuj balotis por obstina defendo, tiel ke el la sep skabenoj kaj du gildodojenoj ses respondis per ‘jes’ kaj nur tri per ‘ne’.

Van Heetvelde ankoraŭ ne perdis la tutan esperon. Ke la plimulto de la skabenoj balotis por la defendo, neniel mirigis lin. Li tamen opiniis, ke ili sendube hezitos decidi favore al la armado de la popolo.

Sed la balotado pri tiu grava demando donis la saman rezulton, kaj la plimulto kaj la Ok de la metioj eksaltis, svingis per la brakoj kaj kriis kun ĝoja entuziasmo:

“Vivu Bruselo! Vivu la granda duko! Vivu Brabanto! Vivu!”

Ili fervore dankis t’Serclaes kaj entuziasme premis al li la manon, ĉar ili estis konvinkitaj, ke oni ŝuldas tiun honorplenan decidon al lia patrioteco kaj persistemo.

“Sinjoroj,” diris Van Heetvelde kun ŝerca bedaŭro, “mia ĉeesto hodiaŭ ne plu utilas ĉi tie. Mi lasas la respondecon kaj la plenumon de viaj decidoj al tiuj kiuj instigis vin al ili. Adiaŭ. Dio protektu nian mizeran Bruselon.”

Kaj prononcinte tiujn vortojn li forlasis la konsilejon.

La ĉefskabeno frapis per la martelo kaj diris en tre senkuraĝa tono:

“Sinjoroj, vi decidis defendi nian urbon ĝisekstreme, sen lasi reteni vin per la terura penso, ke nia aŭdacego povus rezultigi la detruon de Bruselo. Fariĝu via volo... Sed mi estas tre maljuna kaj jam ne povas preni sur min solan la pezan ŝarĝon de la plenumo de viaj decidoj. Mi do proponas komisi sinjoron t’Serclaes per ĉio kio koncernas la baldaŭan armadon de la metioj. Urbaj kurieroj, paĝioj kaj skribistoj estos je lia dispono kaj obeos liajn ordonojn.”

Post kiam la aliaj voĉhavaj membroj aprobis tiun proponon per aplaŭdo, la ĉefskabeno daŭrigis:

“Se okazos io speciala, pri kio via balotado aŭ via konsilo ŝajnas al ni utila, ni avertos vin per kurieroj. Nun mi nur memorigas al vi, ke morgaŭ antaŭtagmeze je la dek-unua nia indulgema dukino Johana promenos sur la remparoj kaj inspektos niajn arkpafistojn kaj la membrojn de la Drapistgildo. Mi ĉesigas la kunvenon... Ĝis revido, Sinjoroj.”

Interŝanĝinte kelkajn vortojn, ĉiuj forlasis la salonon.

Dum t’Serclaes zonis sian glavon en la antaŭĉambro, Hugo Clutinc diris al li:

“Van Heetvelde havas malbonan karakteron. Ĵaluzeco blindigas lin ĝis senprudenteco.”

“Ĉu li vere imagus, ke mi faras klopodojn por fariĝi amano?”

“Ek, t’Serclaes, ne ŝajnu. Vi bone scias, kial li malamas vin. Lia nevino, Sabina Van der Aa, estas la kaŭzo de lia kolerado kontraŭ vi. Li estas ŝia kuratoro kaj arde deziras, ke ŝi edziniĝos al sia filo Willem. Cetere ŝi estas la sola infano de sia riĉa patro. Sed nia dukino instigas la fraŭlinon por doni sian manon al via filo Everard.”

“Sed, Sinjoro Clutinc, la gejunuloj amas sin jam de pluraj jaroj kaj estis gefianĉiĝontaj, kiam eksplodis tiu mizera milito.”

“Van Heetvelde tamen kredas, ke vi akiris, per ĉiaspecaj intrigoj, la subtenon de la dukino kontraŭ li.”

“Ĉu intrigoj? Kiu komandas la amsentojn en junaj koroj? Kion mi povas fari pri tio? Mi tamen ne ĝenos la feliĉecon de mia filo, nek oferos lian estontecon por plaĉi al viro en kies brusto brulas envio. Sed ekskuzu min, Sinjoro Clutinc, ne estas nun la tempo diskuti pri tiaj problemoj.”

“Ĉu vi ne venas? Ni promenos kune kelkan distancon.”

“Ne, mi reeniros ĉi tien por kunvoki la urbajn kurierojn kaj paĝiojn kaj disdoni ordonojn por la

armado de la metioj. Mi estos okupita la tutan tagon pri tiu laboro kaj, se necese, mi oferos al ĝi parton de mia nokta ripozo. Mi volas fari ĉion eblan por ekhavi grandan parton de la metiistoj armitaj morgaŭ tagmeze. Estos granda ĝojo por nia dukino vidi, ke la tuta loĝantaro de Bruselo pretas defendi ŝin.”

“Tiam ĝis morgaŭ, amiko t’Serclaes.”

“Ĝis morgaŭ.”

Ili premis la manon unuj al la aliaj. Clutinc paŝis al la elirejo, dum t’Serclaes remalaperis en la internon de la skabenejo.

II

Tiun tutan matenon la ĉielo super Bruselo tremetis pro la sonado de la trumpetoj, kaj dum multaj horoj tra la stratoj svarmadis armitaj viroj, kiuj venis el ĉiuj kvartaloj kaj direktis sin al la suda parto de la remparoj. Nun tiu ĉi bruado estis ĉesinta, kaj ĉiu staris post sia flago en sia vico atendante la alvenon de la dukino.

Ĉe la pordego Sankta-Katarina ariĝis la ĉefoj de la soldatoj, la kavaliroj kaj la skabenoj, kiuj ne apartenis al iu gildo. Tie oni vidis interalie: la grafon van Berg, armeestron en la nomo de la duko, kiu en tiu funkcio komandis la tutan armeon de Brabanto; Bernhard de Borgneval, estron de la Lovenaj arkpafistoj; la sinjoron de Assche, heredan standardiston de Brabanto; kaj eĉ Zeger Van Heetvelde, la skabenon kiu oponis en la urba konsilio tiel obstine la armadon de la metioj.

Je la dekstra flanko de la pordego, malantaŭ la muro ĉe la Wolvengracht, staris la soldatoj de la dukino. Je la maldekstra flanko malfaldiĝis granda grupo da viroj armitaj per ŝtalaj arbalestoj. Tio estis la granda Gildo de la Pafistoj, kies membrecon la civitanoj rigardis kiel honoron. Kvankam en normala tempo la nombro de ĝiaj membroj estis strikte difinita, oni nun enkorpusigis por defendi la urbon ĉiujn bonajn virojn kiu posedis arbaleston kaj sciopovis uzi ĝin. Eĉ multaj junuloj de la gentoj troviĝis inter tiuj pafistoj.

Tiel staris en la unua vico junulo de proksimume dudek kvin jaroj, en kiu oni rekonis, pro lia pli elegantaj kaj pli prizorgitaj vestaĵoj, riĉan civitanon. Li havis altan staturon kaj belan virecan vizaĝon, kaj li ridetis kun ia ĝojbrilo en siaj okuloj, kvazaŭ la vido de la kolektiĝinta armeo de Bruselo igis lin feliĉa kaj fiera. Tiu junulo estis Everard t’Serclaes, la filo de skabeno t’Serclaes.

Je kelkaj paŝoj de li staris Willem Van Heetvelde, la filo de la malamiko de lia patro

kaj lia rivalo pri la mano de la ĉarma Sabina Van der Aa. Willem povis havi du aŭ tri jarojn malpli ol Everard, havis teneran staturon, palajn vangojn kaj mildajn vizaĝtraĵojn. Liaj necertaj bluaj okuloj perfidis, ke li estas rezignacia kaj tolerema junulo, kaj ke karaktere li tute ne similas al sia patro, kiu estis konata al ĉiuj kiel kolerema, despoteca kaj rankora viro.

De tie ĝis malproksime preter la monaĥinejo de la Nigraj Fratulinaj staris la membroj de la gildo de la drapistoj – teksistoj, fulistoj, tondistoj kaj farbistoj – tre grandnombraj, preskaŭ netraverseblaj, ĉar tiutempe en la malnova kortega urbo de Brabanto la drapindustrio estis tiel floranta kaj fama, ke eĉ fremdaj princoj prefere vestis sin per la plej fajnaj Bruselaj teksaĵoj.

Tamen sur la interna remparo ekde la preĝejo Sankta-Gudula laŭlonge de Zavelgracht kaj Wolvengracht ĝis la rivero Zeno oni povis vidi armitajn Bruselanojn kuniĝintaj en bruajn grupojn de multaj miloj. Ĉi tie staris la diversaj metioj, kiujn oni estis arminta rapide kaj kiel eble plej la antaŭan tagon per mallongaj lancoj, kiuj aspektis kiel pezaj kluboj provizitaj per fera pinto kaj estis vere teruraj armiloj kontraŭ malamiko, kiam fortaj viroj uzis ilin per ambaŭ manoj por piki aŭ bati.

Sur la vasta parto de la remparoj, kiun kovris ilia svarmanta amasego, flirtis ja kvindek standardoj, sur kiuj estis bildigitaj per brilaj koloroj la produktoj aŭ laboroj de ĉiuj metioj. Ili devis indiki al la membroj de la diversaj metioj sian lokon. Sed ĉar tiu aranĝo estis tute nova, la pli multaj ankoraŭ ne sciis, en kiu vico ili devas stari. Krome, la eksciteco pro la fakto, ke li povos partopreni en la defendo de la urbo, la espero, ke oni baldaŭ atakos la malamikon en la aperta kamparo, la belega somervetero, tio ĉi kune eble gajigis ilin kaj inklinigis ilin esprimi sian senpaciencon per laŭtaj patriamaj krioj kaj grandaj gestoj. Iliaj dojenoj kaj kapitanoj ne povis teni ilin trankvilaj, kiajn ajn klopodojn ili faris. Sed kie ajn montris sin la ĝenerala ĉefo, ĉiuj silentis pro respekto kaj staris trankvile en siaj vicoj, ĝis li estis preterpasinta sufiĉe malproksime por ne vidi aŭ aŭdi ilin. Tiu ĉefo estis neniu alia ol skabeno t’Serclaes, kiu pro la ĝenerala insisto de la metioj mem konsentis esti ilia komandanto. Kvankam la vigla aktivaĵo kaj la longa starado sub la ardaĵ sunradioj multe lacigis lin, li haste promenis laŭlonge de Wolvengracht, korektis mankhavajn enviciĝojn, disdonis ordonojn, invitis la virojn al disciplino kaj obeo por liberigi Bruselon kaj sian patron.

Tiel li proksimiĝis al la pordego Warmoes⁵ por ankoraŭfoje viziti la forĝistojn, la kaldro-

⁵ Tiu pordego troviĝis mezvoje de la strato Warmoesbreg

nistojn kaj la glavfaristojn, kiuj staris antaŭ Zavelgracht, kiam li subite aŭdis kelkajn trumpetojn resoni malantaŭ la monteto Sankta-Miĥaelo. Li aŭskultis kelkan tempon por esti certa, ke li ne eraras, kaj tiam diris al la dojeno de la forĝistoj:

“Donu al via kornisto la ordonon sonigi la konatan signalon. Nia indulgema dukino Johana alvenas!”

Kelkaj longaj, akraj tonoj traboris kiel ceremonia anonco la aeron kaj estis tuj ripetataj per kornoj kaj trumpetoj sur la tuta longeco de la remparoj.

“Serclaes ne eraris. Dukino Johana mal-supreniris kun sia sekvantaro la monteton Sankta-Miĥaelo. Tute sola ŝi sidis en malferma ĉevalpalankeno, speco de kaleŝo sen radoj, kiu ripozis sur longaj stangoj lokita inter du ĉevaloj kaj portata de ili, unu antaŭe kaj la alia malantaŭe. La dukino ne havis pli ol tridek kvar jarojn kaj povis ankoraŭ estis rigardata kiel bela virino. Ŝia pala kaj laca vizaĝo pensigis, ke ŝi, kvankam sidanta sur la duka trono, jam multe suferis. Per la simpleco kaj la malhela koloro de siaj vestaĵoj ŝi verŝajne volis montri, ke ŝi funebris pro la katastrofo, kiu trafis la landon, ĉar ŝi estis tute nigre vestita kaj portis nur kelkajn brilajn juvelojn sur sia brusto kaj sia kapvesto.

Malantaŭ la ĉevalpalankeno piede sekvis ĉikaŭ dudek nobelinoj kaj ankaŭ procesio de kavaliroj, kiuj apartenis al la oficistaro de la kortego.

Inter la nobelinoj oni distingis unuavide la ankoraŭ tre junan Sabinan Van der Aa, ĉarman knabinon kun dolĉaj bluaj okuloj, freŝa rozkolora vizaĝo kaj kun tiel simpla, sed simpatia rideto sur la lipoj, ke ŝi, se tiel diri, ravis la koron de ĉiu kiu proksimiĝis al ŝi. Ĉe tio ŝi estis riĉega heredotino. Do ne mirige, ke ĉiuj junuloj, kiuj, kuraĝigite per sia alta naskiĝo aŭ sia riĉeco, aŭdacis rigardi tiel alten, aspiris al ŝia mano. Sed ŝi, sekvante sian korinklinon kaj, stimulate al tio far la dukino mem, elektis inter ĉiuj kiel sian fianĉinon Everard-on, la filon de skabeno t’Serclaes. Kvankam ŝia kuratoro, sinjoro Van Heetvelde, provis per ĉiuj rimedoj preventi tiun geedziĝon, li estis senpova kontraŭ la deziro de ŝia patrino kaj la volo de la dukino. Tuj kiam la malamiko estis ĉesigonta la sieĝon de Bruselo kaj oni ne plu estis devonta timi tujan danĝeron, Everard t’Serclaes estis kondukonta ŝin al la altaro kaj ŝi estis fariĝonta la feliĉa novedzino de la viro kiun ŝi tutkore amis.

Apenaŭ la dukino aperis ĉe la pordego Warmoes kaj fariĝis videbla por la membroj de la metioj, giganta bonveniga kriego leviĝis el la amaso:

“Vivu nia dukino! Vivu Brabanto kaj la granda duko! Vivu! Vivu! Vivu!” kriadis ĉiuj ĉeestantoj.

Dum Johana elpaŝis el la ĉevalpalankeno kaj piede proksimiĝis al la unuaj metioj, la amplenaj ĝojkrioj de la amaso ĉiam plifortiĝis. Sed kiam la metiistoj vidis, kiel la dukino premis la manon de la maljuna t’Serclaes, ili sentis sin fieraj pri tiel granda honoro farita al ili en la persono de ilia ĉefo, kaj la esprimo de ilia ĝojo kaj amo resonadis kiel seninterrompa tondrado super la domoj de la urbo, tiel ke la dukino ridetis al ili kaj dankis ilin pro iliaj pruvoj de afekcio per modesta kapjesado.

Kiam post sufiĉe longa tempo la bruado mallaŭtiĝis, la dukino diris al la ĉefo de la metioj:

“Sinjoro t’Serclaes, kreu je mia sincera dankemo. Mi scias, kiel forte vi kontraŭstaris la senkuraĝigantan konsilon de iuj homoj, kiuj opinias, ke en tiu ĉi malfeliĉega tempo ili povas disigi siajn interesojn de tiuj de sia dukino sen damaĝi sian honoron. Se mi vidas nun armita la kuraĝan popolon de Bruselo, pretan verŝi sian sangon por la urbo kaj por mi, mi dankas tion al vi. Estu certa, ke mi neniam forgesos, kiuj montriĝas miaj veraj amikoj en malfeliĉeco.”

“Indulgema Dukino, per via bonkoreco vi supertaksas miajn meritojn. Mi plenumas nur mian devon,” murmuris t’Serclaes.

“Certe, Sinjoro Skabeno. Estas nur unu maniero vere plenumi sian devon, sed estas pluraj manieroj kompreni ĝin. Almenaŭ via koro troviĝas sur la ĝusta loko.”

Kaj turniĝante, ŝi donis signon al Sabina Van der Aa, tiris ŝin per la mano pli proksimen kaj diris kun rideto:

“Kara Sabina, venu do saluti nian amikon, sinjoron t’Serclaes, kiu baldaŭ estos via kara bopatro. Vi scias, ke li multe amas sian bonan Everard-on kaj fieras pri li kiel la lumo de sia maljunaĝo. Sed en lia nobla koro estas sufiĉe da spaco por doni la plej bonan lokon al sia dua infano, la novedzino de sia filo.”

Unue la fraŭlino rigardis kun radianta rideto en la okulojn de la maljuna skabeno, sed nun konsternita per la vortoj de la dukino, ŝi mallevis la rigardon.

“Ĉu vi silentas, Sabina?” ŝercis la dukino bonkore. “La perspektivo de la feliĉeco kiu atendas vin, emocias vin... Sed diru do ion al la patro de Everard!”

Kiel nura respondo Sabina metis la brakon sur la ŝultron de t’Serclaes kaj kisis lin, murmurante saluton. Larmoj saltis en la okulojn de la skabeno, dum li tenere premis la amandan knabinon sur sian koron.

La armeestro kaj la kavaliroj, kiuj estis eksciintaj la alvenon de la dukino per la sonado

de la trumpetoj, rapide alkuris kaj alvenis ĝustatempe por vidi la belan Sabina Van der Aa inter la brakoj de la maljuna t'Serclaes. Sur ĉies lipoj aperis rideto de simpatio. Nur Van Heetvelde paliĝis ĉe tiu ĉi spektaklo tiel doloriga por li, kaj lia buŝo tordiĝis en grimacon pro malamo kaj ĵaluzo. Sed preskaŭ same tiel rapide li ekregis sian konsternacon kaj sur lia vizaĝo restis nenio plu videbla ol esprimo de silenta moko.

La ĉefoj kaj la kavaliroj respektoplene salutis la dukinon, kiu post tiu ceremonio komencis konversacion kun la armeestro, la grafo van Berg, pri la stato de la aferoj kaj la bona inklino de la metiistoj. Sub la preskaŭ kontinua ĝojkriado de la metioj ŝi promenis laŭlonge de iliaj vicoj iam kaj iam afable alparolante la kapitanojn kaj la armitajn laboristojn mem.

Post kiam ŝi ankaŭ revuis la dukajn soldatojn, ŝi proksimiĝis al la pordego Sankta-Katarina kaj esprimis sian deziron grimpi sur la larĝan remparon kaj rigardi de tie la kamparon, kie oni povis vidi – tion oni diris al ŝi – bruli la fajrojn de la malamika armeo.

Obeante al sia deziro oni montris al ŝi de sur la remparo la malamikan kampadejon, kiu troviĝis malantaŭ la vojo al Dilbeek sur vastega kampo kiun oni nomis la *Hoge Kouter*, kiu troviĝis je unu horo da paŝado de la pordego. La antaŭpostenoj tamen kuŝis multe pli proksime, kaj kelkaj rajdistbandoj eĉ daŭre galopadis proksime de la urbo, sed ekster pafdistanco, por preventi ĉian komunikadon kun ĝi kaj alportadon de vivrimedoj.

Kio vekis la specialan atenton de la armeestro kaj kavaliroj, estis longa karavano de peze ŝarĝitaj vagonoj kaj ĉaroj, kiuj ŝajnis stari ekster la malamika kampadejo. Ne estis eble distingi de tiel for, kio estis ŝarĝita sur tiuj vagonoj. Finfine oni ĝenerale adoptis la opinion, ke alvenis la sturmiloj de la malamiko. Sed la armeestro diris ridetante, ke ili bezonas ankoraŭ multan tempon por instali tiel pezajn maŝinojn, kaj ke ĉiuokaze la Bruselanoj pretas prepari bonan akcepton al la malamiko kaj triumfe rebati lin.

Al la kapitano kiu staris sur la remparo kun siaj viroj kaj gardis ĝin, la armeestro demandis, ĉu tiuj vagonoj jam estas longe videblaj. La kapitano respondis, ke en la malamika kampadejo jam de kelkaj horoj estas seninterrompa foriro kaj alveno de vagonoj, kaj ke li nombras ja ducenton da ili. Per longa rigardado kaj streĉado de sia vidkapablo li povis distingi, li kredis, ke la vagonoj estas ŝarĝitaj per sakoj kaj sakegoj. Verŝajne la malamiko ricevis el Flandrio konsiderindan provizon da nutraĵoj por la viroj kaj la ĉevaloj.

Post tio oni ne plu atentis tiun detalon, tiom pli ke la dukino nun staris apud iuj pezaj

defendiloj kaj ŝajnis deziri eksplikojn. La grafo van Berg rapidis kontentigi ŝian deziron kaj eksplikis al ŝi la uzon de la *blijden* kaj de la *springhalen*, kiuj estis konstruitaj el dikaj traboj kaj per kiuj oni povis lanĉi aŭ longajn sagojn aŭ pezajn rokojn trans foraj distancoj. Li ankaŭ montris al ŝi la ferajn kaldronojn, pendantajn en movebla aparato, en kiuj oni boligis oleon aŭ grason por surverŝi la malamikon per tiuj ardaĵlikvaĵoj, kiam li starigos la sturmeskalojn.

Aŭdinte mallongan tempon la eksplikojn de la armeestro, la dukino malsupreniris de la remparo por daŭrigi la revuon de la Brusela batalontaro. Baldaŭ ŝi proksimiĝis al la vicoj de la pafistgildo, kie staris Everard t'Serclaes kaj Willem Van Heetvelde. Ambaŭ atendis la alvenon de la dukino kun batanta koro. Sed ilia rigardo provis penetri pli for en la procesion por rekoni tie, inter la aliaj nobelinoj, junan knabinon. Ĉu Sabina akompanus la dukinon hodiaŭ? Jes, tie brilis ŝia ĉarma vizaĝo kiel printempa rozo inter malpli belaj floroj! Ŝi eĉ tuj rigardis al ili!

Malferma, gaja rido estis la saluto de Everard. Willem kontraŭe lasis pendu la kapon kaj nur kuraĝis ĵeti iam kaj iam timidan deflankan rigardon. Kion li povis atendi? Ŝi amis alian viron. Nur la milito malrapidigis ŝian edziniĝon al Everard t'Serclaes. Por Willem, kies profundan amon ŝi malakceptis, ne plu eblis feliĉeco sur la tero. Li eĉ ne povis montri, kion li sentas en sia brusto, se li ne volis esti primokata de iu ajn konanta lin.

La dukino nomis ambaŭ junulojn per ilia nomo, diris afablajojn al ili kaj preterpaŝis. Tiam Sabina proksimiĝis al sia fianĉo, premis al li la manon kaj diris duone malgaje:

“Kiel terura estas tiu milito! Kiel ĝi finiĝos? Vi devos batali, Everard. Malamika armilo povus trafi vin... Kion mi farus tiam? Jes, vi estas viro, kaj viaj okuloj brilas pro kuraĝo kaj fiereco. Sed mi, malforta virino, devas timi kaj tremi. Tio estas mia sorto. Ne estu do tro riskema, mia amiko. Ne endanĝerigu vian vivon nenecese! Pensu pri mi!”

“Ha, kara Sabina,” respondis Everard, “ĉu vi povus respekti viron kiu malkuraĝe hezitus plenumi sian devon kontraŭ la patrio? Jes, mi deziras riski mian vivon por nia naskiĝurbo kaj nia indulgema dukino. Se mia sango devus flui pro tiu sankta afero, vi amus min ankoraŭ pli. Kial do mi ne supirus al tiu batalo? La malamiko de nia lando estas ankaŭ la malamiko de nia feliĉeco!”

“Vi pravas, Everard,” ŝi murmuris, “plenumu vian devon. Mi preĝos Dion, ke Li protektu vin. Adiaŭ, nia indulgema dukino jam estas for kaj atendas min...”

Kaj haste paŝante ŝi diris al la juna Willem Van Heetvelde:

“Bonan tagon, Sinjoro Willem. Ĉu vi ankaŭ estas pafisto? Estas bele tiel porti armilon por la patrio.”

Willem Van Heetvelde ekstremis, kiam li aŭdis tiun dolĉan voĉon alparoli lin. Li levis la kapon. En liaj okuloj brilis du larmoj, kiujn Sabina tamen ne vidis, ĉar ŝi jam preteriris.

Post duonhoro da malrapida promenado la dukino atingis apud la pordego Sankta-Jakobo la dekstran alon de la Drapista Gildo, kaj ĉar la revuo finiĝis, ŝi esprimis sian kontentecon al la armeestro kaj komisiis lin danki la tutan loĝantaron de Bruselo kaj la dukajn soldatojn pro ilia kuraĝa sinteno kaj la pruvoj de ilia alligiteco al la lando kaj la gedukoj. Post tio ŝi afable salutis ĉiujn kavalirojn, kiu estis akompanintaj ŝin, grimpis en la ĉevalpalankenon kaj foriris en la direkto de la Grendomo.

La grafo van Berg sendis kelkajn kurierojn por transdoni al la precipaj ĉefoj de la soldataro kaj metiistaro la ordonon tuj kunveni ĉe la pordego Sankta-Katarina por aŭdi el lia buŝo, kion la dukino komisiis lin diri al ili en ŝia nomo. Kelkan tempon poste li vidis ŝin ĉirkaŭita de pli ol sepdek ĉefoj. Li donis al ili signon, por ke ili silentu, kaj diris:

“Sinjoroj, nia indulgema dukino estas treege kontenta pri via kuraĝa sinteno kaj profunde tuŝita per la laŭtaj provoj de alligiteco, kiujn niaj viroj...”

Li eksilentis kaj kun miro rigardis al la urba gruo, kie estis aperinta fremdulo vestita en bruna mantelo kun longa bastono en la mano. Kliniĝante al iu kavaliro, kiu ĉiam akompanis lin, la armeestro demandis ĉe ties orelo:

“Ĉu tio ne estas nia spiono Brants, kiu venas ĉi tien tiel haste?”

“Efektive estas li, Sinjoro,” estis la respondo

“Verŝajne li alportas urĝan mesaĝon.”

Momenton poste la pilgrimanto aŭdace penetris ĝismeze en la rondon de la ĉefoj kaj diris al la grafo van Berg sufiĉe laŭte por esti komprenata de ĉiuj:

“Armeestro, mi ĵus venis el la malamika kampadejo. Mi vidis la morton de proksime, sed, danke al Dio, tio estis aranĝo de la ĉielo por permesi al mi surprizi gravan sekreton. Se vi volas venki la malamikon kaj forpreni al li la gravan trezoron kiun li forrabis al la dukejo, pretigu vin por eliri la urbon ankoraŭ hodiaŭ kaj ataki lin, ĉar morgaŭ estos tro malfrue. Ĉi-vespere la grafo de Flandrio malstarigos sian kampadejon kaj reiros kun sia tuta armeo al Gento.”

La mesaĝo surprizis lin. Neniu ŝajnis kredi je la ebleco de tia neatendata foriro.

“Brants, oni trompis vin. Tio estas certe falsa novaĵo,” murmuris la armeestro, skuante la kapon.

“Lasu min paroli kaj juĝu poste,” diris la spiono en tono de profunda konvinko.” Apogante sur mian pilgrimbastonon, mi paŝis rekte tra kelkajn bandojn da grafaj soldatoj kaj provis intertempe kompreni, kion ili diris. Mi asertis, ke mi estas malriĉa pilgrimanto el Wolvertem, kiu faras pilgrimon al Nia Kara Sinjorino de Halle por plenumi solenan pro-meson. Mi eĉ ripozis meze de incendigardistoj, kiam subite ulo rigardis min rekte en la vizaĝon, nomis mian veran nomon kaj deklaris, ke mi loĝas en Bruselo, kie li vidis min inter la urbaj halebardistoj. Kvankam mi igis la ulon dubi per miaj neŝanceblaj neoj, oni suspektis min pri spionado kaj kondukis min al la armeo, kie, post longa pridemandado, mi estis ligita al la meza fosto de tendo tiel maldolĉe kaj senkompate, ke vi povas ankoraŭ vidi la bluajn striojn de la kruele streĉitaj ŝnuroj sur miaj manradikoj.

“La ĉefoj kiuj esplordemandis min, forlasis min por interkonsiliĝi pri mia sorto. Intertempe mi povis peti Dion pardoni miajn pekojn, ili diris, ĉar la malpli doloriga kio povus okazi la mi, estis pendumo de la unua ajn arbo. Pli ol duonhoron mi restis tute sola. Ĉio ĉirkaŭ mi estis trankvila. Nenion alian mi aŭdis ol la paŝadon de la gardistoj antaŭ la tendo. Subite mi perceptis malantaŭ mi murmurado de voĉoj, kiuj ĉiam pli proksimiĝis kaj klariĝis. Devis esti la ĉefoj, kiuj estis interparolantaj malantaŭ la tendotuko, ĉar ili nomis sin reciproke per honoraj nomoj kiel grafo, monsinjoro kaj kapitano. Mi aŭskultis kun febra atento. Tio kion mi eksciis, multe mirigis min, kaj mi profunde bedaŭris, ke per verŝajna morto mi estos malhelpita malvali al vi la gravan sekreton kiun mi aŭdis. ‘Nia situacio fariĝas tro danĝera,’ diris tiuj homoj inter si. ‘Ni scias, ke la duko de Brabanto estas almarŝanta el Limburgo kun konsiderinda armeo. Se la Bruselanoj samtempe faras atakeliro, ni troviĝos inter du malamikaj armeoj kaj ni certe estos venkitaj. Estus stulte atendi tian malvenkon. Estas pli bone savi niajn konsiderindajn rabaĵojn. Ni havas oron kaj arĝenton kaj grandvalorajn ŝtofojn, eble cent vagonoj da ili, kaj estus tre malfacile en kazo de malprospereco gardi tiujn ĉi netakseblajn riĉaĵojn. Tial nia indulgema grafo decidis malstarigi la kampadejon kaj sekrete foriri tiun ĉi vesperon”.

Grumblado ekestis inter la mirigitaj ĉefoj de la Brusela batalontaro. Kelkaj kriis, ke oni devos tuj ataki la malamikon kaj forpreni al li la rabaĵojn. Sed per signo de la mano la armeestro ordonis ilin silenti kaj demandis la spionon, kion li eksciis kaj kiel li eskapis preskaŭ certan morton.

“La kavaliroj kiuj devis juĝi min,” respondis la

spiono, “revenis kun kelkaj soldatoj. Ili diris al mi, ke mi, kiel spiono, estis kondamnita al pendumilo. La soldatoj metis pendumŝnuregon ĉirkaŭ mian kolon kaj trenis min kiel beston el la tendo al arbo.

“La ŝnurego jam estis lanĉita trans elstaranta branĉo kaj ili estis hisontaj min, kiam du bele vestitaj kavaliroj – altaj ĉefoj sendube – proksimiĝis al ni kaj demandis, kio okazas ĉi tie. Ili denove pridemandis min. Miaj plendoj, ekskuzoj kaj timemaj petoj ŝajnis trafi iliajn korojn: la ideo mortigi veran, pian pilgrimanton, timigis ilin, kaj ili transmetis tiun timon al la ĉirkaŭantoj. Oni donacis al mi la gracon de la vivo. Kelkaj soldatoj ricevis la ordonon forkonduki min ekster la kampadejo sur la vojo al Halle kaj tie liberigi min.

“Efektive oni gvidis min tra inter miloj da malamikaj tendoj. Dum tiu traŭro mi ricevis la konvinkon, ke mi surprizis la veron: ĉie oni portis ĉiuspecajn objektojn al la ĉaroj, kaj mi vidis ankaŭ la sennombrajn ĉarojn sur kiuj estis ŝarĝitaj la rabaĵoj kaj la ĉevalojn, pretajn por esti jungitaj.

“Tuj kiam mi estis libera, mi rapidis tra Vorst por atingi la urbon. Mi eniris ĝin tra la pordego Steen kaj rigardas min nun ege feliĉa komuniki al vi la sekreton de la malamiko kaj fariĝi verŝajne la kaŭzo de lia malvenko kaj de nia venko⁶.”

“Tio estas do la signifo de la vagonoj kaj ĉaroj kiujn oni vidas apud la malamika kampadejo!” murmuris la armeestro al si mem.

“Sinjoroj,” li diris al la ĉefoj, “mi plene fidas la vortojn kiujn mi aŭdis. Sinjoro Brants estas sperta viro. Nur pro amo al sia patrio li riskis sian vivon por spioni niajn malamikojn. Krom tio, certaj cirkonstancoj plifortigas mian konvinkon, ke la grafo de Flandrio vere intencas foriri kun siaj rabaĵoj. Ĉu ni lasos lin pace foriri, aŭ ĉu ni provos forpreni al li la rabitajn objektojn kaj venĝi nin pro la plenumitaj fifaroj?”

“Batali! Batali! Senatende! Ni estas sufiĉe fortaj kaj ni estas pretaj!” kriis la ĉefoj.

Al neniu el ili venis la penso, ke la tuta historio pri la juĝo kaj liberigo de la spiono povus esti kalkulita ruzo de la malamiko por logi la Bruselanojn el ilia urbo. En sia varmega sopiro al batalo ili deziris tujan atakeliron, opiniante, ke la grafaj bandoj, surprizitaj per la neatendata atako kaj malordigitaj per la preparoj de la foriro, prezentos malfortan reziston. Nur la maljuna t’Serclaes esprimis la opinion, ke estus pli konsilinde lasi foriri la grafon de Flandrio ol riski necertan batalon. La metioj, kiuj nun konsistigis signifan parton de la

Bruselaj armitaj fortoj, estis enkorpusigitaj en la armeon nur de hieraŭ kaj certe mankis ankoraŭ multo al ilia armado kaj trejnado. Per tiaj nespertaj trupoj estas danĝere marŝi kontraŭ armeon da spertaj kaj trejnitaj batalantoj.

Sed liaj kontraŭargumentoj ne trovis resonon ĉe liaj kolegoj. La armeestro diris al li, ke la metioj konsistigos la ariegardon, tiel ke ili eniros la batalon nur kiam la resto de la armeo estos komencinta la batalon en decida maniero. Kvankam ne trankviligita, t’Serclaes deklaris esti preta plenumi sian devon kaj konduki la metiojn, kien oni ordonos ilin iri.

Tiam la armeestro resendis la ĉefojn al iliaj bandoj, admonante ilin prepari ĉion por atakeliro. Intertempe li estis interkonsiliĝonta kun sia militkonsilantaro por diskuti la necesajn aranĝojn cele al la atakeliro de la armeo.

Apenaŭ la ĉefoj atingis siajn trupojn, tondraj batalkrioj leviĝis super la urbon. Eksciinte la bonan novaĵon, la ĝojiĝintaj viroj svingis siajn armilojn super siaj kapoj kaj laŭte kriis:

“Vivu! Vivu Brabanto kaj la granda duko! Ek al la batalo, al la batalo!”

En ĉiuj flankoj oni vidis kavalirojn kaj iliajn servistojn reeniri la urbon por alporti ĉevalojn aŭ pli bonajn armilojn. En malpli ol duonhoru ĉiuj preparoj ŝajnis faritaj, kaj disdoninte siajn ordonojn, la armeestro donis la signalon de la eliro.

Laŭ militkutimo la pafistoj estis komencontaj la atakon. Ili estis do lokitaj ĉekape de la armeo kaj eliris tra la pordego la unuaj. Ilin sekvis multaj grandnombraj grupoj da glavistoj, inter kiuj oni povis rekoni la Lovenanojn kun ilia ĉefo, la sinjoro de Borgneval. Meze de tiu potenca armeo rajdis la armeestro, la grafo van Berg, akompanata de proksimume centu da kavaliroj sur ĉevaloj, kaj ankaŭ tie flirtis, alte super la kapoj de la viroj, la granda standardo de Brabanto – ora leono sur nigra kampo –, portata de sinjoro Van Assche. Tiam venis la membroj de la drapista gildo kaj finfine, je iu distanco, la grandnombraj grupoj de la aliaj metioj sub la komando de skabeno t’Serclaes.

Oni ordonis la plej kompletan silenton por ke ĉiu povu rekoni la voĉon de sia ĉefo.

La fajrogardistoj kaj eĉ sufiĉe fortaj bandoj de la malamiko rapidege retiriĝis antaŭ la alproksimiĝantaj Brabantanoj. Tio plifortigis la fidon de tiuj ĉi kaj igis ilin atendi facilan venkon. Tiel la Brabantanoj marŝis antaŭen nemalhelpate, ĝis subite ili ekvidis larĝan grupon da malamikaj pafistoj kaj ŝtonĵetistoj, kiuj venis renkonte al ili. Nubo da sagoj kaj ŝtonoj preskaŭ malheligis la ĉielon. Tiu unua atako ŝajnis aŭguro por la Brabantanoj, ĉar, kiel ajn malrapide, ili ĉiam progresis kaj daŭre gajnis terenon de la retiriĝanta malamiko.

⁶ Pri tiu Brusela spiono vidu *Histoire de la ville de Bruxelles* (Historio de la urbo Bruselo) de A. Henne kaj Alph Wouters, volumo I, p117.

En ilia vicoj falis tamen multaj morte trafitaj viroj, kaj oni vidis, kiel vunditoj kaj mortantoj estis forportataj de siaj proksimaj kunuloj al la ariegardo por esti bandaĝitaj de la kuracistoj.

Skabeno t'Serclaes havis multan penon preventi siajn bandojn kuri antaŭen. La aspekto de siaj vunditaj samurbanoj ekflamis ilian batalemon kaj koleron. Sed ilia ĉefo marŝis laŭlonge de iliaj vicoj kaj retenis per siaj bonaj konsiloj kaj severaj ordonoj ilian brulantan malpaciencon.

Tiel li estis ankoraŭ admonanta la malkvietan metion de la buĉistoj, kiam, direktante la rigardon al la batalkampoj, li subite eligis akran krion kaj fariĝis pala kiel blanka tuko. Ho, kion li kredis vidi, estis neeble! Li volis ankoraŭ dubi kaj fiksas la rigardon sur la du viroj, kiuj portis vunditon, eble mortanton, al la ariegardo. Kara ĉielo! Li ne eraris: estis lia filo Everard!

Venkita per patreca timo, la malfeliĉa t'Serclaes lasis fali sian glavon, kuris al la vundito, ĉirkaŭbrakis la senenergian korpon, kisis la bluajn lipojn kaj ekkriis per voĉo, kvazaŭ la koro rompis el sia brusto:

“Ho, Dio, mia bona Everard, mia filo, mia unika infano, mortinta, mortinta!”

Li ne plu povis paroli kaj, mallaŭte singultante, lasis fali siajn larmojn sur la sango-kovritajn vangojn de sia filo.

“Ĵetŝtono trafis lian kapon,” diris unu el la portantoj. “La forta frapo svenigis lin, sed li ne estas mortinta... Jen li movas brakon!”

“Ĉu ne morta?” ĝemis t'Serclaes kvazaŭ senprudenta. “Ĉu li ankoraŭ vivus? Rapidu do, portu lin malantaŭen ĝis ĉe la kuracistoj. Mi helpos vin.”

Kaj li metis siajn brakojn sub la korpon de sia filo kaj devigis la portantojn paŝi oblikve.

Ĉe la sono de lia voĉo, ordonanta kaj petanta samtempe, du kuraĉistoj alkuris. Unue ili ekzamenis la vundon kaj ĉe tio igis tremi la maljunan skabenon per ilia serioza kaj zorgema mieno. Tiam ili lavis la kapon de la vundito, gluis plastron sur lia vundo kaj refreŝigis sian cerbon per multa malvarma akvo.

La junulo komencis movi la palpebrojn kaj, dum lia patro timoplene observis, kiel la sango revenis en liajn vangojn, li malfermis la okulojn kaj murmuris kun stultiĝinta rigardo:

“Patro, ĉu estas vi? Kie mi estas? Kio okazis? Ha jes, mi scias: frapo tie sur mian kapon. Estas nenio. Mi svenis.”

Kaj dirinte tiujn vortojn, li provis ekstari, sed refalis teren. Helpate de sia patro, li sukcesis ĉe la dua provo starigi sian supran korparton. Plorante pro feliĉeco t'Serclaes premis sian filon inter siaj brakoj kaj dankis laŭtvoĉe la ĉielon pro la dolĉa espero, ke lia unika infano postvivos tiun kruelan batalon.

Erarante pri siaj fortaj, Everard provis liberigi sin el la brakoj de sia patro kaj diris:

“La batalo komenciĝis. La malamiko regresas. Kie estas mia arbalesto?”

“Vi deliras. Kion vi volas ankoraŭ fari, mia povra filo?” demandis la maljuna t'Serclaes, timigita.

“Mi volas reiri al la batalo, patro. En la unua vico estas mia loko.”

“Sed, mia filo,” suspiris la skabeno, “vi estas tiel malforta, ke vi ne povas stari sur viaj piedoj. Oni devas tuj reporti vin en la urbon kaj hejmen. Tie oni prizorgos vin.”

“Ĉu hejmen, patro? Vi ne parolas serioze. Kion oni opinius pri mi? Kion dirus Sabina, se ŝi scius, ke mi forlasis la batalkampon, antaŭ la fino de la batalo?”

“Via sango fluis por via patrio kaj viaj gedukoj. Vi plenumis vian devon. Malsana kaj malforta, kiel vi estas nun, vi certe suferus certan kaj neutilan morton, kaj Sabina certe mallaŭdus tian sensencan nesingardemon kaj malsaniĝi pro aflikto. Iru do hejmen, mi ordonas tion al vi!”

Everard ankoraŭ petegis sian patron ŝanĝi sian volon, sed t'Serclaes, dezirante obei al alia devo, ordonis al la du portantoj tuj konduki lian filon en la urbon kaj lian domon. Li postrigardis lin kelkajn momentojn kaj eligis ankoraŭ timeman suspiron, kiam li vidis, kiel Everard, ŝanceliĝante kaj pene, stumblis antaŭen inter la du viroj, kiuj subtenis lin.

Tiam, perforte fermante sin al tiu sceno, la skabeno turnis sin kaj tutforte paŝis al la bandoj de la metioj, kiuj sekvis la armeon en ĝia progreso. Verŝajne ilia respekto vidalvide de la malfeliĉo de ilia ĉefo estis stimulinta ilin regi sian fortegan malpaciencon, ĉar ili ne estis rompintaj siajn vicojn. Kiam t'Serclaes reprenis sian glavon kaj relokis sin ĉe la kapo, ĝojkrioj de kontenteco leviĝis inter ili, kiuj tuj ĉesis ĉe signo liaflanke.

Intertempe la lukto inter la pafistoj de ambaŭ armeoj daŭradis. La grafaj trupoj, kvankam ĉiam retiriĝante, ŝajnis prezenti pli grandan reziston. Estis kvazaŭ la armeestroj ambaŭflanke timus doni la signalon de la ĝenerala atako. La grafo van Berg, iel maltrankvila pri tio, ke li povus fariĝi la viktimo de milita ruzo, igis sian armeon antaŭeniri nur paŝon post paŝo. Alveninte ĉepiede de montetoj, kiuj estis kovritaj de densa arbaro, li fariĝis tre singarda, ĉar la malamiko retiriĝis inter la montetoj. Atente li ekzamenis la ĉirkaŭaĵon. Subite li montris per fingro al kampoj troviĝanta preter la arbaro kaj diris al la ĉefo kiu rajdis ĉe lia flanko:

“Ĉu vi vidas tie for preter la arbaro tiujn larĝajn nigrajn makulojn? Tio estas Flandraj militbandoj!”

“Efektive, armeestro,” estis la respondo. “Ili staras senmovaj. Kion ili faras tie?”

“Dankon al Dio pro la bona averto!” ekkriis la armeestro. “Ni estas tro aŭdacaj. Supozu, ke dum la batalo tiuj bandoj volus superforti la pordegon kaj penetri en la urbon. Sinjoro van Vroenberg, rerajdu al la ariergardo kaj transdonu al ĉefo t’Serclaes la ordonon reiri kun la plej granda parto de la metioj al la pordego por defendi ĝin kontraŭ ĉia atako. La alia parto antaŭeniru sub la gvido de la dojeno de la buĉistoj!”

Apenaŭ la sinjoro van Vroenberg spronis sian ĉevalon por porti sian mesaĝon, la grafaj pafistoj malfermis siajn vicojn, kvazaŭ du gigantaj kurtenoj estus forŝovitaj, kaj videbligis la verajn militfortojn de la malamiko, kiuj ŝajnis anonci per laŭta kriado kaj resonanta trumpetado kaj tamburado, ke la vera batalo estis komenciĝonta.

Ankaŭ la Brabantaj pafistoj rapide flankeniĝis. Ĉie resonis komandoj, la aero tremis pro la daŭra bruado, kaj du armeoj superfluantaj de kuraĝo kaj venĝemo sturmis unu al la alia. La batalo ĝeneraliĝis. Mortantoj kaj vunditoj falis per centoj, kaj varma sango kolorigis ruĝa la soifanta kampo.

Komence la sorto ŝajnis favori la Brabantanojn, ĉar kvankam iliaj aloj estis haltigitaj, en la mezo ili repuŝis la malamikon kaj faligis ĝiajn soldatojn kiel falĉistoj la grenon. Sed nun ili subite aŭdis la aeron tremi pro tondraj triumfokrioj: ambaŭflanke de ili du novaj armeoj sturmis de la supraĵoj. Tiel ĉirkaŭitaj en tri flankoj, la Brabantanoj devis forpuŝi la atakojn de fortega malamiko.

La armeestro, grafo van Berg, nun rekonis kun timo kaj bedaŭro, ke la malamiko forlogis lin el la urbo per milita ruzo. La retiriĝo de la Flandraj pafistoj estis nur ŝajnigo. La Brabantanoj kuris rekte en la reton kiun oni nun provis fermi post ili. Estis tro malfrue fiaskigi la ruzon. Ne restis alia rimedo por eskapi al la minacanta sorto ol sinrego kaj kuraĝo.

Instigite de siaj ĉefoj, ili luktis furioze, ĉar ankoraŭ ĉiam ili kredis je venko. Kiu scias, ĉu ilia kuraĝo ne estus perluktinta la venkon, se ĉiu el ili estus plenuminta sian devon? Sed kiam la avangardo estis denove atakita per nova nubo da kavaliroj, kiuj aperis de malantaŭ la arbaro, sinjoro van Assche ĵetis la grandan standardon de Brabanto teren kaj ekforfuĝis⁷.

Ĉu tiu malkuraĝa faro aŭ ĉu la nebleco pli longe rezisti estis la kaŭzo, la Brabantanoj perdis sian tutan esperon venki, ĉar malordo estiĝis en iliaj vicoj. Se estis ankoraŭ tutaj

bandoj kiuj neŝanceleble kaj sentime plue rezistis, estis ankaŭ tutaj bandoj kiuj forĵetis siajn armilojn kaj provis savi la vivon per fuĝo.

Dum tiu tempo t’Serclaes, starante kun duono de la metioj antaŭ la ponto de la pordego Sankta-Katarina, aŭdis bruojn de furioza batalo, sed li ne sciis, kiaj estas liaj ŝancoj. Finfine li komencis timi, ke la libereco de la patrio estas en danĝero, kaj liaj viroj eĉ jam haltigis kvar aŭ kvin Brabantajn kavaleriĉevalojn, kiuj kuris de la batalejo rekte al la pordego.

La metiistoj laŭte kriadis, ke ili volas iri helpi siajn samurbanojn, kaj t’Serclaes volonte estus cedintaj al ilia deziro, sed du malamikaj bandoj, kaŝitaj proksime de Anderlecht kaj Molenbeek, kiuj ŝajnis atendi lian foriron, komprenigis lin, ke la savo de la urbo eble dependus de lia konstanta sinrego.

Dum li parolis al siaj viroj por komuniki al ili tiun konvinkon, la Brabanta armeo cedis en la sanga batalo kaj amase ekfuĝis. Vualite de nubo de polvo kaj malsuprenkurante la monteton kiel ŝtormo, la konfuzitaj bandoj sturmis al la pordego⁸.

Kavaliro, kiu antaŭeniris la aliajn je granda distanco kaj volis enrajdi la urbon, estis haltigita de t’Serclaes.

“Katastrofo! Katastrofo!” li kriis. “Ve ni! Ĉio estas perdita! Sinjoro van Assche forĵetis la grandan standardon de Brabanto. Tio estis la signo de perfido. Esperu nenion plu: ni estas venditaj. Miloj da niaj viroj kuŝas en sia sango tie for. La malamiko sekvas nin. Fuĝu! Fuĝu!”

Tiam t’Serclaes vidis tre klare, ke la tuta Brabanta armeo – almenaŭ kio restis de ĝi –, ankoraŭ ĉiam krule atakate en ĉiuj flankoj de la grafaj kavaliroj, atingos la pordegon post kelkaj minutoj kaj nerezisteble renversos la metiistojn. Li diris kelkajn mallaŭtajn vortojn al la dojeno de la barelfaristoj, kiu estis lia anstataŭanto, grimpis sur unu el la kaptitaj kavaleriĉevaloj, spronis ĝin en la flankojn kaj rapidege malaperis tra la pordego. Sen malrapidigi sian galopon li rajdis rekte al la kastelo de Coudenberg, penetris en ĝin kaj kriis al la servistoj, kiujn li renkontis tie:

“Ĉevalojn! Tuj selu ĉevalojn! Rapidu!”

Al ĉambelano, kiun li konis, li demandis:

“Sinjoro ĉambelano, kie estas la dukino? Pro amo al nia dukino, tuj konduku min al ŝi.”

Penetrante en la ĉambron, kie troviĝis dukino Johana kun kelkaj korteganinoj kaj servistinoj, li ekkriis:

“Rapidu, Senjorino, ni perdis la batalon. La malamiko eble jam estas en la urbo. Hezitu

⁷ *Chroniques des ducs de Brabant*, de Edmond De Dyonter, Brusel, 1857, volumo III, p. 549.

⁸ Tiu malvenko restis konata sub la nomo *la Batalo de Scheut*. La Bruselanoj nomis ĝin *den Quaden Goensdag* (la Malbona Merkredo).

nenian momenton, se vi ne volas fali inter liajn manojn. Fuĝu! Fuĝu!”

La dukino komprenis, ke plendoj ne helpas, kaj ke la larmoj de la timigitaj korteganinoj ne deturnos la minacantan sorton. La sento de la danĝero donis al la dukino sufiĉan animforton por sekvi sen kontraŭdiro la konsilon de t'Serclaes. Ŝi ĵetis vojaĝmantelon ĉirkaŭ siajn ŝultrojn kaj malsupreniris.

La servistoj jam kondukis kelkajn ĉevalojn en la stalon kaj selis ilin. Intertempe la dukino ordonis al korteganino serĉi sian juvelkesteton, kiun ŝi volis kunporti. La nobelino kiu alportis ĝin kun larmoj en la okuloj, diris al ŝi:

“Rapide, rapide, Senjorino! La malamiko estas proksimiĝantaj al Kalsijde. Mi vidis ilin tra la fenestro.”

Helpate de servisto, Johana, la malfeliĉa dukino de Brabanto, grimpis sur sian ĉevalon. Sekvate de t'Serclaes kaj deko da kavaliroj kaj servistoj, ŝi forlasis la kastelon tra la malantaŭa pordego, galopis tra la valon de Borgen kaj la pordegon Coudenberg kaj atingis sen problemoj la apertajn kampojn. Tiam la malgaja procesio fuĝis kiel eble plej rapide kaj senparole preter la vilaĝon Elsene ĝis kiam ĝi atingis la arbaron Zonio. Tiam oni malpliigis la rapidecon, ĉar de tie renkontoj kun la malamiko estis malpli timendaj.

La dukino ekploris, plendante sian amaran sorton. Ŝi, la filino de eminentaj dukoj, kiu neniam malbone traktis iun alian, kiu estis amata de ĉiuj siaj regatoj pro siaj propraj virtoj kaj la bonfaroj de siaj prapatroj, devis fuĝi mizere, senhelpe kiel povra proskribitino. Ŝi perdis sian kronon kaj estis pasigonta la reston de siaj malĝojaj tagoj en fremda lando, profunde malfeliĉa kaj kliniĝante sub la pezo de tiu ĉi humiligo!

T'Serclaes provis konsoli kaj kuraĝigi ŝin. Tio ne estas la fino, li diris. La frato de duko Venceslao, ŝia edzo, estas la imperiestro de Germanio, kaj tiu potenca princo certe ne suferos, ke la dukejo Brabanto estu por ĉiam forprenita al sia plej proksima parenco.

Kaj kiam la dukino esprimis sian senkuraĝan opinion, ke la imperiestro mem havas jam tro da laboro en Germanio por povi militi kontraŭ la grafo de Flandrio kaj ties aliancanoj, t'Serclaes certigis ŝin, ke la loĝantoj de la grandaj urboj, pro kompato kaj amo al sia dukino, triumfante ribelos kontraŭ la invadintoj. Tio povis esti nur demando de tempo.

Kiam la grupo atingis la komunumon Overijse, t'Serclaes petis la dukinon permesi al li forlasi ŝin. Lia filo Everard estis vundita ĉe la kapo per ĵetŝtono dum la batalo – eble danĝere. Lia patra koro multe deziris scii, kiel fartas nun lia malfeliĉa filo. Post kelkaj kompataj kaj laŭdaj vortoj pri Everard, la

dukino sincere dankis sian fidelan kaj kuraĝan protektanton. Ŝi premis ambaŭ liajn manojn kaj diris emociita:

“Adiaŭ, mia bona sinjoro t'Serclaes. Kiel volonte mi rekompencus vian elstaran alligitecon, sed ve, mi ne plu povas. Mi esperas, ke la ĉielo pagos la ŝuldon de via propra dukino donante al vi longan kaj feliĉan vivon. Adiaŭ, kaj nun ni reprenos kun la helpo de Dionian fuĝon al Limburgo! Ek! Ek!”

La maljuna skabeno postrigardis ŝin iom da tempo kun malsekaj okuloj, returnis sian ĉevalon kaj rajdis ree tra la arbaron. Kiam post horo li atingis la grandan vojon apud Oudergem, li renkontis multajn malriĉajn homojn kaj ankaŭ kelkajn burĝojn, jes tutajn familiojn, kiuj, ŝarĝitaj per ĉiuj valoraĵoj kiujn ili posedis, estis fuĝintaj el Bruselo.

El iliaj plendoj li eksciis, ke la grafo de Flandrio kun siaj bandoj ekokupis la urbon kaj ke la tuta malsupra kvartalo ĉirkaŭ la pordego Sankta-Katarina brulis.

Apud la vilaĝo Etterbeek li vidis de fore alveni kavaliro sur ĉevalo, kiu paŝis tute kviete kaj pace, kvazaŭ neniam timo maltrankviligus lin. Ĉar li rekonis lin kiel membron de unu el la Sep Gentoj, li haltigis lin kaj demandis lin, kio okazas en Bruselo kaj ĉu estas vere, ke la malsupra urbo brulas.

“Tio estas tute ne vera,” respondis la kavaliro. “Kiel kontraŭulo de nia kapricema kaj malŝparema duko Venceslao, mi ne okupiĝis pri la aŭdaca rezisto de la Bruselanoj. La triumfantaj soldatoj incendis la pordego Sankta-Katarina en la unuaj momentoj, sed nenio alia estas detruita. La grafo de Flandrio rajdis ĉekape de siaj trupoj en la urbon ĝis sur la Vendoplaco kaj hisis sian flagon supre de la fasado de la gastejo *de Sterre*. Duonhoron poste trumpetistoj estis senditaj al ĉiuj stratoj por anonci en la nomo de Ludoviko, grafo de Flandrio kaj duko de Brabanto, ke al ĉiuj loĝantoj de Bruselo estis donita ĝenerala pardono pro ĉio kio antaŭiris tiun ĉi triumfon de la grafa armeo.

“Ĉu duko de Brabanto? Ĉu ĝenerala pardono!” suspiris t'Serclaes, malgaja kaj mirigita. “Li volas delogi nin. Li esperas resti nia duko!”

“Jes, kaj min surprizis ankoraŭ pli,” reprenis la kavaliro, “ke la trumpetistoj estis ankaŭ anoncantaj, ke plaĉas al la nova duko nomumi Zeger Van Heetvelde amano de Bruselo kaj indiki sep novajn skabenojn.”

“Ĉu amano Zeger Van Heetvelde? Ĉu novajn skabenojn?” grumblis t'Serclaes. Oni do tretas per la piedoj⁹ sur niaj leĝoj kaj privilegioj?”

⁹ ‘Li perforte faris amano sinjoron Zeger Van Heetvelde kaj kreis skabenojn el lia partio’ (*trad.*). (Brabantse Geesten, vol.III, 9. 19).

“La grafo de Flandrio ne kutimas respekti la rajtojn de la popolo, almenaŭ se li havas la povon ignori ilin, vi ja scias.”

“Sed,” rimarkis t’Serclaes, enpensigita, “vi diras, ke vi havas nenion timenda. Kial do vi forlasis la urbon?”

“Pro singardeco, amiko t’Serclaes. Nun ĉio estas trankvila en Bruselo, sed sur pluraj lokoj mi aŭdis plendi kaj furiozi la fremdaj soldatoj, ĉar ili ne rajtas prirabi la urbon. Ilia amareco estas granda. Ili povus ribeli, kaj kiu scius, kio tiam okazus en Bruselo? Mi iras pasigi kelkajn tagojn, aŭ se necese, kelkajn semajnojn ĉe mia frato en la kastelo Schoonenberg. Se vi volas iri al la urbo, eniru ĝin tra la pordego Sankta-Gudula. Tiel vi malpli riskos renkonti multajn malamikojn.”

“Via konsilo estas bona. Mi dankas vin kaj sekvos ĝin. Adiaŭ.”

T’Serclaes daŭrigis sian vojaĝon ĝis la granda vojo al Loveno. Tie li lasis sian ĉevalon en la stalo de la gastejo de *Gulden Eenhoorn* kaj piede eniris la urbon.

III

La kapitulaco de Bruselo ebligis la grafon de Flandrio triumfante trakuri la tutan dukaĵon. Postlasinte en ĉiuj urboj kaj fortresoj sufiĉe fortan okupacian taĉmenton, li reiris al Bruselo kaj tenis tie kiel duko de Brabanto kortegon en la malnova duka palaco sur la monteto Coudenberg. La malgranda afekcio de la popolo por la frivola Venceslao verŝajne esperigis lin, ke li povos gardi la dukan kronon eĉ kun la konsento de la Brabantanoj. Ĉar kvankam li estis konata kiel tiraneca kaj venĝema mastro, li nun inklinis al ia mildeco¹⁰.

En la grandaj urboj de Flandrio li senkom-pate verŝis la sangon de la civitanoj. Antaŭ mallonge en Bruĝo li kondamnis okdek kvar el la plej gravaj civitanoj al eterna ekzilo kaj al konfisko de iliaj propraĵoj. Sed en Bruselo li agis tute alie. Ekster la nelegala nomumo de la amano kaj skabenoj, li respektis la privilegiojn de la civitanoj kaj malpermesis al siaj oficistoj ofendi ilin. La pardono, donita de li, estis observata, kaj neniu estis persekutata pro sia antaŭa lojaleco al la legala duko de Brabanto.

Se la sekvo de tiu relative milda agmaniero de la grafo de Flandrio estis, ke la popolo en

iaj partoj de Brabanto malpli bedaŭris sian antaŭan dukon kaj pacience akceptis la novan staton de la aferoj, en Bruselo ĝi ne efikis sur la profunde amariĝintaj koroj. Tie oni ne povis forgesi la sangan kaj hontan malvenkon, kaj en ĉies koro ardis sekreta venĝemo. Por la Bruselanoj estis nediskuteble certe, ke en tiu fatala tago ili estis venditaj al la malamiko fare de krimeca perfidulo, kaj laŭ la ĝenerala sento tiuj perfidulo estis neniu alia ol Zeger Van Heetvelde, la sama popolmalamanta kavaliro, kiu kiel rekompenco pro sia krimo, estis nomumita amano de Bruselo, kaj kiu nun, kiel anstataŭanto de la nova duko, rigardis ĉiun civitanon, eĉ la plej gravan, kun ofenda orgojlo.

Tiu nomumo fare de grafo Ludoviko van Male estis grava eraro kaj miskalkulo, ĉar multaj, kiuj alie estis restintaj indiferentaj rilate al la ŝanĝo de la duka dinastio, ne povis pardoni lin, ke li nomumis amano la perfidiston de Brabanto. Ankaŭ multaj membroj de la gentoj, kvankam mem malamataj de la popolo, sentis sin profunde humiligitaj.

Certe, la loĝantoj de Bruselo nun estis senpovaj ĵeti la fremdan jugon de siaj ŝultroj. Kvankam li estis devigita dividi sian armeon sur la tuta duka teritorio, grafo Ludoviko estis ankoraŭ ĉirkaŭita de sufiĉe forta taĉmento por subpremi perforte ĉiun ribelon. La popolo do silentis kaj ŝajnis rezignacie porti sian sorton. Sed en la familioj, en la kunvenoj de la metiistoj, ĉie kie oni kredis ne devi timi denuncantojn, eksplodadis venĝokrioj kaj malbenoj kontraŭ la fremdan invadinton kaj ankoraŭ pli kontraŭ amano Van Heetvelde, kiun ĉiuj nomis “la perfidisto”, kvankam neniu ĝuste sciis, en kio konsistas lia perfido.

Neatendate oni transmetis al la grafo de Flandrio gravan mesaĝon. La reĝo de Francio estis kaptita de la Angloj dum batalo apud Poitiers kaj transportita al Anglio. La Franca kronprinco havis multajn problemojn kun la ribelantaj loĝantoj de Parizo kaj timis, ke li estos forpelita de Karlo, la reĝo de Navaro. Estante fervora partiano de la Franca reĝo, la grafo de Flandrio ne povis ne helpi la kronprincon per konsiloj kaj rimedoj. Tial li decidis tuj iri al Parizo, postlasante en Bruselo fortan okupacian armeon sub la komando de armeestro Willem Van Reigersvliet. Li tuj reiris al Flandrio kaj direktis sin de tie kiel eble plej rapide al Parizo..

Apenaŭ la grafo forlasis Bruselon, la malkontenteco de la loĝantoj esprimis sin en multaj manieroj kaj pli kaj pli forte. Oni kantadis satirajn kantojn pri la perfidisto de la patrio, oni rifuzadis pagi la impostojn, kaj la metiistoj laŭte kriadis, ke ili volas legale nomumitajn skabenojn. Sed antaŭ ĉio la plej malaltaj metioj ellasis sian amarecon disputante kaj batalante

¹⁰ ‘Kaj tiel li agis, ĉar li esperis, ke per tiu dolĉa vojo kaj agmaniero, li altiros kaj konvinkos al oboe kaj amo la aliajn urbojn de la lando Brabanto.’ (*Chroniques des ducs de Brabant*, de Edmond de Dyonter, vol. III, p. 519).

kun la okupaciantaj soldatoj, el kiuj oni iam trovis mortinton sur unu el la stratoj.

Amano Van Heetvelde, bone sciante, ke li estas la objekto de la popola malamo, tiel koleriĝis pro la publika rezisto, ke li proponis al sinjoro Van Reigersvliet frapi decidan baton, suspendante ĉiujn leĝojn kaj privilegiojn kaj korpe punante ĉiun ajn kiu montriĝus ribela per vorto aŭ faro. Se tie aŭ tie ĉi ia metio rezistus, oni donus efikan ekzemplon al la aliaj per sanga subpremo.

Sed la armeestro, apogante sin sur la grafajn ordonojn, ne volis konsenti al tio. Li nur promesis teni sin preta por povi uzi perforton, tuj kiam la popolo endanĝerigus la interesojn de lia mastro per vere atakanta sinteno. Kiam la armeestro forlasis la amanon, tiu ĉi diris kun ŝerca rido:

“Nu, armeestro, agu laŭ via bontrovo. Tio estas nur prokrasto de la afero. Antaŭ ol pasos du semajnoj, vi venos diri al mi: ‘Estas tempo estingi la minacan ribelon eĉ per sangoverŝado’. Plaĉu al la ĉielo, ke tiam ne estos tro malfrue!”

Sep tagoj poste la armeestro primokis la timon de la amano, kaj tiu ne sciis, kion respondi, ĉar okazis io kio ŝajnis al li nekomprenebla. Ekde kiam li faris tiun proponon al la armeestro perforte subpremi la loĝantaron per armiloj por preventi tiumaniere ĉian ribelon, la Bruselanoj ĝenerale kondukis tiel paceme, kvazaŭ ili estus akceptintaj subite kaj bonvole la novan staton de la aferoj: nenia plua kontraŭstaro, nenia ribeleca kriadado, nenia disputo kun la soldatoj. Estis kvazaŭ iu estus doninta ordonon, al kiu ĉiuj obeis.

Verŝajne oni estis aŭdinta, per spionado aŭ perfido, pri la propono kiun la amano faris al la armeestro, kaj nun oni volis forpreni al li ĉian kialon, li opiniis, por uzi perforton. Sed kiu do en Bruselo posedis tiom da aŭtoritato kaj influo por igi sin blinde obei de la tuta loĝantaro? Nur la maljuna t’Serclaes! Sed t’Serclaes ŝajnis tute soleca kaj ne plu okupiĝi – almenaŭ ne videble – pri la publikaj aferoj... Kaj tamen, en la menso de la amano kaŝiĝis la firma konvinko, ke lia malamiko ne povas resti neaktiva. Lia retiriĝo estis verŝajne nur kamufilaĵo, sub kiu li projektis planojn kaj intrigojn por realigi la celon de lia malamo: la ribelon de la loĝantaro kaj la revokon de dukino Johana, kaj sekve ankaŭ lian demisiigon, humiligon kaj eble morton, ĉar li fariĝis amano danke al la favoro de la nova duko.

Sed kiel li povus scii tion ĉi kun certeco? Eĉ se li certe sciis tion, tiel longe ke t’Serclaes ne kulpigus sin publike kaj per faroj de malobeo al la leĝoj, li estis protektata de la ekzistantaj privilegioj, kiujn la duko mem ordonis respekti. Tiel la amano, kvankam li antaŭsentis grandan

danĝeron, estis devigita al neaktiveco pro la sigarda konduto de la Bruselanoj.

Jam pasis preskaŭ monato ekde la foriro de la duko. La komandantoj kaj soldatoj de la okupacianta armeo, nun traktataj malpli malamike fare de la loĝantoj ol antaŭe, ne montris eĉ la plej malgrandan zorgecon. Nur la amano tremis pro sekreta timo, ĉar kvankam neniu kredis lin, li restis konvinkita, ke tiu nenatura trankvileco devas esti la heroldo de iu ŝtormo.

Kaj efektive, iam matene – estis la 12-a de oktobro 1356 –, kiam Van Heetvelde denove iris al la armeestro por provi igi tiun ĉi partumi lian timon rilate la minacantajn antaŭsignojn de popolribelo, la maljuna t’Serclaes sidis en malsupra salono de sia ŝtondomo, la kapon ripozantan sur mano kaj la fiksan rigardon perdiĝintan en la spaco.

Devis esti profundaj kaj gravaj pensoj kiuj drivis tra lia cerbo, ĉar iafoje li kunpremis la dentojn, aliffoje mistera rideto ŝvebis sur liaj lipoj, aŭ li pugnigis la manojn aŭ liaj okuloj brilis pro entuziasmo kaj fiereco, dum ili prononcis la vortojn ‘patrio’, ‘povra dukino’, ‘malkuraĝa perfidulo’, dum nekomprenebla monologo.

En tiu momento la bruoj de ruliĝanta ĉaro trafis liajn orelojn. Surprizita, li levis la rigardon kaj ekaŭskultis tre atente, kvazaŭ tiu bruoj havus specialan signifon por li. Post momento da atendado, li frapis sur arĝentan tintilon, kaj kiam la vokita servisto aperis, li demandis lin:

“Andries, ĉu mi ne aŭdis halti ĉaron antaŭ la pordego?”

“Jes, Sinjoro,” la servisto respondis, “estas via farmisto de Wezembeek kiu alportas brullignon.”

“Diru al li, ke li venu al mi. Mi volas pagi lin.”

La servisto kondukis la farmiston en la salonon. Tiu ĉi estis vestita malpropre kaj aspektis maldelikata. Li klinis sin mallerte, tenante vipon en la mano... Sed tuj kiam la servisto malaperis, lia sinteno tute ŝanĝiĝis, ĉar li mem reiris al la pordo de la salono por ŝlosi ĝin, malfermis sian kitelon sur la brusto kaj eltiris el ĝi leteron, kiun li enmanigis al t’Serclaes.

“De la sinjoro van Beersel, nome de nia indulgema dukino,” li murmuris.

T’Serclaes rompita la sigelon kaj haste tralegis la skribaĵon. Tiu legado ne ĝojigis lin, ĉar li malkontente skuis la kapon.

“Kiu alportis tiun leteron al vi?” li demandis.

“Brutarkomercisto al vi bone konata,” respondis la kampulo, ridetante. “Li eĉ aĉetis bovinon de mi, sed li venos nur postmorgaŭ por forkonduki ŝin. Se vi havas respondon donanda al li...”

“Li ricevos respondon... Mia bona Steven, vi bone kaj lerte plenumas la taskon kiun vi

akceptis. Se ni sukcesos liberigi la patrimonon, niaj indulgemaj gedukoj rekompencos vin pro via alligiteco. Ĉu vi bezonas monon?”

“Ne, Sinjoro, ankoraŭ ne. Mi ankoraŭ posedas pli ol duonon de la sumo kiun vi donis al mi antaŭ nelonge.”

“Ĉu vi scias ion novan?”

“La brutarkomercisto diras, ke tie for la afero ne iras tre glate. La Lieĝanoj ankoraŭ ĉiam okupas la urbon Landen, kaj nia duko povas defendi Limburgon nur kun granda peno.”

“Mi scias: la letero diras tion. – Ĉu io alia?”

“Kion oni povas ekscii meze de la kampoj?”

“Vi pravas. Foriru nun, Steven. Oni povus suspekti ion.”

“Dio protektu vin, Sinjoro. Se venos ankoraŭ letero por vi, pretendita kampulo de Kraainem alportos ĝin al vi.”

“Ĉu fidela viro, Steven?”

“Jes, Sinjoro, mia propra frato... Adiaŭ.”

Apenaŭ la mesaĝisto foriris, t'Serclaes relegis la leteron. Tiam li ekstaris, kaŝis ĝin en la sekreta tirkesto de nigra ŝranko, residiĝis ĉe la tablon kaj murmuris, enpenŝiginta:

“Niaj povraj gedukoj povas fari nenion. La Lieĝanoj kaj la grafo de Namuro estas aliancanoj de la grafo de Flandrio, kaj dum tiu ĉi kredas gardi kiel posedajon la dukejon Brabanto, ili esperas ricevi pecon de Limburgo kaj Luksemburgo. De tie oni do ne povas esperi ricevi helpon! Se ni, Bruselanoj, volas liberiĝi de fremda regado, ni mem devas rompi tiujn ligojn per niaj propraj fortoj. Ha, ha, kaj kial ne? La grafo estas en Francio. Ni devas rapidi. Li povus reveni kun novaj taĉmentoj... Sed ve, ni ankoraŭ ne estas pretaj, kaj la necesa kaŝiteco de niaj provoj malrapidigas nian laboron...”

Liaj konsideroj estis interrompitaj de servisto, kiu anoncis al li la venon de sinjoro Clutinc, grava membro de la gentoj.

T'Serclaes iris renkonte al la eniranto, kiu diris post la salutado:

“Antaŭhierau kaj hierau posttagmeze vi estis en mia domo sen trafi min. Opiniante, ke vi volos komuniki al mi ion gravan, mi venas nun mem fari viziton al vi.”

“Bonvolu sidiĝi, Sinjoro Clutinc,” diris t'Serclaes, zorge ferminte la pordon. “Ion gravan? Dependas de tio, kiel vi rigardas la aferon. Peza ŝtono kuŝas sur mia koro. La humiligo de nia patrio profunde dolorigas min, kaj ĉar mi rezignis pri miaj publikaj aktivaĵoj, mi volas malpezigi la ĉagrenon kiu premas mian animon parolante kun iu kiu ankaŭ suferas pro la malfeliĉeco de niaj legalaj gedukoj kaj la sklaveco sub kiu ni ĝemas.”

“Estas amara kaj hontiga sorto, efektive.” murmuris Clutinc.

“Ĉu ne? Estas hontige toleri kiel malkuraĝuloj tiun ĉi situacion,” reprenis t'Serclaes. “Niaj legalaj gedukoj estas ekzilitaj. La grafo de Flandrio kredas, ke ankaŭ liaj filoj regos super ni kiel dukoj de Brabanto. Fremdaj soldatoj, dungitoj, devigas nin al obeo. Ni estas regataj de skabenoj kiujn ni ne elektis, kaj la plej granda honto, la plej profunda humiligo trudita al libero popolo, estas, ke ni devas kliniĝi kaj malkovri la kapon antaŭ perfidulo, kiu, pelite de blinda ambicio, vendis sian propran patrimonon al la malamiko! Ĉu vi ne tremas kiel mi pro indigno kaj kolero ĉe la doloriga penso de la malfeliĉo de niaj gedukoj kaj de nia honto?”

“Ve, t'Serclaes, estas tiel,” respondis Clutinc kun suspiro, “sed kion ni povos fari? La popolo estas senkuraĝigita kaj ne posedas armilojn.”

“Kaj se estus eble entrepreni ekstreman provon kun la espero sukcesi? En la domo de Ser Roelofs vi diris, ke vi estus preta oferi bienon kaj sangon por la savo de Brabanto, se vi vidus nur la plej malgrandan sanĉon helpi liberiĝi ĝin per tio.”

“Kaj Ser Roelofs ripetis miajn vortojn al vi,” grumblis Clutinc, surprizita.

Al tiu demando t'Serclaes ne respondis.

“Memoru, amiko,” li daŭrigis, “la momenton kiam ni staris apud la mortlito de nia maljuna duko kaj ĵuris al li kun levita mano defendi sian infanon Johana kontraŭ ĉiaj malamikaĵoj kaj ofendoj. Kvankam mi estas multe pli aĝa ol vi kaj jam kliniĝas sub la ŝarĝo de la jaroj, mi estas preta ripeti tiun ĵuron kaj resti fidela al ĝi je risko de mia vivo.”

“Kaj mi ne malpli ol vi, t'Serclaes,” konfirmis Clutinc. “Montru al mi la eblecon liberiĝi nian Brabanton kaj demandu mian helpon...”

“Ĉu do vi certigas min je via kavalaria honoro, ke vi volas kunlabori, se necese kun blinda sinoferado, por redoni al nia legala dukino la tronon de ŝiaj prapatroj?”

“Kio do signifas tiu solena pridemandado? Ĉu vi malfidas mian patriotecon aŭ mian kuraĝon? Ĉu mi iam donis al iu la rajton aŭ kialon pridubi ilin?” ekkriis Clutinc, duone ĉagrenita.

“Ne tiel forte, amiko, mi petas,” diris t'Serclaes. “Se mi ne estus profunde konvinkita pri la nobeleco de via koro, mi neniam kuraĝus paroli al vi pri aferoj, de kiuj povus dependi la liberigo de nia naskiĝurbo kaj nia propra vivo. Do, estas necese, ke vi donu al mi vian promeson, Clutinc.”

“Tiel estu, vi havas mian promeson.”

“Kaj ĉu vi devontigas vin ne malvuali skretojn kiujn oni konfidis al vi, eĉ se vi malaprobos, kion oni volas entrepreni?”

“Sed mi ne komprenas vin. Kion do vi celas?” murmuris Clutinc.

“Vi povas rifuzi respondi min,” diris t’Serclaes. “Vi estas ankoraŭ libera. Sed se vi volas kunlabori por la liberigo de nia patrio, promesu al mi la plej kompletan sekretigon.”

“Ne kostas al mi penon, promesi tion al vi.”

“Je via kavalira honoro?”

“Je mia kavalira honoro!”

“Nu, amiko Clutinc, aŭskultu. Vi kredas, ke la Brusela popolo estas senkuraĝigita, ĉu ne? Vi eraras. Tiu ŝajne rezignacio estas sekreta ordono, donita de ni al la popolo.”

“De ni? Sed de kiu do?”

“Vi tuj scios tion, se vi deziras. Nun mi nur diras al vi, ke granda nombro da fervoraj patriotoj aktive pretigase ĉion por fari ekstreman provon, por elvoki amasan popolan ribelon. Ili estas sekrete ordigitaj en militistbandojn. La unuopaj viroj scias nur, ke estas ilia devo teni sin pretaj kaj atendi signalon aŭ ordonon, kiu estos donita al ili. La ĉefoj – tiuj kiuj konas ĉiujn sekretojn – estas nur dudek laŭnombro, sed ilia influo etendiĝas super ĉiuj metioj, kaj tiel ili estas fakte pluraj miloj. Armiloj ne mankas al ni. Sed ni havas neniun inter ni por forte prilabori la gentojn, kvankam multaj el iliaj anoj estas kun ni kaj ne malpli ol ni sopiras je la liberigo de nia lando...”

“Sed vi mem, t’Serclaes, ĉu vi ne estas grava membro de la gentoj?” rimarkis Clutinc.

“Jes, sed por la bono de nia afero, mi estas devigita teni mian aktivadon tute sekreta. La amano estas mia persona malamiko. Li malfidas min kaj certe gardigas min kun speciala zorgo. Vin li ne suspektas. Sur vin ni faligis nian rigardon: vi havas multan influon sur la plej multajn anojn de la gentoj. Vi estas prudenta, kaj via kuraĝo estas konata de ĉiuj. Ĉu vi volas ŝarĝi vin per la tasko instigi ilin al venĝemo kaj disvastigi inter ili la esperon je liberigo sen malvuali nian sekreton? Ĉu vi volas konvinki ilin, ke venos la tago, kiam ili devos esti pretaj kapti siajn armilojn?”

“Certe, certe, t’Serclaes, kaj mi komencos hodiaŭ. Nun ke mi mem denove havas esperon, mi postrestos por nenio!”

“Por la momento, mi havas nenion alian direnda al vi. Mi devas nur ankoraŭ demandi vin, ĉu vi preferas helpi sen danĝera respondec. Sed se vi ne timas respondecon, mi havas la taskon konduki vin kiel ĉefo al nia sekreta kunveno. Se vi preferas tion ĉi lastan, vi estos informita pri ĉiuj niaj sekretoj.”

“Vi konas min, t’Serclaes,” grumblis Clutinc, kvazaŭ ofendita. “Se mi akceptas taskon, mi ankaŭ volas tute plenumi ĝin. Mi timas nenian respondecon.”

“Tiam atentu pri tio, kion mi diros al vi. Vi konas la akvomuelejon de mastro Grijspeert, la dojano de la fulistoj, ĉe la fino de la Borgwal ne malproksime de la preĝejo Sankta-Gudula.”

“Mi jam estis tie.”

“Des pli bone. Post kvar tagoj, tio estos vendredon, je la naŭa vespere, vi tie frapos trifoje sur la pordegon. El la mallumo iu demandos al vi: ‘Kiu muelas tie?’ kaj vi respondos: ‘La vento’. Tiam oni malfermos la pordegon kaj kondukos vin per la mano en ĉambron, kie vi trovos la ĉefojn, viajn ĵurkamaradojn. Tie vi ekscios plendetale, kion mi estis ordonita nur suprajne komuniki al vi.”

“Oni demandos min: ‘Kiu muelas tie?’ kaj mi respondos: ‘La vento,’” ripetis Clutinc. “Ĉiakaze, t’Serclaes, se estos necese, mi povos ankoraŭ viziti vin antaŭ vendredo por peti informojn de vi.”

“Ne, tio ne, amiko. Ni scias, ke la amano suspektas ion de la danĝero kiu minacas lin. Sendube li spionigas nin, precipe min. Vi povos veni ĉi tien nur tre malofte. Se ne, oni tuj suspektos nin. Mi ankaŭ ne plu venos al via domo krom pro alta neceseco. Tiel niaj rilatoj restos kaŝitaj.”

Post momento da silento Clutinc demandis:

“Ĉu via filo Everard konas tiujn sekretojn? Mi renkontis lin hieraŭ apud la hospitalo Sankta-Johano. Li diris al mi, ke baldaŭ okazos gravaj aferoj, ke la metioj koleras, kaj ke iutage oni vidos flui sangon en Bruselo.”

“Ĉu mia filo diris tion al vi?” ekkriis t’Serclaes kun videbla zorgemo. “Estas strange! Everard scias nenion pri tio ĉi! Tion kion li diris al vi, li sendube eksciis de iu alia ol unu el la niaj: nur suspekto... Sed al li ni rivelis nenion, absolute nenion.”

“Mi komprenas,” murmuris Clutinc. “Vi estas la patro, vi havas nur unu filon kaj vi amas lin tro multe por...”

“Ho ne, mia amiko, vi eraras. Kiam ni komencis niaj sekretajn agadojn cele al la liberigo de nia dukejo, mia filo estis ankoraŭ tre malsana pro la vundo sur sia kapo. Nun li estas resaniĝinta, sed lia amo al Sabina Van der Aa tenas lian spiriton kaptita. Li faras mil provojn por povi proksimiĝi al ŝi. Tio metas lin en kontakton kun homoj kiuj estas apertaj aŭ sekretaj partianoj de la amano. Ekzemple kun kapitano Goffredo, kiu ŝajnas ĝui la favoron de la amano. Nesingarda vorto tiel facile eskapas. Ĉu vi komprenas la danĝeron? Ĉu amo, turmentita amo ne estas blinda? Alikaze, Clutinc, kredu min, mi kuraĝus konfidi al mia filo la plej gravajn sekretojn, ĉar li amas sian patron. Lia koro estas nobla kaj la vireca kuraĝo, kiu flagras en ĝi, ne forigis el li lian singardemon.”

“Oni do ne povas paroli al Everard pri tiuj ĉi aferoj?”

“Ne, per nenia vorto.”

Post tiuj vortoj, Clutinc adiaŭis t’Serclaes, promesante, ke li venos je la fiksita momento

al la domo de doĵano Grijspeert. Tuj kiam li estis foririnta, t'Serclaes forlasis la salonon, supreniris laŭ la ŝtuparo kaj malfermis la pordon de iu ĉambro.

“Ĉu Everard ne estas ĉi tie?” li grumble demandis. “Ĉu li estus elirinta? Sen doni al mi matensaluton? Ha, mi komprenas: hodiaŭ la vetero estas milda kaj suna, preskaŭ kiel en printempo. Koro perturbita de amo ŝatas revii sub blua ĉielo...”

Dirante tiujn vortojn al si mem, li malsupreniris, eniris grandan ĝardenon kaj trovis sian filon sidanta sub la varma sunradioj kaj tiel forte enpensigita, ke li levis la kapon, nur kiam lia patro diris lian nomon.

T'Serclaes eksidis apud li kaj demandis:

“Ĉu estas vere, Everard, ke vi diris al sinjoro Clutinc, ke en Bruselo baldaŭ eksplodos sangeca ribelo?”

“Mi almenaŭ diris al li ion kio similas al tio, patro.”

“Kaj de kiu vi scias tion?”

“Estas antaŭsento. Mi ne estas la sola, kiu opinias tion.”

“Ĉu vi ne havas pruvojn por tio? Ĉu neniu parolis al vi speciale pri tio?”

“Ne.”

“Everard, vi estas nesingarda,” diris la maljuna t'Serclaes en serioza tono, “kaj tro facile forgesas la situacion, en kiu ni ambaŭ troviĝas. Kvankam mi okupiĝas nun tre malmulte pri la publikaj aferoj, la amano devas pensi, ke mi sekrete laboras kontraŭ li.”

“Nu, lasu lin pensi tion, patro. Vi certe ne timas la amanon, ĉu?”

“Jes, mi timas lin. Li estas malica kaj mal-amema viro, kaj li estus feliĉa, se li trovas kaŭzon aŭ rimedon venĝi sin al mi. Tiun rimedon li havus, se li povus akuzi min pri kunlaboro kun la popola ribelo, pri kiu oni parolas.”

“Sed, patro,” ekkriis la junulo, “ĉu vi do rezignas pri la defendo de la patrio? La popolo estas multe agitita. La situacio ne povas resti tia. Kiam la metioj provos deskui la sklavan jugon? Mi ne scias. Tio povos ankoraŭ longe daŭri. Sed ĉu ni ne devus stari pretaj kun la glavo en la pugno por verŝi nian sangon pro nia libereco kaj niaj gedukoj?”

“Jes, mia filo, en la decida momento, se tia momento venos. Sed ĝis tiam ni devos silenti kaj ŝajnigi indiferecon.”

“Ĝis nun, vi estis la ĉefo kaj gvidanto de la patriotoj, ho, mia patro, kaj nun, vi timas revivigi la fajron, kiu povos forbruli la perfidulojn kaj tiranojn?”

“Vi ne konas la malicojn de la amano, mia filo. Ankaŭ li sentas, ke la situacio fariĝas danĝera por li, kaj li estas konvinkita, ke, se la metioj vere volus peni deskui lian jugon, ili

proklamus min ĉefo. Se mi restas kvieto, li povas nenion fari kontraŭ mi. Sed se mi donus al li nur ŝajnan kialon akuzi min, li certe arestus kaj enprizonigus min. Tiel li senkapigus la popolon kaj eble facile sufokus ĉiun deziron al ribelo. Tiun celon ni helpas lin atingi, se ni agas nesingarde.”

Silentante la junulo skuis la kapon.

“Mi komprenas, patro: vi pravas,” li murmuris.

“Kaj koncerne vin, Everard,” reprenis t'Serclaes, “viaj klopodoj vidi Sabinan metas vin en kontakton kun amikoj de la amano. Se vi eldirus nesingardajn vortojn en ilia ĉeesto, vi metus min en grandan danĝeron.”

“Ha, patro,” diris Everard ridante, “tiel malmulte da prudento vi supozas ĉe mi, ĉu ne? Kun la amikoj de la amano, kiel vi nomas ilin, mi kondutas tre singarde. Kion mi dirus al ili favore al niaj legitimaj gedukoj aŭ malfavore al Van Heetvelde, povus nur plifortigi ilian rankoron kontraŭ vi. Mi scias tion. Do, ne havu timon tiurilate, patro.”

“Unu vorto, mia filo, povus sufiĉi. Se la amano ĉirkaŭus vin per spionoj?”

“Vi aludas pri kapitano Goffredo. Sed, patro, kvankam lia kapo estas frivola, li havas la plej bonan koron en la tuta mondo.”

“Vi ne konas lin, Everard. Mi sekrete informiĝis pri li. Li nomiĝas Goffredo Barberi kaj naskiĝis en Bruĝo el Florenca servisto kaj Flandra ŝtrumptrikistino. Lia vivo estis riĉa je aventuroj. Li militis sub pli ol unu princo. En Francio li estis membro, sub Karlo de Navaro, de la Blankaj Bandoj, la fifamaj prirabistoj. Poste li transiris al la armeo de la grafo de Flandrio kun la rango de kapitano. Nun li estas la amiko kaj eble la sekreta spiono de la amano. Mi malfidas lin...”

“Ho, patro, vi certe eraras,” respondis la junulo. “Pri sia naskiĝo kaj siaj aventuroj li pli ol unufoje rakontis al mi. Li sentas ne pli da simpatio por la grafo de Flandrio aŭ la amano ol amikecon por nia dukino. Li mem konfesas, ke li ne havas patrimon, kaj diras ridante, ke li pretus militi por la Saracenoj¹¹, se ili bone pagus lin.”

“Kaj al tia aventuristo vi donas vian amikecon!”

“Ne nur mi, patro. Kapitano Goffredo estas gaja kaj vivĝoja viro, dotita per ĝentila lingvaĵo kaj simpatia spriteco. Ĉie, ĝis en la plej aristokrataj domoj de la gentoj, ĉe amikoj kaj malamikoj de la amano, li estas akceptata, sed mi koncedas: li ludas kaj vetas pro mono kun vera blindeco. Sed nuntempe faras tion multaj aliaj honestaj civitanoj.”

¹¹ Nomo por la mahometanoj en Hispanio kaj nord-okcidenta Afriko dum la mezeopoko.

“Diru, kion vi volas, Everard. Sed mi estus dankema al vi, se vi volus eviti ĉiun kontakton kun li.”

“Mi multe bedaŭras, patro, devi rifuzi tion al vi,” suspiris Everard. “Rompi mian rilaton kun Goffredo estas tute neebla. Li tenas mian feliĉecon kaj tiun de Sabina en siaj manoj. Ŝia kruela kuratoro, la amano, ĉirkaŭis ŝin kaj ŝian patrinon per servistoj, kiuj estas liaj sklavoj, kaj li gardigas tiujn malfortajn virinojn kiel malliberulinojn per eviti, ke ili eniru en kontakton kun mi. Li minacas ŝin, incitetas ŝin, traktas ŝin barbare. Tiel li volas per ĉagreno kaj laceco devigi Sabinan akcepti lian filon Willem kiel edzon. Kiel malfeliĉa ŝi estus, kiel malespero turmentus min, se ni neniam povus ekscii ion unu pri la alia! Nur unu viron la amano sufiĉe fidus por lasi lin proksimiĝi al Sabina kaj ŝia patrino, kaj tiu viro uzas tiun permeson nur por konsoli ŝin kaj min, por helpi nin kiel vera amiko. Per li mi scias, ke Sabina, kvankam turmentata kaj malsaneta, estas firme decidinta neniam akcepti la manon de Willem, eĉ se oni igus ŝin morti pro ĉagreno. Jes, la bona Goffredo portas miajn konsolajn vortojn al Sabina kaj alportas al mi la certigon de ŝia fidela amo. Tiel estas, kvazaŭ ni vidus unu la alian ĉiutage.”

“Sed ĉu tio ĉi estas vere sincera?” murmuris t’Serclaes, kapskuante. “Ĉu vi estas tute certa, ke ne estas eltrovitaj vortoj, kiujn li transdonas al vi kvazaŭ ili estus prononcitaj de Sabina?”

Everard malfermis mansaketon, kiu pendis de lia zono, kaj etendis al sia patro falditan paperon.

“Hieraŭ vespere, en la domo de Ser Huygens, Goffredo enmanigis al mi tiun ĉi leteron de Sabina,” li diris. “Vi konas sian manskribon kaj ŝian sigelon, patro. Tio certe forpelos vian lastan dubon, ĉu ne?”

Li silentis por doni al sia patro la tempon legi la leteron Tiam li demandis:

“Nu, patro, kion vi diras pri tio? Sabina mem atestas pri la sincereco de la intencoj de Goffredo.”

“Povra fraŭlino,” murmuris la maljuna t’Serclaes, rigardante la skribaĵon. “Kiel fervoran, puran amon ŝi sentas por vi, Everard!... Morgaŭ estos do granda vespera festeno en la domo de la amano. Li deziras, ke Sabina ĉeestu ĝin. Ŝi rezistis lin ĝis nun, sed tio ne povis helpi ŝin...”

“Ve,” suspiris Everard, “tiu Willem Van Heetvelde vidos ŝin dum pluraj horoj kaj certe profunde ĉagrenos ŝin per sia sistemo.”

“Kiel kuraĝa do estas tiu knabino!” daŭrigis t’Serclaes. “Ŝi suferas kruelajn dolorojn per tiu Willem... kaj tamen ŝi kompatas lin pro lia malesperaj klopodoj!... Sabina esprimas la firman esperon, ke vi baldaŭ povos vidi unu la

alian kaj interparoli tute libere. Malgraŭ la minacoj de la amano, ŝia patrino konsentas pri tio... Kio signifas tion?”

“Estas io kion kapitano Goffredo aranĝos. Post mallonge li diros al mi, kien mi devas iri por trovi Sabinan kaj ŝian patrinon solaj. Kiam vi surprizis min iomete enpensigita ĉi tie en la ĝardeno, patro, mi revis, ke mi estas kun ŝi. Ŝiaj dolĉaj kaj ĉarmaj vortoj sonis tiel beatige en miaj oreloj!... Vi ja vidas, patro, ke mi ne povas rompi miajn rilatojn kun tiu bonkora Goffredo.”

“Efektive, tio estus malfacila,” respondis t’Serclaes. “Restu singarda kontraŭ li, fariĝu ankoraŭ pli singarda, mi petas vin, mia filo.”

“Estu trankvila pri tio, patro.”

“Sed unu aferon mi ne komprenas, Everard: se tiu kapitano Goffredo sentas sinceran amikecon por vi, kio povas do esti la kaŭzo de tiu sento?”

“Mi ne scias, patro. Eble nur kompato pro la ĉagreno de Sabina.”

“Mi neniam ludas, kaj nur se mi estas devigita, kaj mi ĉesas, tuj kiam mi estas perdinta du aŭ tri florenojn.”

“Ĉu vi eble pruntas monon al Goffredo?”

“Efektive, patro, mi iam kaj iam pruntis al li kelkajn ŝildojn. Sed kompare al la gravaj servoj kiujn li faras al mi...”

Servisto eniris la ĝardenon kaj diris:

“Fraŭlo Everard, kapitano Goffredo estas en la antaŭĉambro kaj deziras paroli al vi. Li havas urĝan mesaĝon por vi.”

“Venigu lin en la ĝardenon,” respondis la junulo.

Sed t’Serclaes retenis la serviston kaj diris al sia filo:

“Atendu momenton! Mi ne bezonas aŭdi, kion Goffredo venas diri al vi. Tamen estu singarda, mia filo, kaj pensu pri miaj vortoj!”

Murmurante tiujn vortojn, li paŝis al la domo kaj malaperis tra pordo.

Same tiel rapide kapitano Goffredo montriĝis ĉe la enirejo de la ĝardeno. Li estis viro de proksimume tridek kvin jaroj kun svelta staturo, bronzkoloraj vangoj kaj brilaj okuloj. Lia multkolora vestaro estis de elganta fasono kaj facile porteblaj. Ĉe lia flanko svingis mallonga glavo, kaj lian kapon ornamis blua velura ĉapo kun ruĝa plumo. Balanciĝante sur siaj kruroj, laŭte ridante kaj gaje gestante, li iris al la junulo, kaptis kaj skuis ties manon, frapis lin sur la ŝultron kaj diris:

“Hej, hej, mia bona Everard, rigardu min do en la okulojn! Ĉu la ĝojo, kiu radias el mia rigardo ne diras al vi, ke mi alportas feliĉan mesaĝon al vi?”

“Flanke de Sabina?” balbutis Everard.

“Vi vidos ŝin, amiko, sola kun ŝia patrino tiel longe, kiel plaĉos al vi, kaj vi povos diri ĉion

kion vi devis subpremi en via koro dum monatoj. Mi tiel ĝojas, kvazaŭ mi mem estus la tenere amata fianĉo de la bela Sabina Van der Aal!”

“Ĉu mi vidos ŝin, Goffredo? Kiam?”

“Ankoraŭ hodiaŭ.”

“Ho, dankon, amiko! Diru al mi: kie mi povos renkonti ŝin?”

“Aŭskultu. Tuj post la tagmanĝo, sub la preteksto deziri ĝui la eksterordinare mildan veteron, Sabina kaj ŝia patrino faros promenon en kaleŝo al la Nova Arbaro ekster la pordego Coudenberg. Ili haltigos sian veturilon sur la larĝa meza aleo kaj promenos piede ĝis la eta kapelo kiu staras inter la arboj en la direkto de la leprulejo Sankta-Petro. Ĉu vi konas tiun kapelon?”

“Certe, kiam mi estis ankoraŭ knabeto, mi jam ŝatis revii sub ĝiaj ombroriĉaj fagoj.”

“Nu, ŝajngante, ke vi scias nenion pri tio, vi iros al tiu arbaro ekde Coudenberg, promenos ĉirkaŭ la kapelon, renkontos ŝin tie, eniros kun ŝi flankaleon, kie vi povos paroli kun ŝi sen atestantoj, ĝis vi havos nenion plu direnda.”

Everard kaptis la manojn de la kapitano kaj entuziasme ekkriis:

“Ho, amiko, kiel mi iam povos pruvi al vi mian dankemon? Vi faras min supermezure feliĉa. Per kio do mi meritas tian grandan afekcion de viaflanke?”

“Ba, kara Everard, mi mem ne scias tion,” ŝercis Goffredo. “Mi estas malsaĝulo, kaj certe ne estas multa bono en mi, sed devigi gejunulojn geedziĝi sen reciproka amo, ĉiam ŝajnis al mi ekstrema tiraneco. Tial mi sentas min feliĉa, kiam mi povas helpi amantajn, suferantajn korojn.”

“Ĉu la patrino de Sabina libervole konsentis al tiu kunveno?” demandis la junulo. “Estas mirige. Se tion aŭdus la amano...”

“Libervole, jes,” estis la respondo, “sed tio tamen postulis penon. Sed la ĉagreno, preĝoj kaj larmoj de Sabina kaj mia konsilo fine konvinkis ŝin. Ho, Everard, vi estas feliĉa friponeto, tiel nedireble esti amata de la plej ĉarma fraŭlino de la tuta Bruselo, kiun krome oni rigardas kiel unu el la plej riĉaj heredontinoj... Tio ĉi ja estas la plej bona afero, ĉu ne?”

“Ba, Goffredo, kio estas riĉeco?”

“Kio estas riĉeco? Per mono oni povas aĉeti ĉion ajn!”

“Vi ĉagrenas min, Goffredo. Sed ĉi tie ne temas pri mono nek pri aĉeto: estas afero de sento, de pura kaj neprofitema sento... Kiel malpacienca faras min la atendado de tiu feliĉa momento! Mi jam devos pretigi min al tiu promeno al la Nova Arbaro...”

“Kaj surmetu viajn plej belajn vestaĵojn por povi aperi kiel eble plej avantaĝe antaŭ la diino de via koro!”

“Vi ne eraras, Goffredo. Ĉu vi havas nenion plu direnda?”

“Ha, vi ĝentile forpelas min! Mi komprenas: vi havas sufiĉe da tempo, sed vi deziras resti sola por povi revii ankoraŭ iomete pri la feliĉeco kiu atendas vin... Jes, mi havas ankoraŭ ion direnda, ion malpli agrablan: peti malgrandan servon de vi.”

“Parolu, Goffredo, permesu min ŝuldigi vin al mi. Mi dankas vin pro tio.”

“Jen la afero. Hieraŭ, post kiam vi forlasis la domon de Ser Huygens, Hendrik t'Servranx defiis min ludi kontraŭ li, kaj mi perdis. La grafo de Flandrio ankoraŭ ŝuldas al mi multan monon de nepagitaj soldoj. Mi ricevos tiun monon post nelonge, sed dume mi estas iomete en bezono...”

“Kial tiuj ĉi malrektaj vojoj?” interrompis lin la junulo. “Kiom vi deziras?”

“Per dek malnovaj ŝildoj mi povus mal-embarasiĝi.”

“Sufiĉas, ke mi scias tion, Goffredo. Atendu momenton, mi tuj havigos ilin al vi.”

Kaj li rapidis al la domo. La kapitano interfrotis siajn manojn pro ĝojo, dirante al si mem:

“Tiu ŝuldo de la grafo de Flandrio al mi estas miriga eltrovo. Per tio mi povas facile deprunti monon, ĉar oni ne iros demandi al la grafo, ĉu mi diras la veron. Estas stranga metio, kiun mi praktikas ĉi tie: la amano pruntas monon al mi, la patrino de Sabina pruntas monon al mi, Willem kaj Everard pruntas monon al mi... Kaj se ili estus nur la solaj! Ili kredas, ke mi faras al ili servojn pro amikeco, pro afekcio. Mi ridas pri ili ĉiuj. Ĉio estas indiferenta al mi escepte de mono. Tamen se iu povus inspiri al mi amikecon, kondiĉe ke mia koro ne estus imuna al tiu sento, tiu certe estus la bona, honesta Everard... Malbenita ludo, kiu tiel malbone traktas min: mi povas gajni dum multaj horoj, sed ĉiufoje mi finfine perdas ĉion... Ha! Tie venas la mono!”

Everard metis kelkajn malgrandajn orajn monerojn en lian manon, dirante:

“Jen dek malnovaj ŝildoj. Vi redonos ilin al mi, kiam tio plaĉos al vi.”

“Jes, tuj kiam la grafo de Flandrio pagos min, aŭ kiam la ludado speciale favoros min.”

“Tio ne malkvietigu vin, kapitano. Mi ĝojas, ke mi povas ŝuldigi vin, kaj ju pli longe vi estos mia ŝuldanto, des pli agrabla tio estos al mi.”

“Adiaŭ, Everard. Dankon. Mi ankaŭ faros promenon al la Nova Arbaro en la malfrua posttagmezo, kaj se vi estos ankoraŭ tie, vi diros al mi, kiel feliĉa vi estis.”

La junulo akompanis lin ĝis la pordego, esprimante ankoraŭfoje sian dankemon.

IV

Longe antaŭ la interkonsentita horo Everard forlasis la urbon tra la pordego Steen, lasante la leprulejon Sankta-Petro ĉe sia dekstra flanko, kaj tiel atingis ekde la okcidenta flanko la Novan Arbaron, kiu estis parto de la arbarego Zonio kaj servis kiel promenparko al la Bruselanoj en la somertempo.

En sia malpacienco li iris rekte al la kapelo. Lia koro bategis kaj fajrero de feliĉa espero brilis en liaj okuloj, kvazaŭ li atendus tuj renkonti tie la belan Sabinan. Sed li trovis neniun tie: ĉirkaŭ la preĝejo regis soleco kaj silento.

Everard ĉirkaŭrigardis momenton seniluziigita. Sed tiam li skuis la kapon kaj ekridetis pri sia propra eksciteco. Ankoraŭ ne povis esti la fiksita horo, kaj la plej bona, kion li povus fari por pasigi la tempon, estis promeni tien kaj reen sur la malproksimaj padoj de la arbaro.

Ĉi-jare la somero daŭris pli longe ol kutime. Multaj arboj, precipe la kverkoj kaj la malaltaj arbustoj ankoraŭ havis siajn foliojn, kaj kvankam la plej altaj kverkoj komencis perdi ilin, oni povus imagi, ke oni estas ankoraŭ en la bela sezono, tiel milda estis la vetero kaj tiel arde brilis la suno en la pura ĉielo.

Jam plurfoje Everard estis trapaŝinta la flankpadojn en la arbaro, kaj same tiel ofte li estis reirinta al la kapelo. Li jam komencis timi, ke iu neatendata evento malhelpos Sabinan veni al la Nova Arbaro... Ĉu kapitano Goffredo trompis lin por ricevi monon de li? Ne, li tute malpravus pensi tiamaniere. Ĉu sinjorino Van der Aa posteniĝis antaŭ tiu renkonto, kiun ŝi konsideris danĝera? Ŝi lasis sin tiel facile timigi per la minacoj de la amano. Ĉu ne estis ŝia timo, kiu malebligis tiel longe ĉian kontakton inter li, Everard, kaj ŝia filino? Eble la amano mem malkovris la sekreton de la planita renkonto. Ĉiuj servistoj kaj servistinoj en la domo Van der Aa estis dungitaj de la amano kaj servis lin kiel spionoj. Ve! Sabina ne estis venonta! La feliĉeco, kiun promesis al li lia emociita koro, estis nur vana revo!

Kun la kapo klinita sub tiaj malkuraĝigaj konsideroj, li promenis ankoraŭ kelkan tempon ĉirkaŭ la kapelon. Finfine, kvankam li sciis, ke tio povis esti nesingardeco, li lasis sin mislogi por ĵeti rigardon en la grandan aleon. Eble li estis ekvidonta tie en la malproksimeco la kaleŝon tiel malpacience atendatan!

Kiam li eliris el la arbustaro kaj eniris la mezan aleon, li efektive vidis alveni je iu distanco fermitan kaleŝon. Surprizita kaj bedaŭrante sian aŭdacon, li resaltis en la arbustaron kaj direktis siajn paŝojn al la kapelo. Ĉu la koĉero aŭ veturigisto ekvidis lin? Li ne kredis tion, sed tio estis tamen ebla. La amano povus do ekscii, ke li havos rendevuon kun Sabina kaj ŝia patrino!

Antaŭ ol Everard denove atingis la kapelon, la kaleŝo haltis kaj du virinoj elpaŝis. La pli juna diris al la servisto, kiu volis sekvi ilin:

“Ne, Jozef, restu ĉi tie atendanta nin.”

“Sed, fraŭlino,” rimarkis la servisto, “tiel solaj en la arbaro! Kion diros la amano?”

“Ĉu vi estas mia servisto aŭ ne?” demandis la alia virino en ordona tono. “Ni iros al la kapelo. Ne forlasu la kaleŝon, ĝis ni revenos.”

“Estas bone, Sinjorino,” grumblis la servisto, videble malkontenta. “Mi obeos al via ordono.”

Sabina kaj ŝia patrino malrapide eniris flankaleon. La juna knabino, antaŭe ĝuante bonegan sanon kaj freŝa kiel rozo, nun estis videble paliĝinta kaj maldikiĝinta. Se la espero ne estus elvokinta feliĉan rideton sur ŝiaj lipoj kaj briliginta ŝiajn okulojn, ŝi certe aspektus kiel grave malsana knabino. Sed la certeco, ke ŝi baldaŭ estas vidonta Everard-on kaj parolonta kun li, por la unua fojo post la fuĝo de la dukino, kuraĝigis ŝin kaj redonis al ŝi almenaŭ ŝajne la perdintajn fortojn.

“Patrino,” ŝi suspiris, “mia koro batas tiel forte.”

“Sabina, Sabina, kian danĝeran paŝon vi igas min fari,” diris sinjorino Van der Aa. “Tiel sola iri en la Novan Arbaron al sekreta rendevuo kun la filo de la malamiko de la amano!”

“Mia patrino, ne parolu tiel. Estas danke al vi, ke mi ricevos tiun ĉi konsolon. Mi dankas vin pro tio.”

“Tiel estu, mia infano. Mi konsentis pro amo al vi, esperante, ke tio donos al vi novan kuraĝon kaj malhelpos, ke vi tute malsaniĝos. Se la amano ekscios tion, kiel kolera li estus!”

“Li ne ekscios tion, patrino.”

Mi estas tute ne certa pri tio. Ni interkonsentis, ke ni kredigos lin, ke hazardo igis nin renkonti ĉi tie sinjoron t'Serclaes. Ĉiakaze vi promesis min, ke post tiu ĉi renkonto kun Everard vi ne plu postulos vidi lin kaj pacience atendos, ĝis la amano rezignos pri sia projekto koncerne sian filon Willem.”

“Jes, patrino, aŭ ĝis kiam niaj legitimaj gedukoj revenos.”

“Ne esperu tion, mia infano. Tio estas tute nebla.”

“Mi petas tion en ĉiuj miaj preĝoj, patrino. Por Dio nenio estas nebla... Ho! Kia feliĉo! Tie for

apud la kapelo staras li. Mi vidas lin! Rapidu, patrino!”

Eligante krion de ĝojo, ŝi kuris al la junulo, kiu venis renkonte al ŝi kun disetenditaj brakoj. Ili premis unu al la alia la manojn kun fervora tenereco, jubilante pri la feliĉa revido. Cent konfuzaj vortoj fluis trans iliaj lipoj. Larmoj briletis en iliaj okuloj. Ili ŝajnis forgesi la tutan mondon... sed la riproĉa voĉo de la patrino de Sabina interrompis tiun elverŝadon de ĝojo.

Tiam Everard faris kelkajn paŝojn antaŭen kaj diris post profunda riverenco:

“Ho, Sinjorino, mi dankas vin! La ĉielo rekomencu vian bonkorecon. Jes, mi komprenas; kion kostas al vi doni al ni tiun konsolon. La amano povus kruele puni vin pro via indulgemo. Iam venos la tago, kiam mi povos nomi vin patrinon. Ne levu la ŝultrojn: Sabina fariĝos mia edzino, se ŝi restos fidela al mi, malgraŭ ĉiuj kiuj envias min...”

“Fidela ĝis la tombo!” konfirmis la fraŭlino, proksimiĝinte sian patrinon.

“Nu, kara patrino,” daŭrigis Everard, ekscitita, “tiam mi estos por vi amplena filo, kaj mi repagos al vi centfoje, kion vi suferis pro Sabina kaj mi. Vi havos du infanojn, kiuj konkuros por fari vian maljunecon agrabla kaj dolĉa, kaj vi dankos Dion, tute kiel ni, malgraŭ la suferoj, kiujn ni travivas nun kune.”

“Se povus okazi tiel!” murmuris sinjorino Van der Aa, emociita. “Mi dubas...”

“Tio dependas de la konstanteco de Sabina, Sinjorino.”

“Do ne dubu pli longe, patrino,” ekkriis la knabino. “Nun mi estas forta: eĉ la morto ne ŝancelus min.”

“Vi mirigas min, Sabina, morgaŭ vi denove malĝojos kaj ploros.”

“Ne, patrino, eble mi malĝojos, sed mi ne plu malesperos.”

“Nur se tiu renkonto redonus al vi la sanon, mia infano. Tiam mi vere dankus la ĉielon, kiel ajn kolera kontraŭ ni estus la amano.”

“Mi restos kuraĝa kaj mi resaniĝos. Vi vidos, patrino.”

“Vi donas al mi dolĉan esperon, mia infano. Nun ni iru promeni, miaj infanoj, sed parolu malpli laŭte kaj ne tenu vin ĉe la mano. La bela vetero povus logi aliajn homojn al tiu ĉi flanko de la arbaro. Ĉiu devas pensi, ke nur hazardo kunigis nin ĉi tie. Parolu inter vi, ĉar ni ne povos resti longe ĉi tie.”

“Aj, kaj ni havas direnda tiom da aferoj unu al la alia!” suspiris Sabina.

“Komencu do tuj. Estos des pli baldaŭ farite,” ŝercis sinjorino Van der Aa kun afabla rideto.

“Mi sentas min tiel feliĉa, Sabina,” diris la junulo, “ke mi apenaŭ kuraĝas paroli pri malĝojigoj aferoj. Sed, mia karulino, via vizaĝo

portas spurojn de longa kaj dura suferado. Via sorto estis do amara post nia kruela disigo.”

“Unuavice via malsano rompis mian kuraĝon, Everard,” respondis la knabino. “Vi estis mortige vundita, kaj mi ne rajtis scii, kiel vi fartas. Almenaŭ mi ne povis fidi la vorton de tiuj, pri kiuj mi sciis, ke ili estas niaj malamikoj. Mi dankas Dion, ke vi resaniĝis. Sed mia koro ne trompis min: vi estis danĝere malsana, ĉu ne?”

“Efektive, Sabina. Kiam, trafite per ĵetŝtono, mi forlasis la batalon, kaj eĉ la postmorgaŭon mi kredis, kaj ankaŭ mia patro, ke la vundo estas nur supraĵa kaj certe ne havos gravajn sekvojn. Ni eraris. Mia vundo inflamiĝis, mi ekhavis febron, deliron, kaj oni longe timis pro mia vivo.”

“Kion mi diris al vi, patrino?” ekkriis Sabina indigna. “Kion oni diris al ni, estis mensogoj! Sed mi sciis tion, mi sentis tion. En mia konsternita menso, mi vidis vin kuŝi sur via lito anhelanta, pala kaj vokanta min...”

“Vi sciis tion?” interrompis la junulo, mirigita. “Sed estas vere, Sabina. Poste mia patro diris al mi, ke en mia deliro mi daŭre prononcis vian nomon.”

“Mi aŭdis vian voĉon resoni en mia animo, Everard. Kaj, ve, mi ne rajtis viziti vin, konsoli vin! Kaj tiam ankaŭ mi malsaniĝis.”

“Sed unu monaton poste, vi tamen eksciis, ke mi tute resaniĝis, ĉu ne?”

“Jes, Everard, kaj mi kredis tion, ĉar tion diris al mi iu, kies vortojn mi fidis.”

“Kial do, kara amikino, ankoraŭ ĉiam nun tiu paleco sur viaj vangoj?”

“Ha! Por mi la suferado tiam ne finiĝis,” ŝi respondis. “De la komenco la amano asertis, ke li tenis min tiel senkompate apartigita de vi por protekti mian kaj lian familiojn kontraŭ la honto kaj malhonoro. Ni ne povis rilati kun homoj, kiuj estis malamikoj de la grafo de Flandrio kaj malamamis lin persone, li diris. Sed tiam li malkaŝis siajn verajn intencojn: li devigas min fariĝi la edzino de lia filo Willem. Per ĉiaspecaj rimedoj li devigas min akcepti tiun geedziĝon. Centfoje li minacis mian povran patrinon, tenis min preskaŭ enfermita, turmentis kaj morale torturis min tiel longe kaj tiel kruele, ke mi ekhavis febron pro timo...”

“Pro timo?” ripetis Everard, pugnigante la manojn. “Ĉu vi timis, ke li devigos vin perforte? Tion li ne povas!”

“Pro timo, ke fine la jesa vorto elglitos mian buŝon,” suspiris la knabino, “pro timo, ke mi, malsana, malforta kaj forvelkanta, diros al li: mi submetiĝas, Willem fariĝu mia edzo.”

“Dio mia! Ne estas eble! Viaj vortoj tremigas min, Sabina,” ekkriis la junulo paliĝante. “Se li iam vere eltordus vian konsenton...!”

“Por tio ne plu ekzistas danĝero,” ŝi respondis. “Mi fariĝas pli forta. Krom tio, de kelka tempo li ŝajnas fariĝinta malpli senkompata kaj iomete pli milda kontraŭ ni. Eble li komencas rekoni, ke li ne povas konvinki min perforte kaj volas nun elprovi malpli durajn rimedojn.”

“Haha,” grumblis Everard enbuŝe, “li sentas, ke la grundo komencas ŝanceliĝi sub liaj piedoj. Lia trokuraĝeco elfalas lin.”

“Kion vi diras?” demandis sinjorino Van der Aa, kiu nur duone komprenis liajn vortojn.

“Mi volas diri, ke la grafo de Flandrio ne ĉiam restos duko de Brabanto. Tiu nelaŭleĝa kaj nenatura situacio iam devos finiĝi... Sed, Sabina, kiel kondukas Willem kontraŭ vi en tiu afero? Certe ne estas krimo ami vin, sed se li iam rifuzus al vi la ŝuldatan respekton, li iutage multekoste pagus pro tio al mi. Estu certa pri tio, ĉar li almenaŭ...”

“Ne, ne akuzu fraŭlon Willem,” interrompis sinjorino Van der Aa. “Li estas bonkora knabo, kiu ne ĝenas nin.”

“Sed li turmentas Sabinan per amdeklaroj, kiujn ŝi malakceptas.”

“Ke li amas mian filinon kaj sopiras je ŝia amo kun tiom da fervoro, kiom vi mem, Everard, oni ne povas pridubi. Sed ĉar li scias, ke li malĝojigas Sabinan parolante al ŝi pri sia amo, li silente subpremas sian ĉagrenon. Al mi li plendas pri sia amara malespero. Li ploras kaj forvelkas.”

“Li estas do konvinkita, ke liaj deziroj restos neplenumigitaj?”

“Tion mi ne asertas. Kontraŭe, li kredas, ke Sabina, kompatigita per lia submetiĝo kaj suferoj, finfine konsentos feliĉigi lin.”

“La impertinentulo, la aŭdaculo!” grumblis la junulo.

“Kial vi nomas lin aŭdaculo?” replikis la patrino de Sabina. “La knabo opinias, ke estas certe, ke la grafo de Flandrio restos nia duko, kaj li do rigardas vian edziĝon kun Sabina tute neebla, tial ke lia patro malhelpos tion. Rekonu, ke, se lia opinio estas bonmotiva...”

“Kion vi diras pri tio, Sabina?” demandis la junulo kun videbla zorgemo. “Mi pretas oferi ĉion, prefere ol rezigni pri via mano. Se oni povus konvinki vin, false konvinki vin, ke vi neniam fariĝos mia edzino, ĉu vi akceptus Willem Van Heetvelde kiel vian edzon?”

“Ĉu mi? Neniam!” respondis la fraŭlino kun forteco. “Mi estos via novelzino, Everard, aŭ mi malsupreniros en la tombejon virgulino.”

“Ho! Ripetu al mi tiun belajn vortojn!” ekkriis la junulo, dankeme kaptante ŝiajn manojn.

“Kaj ĉe tio,” ŝi reprenis, “la ĉielo scias, ke mi neniam volos fariĝi parto de familio, kies ĉefo subtenas la malamikon de niaj legitimaj gedukoj. Nia indulgema dukino Johana estis mia

protektantino, kaj ŝiajn bonfarojn mi neniam forgesos. Tiel longe, ke ŝi estos malfeliĉa, mi ne povos partopreni en geedziĝa festeno kiel novelzino, eĉ se vi estus la novelzo, mia Everard.”

La junulo klinis sin trans ŝia ŝultro kaj murmuris en ŝian orelon:

“Vi pravas, kara amikino, tio estus kulpa maldankemo. Sed lasu la esperon ĝojigi vin: tiu ĉi situacio ne plu daŭros tre longe. La liberigo alproksimiĝos.”

“Ni devos esti singardaj,” diris sinjorino Van der Aa. “Nun vi parolis jam sufiĉe longe unu al la alia. Estas tempo, ke ni reiru al nia veturilo por ne havigi suspekton al niaj servistoj.”

“Sed, patrino,” ekkriis la fraŭlino, “Everard estas nur kelkajn minutojn kun ni. Ni havas ankoraŭ tiom da aferoj priparolendaj inter ni!”

“Mi estas laca pro tiu malrapida promenado,” rimarkis sinjorino van der Aa. “Se vi volas ankoraŭ momenton interparoli, ni sidiĝu sur la benko tie for. Sed rapide.”

Ili plenumis tiun peton kaj eksidis unu apud la alian sur lignan benkon, kiu staris sub tegmento de superpendantaj branĉoj de kverka arbusttaluŝo.

Dum ili sidis tie agrable parolantaj, iu fraŭlo rapide venis al la Nova Arbaro el la direkto de la pordego Coudenberg. Ĝoja rideto prilumis lian vizaĝon, kaj liaj okuloj brilis pro deziro. Jam ekde liaj unuaj paŝoj li turnis la kapon al ĉiujn flankojn, ŝajne serĉante ion. Kiam li malkovris la veturilon de sinjorino Van der Aa iomete pli for en la granda aleo, ĝojkrio eskapis el lia buŝo.

“Ha jen! Tie ili estas! La servistino diris al mi la veron,” li murmuris. “Mi agos, kvazaŭ hazardo estus kondukinta min al la arbaro. Mi ne kuraĝas paroli al ŝi pri mia neeltenebla ĉagreno, sed tiel sola kun ŝia patrino, ŝi ne povos rifuzi mian ĉeeston... Promeni ĉe ŝia flanko en la plej plena soleco! De kelka tempo, ŝi estas malpli dura por mi. Ho, Dio mia, se ŝi lasus al mi nur ian esperon, kiel mi benus vian nomon!”

Ju pli li proksimiĝis al la veturilo, des pli li malrapidigis sian paŝadon, kaj fariĝis serioza kaj pudora lia vizaĝesprimo, kvazaŭ li timus la renkonton, je kiu li sopiris tiel forte.

En tre trankvila tono li demandis la serviston: “Jozef, vi veturigis viajn mastrinojn al la Nova Arbaro, ĉu ne?”

“Jes, fraŭlo Willem,” estis la respondo, “estas tiel milda vetero...”

“Kie ili estas?”

“Ili iris tiufanken, tra la flankaleo. Ili preĝas en la kapelo.”

“Multan dankon, mi ja trovos lin.”

La servisto sekvis lin kelkajn paŝojn, kvazaŭ por montri al li la vojon, kaj tiam diris en mistera tono:

“Fraŭlo Willem, vi ne trovos Sabinan kaj ŝian patriron solaj. Iu estas kun ili.”

“Iu? Kiu?”

“Mi ne scias precize. Kiam ni alvenis ĉi tie en la veturilo, mi vidis sinjoron, kiu spionante eligis la kapon el la foliaro. Tio inspiris al mi malfidon. Malgraŭ la malpermeso de la Sinjorino, mi penetris tie malantaŭe tra la arbusttaluŝo kaj vidis en la malproksimeco tiun saman sinjoron promeni inter fraŭlino Sabina kaj ŝia patrino. Ŝajnis al mi, ke li tenis la manon de la fraŭlino en la sia, parolante al ŝi tre emocie kaj ekscite.”

“Kara ĉielo! Kaj ĉiu vi rekonis lin?” murmuris Willem.

“Li similas al la fraŭlo, kiu antaŭe venis ofte frapi sur nian pordon.”

“Ĉu Everard t’Serclaes?”

“Jes, se miaj okuloj ne trompis min. Sed mi ne estas certa pri tio, ĉar timante, ke la sinjorino rekonos min, mi ne kuraĝis alproksimiĝi.”

“Estas bone. Mi dankas vin pro via diligenteo. Mi baldaŭ scios tion.”

Post tiuj vortoj Willem paŝis pluen en la aleon. Iomete plu li ŝajnis heziti, haltis momenton kaj ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ li volus reiri. Sed tiam li decidiĝis, proksimiĝis al la rando de la aleo kaj penetris profunde en la arbusttaluŝon. Lia intenco estis sendube atingi tra la densa foliaro lokon, de kie li povus vidi la kapelon sen esti mem vidata.

Komence li paŝis haste tra la arbustoj, ĉar la kapelo troviĝis ankoraŭ malproksime. Sed tiam li subite haltis surprizite, aŭskultis kelkajn malfortajn sonojn, kiujn li kredis aŭdi. Efektive li ne eraris: je ŝtonjeta distanco je lia maldekstra flanko la personoj, kiujn li volis spioni, devis esti konversaciantaj, ĉar iam kaj iam la preskaŭ neperceptebla sono de virina voĉo venis de ie trafi liajn orelojn.

Kion li faru? Li hezitis kaj ŝajnis tremi. Sekrete spioni Sabinan kaj Everard-on: ĉu tio ne estus malica kaj honta? Ĉu li ne prefere iru tra la aperta aleo kaj montri sin sentime? Sed kion li dirus, kaj kiel li pravigus sian surprizon?

Ankoraŭ momenton li ŝanceliĝis en sia nedecidemo, skuis la kapon, dolore suspiris... kaj fine subfalas al la tento, kiu instigis lin certiĝi pri sia malfeliĉeco. Singarde kaj kiel eble plej silente li penetris tra la arbustoj, ŝtelirante kvazaŭ timema ŝtelisto, profunde kliniĝante kaj fine rampante sur manoj kaj genuoj ĉiam pli proksimen al la loko, de kie li perceptis de tempo al tempo sonon, kiu indikis al li la ĝustan direkton. Lia koro bategis. Ŝvito kovris lian frunton. Lia konscienco riproĉis al li, ke li estas

plenumanta senkuraĝan kaj malŝatindan agon. Sed la timo en lia animo, la amĵaluzeco, kiu ronĝis lin, faris lin senprudenta kaj blinda.

Ĉar dum iom da tempo li aŭdis jam nenion, li komencis kredi, ke Sabina kun ŝia kunulo kaj ŝia patrino jam foriris de tie por daŭrigi sian promenon. La penso, ke nun ili povus esti jam for de li, malpezigis iomete lian premitan bruston. Li spiris pli libere kaj malpli konsternita ŝteliris tra la arbustaro... Tie eksonis en liaj oreloj la voĉoj, tre proksime de li kaj bone kompreneblaj! Jes, jes, estis Sabina, kiu respondis al la demando de Everard! Nur densa kaj foliriĉa arbustaro de aveluoj kaj rubusujoj apartigis lin de ŝi!

Li retenis la spiron, streĉis la orelojn kaj aŭskultis. Ĉiu vorto eliĝanta el la buŝo de Sabina kaj Everard trapikis lian koron kiel murdanta aleno. Ĉar nun, kiam la gefeliĉuloj havis plu neniam materiajn detalojn komunkendaj unu al la alia, ili babilis pri nenio alia ol sia reciproka senfina afekcio, tiel ke lia tuta konversacio estis la nura kaj ĉiam ripetata elverŝo de sia nepereonta amo.

Aŭdante tiujn tenerajn eldirojn, Willem sentis sian koron ŝrumpi en la brusto. Li sinkigis la kapon sur la bruston, kaj du dikaj larmoj ruliĝis sur liaj vangoj. Estis malheliĝante en lia menso, kaj li eble jam ne aŭskultis iliajn parolojn... Sed iumomente lia nomo estis laŭte prononcata fare de Sabina! Li relevis la kapon kaj tremante streĉis la orelojn.

Kion do diris la fraŭlino, ke ĉiu el siaj vortoj pelis glacian tremon tra la korpon de la povra Willem Van Heetvelde? Kial li paliĝis kaj tordis siajn membrojn, kvazaŭ konvulsia febro kaptus lin?

Konsternita kaj profunde malespera, la junulo rerampis tra la arbustaron, nun kun pli da singardemo ol antaŭe, kaj nur tre for de la loko, kie li ricevis la fatalan baton, li kuraĝis tute rektiĝi. Haste, sed ŝanceliĝante sur siaj kruroj, li paŝis inter la arbojn, ĝis kiam li kredis sin sufiĉe foriĝinta. Tiam kun dolora krio li apogis la kapon kontraŭ la trunkon de fago kaj komencis abunde plori.

Tiel malŝarĝante iomete sian koron de la subpremata doloro, li bridis siajn larmojn kaj murmurante kaj plendante paŝis pluen tra la arbaro ĝis iu flankaleo. Tie li trovis benkon, sur kiun li faligis sin, kvazaŭ ĉiuj liaj fortoj estus elĉerpitaj. Kelkan, tempon li tenis la rigardon senmove direktita al la grundo. Tiam li suspiris per raŭka voĉo:

“Jam ne ekzistas feliĉeco por mi. Ĉiu espero estas perdita. Estas kvazaŭ eterna kondamno, kiun ŝi eldiris por mi. Mia edzino ŝi neniam fariĝos, eĉ se mi estus reĝido, eĉ se mia patro igus ŝin forvelki pro ĉagreno, eĉ se ekzekutisto

starus kun glavo antaŭ ŝi! *Lia* novelzino ŝi estos! Al kio servas ankoraŭ al mi tiu ĉi mizera vivo? Lasu min morti, ho Dio mia!”

En tiu momento en la sama aleo aperis persono, kiu per siaj bunta vestaro kaj glavo estis rekonebla kiel ia ĉefo de la grafaj trupoj. Ekvidante la junulon, li levis la ŝultrojn kaj diris al si mem kun leĝera mokrido:

“Ho, ho, la filo de la amano! Ĉu oni perfidis al li la sekreton de tiu ĉi renkonto? Atentu! Mi almenaŭ scias nenion.”

Li iris al la junulo kaj diris:

“Hej, fraŭlo Willem, ĉu vi en la Nova Arbaro? Kia plezuro renkonti vin! Estas eble la lasta bela tago de la jaro. Ankaŭ min la arda sunbrilo logis eksteren por fari promenon.”

Willem levis la kapon kaj rigardis lin malĝoje.

“Bonan tagon, kapitano Goffredo,” li balbutis per dolore stranga voĉo.

“Ho, ĉielo, kion tio signifas?” ekkriis la kapitano. “Ĉu mi ne eraras? Vi ploris. Kio okazis? Kiu ofendis aŭ insultis vin? Mia brako kaj mia glavo estas je via dispono, vi bezonas diri nur unu vorton.”

“Aj, Goffredo,” suspiris la junulo, “se vi sciis, kiel profunde malfeliĉa mi estas. Nur se mi povus mortii!”

“Ĉu morti? Ba, por tio vi havas ankoraŭ sufiĉe da tempo. Ĉu denove amĉagreno?”

“Sinjorino Van der Aa kaj Sabina troviĝas en la Nova Arbaro.”

“Ha! Kaj vi, Willem ne profitas de la okazo kompanii ilin?”

“Everard t’Serclaes estas kun ili.”

“Ho, ho, kion vi diras!” murmuris la kapitano kun ŝajnigita miro. “Ankaŭ lin la bela vetero verŝajne logis al la arbaro. Certe, se sinjoro via patro aŭdus tion, li fortege ekkoleriĝus. Sed vin tio certe ne povas malfeliĉigi, mia bona Willem: estas pura hazardo, sendube... Nu, nu, mi sidiĝos apud vin kaj konsolos vin.”

“Neeble, mia vivo estas por ĉiam venenita. Ĉiu espero estas forprenita de mi. La plej amara ĉagreno estas mia sorto.”

“Ĉar hazardo igis Sabinan kaj Everard-on renkonti sin? Per kio tio ŝanĝas vian aferon?”

“Se tio estus nur la sola kaŭzo de mia ĉagreno,” plendis la junulo, “mi ankoraŭ povus dubi. Sed nun eĉ la plej malgranda iluzio estas rifuzita al mi. Mi aŭdis mian kondamnon, mian malbenon el ŝia buŝo, kapitano.”

“Ŝi malbenis vin? Ŝi, la boneco, la dolĉeco mem? Eĉ se mi aŭdus tion, mi ne kredus tion.”

“Ve, Goffredo, kompatu min! Estas tamen tiel. Ŝi kondamnis min al eterna malespero. Mi eksciis, ke ili iris al la Nova Arbaro. Ĉi tie mi aŭdis de ŝia veturilservisto, ke iu persono, kiun mi suspektis esti Everard t’Serclaes, promenis en ŝia kompanio kaj eĉ manon en mano. Mi penetris tra la arbustoj por proksimiĝi nevidate

al la loko, kiun la servisto montris al mi. Subite mi aŭdis malantaŭ la arbustaro la voĉon de Everard kaj poste la voĉon de Sabina, kiu respondis lin. Aj, tie mi travivis momentojn de nedirebla doloro! El ŝia buŝo mi devis aŭdi, kiel tenere, kiel arde, kiel senfine ŝi amas lin! Kaj tamen, estis nenio kompare kun ŝiaj lastaj vortoj, kiuj traboris mian koron kiel tiom da spadoj. Goffredo, ŝi prenis la ĉielon kiel atestanto, ke ŝi neniam fariĝos mia edzino, eĉ se mi estus reĝido, eĉ se ekzekutisto starus antaŭ ŝi kun blanka glavo por senkapigi ŝin kaj ŝi povus savi sian vivon nur akceptante mian manon!”

“Kaj tiuj vortoj malesperigas vin?” diris la kapitano ridante. “Nu, mia amiko, kiel leĝere vi povas esti senkuraĝigita! Ni ja bone scias, ke almenaŭ ĝis nun fraŭlino Sabina sentis pli da amo en sia koro por Everard ol por vi. La situacio de la afero do neniel ŝanĝiĝis aŭ malpliboniĝis. Sed virina koro estas tiel malkonstanta! Havu paciencon: ŝi ne povos edziniĝi al Everard, tiel longe, ke via patro vivos. Estu certa: finfine vi venkos.”

“Dankon pro viaj afablaj vortoj,” suspiris la junulo en tono de la plej kompleta senkuraĝeco. “Se vi estus aŭdinta la voĉon de Sabina – tiel emociitan, tiel tremantan, tiel solenan –, kiam ŝi kondamnis min al eterna malespero, vi ne dubus pri mia nenuligebla sorto.” Por mi la vivo sur la tero estos plu nenio alia ol ĉagreno kaj amareco! Se mi ne timus Dion tiel multe, mi serĉus liberigon en la morto!”

“Nu, nu, mia bona Willem,” diris la kapitano konsolante, “forpelu tiujn sensencajn pensojn. Vortoj diritaj de knabino en momento de eksciteco, ne estas evangelio. Konfesu vi mem, ke la animstato de Sabina kontraŭ vi jam multe ŝanĝiĝis, kaj ke de kelkaj semajnoj ŝi traktis vin pli afable.”

“Ve, jes, mi kredis tion, Goffredo. Sed kiel dolore la tuko estis fortirita de miaj okuloj!... Ne, ne, ĉesigu viajn noblajn provojn: por mi restas nenia espero!”

“Ĉu vi kredas tion? Nu, Willem, mi konsolos vin, mi savos vin.”

“Ĉu savi min?” ekkriis la junulo kun brilaj okuloj. “Kion vi volas diri?”

“Ha, vi ne konas min, Willem. Mi kapablas fari pli, ol vi pensas, kaj ĉar mi kompatas vin, mi intencas streĉi ĉiujn miajn fortojn por liberigi vin de via ĉagreno. Mi havas granda influon sur Sabina. Ŝi havas senliman fidon en mi. Ĝis nun mi ne volis – almenaŭ ne speciale – enmiksiĝi en la aferon, sed ekde nun mi engaĝos min por vi kaj, se tiel diri, penos per animo kaj korpo por via afero.”

Kvankam Willem atendis nenion de la interveno de la kapitano, li estis dankema al li pro

lia simpatio kaj lia bona volo. Sed se li ne estus tiel naiva, la konstanta duba rido sur la lipoj de Goffredo kaj la stranga esprimo de liaj daŭre moviĝantaj pupiloj devus inspiri malfidon al li, kaj li demandud sin, ĉu li ne devos rigardi la vortojn de la kapitano kiel blufon aŭ falsan mokon. Sed la junulo estis ankoraŭ tro sen-sperta por suspekta la sincerecon de iu, kiun li rigardis kiel sian amikon.

“Bona, nobla Goffredo,” li murmuris, emocie kaptante lian manon, “vi volas provi ion neeblan por mi, sed tamen akceptu mian elkoran dankon pro via bona volo.”

“Ĉu ion neeblan?” ripetis la kapitano. “Vi vidos. Kion vi dirus, se Sabina mem, antaŭ ol monato estos pasinta, ordonus al vi gardi esperon: unuvorte, se ŝi kredigus al vi, ke ŝi amas vin?”

La junulo skuis la kapon nekredante.

“Tio eble kostus al vi iomete da mono...”

“Kostus iomete da mono?” ŝercis Willem.

“Ho, se mi povus aĉeti amon kaj feliĉecon per mono!... Ekde mia infaneco mi iam kaj iam ŝparis, kaj nun mi posedas malgrandan trezoron... kvarcent malnovaj ŝildoj¹². Tiujn mi tute donus por kuraĝiĝa vorto de Sabina.”

La rigardo de la kapitano rigidiĝis kaj ekbrilis. Li videble paliĝis kaj ŝajnis sinkinta en profundan pensadon.

“Ĉu mi komprenis vin bone?” li murmuris post momento da silento. “Ĉu vi diris kvarcent malnovajn ŝildojn, mia bona amiko? Ĉu kvarcent?”

“Jes, kaj eble ankoraŭ iomete pli.”

La esprimo sur la vizaĝo de Goffredo estis tute ŝanĝiĝinta. La ruza rideto estis mal-aperinta de liaj lipoj, kaj la tono de lia voĉo atestis pri atento ka seriozeco.

“Estas trezoro, vera trezoro,” li murmuris, “kaj vi donus ĉiujn tiujn kvarcent malnovajn ŝildojn al tiu, kiu ebligis al vi konkeri la manon de Sabina?”

“Ĉiujn, ĉion kion mi posedas... Sed, Goffredo, pro kio tiuj vanaj vortoj? Mi estas tre certa, ke neniu iam povos gajni mian ŝparitan monon.”

“Tion vi pensas. Ĉio estas ebla, se oni havas bonan planon!” grumblis la kapitano, konvulsie frotante al si la kapon. “Lasu min pensi kelkajn momentojn...”

Silente li tiel longe rigardis la grundon, ke Willem stariĝis kaj diris al li:

“Nu, kapitano, ne vane torturu vian cerbon. Mi iras hejmen. Mi sopiras je soleco;”

“Ne, sidu ankoraŭ iomete, mi petas vin,” respondis Goffredo, retirante lin al la benko. “Miaopinie estas nediskuteble, ke Everard estas la sola obstaklo al via feliĉeco. Jes, ĉar

Sabina ofte komprenigis al mi, ke ŝi ne rifuzus vian manon, se ŝi ne estus promesinta antaŭe sian amon kaj fidelecon al Everard, kaj ŝi sincere plendis pri tio, ke ŝi devos tiel ĉagreni vin. Unufoje, ĉe tia okazo, mi eĉ vidis larmojn en ŝiaj okuloj. Ĉu vi kuraĝus aserti, ke ŝi malamas vin?”

“Ne, mi konas la bonecon de ŝia koro kaj scias, ke ŝi almenaŭ kompatas min pro mia ĉagreno. Sed al kio tio povus servi min?”

“Kaj se Everard ne plu starus inter vi kaj Sabina?”

“Ha! Tiam...!” suspiris Willem.

“Nu, forigu Everard-on el via vivo. Tio estas la rimedo!”

Timigita kaj mirigita, Willem rigardis lin en la okuloj.

“Ho, ĉielo!” li murmuris. “Ĉu mi bone komprenis vin? Ĉu murdo?”

“Vi revas, Willem. Kiu parolas pri murdo aŭ pri ia ajn perforto? Ne, ne, oni devus esti kapabla forpreni al Everard ĉian esperon pri la mano de Sabina sen tuŝi haron sur lia kapo. Certe ekzistas rimedoj tiucele: ekzistas rimedo por ĉio.”

“Kaj tian rimedon vi konas, kapitano?”

“Ankoraŭ ne, sed kvarcent ŝildoj estas tiel granda trezoro, ke mi streĉos mian cerbon ĝis ekstreme – kaj mi trovos tiun rimedon! Ne estas dubo! Nu, nu, Willem, ankaŭ mi deziras esti sola en mia ĉambro. Ni eniru kune la urbon. La nokto alportos al mi konsilon. Atendu min morgaŭ frue. Se jam tiam mi estos trovinta la rimedon, mi tuj venos diri tion al vi.”

Ili ekstaris kaj ekpaŝis malrapide unu apud la alia: la junulo, kiu, ne kredante je la promesoj de la kapitano, rememoris la kruelan juĝon prononcitan kontraŭ li, kaj Goffredo, kiu torturis al si la cerbon, serĉante taŭgan rimedon por forigi Everard-on kaj de tempo al tempo neaŭdeble murmurante:

“Kvarcent ŝildoj! Kvarcent ŝildoj!”

“De kelkaj semajnoj tiel dolĉa espero estiĝis en mia koro!” diris Willem plende. “Senprudentulo, kiu mi estis: tage kaj nokte mi revis pri la feliĉeco, kiu ridis al mi el la malproksima estonteco. Sabina estis fariĝinta afabla kontraŭ mi. Mi jam ne parolis al ŝi pri la ardaĵoj de mia koro, sed en ŝiaj okuloj mi kredis vidi brili iafoje fajreron de afekcio por mi! Trompa ŝajno! Ŝi deziris nur danki min pro tio, ke mi ne plu enuigis ŝin per la esprimoj de mia priridinda espero! Por mi ŝi sentis eble ian kompaton, sed por li neeldireblan, senfinan amon! Ve, kio mi fariĝos nun? Mia vivo jam ne havas sencon: malĝoĝi en soleco, malrapide forvelki!... Goffredo, vi tiel ofte diris al mi, ke ŝi videble komencis senti amon por mi. Nun ankaŭ vi jam ne kredas tion.”

¹² Malnova franca monero nomata ‘écu’.

Sed la kapitano, kvankam paŝante ĉe lia flanko, estis tiel profunde enpenŝiginta, ke li aŭdis neniun ajn el la vortoj, kiujn diris la junulo.

“Rekonu do, ke vi grave eraris, ĉu ne, Goffredo?” demandis Willem.

Kiel solan respondon la kapitano murmuris:

“Kvarcent ŝildoj! Kaj ĉu vi donos ilin ĉiujn?... Ne, ne, ne parolu: lumradio trarapidegas mian cerbon. Ne malordigu miajn pensojn!”

La junulo ridetis kun malĝoja moko. Ambaŭ silentis dum tre longa tempo. Jam ili povis vidi la pordegon Coudenberg en la malproksimeco, kiam la kapitano subite haltigis sian kunulon per ekscita movo kaj ekkriis:

“Trovite! Mi trovis la solvon! Ne, ankoraŭ ne tute... Atendu ankoraŭ iomete... Jes, jes, estas certa rimedo!”

“Kiu rimedo?” demandis Willem, mirigita.

La kapitano rigardis al ĉiuj flankoj, kvazaŭ li timus, ke iu povos aŭdi lin.

“La rimedo fari el vi la feliĉan novedzon de Sabina,” li diris. “Ne rigardu min tiel konsternite: kion mi diras, estas vero. Vi donos al mi la kvarcent ŝildojn, ĉu ne?”

“Senhezite, eĉ se vi farus nenion alian ol redoni al mi la perditan esperon.”

“Nu, mi malkovris neerareman rimedon por inspiri al Sabina malŝaton kaj antipation por Everard. Antipation por Everard, jes... kaj amon por vi.”

“Ho, se mi povus kredi vin, kapitano! Sed kiel vi plenumos tian miraĵon ne estante sorĉisto?”

“Oni efektive bezonas iom da sorĉado.”

“Ĉu sorĉado,” murmuris Willem, time rigardante la kapitanon en la okuloj.

“Vi ne bezonas kulpigi vin pri sorĉado. Mi prenos ĉion sur min... Krome, mi ne scias, ĉu oni devas nomi sorĉado la portadon de talismano.”

La junulo skuis la kapon ankoraŭ nekredate.

“Vi estas viro sen kuraĝo,” ekkriis Goffredo kun amara mokrido. “Kiel vi kuraĝas ami knabinon, vi, kiu kiel timida infano posteniĝas antaŭ la plej malgranda obstaklo? Sabina pravos doni sian amon al pli forta viro. Miloĵoj da homoj, kiam ili havas la feliĉon posedi talismanon, uzas ĝin sensuspekto. Efektive, ni ne scias, ĉu talismano ŝuldas sian influon al sorĉado aŭ al naturaj aŭ diaj fortoj... Ĉu vi ankoraŭ dubas? Mi volas doni al vi kiel edzinon la plej belan kaj riĉan fraŭlinon de Bruselo, kaj vi stulte ĵetas ŝin en la brakojn de Everard t'Serclaes! Estas tiel! Estu do malfeliĉa, vi meritas tion. Adiaŭ!”

Kion li atendis, okazis: la junulo ekkuris post li kaj retenis lin.

“Ho, Goffredo, mia bona amiko,” li petegis, “miaj pensoj estas konfuzaj. Kompatu min

iomete. Vi estas certa, ke Sabina fariĝos mia novedzino?”

“Tute certa.”

“Nu do, mi liveras min tuta al vi: ordonu, kaj mi obeos.”

“Mi ne havas multon ordonenda al vi,” respondis la kapitano. “Estis vi, kiu devas havigi al mi talismanon. Krom tiu punkto, vi devas okupiĝi pri nenio ajn. Ĉio cetera estas mia afero.”

“Diru al mi, Goffredo, kion mi devas fari.”

“Estas malfacila afero,” diris la kapitano, levante la ŝultrojn, “eble neebla, se la kuraĝo mankas al vi.”

“Ho, ne timu pro tio, Goffredo, mi estas preta fari ĉion.”

“Ni ja vidos tion, Willem. Nu, faru kelkajn paŝojn flanken de la vojo. Tie for, inter la arboj, ni riskos malpli facile esti surprizitaj aŭ ĝenataj de preterirantoj.”

Alveninte sur la indikita loko, la kapitano metis manon kontraŭ la kapon kaj, silentante fikse rigardis iom da tempo la grundon, kvazaŭ por serĉi ion en si memoro. Tiam li diris:

“Willem, sendube vi scias, ke, en unu el la unuaj tagoj post la okupacio de Bruselo nia kolonelo, sinjoro Van Reigersvliet, vendis por multa mono al via patro strangan juvelon, en kiu brilis altvaloraj ŝtonoj.”

“Certe mi scias tion,” respondis la junulo, “plurfoje mi havis ĝin en la mano. Mia patro atribuas grandan valoron al ĝi. Li intencas fariĝi el la ŝtonoj artan broĉon kaj donaci ĝin al la grafino de Flandrio, tuj kiam ŝi honoros Bruselon per vizito por la unua fojo.”

“Dankon al Dio, Willem, ke via patro ankoraŭ ne faris tion, ĉar la juvelo posedas sekretajn fortojn, kiujn konas neniu en Bruselo krom mi sola. La juvelo estas ronda kaj havas la formon de radeto, ĉu ne? Dum la ekstera cirklo kaj la spokoj estas kovritaj per diamantoj, rubenoj kaj smeraldoj, en la mezo ambaŭflanke troviĝas kruda, senbrila ŝtono, aŭ pli ĝuste ŝtono el nekonata materio...”

“Ĝi estas blua unuflanke kaj bruna aliflanke,” rimarkigis Willem.

“Ĝuste en tiuj ŝtonoj kaŝiĝas la mistera forto de la juvelo. Eble vi miras, ke nur mi konas tiun misteran forton. Vi tuj komprenos... Kiam ni estis predantaj ĉion laŭlonge de la vojo de Aalst al Bruselo, fordonante la kastelojn kaj domojn al la flamoj, mi alvenis kun trupo da soldatoj antaŭ fermita kastelo-fortreso, kiun ni ne povis superforti sen sturmo, kvankam ni vidis apenaŭ kelkajn virojn sur la muregoj. Mi resendis kelkajn soldatojn al nia kampadejo por alporti skalojn kaj atendis kun la aliaj je arkpafa distanco de la kastelo. Kelkan tempon poste ni vidis la levponton malsupreniri kaj maljunan viron veni al ni en la kampoj. Li

demandis la permeson paroli al mi sola kaj estis kondukita al mi. Post kiam mi iris kun li distanceton flanken, li diris al mi, ke en la kastelo loĝas malsana vidvino kun siaj tri ankoraŭ junaj infanoj. Ŝi deklaris rezigni pri ĉion, kion ŝi havas, monon kaj bienon, sed petegis min ne ekbruligi la kastelon, tial ke ŝi, estante litmalsana, ne povas fuĝi kun siaj tri infanoj kaj pereos en la fajro. Ĉar mi ne povis ŝpari tiun kastelon pro la severa ordono de miaj ĉefoj, mi ne povis konsenti al la petego de la vidvino. Tiam, por tenti min, la maljunulo parolis al mi pri altvalora kaj mirakla juvelo, kiun la malsana nobelino posedis kaj estis dononta al mi kiel sekretan rekompenco. Kavaliro estis aĉetinta aŭ konkerinta ĝin antaŭ preskaŭ ducent jaroj dum militiro kontraŭ la Saracenoj en Egipto. Kaj tiel ĝi venis kiel altvalora heredaĵo al la mastrino de la kastelo. La mirakla forto de la juvelo konsistis en tio, ke per certaj sekretaj agoj, kiujn li eksplikis al mi, oni povus, per la bruna ŝtono, inspiri al iu persono senton de nerepacigebla malamo kontraŭ alia persono, kaj per la blua ŝtono sammaniere nerezisteblan senton de amo... La sorto de la malsana vidvino tenerigis mian koron, la grandvalora juvelo tentis min, kaj mi estis preta ŝpari la kastelon, kiam nia armeestro, kiu akompanis la virojn kun la skaloj, venis al ni kaj ordonis la tujan sturmon de la kastelo. Sed la loĝantoj libervole malfermis la pordegojn, kaj ni eniris sen ia glavobato. Ĉio estis kaptita kaj predita. Kiom ajn mi rapidis por esplordemandi la nobelino pri la juvelo, ĝi jam estis forprenita de ŝi de aliaj.

“Ĉu la povra vidvino estis forvorita de la flamoj?” demandis Willem kun glacia tremeto.

“Ne, pro kompatato al ŝi kaj ŝiaj infanoj la armeestro ordonis ŝpari la konstruaĵojn. Oni ne suferigis ŝin. Kelkajn tagojn poste mi vidis la juvelon en la manoj de sinjoro Van Reigersvliet. Li ne konis ĝiajn fortojn. Mi silentis, ĉar ekde tiam mi decidis aĉeti ĝin por ia ajn sumo da mono. Bedaŭrinde, la ludado fariĝis al mi tiel malfavora... Ĉu vi komprenas, Willem, kial mi rakontas tion al vi?”

“Ne tute klare.”

“La juvelo, kiun via patro aĉetis de nia armeestro, estas la miraklaĵo de la malsana vidvino, la Saracena talismano, kiun mi bezonas por ekflamigi la koron de Sabina pro amo al vi. Ĉu vi povos havigi ĝin al mi kaj lasi min gardi ĝin du aŭ tri tagoj?”

“Mi demandos tion al mia patro, Goffredo. Tiucele li certe kun ĝojo konfidus ĝin al vi.”

“Ne, ne tiel. Nenia homo rajtas scii pri tiu afero krom la uzanto kaj la homoj, por kiuj li uzas la ŝtonon. Se ne, la ŝtono ne povos efiki.”

“Ĉu enmanigi la grandvaloran juvelon al vi, sen ke mia patro scias tion?” balbutis Willem. “Mi ne kuraĝas fari tion.”

“Sed ĉu vi do ne fidus mian honestecon? Post du aŭ tri tagoj mi redonos ĝin al vi. La problemo estas nur, kiel vi mem povus forpreni ĝin nevidate, ĉar ĝi certe estas gardata en forta kesto.”

“Jes, tiu kesto ne havas ordinaran seruron. Por malŝlosi ĝin, oni devas koni iun sekretan nombron.”

“Kaj vi konas tiun sekretan nombron?”

“Jes, Goffredo.”

“Vi ja vidas, ke la ĉielo favoras nin. Tiam tio iros glate!” ekkriis la kapitano kun granda ĝojo.

“Mi hezitas. Mi ne scias, Goffredo, mi koro konsterniĝas pro timo, kvazaŭ vi volus delogi min al krimo. Ĉu vi ja ne volas trompi min?”

“Ĉu trompi vin? Krom mia deziro vidi vin feliĉa, mia sola celo estas gajni la kvarcent malnovajn ŝildojn... Mi ne petas ilin de vi hodiaŭ, nek morgaŭ, nek postmorgaŭ. Vi donos ilin nur al mi, kiam vi mem estos konvinkita, ke Sabina ne nur sentas jam neniam amon por Everard, sed ankaŭ ke ŝi ne plu povos ami lin.”

“Kaj ĉu vi redonos al mi la juvelon nedamaĝitan?”

“En tre surpriza maniero mi reirigos ĝin en la manojn de via patro, sen ke vi bezonos okupiĝi pri tio. Ne timu, li laŭdos kaj dankos vin pro tio, kion vi faros.”

“Ĉu certe?”

“Je mia honoro.”

“Nu, se la cirkonstancoj estos favoraj, mi sekrete donos al vi la juvelon ankoraŭ hodiaŭ. Ĉu vi volas veni kun mi al nia domo?”

“Jes, mi devas nepre paroli al via patro, kaj krom tio, mi devas diri al vi ankoraŭ aliajn aferojn, kiuj vi devas nepre scii.”

Ili revenis sur la vojon kaj direktis siajn paŝojn al la pordego Coudenberg.

La kapitano diris:

“Postmorgaŭ estos granda vespera festo en via domo, en kiu ankaŭ sinjorino Van der Aa kaj Sabina ĉeestos. Mi volas konvinki vian patron inviti ankaŭ Everard-on t'Serclaes al tiu festo.”

“Ho, li ne faros tion.”

“Vi vidos, Willem, nur lasu min agi.”

“Sed Everard rifuzos. Li, veni en la domon de mi patro?”

“Li certe venos. Koncerne vin, eĉ per la esprimo de via vizaĝo, vi ne povas perfidi, ke vi havas specialan kialon senti venĝemon kontraŭ li. Montru vin ĝentila aŭ indiferenta kontraŭ li, kaj diru nenian vorton al Sabina pri ĉio okazinta. Tenu vin silenta kaj modesta, se ne, vi eble fuŝus ĉiujn miajn planojn. Ĉu vi

sentas vin sufiĉe forta por sekvi mian konsilon?”

“Mi faros ĉion, kion vi volas. Mi obeos vin kiel infano.”

“Tiam mi havas nenion pli direnda. Ni nun rapide eniri la urbon.”

Ekde tiam ili parolis nur tre malmulte. Iam kaj iam Goffredo diris ankoraŭ kelkajn vortojn al sia juna kunulo por komprenigi lin, ke la sukceso de tiu plano povus dependi de sia modesteco, kaj Willem, kiu nun kredis liajn promesojn, ripetis al li, ke li akurate sekvas lian bonan konsilon.

Tiel ili alvenis en larĝa strato, kiun oni nomis la Putterij, tial ke tie, piede de la Coudenberg elŝprucis multaj fontoj, interalie *la Camborn*¹³, *la Bloemartsborn* kaj *la Cretsborn*. Tie staris la domo de Van Heetvelde, tre granda kaj alta konstruaĵo el silikŝtonoj. Ĉe la pordego staris nun nombro da grafaj soldatoj por gardi la sekurecon de la amano.

Willem eniris kun la kapitano kaj kondukis lin al sia propra ĉambro en la unua etaĝo. Li oferis ŝegon al li kaj diris:

“Atendu iomete. La dormoĉambro de mia patro troviĝas malsupre en la alia flanko de nia domo. Tie troviĝas la kesteto. Post kelkaj momentoj mi revenos kun la juvelo.”

Goffredo postrigardis lin, dum li eliris tra la pordo, kaj aŭskultis iom da tempo la malpli-laŭtigantan sonon de liaj paŝoj. Tiam li ride-tante frotis al si la manojn kaj murmuris kun sovaĝa ĝojo en siaj okuloj:

“Kvarcent malnovaj ŝildoj! Mi havos ilin... Estas, kvazaŭ mi jam vidus ilin brili en miaj manoj. Kiel potenca dezirego al mono povas fari homan menson kreiva! Kiom ĝi akriĝas nian prudenton! Dum malpli ol duonhoron mi kunligis historion tiel mirinde trovitan kaj tiel kredinde rakontitan, ke mi mem povis kredi ĝin... Willem donos al mi la kvarcent malnovajn ŝildojn. Sed la plej mirinda el ĉio estas, ke mia trovo eble havigos al mi ankoraŭ pli riĉan rekompencon de la amano, ĉar, se estas tre necerte, ĉu Sabina iam amos la filon, al la patro mi faros nediskuteble grandan servon, kiun li ne povus sufiĉe pagi eĉ per tuta amaso da oro... Jen Willem, kiu revenas. Tiel baldaŭ! Kion tio signifas?”

“Nu, amiko, ĉu vi havas la juvelon?”

“Ne,” respondis la junulo. “Estas laboristoj en la dormoĉambro de mia patro – mi forgesis tion. Ili pendigas novajn kurtenojn ĉe la lito, kaj ili laboras ĝis malfrue en la vespero. Sed ne estas grave: morgaŭ, tuj kiam mia patro estos ellitiĝinta, mi malfermos la kesteton.”

“Vi maltrankviligas min,” grumblis la kapitano. “Se morgaŭ denove estos malhelpo?”

“Neeble. Dudekfoje dumtage mi povus preni la juvelon el la kesteto.”

“Se mi ne havos ĝin morgaŭ, ni maltrafas nian celon... eble por ĉiam.”

“Vi havos ĝin, ne dubu pri tio. Venu ĉi tien antaŭ la tagmezo, kaj mi donos ĝin al vi.”

“Nu, mi fidas vian vorton, Willem. Nun mi rapide malsupreniros por paroli al via patro. Ĝis morgaŭ!”

La junulo akompanis lin ĝis la pordo, retenis lin tie momenton kaj diris:

“Goffredo, mia amiko, vi zorgeme gardos la juvelon, ĉu ne? Se vi perdus ĝin!”

“Perdi ĝin?” replikis la kapitano, malfermante la kamizolon sur sia brusto. “Jen, sur mia nuda koro pendas saketo el kaprohaŭto. En tiu mi kaŝos ĝin. Kiel mi povus tiam perdi ĝin?”

“Ha, tio estas bona. Nun mi estas trankvila. Adiaŭ!”

La kapitano malsupreniris la ŝtuparon, direktis sin al la antaŭpordo de la domo kaj eniris survoje en flankĉambron, kie li demandis al servisto, ĉu li povos paroli al la sinjoro amano.

“Iu estas ĉe mia mastro. Bonvolu do atendi iomete, Sinjoro Kapitano,” oni respondis lin.

Sidiĝinta sur seĝo, Goffredo metis la kapon sur mano kaj komencis pripensi, tre absorbite, kion li diros al la amano por persvadi lin inviti Everard t'Serclaes. Sed li preskaŭ tuj aŭdis la voĉon de la amano resoni kun aparta forto malantaŭ la pordo. Eĉ la planko tremetis ĝis en la antaŭĉambro, kvazaŭ iu kolere stamfis per la piedo sur ĝin.

Post momento la pordo estis malfermita por elirigi iun. La amano, kiu ekvidis Goffredon faris al li signon per la mano. Kiam la kapitano estis enirinta en la salonegon, surprizis lin la esprimo sur la vizaĝo de Van Heetvelde. La lipoj de la amano tremetis, li pugnigis la manojn kaj li ŝajnis samtempe profunde timigita kaj ege kolera.

“Vi ŝajnas al mi emociita, Sinjoro Amano,” diris Goffredo. “Ĉu do vi ricevis tiel malbonan novaĵon?”

“Ho, mi preskaŭ sufokiĝis pro bedaŭro, kolero kaj ĉagreno!” grumblis sinjoro Van Heetvelde, konvulsie gestante. “Mi scias, ke oni sekrete preparas popolan ribelon kontraŭ mi. Ĝiaj signoj estis ĉiam pli bone videblaj, sed la projektantoj de tiu ribelo, la lokoj kie oni nutras tiun fajron, la realaj celoj de miaj malamikoj, iliaj rimedoj, ĉio ĉi eskapas al mi. Verŝajne nia sinjoro grafo devos resti ankoraŭ plurajn monatojn en Francio. De tiu flanko helpo ne estas atendenda! Aj, kaj la instigantoj estas tiel ruzaj, tiel fajnaj, ke mi vidas nenian rimedon por trafi ilin kun ia ŝajno de rajto kaj

¹³ ‘Born’ estas manova Nederlanda vorto por ‘fonto’ aŭ ‘puto’

sufoki iliajn inferajn intrigojn. Konvinkita, ke oni ekbrulos fajron minacantan min, mi devas lasi kreski ĝin senpove kaj nenion farante, ĝis kiam ĝi ekflamos nerezisteble por vori min. Mia situacio estas terura.”

“Sed, Sinjoro Amano,” rimarkigis Goffredo, “vi ja scias, kiu kaŭzas al vi tiun ĉi malbonon. En la tuta Bruselo estas nur unu viro, kiu kun tiom da singardemo kaj prudento kapablas...”

“Jes, jes, estas t’Serclaes, mia kaŝema malamiko!” interrompis lin la amano. “Estis li, kiu, instigita de malamo, sopiras al mia falo... Sed la hipokrita trompanto tenas sin trankvila kaj rampas en kaŝiteco kiel ruza serpento, ĉie sputante sian venenon kontraŭ min kaj nian dukon Ludoviko van Male. Sen li mi timus kaj devus timi nenion.”

“Estu do ĝoja, Sinjoro Amano,” flustris al li Goffredo per retenita voĉo. “Mi venas fari al vi proponon, kiu liberigos vin unufrape de ĉiu zorgoj... Sed neniu povas aŭdi nin.”

Li iris al la pordo de la salonego kaj certigis sin, ke ĝi estas bone fermita. Tiam, reveninte, li prenis seĝon kaj ŝovis tiun tre proksime de Van Heetvelde, kiu jam sidiĝis.

“Aŭskultu atente, kion mi eksplikos al vi,” li diris. “Mi konas la rimedon por tute senpovigi la maljunan sinjoron t’Serclaes kontraŭ vi, jes, eĉ por devigi lin labori por vi kaj obei vin kiel sklavo.”

“Ĉu devigi t’Serclaes, mian plej granda malamikon helpi min, obei min?” ekkriis sinjoro Van Heetvelde, mirigite kaj nekredante.

“Li rampas antaŭ viaj piedoj, petante de vi gracon, kaj faros ĉion, kion vi volas.”

“Sed vi revas, Goffredo. Sen miraklo...”

“Ne, ne necesas miraklo, Sinjoro Amano, mi estas certa pri mia afero.”

“Sed la rimedo al tia miraklaĵo?”

“Se mi malkaŝus al vi la rimedon, mia plano certe fiaskus. Ĉar vi, Sinjoro Amano, ne povas havi la plej malgrandan respondecon en ĝi. Eble jam postmorgaŭ via malamiko kuŝos antaŭ viaj piedoj, kaj ĉiu danĝero de ribelo malaperos. Ĉu mi ne farus grandan servon al vi, se mi plenumos mian promeson?”

“Certe, kapitano, netakseblan servon, sed mi demandas min, ĉu vi ne trompas vin mem.”

“Por sukcesi, mi bezonas monon.”

“Ĉu monon? Hahaha!” ekridis la amano, kvazaŭ li estus atendinta tian peton.

“Jes, Sinjoro, sed mi ne petas monon de vi antaŭe. Ne antaŭ ol vi estos vidinta antaŭ vi la maljunan t’Serclaes, petantan gracon de vi kaj pretan al la plej kompleta obeemo... Nu, Sinjoro Amano, se mia projekto estus realigita, kion ĝi valorus?”

“Se t’Serclaes submetos sin al mia volo, ĉion kion vi deziras.”

“Ĉu kelkajn centojn da malnovaj ŝildoj, Sinjoro Amano?”

“Tricent”

“Tro malmulte: kvincent almenaŭ.”

“Nu, tiel estu... Sed, Goffredo, vi ne metos min en danĝeron?”

“Neniamaniere, Sinjoro Amano. Nur unu kontribuon por sukcesigi mian planon mi petas de vi, ion malgravan en si mem: vi devas inviti la junan Everard-on t’Serclaes al via morgaŭa vesperfesto.”

“Ĉu inviti la junan t’Serclaes al mia vesperfestoj?” malrapide ripetis la amano. “Sed, Goffredo, vi ne parolas serioze: mi devigis Sabinan ĉeesti ĝin!”

“Ĝuste tial, Sinjoro Amano. Tio estas parto de mia plano. Oni kaptas pli da muŝoj per mielo ol per vinagro. Estas absolute necese, ke vi indulgu iomete Everard-on, almenaŭ ŝajne. Li devas kredi, ke vi fariĝis malpli severa kontraŭ li. La espero devas mislogi lin. Se Everard ne aperos en la vesperfestoj, mi estos tute senpova kaj ne estos eble por mi plenumi mian promeson al vi. Lia ĉeesto estas necesa.”

“Sed sendube Everard rifuzos akcepti mian inviton.”

“Li ne rifuzos, se mi diros al li, ke Sabina petas lin pri tio.”

“Kaj mia povra Willem, kion li dirus?”

“Nur lasu tion al mi: via filo tute ne estos malkontenta.”

“Vi mirigas min, Goffredo, almenaŭ se vi ne povas sorĉi.”

“Eble mi povas, Sinjoro, sed tio estas mia afero. Kio kostos al vi inviti la junan t’Serclaes al via festo? Tio povus mirigi kelkajn el viaj amikoj, sed oni rigardos tion nur kiel grandanimecon viaflanke. Nu, Sinjoro Amano, skribu invitilon por Everard. Mi mem portos ĝin al li por esti certa, ke ĝi havos la efikon, kiun mi deziras. Li fidus min.”

La amano, plene konvinkita per tiu tono de absoluta certeco, skribis kelkajn invitajn vortojn sur paperon, faldis ĝin, fermis ĝin per sia sigelo kaj transdonis ĝin al Goffredo. Tiu leviĝis kaj diris, dum Van Heetvelde kondukis lin al la pordo:

“Restu senzorga, Sinjoro Amano. Post du aŭ tri tagoj vi vidos ĉiujn miajn promesojn plenumitaj, kaj tiam mi ricevos la promesitan monon, ĉu ne?”

“Mi havas nur unu vorton.”

“Vi donos al mi kvincent malnovajn ŝildojn?”

“Se vi plenumos, kion vi diris. Kun ĝoja, amiko.”

“Nu, ĝis morgaŭ en via vesperfestoj. Adiaŭ, Sinjoro Amano.”

Kaj ridetante kaj kun brilaj okuloj Goffredo forlasis la domon de Van Heetvelde.

V

Duonhoron post la falo de la nokta mallumo oni vidis iam kaj iam brulantajn torĉojn en la Putterij, per kio estis anoncate, ke kelkaj invititoj jam proksimiĝis al la domo de Van Heetvelde por ĉeesti la grandan vesperfeston de la amano. Luj vojaĝis en belegaj veturiloj, gravaj sinjoroj sidis en ĉevalpalankenoj, sed la plej multaj iris piede, ĉiuj tamen estis akompanataj de kurieroj aŭ servistoj kun torĉoj por prilumi iliajn paŝojn tra la cetere tute mallumaj stratoj de la urbo. Ĉe la domo de la amano ili paŝis inter duobla vico de soldatoj en la larĝan ŝtuparsalonegon, kie ili demetis sian mantelon aŭ vesperpeltaĵon, kaj de tie ili estis kondukataj de servistoj ĝis antaŭ la pordo de la granda festosalonego. Tie ceremoniestro anoncis ilin laŭvoĉe kriante ilian nomon.

La amano staris kun sia needziniĝinta fratino en la salonego je iu distanco de la pordo por akcepti la gastojn, kiuj, interŝanĝante kelkajn vortojn kun la mastro de la domo, iris pluen en la salonegon por saluti kelkajn amikojn aŭ sidiĝi sur la foteloj kaj seĝoj, kiuj staris en granda nombro kontraŭ la muroj.

Multaj tamen pasigis la unuajn momentojn admirante la riĉajn murornamaĵojn en tiu nekutime belega salonego. Sur ĝiaj muroj estis fiksitaj lignaj bareliefoj, kiuj brilis kaj fajreris pro la oro, lazuro kaj karmino, per kiuj ili estis kovritaj. Sur la lokoj, lasitaj liberaj per tiuj artaj skulptaĵoj, pendis buntkoloraj tapiserioj, sur kiuj estis figuritaj scenoj el la sankta Skribo.

Laŭlonge de la parietoj brulis sur oraj kandeligoj multaj vaksaj kandeloj, kies fumo, ŝarĝita per orientaj balzamoj aŭ rezinoj, disvastigis agrablan odoron. Kvar grandegaj kronlustroj pendis de la plafono, kunfandiĝante per la radioj de sia abunda lumo ĉiun tiun riĉecon de koloroj kaj metalbriloj en unu blindigan brilegon.

Ankoraŭ du aliaj salonegoj, malpli vastaj, rilatis al tiu ĉi. La unua estis ripozejo por personoj, kiuj preferis pasigi la tempon en soleco aŭ per trankvila babilado ol resti en la tumulto de la festosalonego. La dua, en kiu staris nombro da tabletoj, devis servi kiel ludĉambro. En ĝi homoj, kiuj inklinis, laŭ la kutimo de la epoko, serĉi emociojn en la riskado de mono, povis kontentigi sian deziron.

Nun granda parto de la invititoj jam ĉeestis. Ĉe la pordo de la salonego, la ceremoniestro estis anoncinta kvindekon da kavaliroj, nobelinoj kaj gravaj burĝoj, inter kiuj estis la gesinjoroj Van Oostkerk, Van Quaedrebbe, Van Selleke, Van Redelghem, Van Meldert,

Van der Elst, Van Ophem, Van Beerthem, la sinjoroj De Beer, Swaef, De Roovere, Rolibuc, De Leeuw kaj multaj aliaj. Ankaŭ jam ĉeestis kelkaj komandantoj de la grafaj trupoj, inter kiuj armeestro Van Reigersvliet.

Ĝis tiam Willem, la filo de la amano, staris apud la enirpordo en la proksimeco de sia patro, atendante kun batanta koro la alvenon de Sabina, ĉar kapitano Goffredo Barberi certigis lin, ke la potenco de la talismano jam influis ŝin, kaj ke li povos vidi, ke sento de amo komencis vekigi en ŝia koro.

Ĉar sinjorino Van der Aa ankoraŭ ne aperis, Willem estis kaptita de la timo, ke Sabina eble retenos sian patrinon, ne volante veni al la vesperfestoj. Ĉu la fraŭlino ne rifuzis kun obstineco, kaj certe ankaŭ kun naŭzo, akcepti la inviton ĝis antaŭhieraŭ? Kapitano Goffredo estus povinta erari en sia espero.

Malpacienciĝinte per tiu dubo, Willem forlasis la pordon de la salonego kaj iris al la kapitano, kiu estis babilanta pli malproksime kun kelkaj nobelinoj, ridigante ĉiujn ĉirkaŭstarantojn per siaj gajaj eldiroj kaj spritaj ŝercoj. Kiam li vidis alproksimiĝi la filon de la amano, li ekskuzis sin antaŭ la nobelinoj, iris renkonte al la junulo kaj, tirante lin iomete flanken, demandis lin per regita voĉo:

“Tiel malĝoja, mia kara Willem? Kio do nebulas vian animon? Ĉu vi ankoraŭ dubas pri la realigo de mia promeso?”

“Ŝi ne venos!” suspiris la junulo.

“Ŝi venos. Mi vetas mian kapon pro tio. La talismano tiros ĝin ĉi tien kun nerezistebla forto.”

“Kial do ŝi tiom malrapidas?”

“Certe estas ŝia patrino, kiu ne estis preta pli frue. Vi komprenas, la tualetoj de tiuj maljunaj nobelinoj neniam finiĝas. Sabina kontraŭe, eĉ se ŝi estus vestita per sakaĵo, ...”

“Kaj vi estas tute certa, Kapitano, “interrompis lin la junulo revante, “ke ŝi sentas jam pli da amikeco por mi?”

“Amo!... Komenco de amo, kiu ekde nun kreskos seninterrompe.”

“Kaj ĉu ankaŭ ŝia koro sammezure malvarmiĝos kontraŭ t’Serclaes?”

“Ankoraŭ ne. Vi estas tiel terure hasta, mia amiko. Everard ankoraŭ ne estas sub la influo de la talismano. Nur ĉi tie, ĉi-vespere, ĝia povo prilaboros lin, kaj nur morgaŭ ni povos vidi la sekvojn.”

“Ĉu Everard venos, Kapitano?”

“Vi dubas pri ĉio, Willem. Li pozitive promesis tion al mi. Ke li aperos ĉi tie iomete pli malfrue, estas normale: lia veno devas kaŭzi miron, kaj li volas eskapi kiel eble plej al apartaj eksplikoj. Mi igis lin kredi, ke Sabina arde deziras vidi lin dum la vesperfestoj. Al Sabina mi konsilis trakti lin kun multe da modesteco. Tio estas necesa

por la sukceso de nia plano. Estu do singarda kaj akurate sekvu mian konsilon, ĉar alie ...”

Li estis interrompita per anonco fare de la ceremoniestro, kiu kun speciala emfazo proklamis:

“Sinjorino Van der Aa kaj fraŭlino Sabina Van der Aa!”

La anonco kaŭzis iom da agitado en la salonego, precipe inter la kavaliroj kaj fraŭloj, kiuj, instigitaj de la deziro vidi kaj saluti la belan fraŭlinon Van der Aa, ĉiuj direktis sin al la enirejo.

“Kial vi staras tie ĉi tiel konsternita!” ŝercis la kapitano, dolĉe antaŭenpuŝante la junan Van Heetvelde. “Oni dirus, ke vi havas timon. Kuru, diru al ŝi ion afablan. Vi vidus, kiel afable ŝi traktos vin... Jen, rigardu, kiel ŝi alridas vin!”

“Ĉu tio estus do vera?” suspiris Willem kun ĝoja miro. “Ho, kia feliĉeco! Neniam ŝia rigardo estis tiel dolĉa por mi! Ha, mi sentis min plena je espero kaj kuraĝo... Mi jam kuras!”

“Ne tro impete. Ne forgesu, kion mi diris al vi,” flustris Goffredo ankoraŭ en lian oreilon. “Afable, sed modeste.”

Kiam Willem proksimiĝis al la fraŭlino, ŝi estis ĉirkaŭita de dudeko da invititoj, kiuj konkure superŝutis ŝin per salutoj kaj laŭdoj kaj super ĉio gloris la ekstreman gracion de ŝia tualetto.

Efektive, dum ŝia patrino estis vestinta sin per peza sateno kun grandaj floroj, sub kies larĝaj kaj kraketantaj faldoj ŝia figuro estis preskaŭ nerekonobla, kaj estis ŝarĝinta per juveloj kaj ŝtonoj sian kapon, kolon kaj brakojn, Sabina elstaris per la simpleco kaj bongusteco de siaj vestoj. Ŝi estis tute vestita per leĝera, rozkolora silko. La sola alia koloro en ŝia tualetto estis ruĝa koralkoliero ĉirkaŭ ŝia svelta kolo. Eble ŝi ornamis sin tiel humile pro ia ruza, eble ne konscia koketeco. Ĉiakaze ŝiaj vestoj estis bone elektitaj por elstarigi ŝian naturan gracion kaj pruvi, ke ŝi ne bezonas eksterajn beligilojn por brili inter la plej graciaj knabinoj. Paleco kaj aspekto de malsaneto, kiun longdaŭra ĉagreno premis sur ŝian vizaĝon, eble malpliigis ŝian belecon, sed la sangruĝaj koraloj ĉirkaŭ ŝia kolo emfazis per sia brilo la freŝan ruĝon sur ŝiaj vangoj, tiel ke, kvankam ĉio en ŝia vestaro estis preskaŭ senkolora, ŝia tenere skulptita vizaĝo ŝajnis revivigita per la aminda roza koloro.

Willem, retenata de la cirklo de la invititoj, denove komencis heziti kaj ne kuraĝis penetri antaŭen ĝis apud ŝi. Sed ŝi, rekonante lin, faris kelkajn paŝojn al li, oferis al li sian manon kaj diris kelkajn salutajn vortojn, kies aminda tono igis bati pli forte pro feliĉeco la koron de la junulo kaj lasis lin preskaŭ nekapabla balbuti kompreneblan respondon.

Li estis tamen same rapide apartigita de Sabina fare de armeestro Van Reigersvliet kaj la oficiroj de la grafaj trupoj, kiuj volis honori ankaŭ siavice ‘la rozon de tiu ĉi ĉarma rozbedo, la plej brilan stelon de tiu ĉi vespero’, kiel ili nomis la fraŭlinon per sia bildoriĉa laŭdo.

Momenton poste Sabina sidis kun sia patrino meze de aliaj nobelinoj. Tute emociita kaj kun okuloj brilantaj por espero kaj ĝojo, Willem tenis sian rigardon fiksita sur ŝi. Sed kiam li konstatis, ke la fraŭlino turnis la kapon ĉiufanken de tempo al tempo, kvazaŭ serĉante iun en la salonego, nubo malsupreniĝis super lian koron. Li komprenis, kio okazas en ŝi: ŝi pensis pri Everard t’Serclaes kaj sopiris al lia alveno.

Eble Willem denove estus malesperiĝintas, se li ne estus vidinta, kiel la fraŭlino faris al li signon kaj indikis per fingro neokupitan fotelon flanke de ŝi. Tremante pro ĝoja surprizo, li rapide proksimiĝis kaj sidiĝis ĉe ŝian flankon.

En tre afabla tono Sabina komencis paroli kun li pri la bela vetero, kiun oni ĝuis de kelka tempo, pri la beleco de la salonego, la selekta kompanio kaj aliaj indiferentaj temoj. Sed ŝia voĉo estis tiel penetranta, ŝia rideto tiel ĉarma, ke Willem, ravite revante, aŭskultis kun tiel profunda sento de feliĉeco, kvazaŭ li jam estus aŭdinta la jesan vorton el ŝia dolĉa buŝo.

Nun Sabina ekvidis, ke la nobelino, kiu sidis flanke de Willem, deturnis la kapon kaj enprofundiĝis en viglan konversacion kun sia najbarino. Profitante de la okazo, la knabino klinis la kapon al sia kunulo, dirante:

“Willem, antaŭ nelonge vi demandis al mi, al kio vi dankas mian specialan amikaĵojn. Estas dankemo, profunda, sincera dankemo. Vi estas efektive noblanima viro. Mi jam ĉiam sciis kaj rekonis tion. Sed oni povas ja estimi iun sen pro tio... Ha, Willem, kiel mi iam esprimos al vi mian dankemon? Oni devas esti bonkora por povi fari, kion vi faris.”

“Kion mi faris?” murmuris la junulo, mirigita.

“Jes, nur kaŝu tion al mi, Willem: vi volas nur pligrandigi vian meriton, kaj sekve mian ŝuldon kontraŭ vi.”

“Vere, Sabina, mi ne komprenas.”

“Ĉu vi, sciante, ke tio povus feliĉigi min, ne konvinkis vian patron per preĝoj kaj petegoj inviti Everard-on t’Serclaes al tiu ĉi festo?”

“Ĉu mi?”

“Nu, akceptu mian dankon. Ne neu pli longe.”

“Sed kiu diris tion al vi, fraŭlino?”

“Nia bona amiko Goffredo ĉion eksplikis al mi. Mi scias, per kiuj ekstremaj klopodoj vi persvadis vian sinjoron patron inviti Everard-on por donaci al mi kelkajn momentojn da konsolo kaj ĝojo. KREDU MIN, MI NENIAM FORGESOS VIAN GRANDANIMECON.”

“Ha! Goffredo diris tion al vi?” balbutis la junulo. “Tiam tio devas esti vera.”

“Vi do konfesas?”

“Jes.”

Kaj kun interna ĝojo li aldonis:

“Sed Everard ne povos veni ĉi tien. Ni ne vidos lin ĉi-vespere.”

“Ne timu: li venos!” konfirmis la fraŭlino.

“Ĉu vi scias?”

“Kial mi ne sciis tion? Por vidi min kaj povi paroli al mi, Everard alfrontus ĉiujn danĝerojn, eĉ riskus sian vivon!”

“Maltrankvilo kaptis la koron de la povra Willem. Lia tuta feliĉeco frakasiĝis kaj li tute perdis sian kuraĝon. Nun li komprenis, aŭ kredis kompreni, ke Goffredo samtempe trompis lin kaj Sabinan. Ŝia nekutima afableco estis nenio alia ol sento de dankemo pro servo, kiun li ne faris al ŝi! Sed ĉu tio ne estis parto de la plano de Goffredo, kaj ĉu ne estus malsaĝe esprimi nun sian bedaŭron? Tiuj pensoj tiel terurigis lin, ke ekde tiam li respondis nur distrite al la vortoj de la fraŭlino. Finfine naŭzita de tiu doloriga situacio, li diris al ŝi, ke li devas, pro gentileco, iri saluti la ĵus alvenintajn geinvititojn. Tiel li trovis verŝajnan kialon leviĝi kaj direktiĝi al la alia ekstremo de la salonego.

Apenaŭ li malproksimiĝis, maljuna nobelino, kiu volis paroli al la patrino de Sabina, sidiĝis sur la seĝon, kiun li ĵus forlasis.

Tute senkuraĝigite, Willem eniris la duan ĉambron, falis sur benkon kaj komencis, la kapon apogitan sur mano, pripensi sian amaran senrevigon. Sed Goffredo, kiu postrigardis lin, venis al li. Kun leĝera ŝerco la kapitano respondis al liaj plendoj, dirante:

“Vi estas maljusta, amiko. Vi volas vidi la ĉevalojn jungitaj malantaŭ la ĉaro. Ĉu vi do esperis, ke Sabina ĉirkaŭbrakos vin, ekkriante al ĉiuj: ‘Jen Willem Van Heetvelde, mia estonta novedzo?’ Tiel tio ne funkcias. Amsento estas kiel grajno, kiu unue komencas ĝermi, tiam enradikiĝas kaj fine kiel forta kreskaĵo levas sian supron kun folioj kaj floroj. Ĉu mi ne plenumis mian promeson? Ĉu la voĉo de Sabina estis iam pli dolĉa por vi? Ĉu iam en ŝiaj okuloj brilis tia amikeco? Ĉu ŝia rideto estis iam tiel plena je afekcio? Tio estas la ĝermado de la grajno kaj ĝiaj unuaj radikoj. Estu do pacienca: vi vidos... Kaj antaŭ ĉio, restu singarda kaj lasu vin mirigi de nenio... Jen, aŭskultu, oni vokas la nomon de Everard t’Serclaes... Leviĝu kaj iru renkonte al li. Kion ajn li diros, estu afabla kontraŭ li kaj montru nek miron nek bedaŭron. La mano de Sabina fariĝos senerare la rekompenco de via fortanimeco.”

Ambaŭ direktiĝis al la pordo de la salonego por saluti la junan t’Serclaes.

Malmultaj el la ĉeestantaj kavaliroj aŭdacis renkonti Everard-on, eĉ retropaŝis ĉe lia apero, kaj ĉiuj, eĉ la virinoj, rigardis sin kun miro, kvazaŭ demandante, kion venas fari ĉi tie la filo de la plej obstina malamiko de la grafo de Flandrio kaj de la amano.

Ili ja ne sciis, ĉu la junulo jam donis pruvojn de tiu malamikeco ekde la komenco de la nova situacio, sed li estis la filo de la maljuna t’Serclaes, la fidela amiko de grafino Johana, kaj tio sufiĉis al ili.

Sed kiam ili vidis, ke la amano parolis kelkajn momentojn kun la juna t’Serclaes kaj eĉ premis al li la manon, ili komencis dubi. Ĉu la amano havis kialojn por fari tion? Ĉu Everard ne partumis la opinion de sia patro? Ĉu la junulo, pro sia amo al Sabina Van der Aa, kliniĝis al la partio de la grafo?

Tiuj pensoj ŝancelis la antipation de multaj. Stimulate de la ekzemplo de la amano, iuj antaŭeniris kaj salutis Everard-on per ĝentilaj vortoj. Precipe inter la fraŭlinoj estis iuj, sur kies kapoj aperis afabla rideto ĉe la vido de la bela, impona junulo.

Everard ŝajnis tute ne timida. Li salutis maldekstre kaj dekstre kun malstreĉaj gestoj, diris kelkajn vortojn al la kavaliroj kaj nobelinoj al li konataj, kaj tiam paŝis rekte tra la salonego ĝis antaŭ sinjorino Van der Aa kaj ŝia filino. Liaj profundaj kaj ripetaj riverencoj kaj liaj solenaj salutvortoj povus pensigi ĉiujn, ke temas nur pri ordinara montro de respekto. Sed liaj briletantaj okuloj kaj la radianta rideto de Sabina parolis pri amo kaj feliĉeco kaj esprimis la esperon, ke pli malfrue estiĝos por ili okazo malpli observate elverŝi siajn korszentojn per dolĉa babilado.

“Ĝis poste, mia karulino,” flustris la junulo.

“Ĝis poste, Everard. Nun bone plenumu vian devon de ĝentileco,” ŝi respondis.

De malproksime Willem tenis sian rigardon fiksitaj sur Sabina kaj Everard, kaj kun ĵaluza konsterneco spionis, kiel ŝi akceptis lin. Ŝia ŝajna malvarmeco verŝis konsolon en la koron de Willem. Li vidis, kiel Everard foriĝis de ŝi kaj venis rekte al li. Nun ne kostis al li penon, premi la manon, kiu estis etendita al li kun evidenta malavareco.

“Ha, Sinjoro Willem,” diris al li la juna t’Serclaes, “kian noblan koron vi do havas! Via grandanimeco hontigas min. Se iam estos ebla por mi refari al vi servon miavice, ne ŝparu min, mi petas. Mi estimos min feliĉa, prui al vi mian senfinan dankemon.”

Willem murmuris ion nekompreneblan.

“Ne, ne,” kontraŭdiris lin Everard, “ne estas malgranda servo, kiel vi asertas. Por mi kaj Sabina, kiuj ne povis vidi unu la alian ĝis nun, tio estas netaksebla feliĉeco. Kaj estas al vi,

mia bona Willem, ke ni ŝuldas tiun ĉi grandan bonfaron, al vi, mia bona Willem, kiu havas kialojn agi tute alie. Ho, tio estas vere tiel grandioza, tiel noblanima, ke mi ne scias, kiel esprimi al vi mian dankemon kaj admiron.”

“Sed pri kio do vi parolas?” demandis Willem.

“Ĉu pro kompato kun la ĉagreno de Sabina, kaj eble ankaŭ iomete pro amikeco al mi, vi ne insistis ĉe via patro inviti min al tiu ĉi vesperfesto kaj tiel donis al mi la okazon vidi Sabinan kaj paroli kun ŝi? Goffredo rakontis ĉion al mi.”

“Ha, Goffredo diris tion al vi.” balbutis Willem.

“Li certe troigas miajn meritojn: ne estas mi, kiu...”

“Nu, nu, ne pli longe ŝajnigu. Kiel do mi povus ĉeesti tiun ĉi feston, se vi ne estus konsentinta pri tio antaŭe...”

“Tio estas efektive vera.”

“... kaj se vi ne estus petinta de via patro tiun neatendatan inviton?”

Pro timo, ke li plenumos nesingardaĵon, Willem ne kuraĝis pli klare esprimi sian neadon, sed klare mensogi same tiom naŭzus lin. Tial indiferenta ŝultrolezado estis lia sola respondo.

Ravite de profunda sento de dankemo kaj blindigite per ĝojo, Everard prenis la manon de sia kunulo kaj tiris lin en angulon de la salonego. Tie li diris en lian orelon kun emociita voĉo:

“Willem, mia nobla amiko, finu vian noblaniman laboron: feliĉigu Sabinan kaj min! De vi sola dependas, ĉu ŝi tuj fariĝos mia edzino aŭ ne. Kial vi restus ankoraŭ pli longe la sola obstaklo al la plenumo de niaj deziroj? Sabina estimas kaj respektas vin, sed estas mi, kiun ŝi amas per la tuta forto de ŝia pura animo. Mi preferas morti ol perdi ŝin. Jes, eĉ se minacus nin la plej kruela torturo, nek ŝi nek mi rezignus pri tiu geedziĝo, kiu fariĝis la sola celo kaj la sola espero de nia vivo. Lasu min kaj Sabinan esti viaj plej bonaj amikoj. Devigu nin beni vian nomon kaj repensi pri vi kun dankemo en ĉiu feliĉa momento en la estonteco. Diru al via sinjoro patro, ke vi rezignas pri la mano de Sabina... Vi skuas la kapon? Malĝojigas vin do delasi ĉian esperon? Sed kial vi nutrus pli longe vian koron per vanaj iluzioj? Sabina kaj mi, ni amas nin ekde nia infanco. En ŝia koro jam ne estas loko por alia bildo ol la mia...”

Lia parolado estis interrompita de la alveno de kelkaj junaj kavaliroj kaj oficiroj de la okupacianta armeo, inter kiuj distingiĝis Goffredo per sia laŭta babilado.

“Ha, ha,” ekkriis la kapitano ridante, “tio estas bona! Vi interparolas konfidence kaj sekrete kiel du bonaj amikoj pri fraŭlinoj kaj amo, ĉu ne? Kial do tiaj grandanimaj viroj vivus en malamikeco?”

Fikse rigardante Willem en la okuloj, li aldonis kun speciala emfazo:

“Unuanimeco kaj amikeco estas la veraj rimedoj, kiuj permesas atingi la celojn de la koro.”

“Koncerne min,” diris Everard, “mi estas preta promesi al sinjoro Willem Van Heetvelde eternan afekcion por unu sola faro...”

“Nu, nu, vi havas la tutan vesperon por paroli pri tio,” interrompis Goffredo. “Sekvu nin nun, Sinjoroj: ni tuj komencos la ludon. La ŝildo kaj floroj baldaŭ ruliĝados.”

“Mi certe ne ŝatas ludi en tiu ĉi momento,” murmuris Everard.

“Estas egale. Tiam vi rigardos la ludon. Tuj kiam la ludo kaptos vin, vi ankaŭ metos la manon en la poŝon.”

“Mia patro faris al mi signon: li vokas min,” diris Willem, eble inventante tiun pretekston por povi eskapi al doloriga konversacio kun Everard.

Goffredo kuris post li kaj flustris en lian orelon:

“Ne estu tiel malĝoja. Kontraŭe havu kuraĝon kaj fidon: la talismano komencas bone efiki. Morgaŭ Sabina ne plu pensos pri Everard ol kun sento de malestimo. Ne dubu pri tio. Vi vidos.”

Kaj reirante al sia kompanio, li tiris Everardon en la ludĉambro.

En ĉagrena revado Willem rigardis la plankon kaj meditis pri la vortoj de Everard. Eĉ martirmorton Sabina libervole suferus prefere ol doni sian manon al alia viro ol Everard! Ili ambaŭ esperas, ke li, Willem, plifaciligus ilian geedziĝon! Ĉu tiu talismano ne estis superpotenca por tute ŝanĝi la humoron de Sabina? Ĉu Goffredi ne ĵus konfirmis, ke ĝi komencis bone efiki? Jam morgaŭ Sabina estis amonta lin kaj malestimonta Everardon!

Kvankam Willem ne plene fidis la promeson de la kapitano, tiu konsidero aperigis silentan rideton sur liaj lipoj, kaj malpli senkuraĝa li iris al kelkaj el siaj amikoj, kun kiuj li komencis interparoli, sed ne sen daŭra distreco. Lia koro instigis lin alproksimiĝi al Sabina, sed sento de honto retenis lin. La talismano ankoraŭ ne sufiĉe influis ŝin. Li timis, ke ŝi sendube reparolos al li pri Everard, kaj ke lia koro estos denove vundita kaj sangos pro la esprimoj de ŝia infinita amo al la amiko de sia infanco.

Ekde tiam Willem tenis sin en tiu parto de la salonego, kiu estis plej malproksime de sidejo de Sabina. Fojfoje li eĉ retiriĝis en la plej malproksiman parton de la domo kaj longe forestis.

Lia patro, kiu konsideris kiel sian devon laŭvice alparoli siajn gastojn kaj tial promenadis de unu al la alia, malmulte atentis pri la melankolio kaj introverta sinteno de sia filo.

Krom tio, kvankam li ne plene komprenis la planon de la kapitano, la amano fidis lian promeson kaj volis nek diri nek fari ion, kio povus malsukcesigi liajn sekretajn kalkulojn.

De kelka tempo servistoj cirkuladis en la salonego kun arĝentaj pletoj. Sur unuj brilis pokaletoj plenigitaj per altvaloraj vinoj. Aliaj estis ŝarĝitaj per pasteĉetoj kaj ĉiaspecaj bakajoj.

Tuj kiam la amano estis certa, ke ĉiuj liaj gastoj havas la okazon ĝui la diversajn refreŝaĵojn, li faris signon al la ceremoniestro. Nun aperis en la salonegon deko da muzikistoj kaj trubaduroj. La unuaj portis diversajn muzikilojn, kiel violonojn, flutojn, ŝalmojn, klarionojn kaj tamburojn. Du el ili tenis etajn harpojn en la manoj. La du lastaj sidiĝis sur seĝon kaj metis specon de kordotabulojn sur la genuojn, pretaj pinĉi la kordojn per pinĉiloj dum la kantado.

La violonistoj, akompanataj de aliaj muzik-instrumentoj, tuj ekludis gajan, rapide evolu-antan melodion, post kio ili ankaŭ resonigis ion de pli grava tono kaj malrapida mezuro. Tiam venis la vico de la trubaduroj, kiuj per la resonado de siaj voĉoj kaj la plej mallaŭtaj sonoj de siaj kordinstrumentoj karesis la orelojn de la gastoj kaj gajigis iliajn korojn.

Tiel dum proksimume du horoj kun mallongaj paŭzoj daŭris la muzikado kaj kantado. La bonegaj artistoj cetere sukcesis teni la atenton de la gastoj, ĉar la konversacioj estis preskaŭ ĉiuj ĉesintaj, kaj la societo interŝanĝis nur kelkajn mallaŭtajn rimarkojn pri la arta ludado kaj deloga kantado, kiujn ĝi rajtis ĝui tiun vesperon.

Intertempe Everard t'Serclaes estis reveninta el la ludoĉambro en la festosalonegon. Parolinte du- aŭ trifoje kun Sabina kaj ŝia patrino kaj foririnte same tiom da fojoj, li ekvidis kun plezuro, ke la nobelino, kiu sidis je la maldekstra flanko de Sabina, leviĝis de sia seĝo kaj eksidis flanke de alia al ŝi konata persono. Everard hezite alproksimiĝis al fraŭlino Sabina kaj demande rigardis la neokupitan seĝon. Kuraĝigite per preskaŭ neperceptebla kapklino de Sabina, li sidiĝis je ŝia flankon kaj komencis kun ŝi mallaŭtan por la aliaj nekompreneblan konversacion. La muzikon ili jam ne aŭdis. Ili parolis pri amo, fideleco kaj la estonteco, kaj en la daŭro ili tiom enprofundiĝis en sian senton de beateco, ke iliaj brilaj okuloj kaj radianta rideto perfidis, kio okazas en iliaj emociitaj koroj. Ili tiom forgesis la lokon kie ili troviĝas, ke ili finfine kaptis la manon unu de la alia kaj restis sidantaj kvazaŭ ravitaj.

Willem Van Heetvelde, kiu staris en angulo ĉe la fino de la salonego, tenis spionantan rigardon sur Everard kaj Sabina. Lia kredo je la forto de la talismano tute malaperis. Li eĉ demandis sin, ĉu la mirakla objekto en la

posedo de Goffredo ne havis kontraŭan efikon, ĉar Sabina, ekde ĝi efikis sur ŝi, ŝajnis senti multe pli da amo por Everard ol iam. Larmo brilis en la okuloj de la suferanta junulo, kiu baldaŭ fiksas la rigardon al la grundo por eskapi al la doloriga spektaklo. Lia patro, preterpasante lin, frapetis lin sur la ŝultron kaj demandis lin:

“Hej, Willem, kial vi staras tie revante? Vi, kiu estas tiel fervora amato de ludo kaj kanto! Kion tio signifas? Ĉu mi ne eraras? Larmoj en viaj okuloj? En tie gaja vespero?”

“Kara patro,” respondis la junulo per rompita voĉo, “se vi scius, kiel malfeliĉa mi estas!”

“Kial do, mia filo?”

“Aj, patro, ĉiu rigardas tion kun miro. Nur vi ne ekvidas tion. Ne montru, ke mi tiris vian atenton sur tion, sed rigardu Sabinan kaj Everard-on: ili kaŝas al neniuj, kiel blinde ili amas sin. Ili sidas tie for manon en mano!”

La amano turnis sin kaj direktis la rigardon al la alian finon de la salonego. Mallaŭta grumblado resonis el lia gorĝo, dum li pugnis la manojn pro kolero.

“Ho, tiu impertinentulo!” li murmuris. “Ĉu li tiel agus por ofendi min en mia domo? Kiu scias? La vespero apartenas al la familio t'Serclaes! Se mi ne permesis tion pro respekto al miaj gastoj, mi forpelus lin tra la pordo... Sed ne, ni devas regi nian indignon, mia filo. Estu pacienca kaj kuraĝa: estas la lasta fojo, ke Everard Serclaes proksimiĝis al fraŭlino Van der Aa. Sed estas vere troigite! Teni la manon unu de la alia en ĉeesto de miaj gastoj, kiuj ĉiuj scias, ke vi, Willem Van Heetvelde, devas fariĝi la edzo de Sabina, kaj ke t'Serclaes estas mia plej grava malamiko! Ha, se Goffredo ne estus promesinta al mi... Morgaŭ, mia filo, ni estos verŝajne venĝitaj, kaj ĉiakaze Sabina ne plu renkontos Everard-on.”

Dum la amano diris tiujn parolojn, li tenis la okulojn direktitaj al sinjorino Van der Aa, kvazaŭ li volus peti de ŝi klarigon pri tio, kio okazas, kaj lia ekflaminta rigardo sufiĉe montris, kia granda kolero malserenigas lin. La sinjorino ekvidis tion, kaj zorgeme diris al Everard:

“Sinjoro t'Serclaes, se vi ne volas perturbi vian plezuron kaj endanĝerigi vian feliĉecon en decida maniero, ekstaru kaj promenu iomete tra la salonego. Ke vi restas tiel longe sidanta flanke de Sabina, altiras la atenton de la homoj kaj povus ofendi la amanon: li rigardas vin tre malafable.”

Tiel vekite el sia forgesemo, Everard komprenis, ke ŝi pravas. Li diris al Sabina, ke li revenos al ŝi poste, malproksimiĝis de ŝi kaj iris al unu el siaj konatuloj, kiu staris pli fore en la salonego. Tiam li ekvidis, ke la amano mem okupas la seĝon flanke de Sabina kaj nun

ŝajnas esti vigle konversacianta kun sinjorino Van der Aa. Sed ke oni disputis tie pri li en akra tono, li tute ne supozis.

Por pasigi la tempon, li iris en la ludoĉambron kaj stariĝis malantaŭ Goffredo, kiu, tute absorbata de la ludo, ŝajnis havi orelojn kaj okulojn nur por la ruliĝado de la ĵetkuboj kaj la kalkulado de la poentoj estigitaj ĉe ĉiu ĵeto. Antaŭ la kapitano kuŝis staketo da florenoj kaj ŝildoj, kaj liaj ĝojaj ekkrioj suponis, ke la fortuno favoris lin.

“Vi ŝajnas bone farti, Kapitano.” Li diris, frapante lin sur la ŝultron.

“Antaŭ nelonge mi fartis ankoraŭ pli bone,” murmuris Goffredo sen rigardi supren. “Sed silentu! La fortuno denove ridas al mi... Mil tondroj! Dudek! Mi denove perdis kvin florenojn! Mi duobligas mian ludon kaj enmetas dek florenojn... Ha, al mi la levo: dudek du!”

Kaj tiel Goffredo plu ludis kun blinda entuziasmo, preskaŭ ne priatentante la ĉeeston de Everard, jen jubilante, jen furiozante, laŭ tio ke la fortuno favoris aŭ malfavoris lin.

La junulo rigardis iom da tempo la ludadon de sia amiko kun intereso kaj tiam proksimiĝis ankaŭ al la aliaj tabloj, kie oni ĵetis la kubojn kun ne malpli da fervoro. La plej multaj oficiroj de la okupacia armeo estis ĉi tie, ludante unu kontraŭ la alia aŭ kontraŭ kelkaj riĉaj junuloj, apartenantaj al la gentoj. Sur la tabloj briladis staketoj da oro kaj arĝento.

Tiel, mallonge rigardinte ĉiun grupon da ludantoj, Everard reiris al la kapitano en la momento, kiam tiu ĉi vidis sian lastan florenon malaperi en la sakon de sia kontraŭulo. Kompreneble li nun petis t'Serclaes prunti al li monon kun la firma promeso redoni ĝin al li plej malfrue postmorgaŭ.

Senhezite la junulo tute malplenigis sian monujon en la mano de la kapitano. Tiu ĉi defiis sian kontraŭludanton kaj denove per forta mano ĵetis la kubojn sur la tablon. Ĉi-foje li gajnis kaj eligis laŭtan triumfkrion...

En tiu ĉi momento la amano eniris la ludoĉambron. Everard kredis rimarki, ke li rigardas lin per koleraj okuloj, kiam li preterpasis lin. Sed kiam sinjoro Van Heetvelde sidiĝis ĉe la ludotablo kun bonhumora mieno, la junulo ne dubis, ke li eraris. Perdinte multan monon per kelkaj ĵetoj la amano denove forlasis la ĉambron.

Opiniante, ke li restas sufiĉe longe for de festosalonego, kaj sentante sin denove altirata al Sabina, Everard forlasis la ludoĉambron.

Sed kiam li eniris la salonegon, li vidis sinjorinon Van der Aa kaj Sabinan starantaj ĉe la elirpordo. Per la salutoj, kiujn ili interŝanĝis kun gekonatuloj, estis klare, ke ili pretigis sin forlasi la feston kaj reiri hejmen.

Everard proksimiĝis al ŝi, demandante, kion signifas tiu frua foriro. Li amare plendis, ke lia efemera feliĉeco estas brutale interrompita tiumaniere. Sed li ne ricevis akcepteblan respondon. Nur sinjorino Van de Aa murmuris, ke ŝi sentas sin lacega, kaj timis, ke ŝi malsanetiĝos, restante pli longe. Sabina diris nenion. Ŝi ŝajnis pli inklina al plorado ol al parolado.

Ĉagrenite kaj eĉ terurigite, Everard sekvis ambaŭ virinojn ĝis antaŭ la pordego de la domo, kie atendis ilin ilia ĉevalpalankeno. Nur tiam sinjorino Van der Aa respondis al la insistanta demando de la junulo.

“Okazis nenio speciala, Sinjoro t'Serclaes. Estas vere, ke mi estas lacega kaj malsaneta. Sed pro tio mi tamen ne forlasis la feston, sed mi opiniis, ke mi agas favore al Sabina kaj vi per mia frua foriro. Poste vi ricevos la eksplikon de mia kialo. Demandu nun al ni plu nenion kaj lasu nin sen longaj salutoj grimpi en nian palankenon. Tio estas necesa por via feliĉeco.”

“Sed kio okazis, granda ĉielo?” suspiris la junulo.

“La amano kruele mallaŭdis kaj riproĉis ion al mia patrino,” malĝoje diris Sabina. “Ni, kiuj kredis je lia grandanimeco! Ke vi sidis je mia flanko estis krimo al liaj okuloj, Everard.”

“Kion ĉagrenan li do diris al vi?... Atendu momenton, ĝis mi estos preninta mian mantelon,” diris la junulo. “Mi paŝos flanke de via palankeno kaj akompanos vin ĝis via domo. Tion li nek vidos nek ekscios.”

“Ne faru tion,” replikis sinjorino Van der Aa en ordonanta tono. “Tuj reiru en la salonon, ne nur por plenumi vian devon de ĝentileco kontraŭ la gastoj kaj deziri almenaŭ adiaŭ al ili, sed ankoraŭ pli por ne igi la amanon pensi, ke vi akompanas nin hejmen. Tio ankoraŭ pli kolerigus lin. Vi devas ŝajnigi kaj teni vin, kvazaŭ ni diris nenion al vi. Ni promesis al li, ke ni ne parolos al vi pri la okazinta.”

“Sekvu la konsilojn de mia patrino, mi petas, Everard!” petegis Sabina

“Ve, tiam tiel estu: mi obeos,” suspiris la junulo kun profunda bedaŭro.

Sabina, jam sidante en la palankeno, ankoraŭ premis lian manon, dirante al li kelkajn kuraĝigajn vortojn. Kaj tiel Everard sekvis sian amikinon je duona arkpafa distanco, antaŭ ol kribi al ŝi adiaŭ. Li postrigardis la palankenon, ĝis la lumo de la torĉoj malaperis ĉe la fino de la Putterij. Li intencis reiri al la domo de Van Heetvelde, kiam li subite vidis Goffredon, vigle gestantan pro ĝojo, veni al li.

“Kio tio signifas, Kapitano?” li demandis. “Vi surmetis vian mantelon. Ĉu vi jam forlasis la feston?”

“Dankon al Dio, ke vi ankoraŭ ne foriris!” replikis Goffredo. “Mi serĉis vin kun zorgoj. Pensante, ke vi sekvas fraŭlinon Van der Aa al ŝia domo, mi iris serĉi vin tie ĉi. Mi troviĝas en tre ĝena embaraso. Vi devos fari al mi etan servon kaj tial akompani min ien.”

“Mi pretas al ĉio, Kapitano, sed lasu min unue iri preni mian mantelon, ĉar la freŝa nokta aero tremetigas in.”

Goffredo malbukis sian propran mantelon kaj ĵetis ĝin sur la ŝultrojn de la junulo. Al ties objektoj li respondis:

“Lasu min nur fari, Everard. Estas pli bone, ke oni ne revidu vin nun en la domo de la amano. Poste ni revenos. Militisto estas hardita kontraŭ forta malvarmo. Cetere, mi estas varme vestita.”

“Bone, Goffredo, mi sekvos vin.”

Kiam ili estis sufiĉe for de la domo de Van Heetvelde, la Kapitano diris kun rompita voĉo:

“Everard, la fortune estis eksterordinare kruela por mi hodiaŭ, dum vin ĝi kontraŭe multe feliĉigis...”

“Mia bona ŝanco ŝanĝiĝis. Mi malĝojas,” murmuris la junulo.

“Jes, mi scias, kion vi volas diri,” respondis Goffredo. “La amano rakontis al mi pri sia disputeto kun la patrino de Sabina. Estas miskompreno de sinjorino Van de Aa. Ni reparolos pri tio poste. Nun unue pri mia afero... Paŝu iomete pli rapide, ĉar mi forkondukos vin sufiĉe malproksimen.... Jen mia peto. Mi perdis mian tutan monon ludante kontraŭ kapitano Bossart, la Lilano, kaj krome mi jam ŝuldas al li dudek florenojn, kiujn mi perdis dum la lasta ludo kaj ne povis pagi lin... Vi ja scias, estas tiu granda, ruĝhara krudulo, kiu ludis antaŭe ĉe la tria tablo kontraŭ fraŭlo Van Quaedrebbe. Mi diris al li, ke mi iros hejmen preni la monon. Li estas sekrete mia malamiko. Mi sentus min humiligita kaj malfeliĉa, se mi devus reveni kun malplenaj manoj. La hontoruĝo arduis sur mia vizaĝo... Nu, mi povus ja iri al mia gastejo kaj turni ĉion fundalsupre, sed por la momento mi malkovrus eĉ ne unu kupran moneron.”

“Mi bedaŭras, ke estas jam tiel malfrue,” respondis la junulo. “Mian tutan monon mi jam donis al vi, Goffredo. Mi devus ja vekii mian patron. Ĉu mi kuraĝos fari tion?”

“Ne, tio ne, mia amiko. Vi jam tro oferis por mi. Se mi nun petas helpon de vi, estas nur por povi redoni al vi, kion vi pruntis al mi. Ĉio kunkalkulita, se mia memoro estas ankoraŭ bona, mia ŝuldo al vi sumiĝos je tridek du malnovaj ŝildoj, ĉu ne?”

“Devas esti io tia, efektive. Sed mi ne deziras rehavi ilin nun. Kontraŭe, mi ĝojas povi devontigi vin kontraŭ mi.”

“Kaj mi volas redoni al vi tiun pruntitan monon ankoraŭ ĉi-vespere.”

“Vi do havas rimedon fari tion?”

“Tio mirigas vin, ĉu ne, Everard. Sed vi komprenos tion. La aroganteco kaj kaŝita mokado de tiu flavruĝa kapitano profunde ofendis min. Kiam mi diris al li, ke mi volas iri al mia gastejo preni la monon, li komprenigis al mi per sia ridado, ke mi ne plu revenos. Mia honoro estas en danĝero... Ne, laŭ tiu ĉi vojo ni iros trans la vendoplaco Pongel kaj preter la hospitalo Sankta-Johano... Monon, multan monon mi devas tuj havi.”

“Sed kiel vi akiros ĝin, Kapitano?”

“Ba, mi estas pli riĉa, ol vi pensas,” fanfaronis Goffredo, ridetante. “Havigi al mi kelkajn centojn da malnovaj ŝildoj kostas al mi ne pli da peno, ol turni la manon. Tio dependas de decido, kiun mi nur malvolonte prenas. Sed nun mi ne pli hezitas. Haltu momenton.”

Sur la brusto li malfermis sian kamizolon kaj eltiris el leda saketo brilan objekton, kiun li metis en la manon de t'Serclaes.

“Alian objekton vi ne vidus en la mallumo,” li diris, sed tiu ĉi perfidas sian grandan valoron per sia forta brilado.”

“Estas, kvazaŭ vi tenus brilantajn stelojn en via mano.”

“Kiel vi diras: estas diamantoj, roboj kaj smeraldoj. Sub reĝo Karlo de Navaro en Francio ni ekokupis kaj prirabis laŭ ordono lia multajn kastelfortresojn, vilaĝojn, jes eĉ urbojn. Tiun ĉi altvaloran objekton mi ekkaptis post ia sanga sturmo. Mi multege ŝatas ĝin, ĉar ĝi estas samtempe talismano, kiu protektas kontraŭ ĉiuj febroj. Nun tamen mi volas lombardi ĝin por cent malnovaj ŝildoj. El tiuj vi ricevos tridek du, kaj kun la aliaj mi reiros al la domo de Van Heetvelde.”

“Sed kiu akceptos vian lombardaĵon je tia malfrua horo?” murmuris Everard.

“Kiu? Riĉega avarulo, kiu eĉ post sia morto ekstarus el la nokto de sia tombo por urzure gajni kelkajn florenojn... Preter la grenhalo troviĝas strateto sen fino, kiu ĉirkaŭas la domojn de la strato Eike kvazaŭ kurba kubuto. Ĝi nomiĝas la Kattengang. Ĉu vi konas ĝin?”

“Mi jam aŭdis tiun nomon.”

“Mi kondukos vin tien, Everard. En la plej profunda parto de tiu strateto staras ŝtona dometo, kies fenestroj estas ĉiuj protektataj per feraj stangoj. Tiu loĝas la lombardisto Niceforo. Kiam li ekvidos la altvaloran juvelon, li certe, anstataŭ rifuzi cent ŝildojn por ĝi, pruntedonos tricent ŝildojn por ĝi, ĉar ĝi valoras ne malpli ol kvarcent ŝildojn, kaj ju pli Niceforo pruntedonos, des pli da profito li povos postuli.”

“Ĉu vi estas certa, ke li malfermos sian domon al vi, tiel malfrue en la vespero?”

“La lombardisto konas siajn klientojn, Everard. Estas rimedo ellitigi lin je ĉia horo de la nokto. Por tio oni devas frapi en speciala maniero sur lian pardonon: unue du frapojn, post momento tri frapojn, kaj tiam kvar frapojn, tre mallaŭte, ĉar la avarulo dormas kun la okuloj kaj oreloj tute malfermitaj... Nun ke vi scias tion, jen la juvelo. Frapu kiel mi diris al vi kaj lombardigu ĝin por cent malnovaj ŝildoj. La kondiĉoj de la lombardisto estas ĉiam la samaj. Akceptu ilin sen kontraŭdiro...”

“Ĉu mi? Ĉu mi bone komprenas vin, Goffredo?” murmuris la junulo, timigita. “Vi deziras, ke mi iros al la lombardisto por lombardigi la juvelon?”

“Estas malgranda servo, kiun mi atendas de via amikeco.”

“Sed vi, Kapitano, kiu ŝajnas tiel bone koni la lombardisto, kial vi ne iros mem ĉe lin?”

“Ĝuste ĉar li konas min tro bone. Ĉu vi komprenas? Mi ŝuldas ankoraŭ multan monon al tiu uzuristo. Se li sciis, ke la juvelo apartenas al mi, li gardus ĝin sen doni monon al mi.”

“Sed, sed mi ne scias. Estas stranga komisiono, kiun vi volas doni al mi!” balbutis la junulo hezitante.

“Ĉu vi povus rifuzi tiel sensignifan servon al mi,” ridetis Goffredo, “al mi, kiu pro amikeco al vi, elmetas min al la kolero de la amano, kaj do ankaŭ de mia armeestro? Tio estas nebla! Vi ne bone komprenas la aferon, Everard. Jen vi havas garantiaĵon, kiu valoras plurajn centojn da malnovaj ŝildoj. Vi petas nur cent ŝildojn por ĝi. Oni donos ilin al vi sen kontraŭstaro. Vi donos ilin al mi, kaj morgaŭ mi iros ĉe la lombardiston por diri al li, ke la juvelo apartenas al mi. Kiu danĝero povas esti por vi en tio? Unuflanke vi estos garantita per la alta valoro de la juvelo mem, kaj aliflanke per mia persono kaj mia vorto. Vi ne devas plu okupi vin pri la afero. Mi liberigos la juvelon, tuj kiam mi havos la mono, kaj tiel ĉio finiĝos.”

“Sed la malhonoro! Mi, Everard t’Serclaes, iri ĉe uzuriston por pruntepreni monon!”

“Neniu povas scii tion. Kaj ĉiakaze, kiu malhonoro povus esti en servo farita pro amikeco al kapitano Goffredo?”

“Estas vere!” suspiris Everard. “Mi ne faros tion sen timo, sed nur por devontigi vin kontraŭ mi... Nu, donu al mi la juvelon: mi estas preta.”

La kapitano kondukis lin en la plej profundan finon de la Kattengang, ĝis antaŭ la pordo de malalta burĝa domo kaj mallaŭte diris al li:

“Tie loĝas la lombardisto Niceforo. Nun frapu sur la pardonon: du, tri, kvar fojojn... Tiel estas bone... Rigardu: tie supre aperas lumeto. Niceforo malsupreniras. Mi atendas vin tie for ĉe la komenco de la strato Eike. Ne parolu pri mi.”

Per grandaj paŝoj li retiriĝis en la Kattengang.

Pro honto Everard sentis tremeton kuri tra siaj membroj, ne pro tio ke li kredus fari ion malbonan aŭ mallaŭdeblan, sed nur pro la penso, ke li iris kiel malŝparulo aŭ perversulo ĉe uzuristo por pruntepreni monon. Sed li decidis kaŝi sian konsternitecon en la ĉeesto de la lombardisto kaj kontraŭe ŝajni sin fiera kaj aŭdaca por ne devi ruĝiĝi antaŭ tiu malestiminda viro. Ĉar li ne povis rifuzi la deziratan servon al Goffredo, li volis fari ĝin sincere kaj laŭ ties volo

Farante tiujn konsiderojn, li estis surprizita per la siblanta sono de raŭka voĉo, kiu subite ŝajnis paroli tuj ĉe lia orelo, demandante lin:

“Kiu frapas tiel malfrue sur mian pardonon? Proksimiĝu al la spiontruo kaj respondu min.”

“Mi estas amiko, mastro Niceforo,” flustris Everard. “Malfermu: mi alportas al vi altvaloran objekton.”

“Sed kiu vi estas, Sinjoro?... Ĉu vi silentas? Tiam, bonan nokton. Mia pordo restas fermita al nekonatoj.”

“Mi estas Everard t’Serclaes,” repondis la junulo kun bedaŭro.

“Ĉu la filo de la eksskabeno t’Serclaes?”

“Jes.”

La rigliloj estis forŝovitaj kaj la hinĝoj de la pordo knaris.

“Eniru, Sinjoro, kaj sekvu min,” diris la lombardisto, kiu kun fumanta olelampo en la mano antaŭiris la junulon tra mallarĝa koridoro.

Ili alvenis en ĉambro kun tute nudaj muroj, kie staris neniu alia meblo ol granda kesto kun feraj bendoj, skribtablo, sur kiu staris orpesilo, kaj kelkaj malnovaj apogseĝoj. Ĉi tie la lombardisto levis la lampeton supren kaj rigardis momenton senparole la personon, kiu petis lian helpon. Everard, ofendita per la ekzamenantaj okuloj, rigardis lin fiere de la kapo ĝis la piedoj. La viro estis grizhara kaj maljuna kaj envolvita en eluzita noktorobo el flordesegna silko. Ekster liaj malgrandaj brilaj okuloj kaj dikaj lipoj, li havis nenion rimarkindan.

“Bela mantelo, Sinjoro,” diris Niceforo. “Tiu ruĝa veluro eble estas iom tro longe portata, sed ĝi estis multekosta kaj havas ankoraŭ ian valoron... Ha, vi estas la filo de la maljuna sinjoro t’Serclaes. Vi estas efektive belaspekta juna kavaliro. Vian patron mi ja konas. Mi estus feliĉa, se mi povus devigi vin al mi, sed mono estas tiel malofta kaj tiel multekosta...”

“Mi devas rapidi, mastro,” Everard interrompis lin. “Ni aranĝu la aferon kiel eble plej rapide. Jen juvelon, kiu certe valoras kvarcent malnovajn ŝildojn. Pruntu al mi cent ŝildojn por ĝi. Mi kredas, ke mi konas viajn kutimajn kon-

diĉojn kaj mi akceptas ilin... Nu, kio estas via respondo?"

La lombardisto tenis la juvelon en siaj manoj, mirigite kaj avide rigardante ĝin.

"Pacienco, iom da pacienco, Sinjoro," li murmuris. "Diamantoj kaj rubenoj! Kiom ĝi brilas kaj fajreras! Altvalora objekto, kaj stranga samtempe. Ĝi similas la orienta talismano. Ĉu tiu juvelo apartenas al vi, Sinjoro?"

"Kia demando estas tiu?" grumblis Everard. "Vi diris, ke vi konas mian patron. Ĉu tio ne sufiĉas al vi?"

"Certe ja. Ne koleriĝu, Sinjoro. Ĉu la juvelo apartenas al vi aŭ al via patro, al mi ne gravas. Vi jam ne estas neplenaĝa infano. Kaj vi volas prunti de mi cent malnovajn ŝildojn? Tio estas amasego da mono..."

"Por kio tiuj ĉiuj vortoj. Ĉu vi intencas rifuzi?" interrompis Everard. "Se vi ne povas prunti al mi tiujn cent malnovajn ŝildojn, redonu la juvelon al mi."

"Por kiom da tempo vi depruntos, Sinjoro?"

"Por kiom da tempo?" ripetis la junulo pripensante. "Nur por unu monato."

"Kaj vi akceptas miaj kutimajn kondiĉojn."

"Kiel mi jam diris al vi."

"Por unu monato mi demandas dek procentojn. Se vi ne liberigos vian garantiaĵon post tiu unua monato, vi devos renovigi vian pruntton."

"Tiel estu, mastro. Ni finu: jam malfruiĝas. Mi ne havas tempon atendi."

"Ankoraŭ kelkajn momentojn, Sinjoro, kaj vi estos servita," grumblis la uzuristo, malfermante feran kofron. El ĝi li prenis manplenon da oraj moneretoj kaj metis ilin sur la tablon. Tiam li prenis du pecetojn de pergameno kaj plumon kaj silente skribis dum kelkaj minutoj. Tiam li antaŭenŝovis unu el la folioj kaj diris, transdonante la plumon al la junulo:

"Jen, Sinjoro, bonvolu subskribi... Vi hezitas? Estas nenio alia ol atesto, ke vi lombardas ĉe mi tiu ĉi juvelon por cent malnovaj ŝildoj. Fojfoje la servistoj de la amano venas serĉi ŝtelitajn objektojn en mia kofro. Se mi ne ĉiam estus povinta pruvi, ke mi pruntas monon nur al bone konataj personoj, kiujn oni devas rigardi honestaj, mi estus pendumita aŭ almenaŭ enkarcerigita. Certe ne por vi mi diras tion... Bona ĉielo! Vi ŝajnas teruriĝi, Sinjoro! Ĉu vi ne kuraĝas subskribi deklaron de la vero?"

"Vi ne scias, kion vi diras!" krude diris Everard por kaŝi sian honton. "Via malrapideco kaj neutilaj vortoj incitas miajn nervojn!"

Kaj dirante tiujn vortojn, li skribis sian nomon sub la deklaro.

La lombardisto nombris naŭdek malnovajn ŝildojn en lia mano kaj donis al li ankaŭ la alian pecon de pergameno, sur kiu li deklaris, ke li

ricevis de sinjoro t'Serclaes iun juvelon, kovritan per diamantoj, smeraldoj kaj rubenoj.

"Mi estas honesta viro," li diris. "Ĉio okazas sincere kaj regule en mia domo. Mi jes postulas altan interezon pro protekti min kontraŭ eblaj malgajnoj, sed mi trompas neniun. Se sinjoro t'Serclaes bezonos miajn servojn poste, li scias, kie mi loĝas."

Sen plu atendi la vortojn de mastro Niceforo, Everard prenis la lampeton kaj eniris la koridoron. Tiel li devigis la uzuriston tuj malfermi la pordon antaŭ li, kaj prononcante mallongan saluton, li iris sur la straton.

Iomete pli malproksime li retrovis Goffredon, kiu demandis lin:

"Nu, amiko, ĉu vi havas la monon?"

"Jes, prenu: naŭdek malnovajn ŝildojn. Niceforo forprenis dek da ili kiel interezon," respondis Everard, metante la monon en lian manon. "Kapitano, kostis al mi multan penon. La lombardisto estis babilema kaj malmodesta viro. Li igis min skribi mian nomon sub deklaro."

"Kompreneble, kompreneble!" ekkriis Goffredo, frotante al si la manojn.

"Ĉu tio ĝojigas vin?" demandis la junulo, mirigita.

"Ke vi povis havigi al mi tiun monon? Ho, jes, tio multe feliĉigas min! Mia honoro dependas de tio. Venu, ni rapidu! Jam malfruiĝas."

"Nun la afero estas finita," murmuris Everard, rapide paŝante. "Al mi restas nur unu timo: ke vi povos perdi ĉion, se vi reiros al la ludo."

"Neeble," repondis la kapitano. "Donu al mi vian manon, Everard. Mi jam nombris tridek du malnovajn ŝildojn. Tiam mi ŝuldas al vi. Jen prenu ilin: inter ni ĉio estas nun reguligita."

"Sed mi ne volas ilin, Goffredo."

"Akceptu ilin, mi petas. Tiam vi estos almenaŭ certa, ke mi ne forludos ilin."

"Efektive, Kapitano, vi pravas. Sed se vi denove bezonos monon, la tridek du malnovaj ŝildoj estos gardataj por vi."

"Dankon, vi estas malavara amiko, kaj por trankviligi vin, mi donas al vi mian parolon de honoro, ke ĉi-vespere mi riskos neniakaze pli ol dek malnovajn ŝildojn. Sed estas io en mia koro, kio diras al mi, ke mi gajnos. Venu, ni rapidu!"

"Sed ekspliku al mi, kio okazis inter la amano kaj sinjorino Van der Aa," demandis la junulo post mallonga paŭzo. "Sabina ŝajnis al mi tre malĝoja kaj senkuraĝigita."

"Ba, tio signifas nenion," respondis Goffredo. "La amano estas tre kolerema, kaj sinjorino Van der Aa estas ne malpli obstina. Cetere ili kutimas ĉiam kvereli. La amano trankvile remarkigis al ŝi, ke vi estus aginta pli dece dum via unua apero inter liaj amikoj, se vi ne estus sidinta tiel longe flanke de Sabina. Sed sin-

lorino Van der Aa kontraŭdiris lin, kaj ambaŭ multe koleriĝis. Mi bone konas la amanon. Morgaŭ li bedaŭros sian flamiĝemon kaj petos pardonon al sinjorino Van der Aa. Ne lasu do tiun malgrandan okazaĵon maltrankviligi vin... Ĝi neniel ŝanĝas la favoran staton de via afero."

"Mi reiros al la vesperfesto por adiaŭi la amanon. Ĉu mi petu lin pardonon pro mia senpripensemo?"

"Pro Dio, ne faru tion!" ekkriis Goffredo. "Nun la amano estas ankoraŭ ĉiam malserena kaj kolera. Li povus malhonori vin en la ĉeesto de siaj gastoj. Ŝparu al li kaj al vi tiun neutilan malĝojon."

"Kaj mia mantelo?"

"Prenu ĝin en la ŝtuparejo kaj reiru hejmen."

"Sed mi promesis al Sabina kaj ŝia patrino, ke mi adiaŭos la amanon."

"Ne maltrankviliĝu pro tio. Mi eksplikos la aferon al sinjorino Van der Aa."

"Tiel estu. Mi sekvos vian konsilon."

Ricevinte sian mantelon en la ŝtuparejo kaj metinte tiun de la kapitano sur ĝian lokon, la junulo premis la manon de sia amiko kaj deziris al li bonan nokton. Goffredo postrigardis lin momenton, ĝoje murmurante al si mem:

"Ĉio iras laŭdezire: li estas kaptita! Ĉiuj miaj promesoj realiĝos. Mi admiras mian propran ruzecon. La amano pagos al mi kvincent malnovajn ŝildojn kaj lia filo kvarcent. Tio faros preskaŭ mil! Mi estas riĉa, mi povos ludi, ludi... Se mi gajnus ankoraŭ same tiom! Baldaŭ, baldaŭ!"

Kaj per plirapidigitaj paŝoj li eniris la festosalonon. Tie li trovis nur malmultajn invititojn. Evidente la plej multaj nobelinoj jam foriris. Sed el la ludoĉambro alsonis lin la bruo de la ruliĝantaj ĵetkuboj. Li paŝis al la pordo de la ĉambro, kie lin retenis Willem van Heetvelde, kiu demandis lin mallaŭte:

"Nu, Kapitano, ĉu mi povas esperi? Ĉu la talismano bone efikis?"

"Ĝi efikis mirige bone," estis la respondo.

"Ankaŭ sur Everard?"

"Sur ambaŭ egale forte."

"Ĉu Sabina amos min?"

"Tenere kaj arde."

"Kaj ĉu ŝi fariĝos indiferenta kontraŭ Everard?"

"Multe pli: ŝi malestimos lin."

"Ĉu tio estas ebla? Ĉu vi ne trompas min?"

"Nun mi ne havas tempon, Willem, por ekspliki tion al vi. Venu morgaŭ en mian gastejon, tiel frue kiel vi volas: mi donos al vi la nekontraŭdireblajn pruvojn, ke estos, kiel mi diris al vi... Alportu, kion vi promesis al mi: kvarcent malnovajn ŝildojn... Kaj lasu min nun pasi, Willem, mi devas rapidi, la grundo brulas sub miaj piedoj."

Kaj penetrante ĝis apud sia malamiko, kapitano Bossart, li tuj defiis lin per fieregaj vortoj por ludi kontraŭ li. Tiu ĉi, ofendita kaj ĉagrenita, akceptis. En la komenco la sorto malfavoris Goffredon, sed iom post iom la ŝanco turniĝis kaj fine tute ŝanĝiĝis. Goffredo gajnis ludon post ludo, kaj ĉar li atakadis pro ĝojo sian kontraŭulon per mokaj spritaĵoj, tiu ĉi fine tiel koleriĝis, ke li komencis insulti Goffredon, nomante lin krudulo kaj fiulo. Tiam ankaŭ Goffredo komencis insulti lin, dirante, ke li estas la plej granda kanajo kaj fripono de la tuta Bruselo. Kiam Bossart ekkriis, ke la patrino de Goffredo estis servistino en gastejo, kiu eĉ ne sciis, kiu estas lia patro, ambaŭ viroj ekstaris, levis la dekstran kaj pretis frapi unu la alian sur la vizaĝon.

Tiam armeestro Van Reigersvliet, altirita de la krioj, intervenis, dirante, ke li ne permesas, ke soldatoj de lia armeo solvas siajn problemojn en tiel malnobla maniero. Li sukcesis kvietigi ilin, sed tio estis nur ŝajno. Pensante, ke Bossart estas la kaŭzo de tiu disputo, la armeestro ordonis lin tuj forlasi la loĝejon de la amano.

Bossart obeis, kvankam en liaj okuloj fajreris kolero kaj malamo. Dum li eliris la ĉambron, li minace diraĉis al Goffredo:

"Mi trovos vin, senhonta hundo!"

"Vi tute ne bezonos serĉi min," respondis Goffredo kun mokrido

Kapitano Bossart forlasis la domon de Van Heetvelde kaj laŭiris la Putterij, murmurante al si mem, ke la morgaŭon li defios Goffredon al duelo. Nur sango estis povonta forviŝi tiun malhonoron. Sed kiam li proksimiĝis al la rojo Spiegel, li aŭdis iun paŝadi malantaŭ li.

"Haltu, mi devas paroli al vi!" oni kriis al li.

Li tuj rekonis la voĉon de Goffredo, turnis sin kaj demandis:

"Kion vi ankoraŭ volas de mi? Mi proponis min viziti vin morgaŭ. Vi komprenas, ĉu ne?"

"Mia honoro estas ofendita, kaj tial via sango devas flui," respondis Goffredo. "Nur la spado povos decidi inter ni."

"Vi pravas. Mi pretas. Diru, kie kaj kiam."

"Morgaŭ je la sepa matene sur la monteto Alboem, ekster la pordego Sankta-Gudula apud la vojo al Schaarbeek."

Kaj ambaŭ malproksimiĝis en kontraŭaj direktoj.

VI

La nokton post la vesperfesto Willem Van Heetvelde malmulte dormis. Lia ripozo estis perturbata de ĉiuspecaj feliĉaj sonĝoj. Ĉu

Goffredo ne diris al li, ke la talismano mirige funkcias? Sabina estis do amonta lin, kaj li estis fariĝonta ŝia edzo.

Je proksimume la sepa matene, li malsupreniris. En najbara ĉambro li aŭdis la voĉon de sia patro kaj eniris por diri al li sian matensaluton.

La amano, kiu estis en sekreta konversacio kun iu kavaliro, kiu estis unu el liaj fervoraj partianoj, estis malkontenta pri la neatendata apero de sia filo. Sed kaŝante sian ĉagrenon, li ekkriis kun rideto:

“Nu, Willem, jam ellitiĝinta? Estas ankoraŭ tro frue por eliri promeni.”

“Mi ne volas forlasi la domon, patro,” diris la junulo, “sen deziri al vi bonan matenon. Kapitano Goffredo petis min viziti lin tiel frue. Li havas ion komunikenda al mi pri... fraŭlino Van der Aa, mi kredas.”

“Eble kapitano Goffredo havigis al si gravan aferon,” murmuris la amano. “Donu Dio, ke lia disputo kun Bossart ne havos bedaŭrindajn sekvojn! Iru, Willem, kaj diru al Goffredo, ke mi devos tuj paroli al li. Mi ankaŭ sendos iun al kapitano Bossart. Tiu malfeliĉa disputo devas finiĝi, kion ajn tio kostas. Rapidu, mia filo.”

Willem forlasis la domon de sia patro. Li supreniris la Putterij, transiris la Lignan Vendoplacon, trairis la strato Leer ĝis preter la preĝejo Ter Arcken.

Kelkajn paŝojn pli malproksime li eniris iun plombistan butikon, kies parietoj estis tute kovritaj per brilaj stanaj objektoj: potoj, karafoj, pladoj, pokaletoj, kuleroj kaj multaj aliaj kuiriloj kaj manĝiloj. Willem frapis sur la vendotablon kaj kriis:

“Hola! Ĉu estas iu ĉi tie?”

El la postkuirejo alkuris mallonga, dika viro kun leda antaŭtuko, kiu kovris la bruston kaj la ventron, kaj noktoĉapo sur la kapo. Kiam li rekonis la junulon, li rapide diris:

“Nu, nu, kia honoro por ni! Vi, Sinjoro Van Heetvelde, bonvolas viziti nin tiel frue? Mi vidas, ke vi tre atente rigardas tiun ŝrankon. Jes, jes, pura stano, Sinjoro! Tial ĝi brilas kiel arĝento. Ĉu vi bezonas ion? Ĉu vi eble estas edziĝonta? Kaj kial ne? Juna kavaliro, kuraĝa kaj belaspekta kiel vi! Kaj vi bonvolas havigi al mi kelkajn monerojn! Mi dankas vin, mi milfoje dankas vin, Sinjoro. Kiam viaj infanoj estos plenkreskaj, mia stano ankoraŭ...”

“Silentu do momenton, mastro Cools,” interrompis lin Willem. “Vi eraras: mi venas paroli al la kapitano. Ĉu li jam ellitiĝis?”

“Ĉu ellitiĝis?” ripetis la plombisto ridante. “Li jam delonge eliris sur la straton! Mi ne komprenas la kapitanon. Li revenas hejmen tre malfrue en la nokto kaj forlasis la domon ĉe la komenco de la tago. Tiu viro ne bezonas

dormon. Se mi estus en lia loko... Li havas nenion farenda ol pasigi iel ajn la tempon, dum simpla laboranta burĝo...”

“Li ne estas hejme?” demandis la junulo, mirigita kaj seniluziigita. “Kaj li eliris ĉe la tagiĝo?”

“Jes, jam antaŭ iom pli ol duona horo.”

“Tiam, adiaŭ, mastro. Diru al la kapitano, ke mi vizitos lin antaŭ la tagmezo.”

Sed la plombisto retenis lin kaj driis:

“Restu, restu, Sinjoro, mi petas vin!... Eli-rante la kapitano diris, ke li revenos post duona horo. Kaj tri kvaronoj jam pasis. Jen seĝo, Sinjoro, sidiĝu. Parolante oni ne rimar-kas, ke la tempo pasas. Certe la kapitano atendas vin kaj malĝojus, se li ne trafus vin.”

Willem akceptis la seĝon kaj sidiĝis. Kun iom da timo li vidis, ke la plombisto prenis ankoraŭ alian seĝon. Li devis do atendi, ke la babilema viro sturmos lin per malmolestaj vortoj.

Efektive, tiu ĉi ankoraŭ ne estis metinta sin ĉe lian flankon, kiam li jam diris:

“Kapitano Goffredo estas via amiko, Sinjoro, mi scias. Li sentas por vi multan estimon kaj simpatian. Li estas tiel sprita kaj gaja junulo, ĉu ne? Energia kaj kuraĝa militisto. Se nur li pagus same tiel bone! Ĉu vi neniam pruntis monon al vi, Sinjoro?”

“Kial vi demandas tion?” murmuris Willem, malkontenta.

“Kial? Mi pruntis al li sufiĉe multan monon? Pro tio kulpas mia edzino. Per la amuzaj ŝercoj de la kapitano ŝi lasas sin delogi tiel facile, ke ŝi kapablas prunti al li nian lastan florenon. Krom tio, per ĉio kion li ĝuis ĉe ni – loĝado kaj nutrado – la kapitano pagis ankoraŭ nenion. Li diris, ke la grafo de Flandrio ŝuldas al li multan nepagitan soldon. Sed mi timas, ke la kapitano foriros unu tagon kaj pagos nin per afabla rido kaj gaja ŝerco.”

“Ĉesu do kaj ne kalumniu kapitanon Goffredo tiel malice!” interrompis lin la junulo. “Se mi ne eraras, li jam morgaŭ ricevos tiom da mono, ke li povos dekfoje pagi siajn ŝuldojn ĉe vi.”

“Kion vi diras, Sinjoro? Ĉu mi povas kredi tion?”

“Mi estas tute certa.”

“Ne estas tiel, ke mi pridubas la honestecon de kapitano Goffredo. Kontraŭe, mi plene fidus lin, kaj la pruvo estas, ke, kvankam li ne pagis min pro loĝado kaj nutrado, mi bonvolis prunti al li tiom de mia malfacile perlaborita mono. Ha, ha, li pagos min morgaŭ? La kapitano estas bona, prudenta kaj malavara viro, mi ja scias. Sed se li prokrastus tro longe la pagon de siaj ŝuldoj al mi, li povus esti malhelpita pagi min kontraŭ sia propra volo. La grafo de Flandrio estas nun en Francio, kaj nur Dio scias, kiam li revenos! Ĉio estas ebla. Se iam

tedus la Bruselanojn, ke fremdaj soldatoj tenas ilian urbon okupita... Sed kion signifas tiu stranga bruo sur la strato?"

Li ekstaris kaj iris al la pordo. Returniĝante li diris:

"Io certe estas okazinta. Eble akcidento. Venu rigardi, Sinjoro. Tie for tiun grupon de homoj apud la tombejo Sankta-Marteno! Nun vi jam ne povas vidi tion, sed ili portas brankardon, kaj sur ĝi kuŝas viro, se ne trompas min miaj okuloj. Verŝajne povra masonisto, kiu falis de la skafaldo ĉe la preĝejo Sankta-Gudula. Ili venas ĉi tien: ni baldaŭ scios pri kio temas."

Kiam la homamaso alproksimiĝis, unu el ĝiaj moviĝoj ebligis al la plombisto vidi tra ĝi. Li levis la manojn supren kaj ekkriis:

"Granda Dio. Ĉu estas eble? Estas la kapitano! Mia mono, mia povra mono!"

"Kion vi diras? Ĉu la kapitano?"

"Jes, estas li kiu kuŝas sur la brankardo! Ve ni! Ve ni! Ĉu li estas senviva?"

Tremanta kaj pala Willem kuris sur la straton kaj penetris ĝis la brankardo. La ruĝa sango, kiu makulis la kamizolon de la kapitano kaj ankoraŭ fluadis, igis lin suspekti, ke spadopiko traboris lian bruston. Liaj okuloj estis fermitaj, liaj vangoj estis senkoloraj kaj liaj lipoj violaj. Sed li ankoraŭ vivis, ĉar iam kaj iam konvulsa moviĝo trakuris liajn brakojn kaj kruojn.

Oni portis la vunditan en la plumbistan butikon kaj metis lin sur liton en postĉambro.

"Kuraciston! Ian kuraciston!" kriis Willem. "Kuru, kuru, mi malavare rekomencos vin!"

"Jam iris iu averti kuraciston," oni respondis lin.

"Ho ve, tiu bonkora kapitano Goffredo! Ankoraŭ tiel juna! Li povus morti!" ĝemis mastro Cools. "Kiu krimulo, kiu senkonscienca murdisto vundis lin tiel kruele?"

"Tion mi diros al vi," respondis viro, vestita kiel kamparano. "Mi venis de Schaarbeek kaj estis transiranta Alboem. Subite mi vidis tie du kapitanojn de la graffaj trupoj, kiuj elingigis siajn spadojn kaj komencis skermi unu kontraŭ la alia. Preskaŭ tuj mi aŭdis krion: unu el la kapitanoj falis teren. La alia eningigis sian spadon kaj iris al la urbo. Mi proksimiĝis al la falinta kapitano. Li diris al mi, ke li loĝas en via domo kaj petis min porti lin tien. Mi kriis por helpo. Oni alportis brankardon. Sed survoje la vundita fariĝis tiel pala, ke..."

En tiu momento la edzino de la plombisto subite enkuris la ĉambron. Vidante la palan vizaĝon kaj la sangomakulitajn vestaĵojn de la kapitano, ŝi eligis tranĉantan krion kaj svenante falis teren. Mastro Cools saltis al ŝi, levis ŝin lamentante kaj portis ŝin, helpate de unu el la ĉeestantoj, en alian ĉambron.

Intertempe Willem, konsternita kaj terurita, staris ĉe la korpo de la kapitano. Larmoj fluadis sur liaj vangoj, kaj kun tima espero li spionis la plej malgrandan vivosignon, kiu rimarkiĝis en la membroj de la vundito.

Tiam Goffredo malfermis siajn rompigitajn okulojn kaj rigardis la junulon per strange firma rigardo. Willem klinis sin super lin kaj diris kelkajn konsolajn vortojn.

"Estas finite," balbutis la kapitano preskaŭ neaŭdeble, "piko tra mia koro! Mi multe pekis... malbona, malhonesta... la talismano... Everard... Sabina... Dio punos min..."

Li volis ankoraŭ paroli, sed kvankam li movetadis la lipojn, neniam aŭdebla sono eliĝis el lia buŝo. Tremetanta konvulso trakuris lian korpon.

"Mi mortas, adiaŭ!" eskapis kun la lasta spiro el lia malleviĝanta brusto. Li etendis ankoraŭfoje siajn membrojn kaj de tiam restis tute senmova.

"Ve, Dio vokis lin al si! Li mortis!" suspiris Willem, denove verŝante larmojn.

"Kio? Li jam mortis?" ekkriis la plombisto, alkurante. "Kaj mia mono, ho granda ĉielo! Kiu pagos min nun?... Ha, jen la kuracisto! Eble estas ankoraŭ espero..."

La kuracisto estis jam tre maljuna viro, portanta longan, nigran talaron, kies orlo estis borderita per malkoloriĝinta pelto. Ankaŭ lia ĉapo estis el pelto. Ĉe lia zono pendis larĝa leda sako, en kiu oni vidis tranĉilojn kaj prenilojn. Li komencis per forpelado de la plimulto de la ĉeestantaj scivolemuloj, proksimiĝis al la korpo, rigardis ĝin malbonaŭgure skuante la kapon kaj diris al Willem Van Heetvelde:

"Estas verŝajne jam tro malfrue. Morto estas nevenkebla malamiko. Sed oni ne povas esti certa. Mi malbutonumos lian kamizolon por povi senti, ĉu lia koro ankoraŭ batas. Helpu min iomete, Sinjoro."

Apenaŭ la kamizolo kaj ankaŭ la subvesto estis malfermitaj sur la brusto, Willem ekvidis la ledan saketon en kiu Goffredo estis kaŝinta la altvaloran talismanon. La junulo etendis la manon por preni la saketon, sed la plombisto estis pli rapide ol li, kaptis ĝin kaj diris kvazaŭ por senkulpigi sin:

"Pardonu min, Sinjoro, sed la kapitano ne ŝuldas monon al vi, almenaŭ ne tiom, kiom al mi. Vi estas riĉa Sinjoro, mi kontraŭe estas malriĉa laboristo. Ha, tintas en ĝi. Eble Dio ne volis, ke mi perdu ĉion."

"Montru, kio estas en la saketo!" ordonis Willem

"Mono estas en ĝi, Sinjoro. Mi volas nur tion kio apartenas al mi. Se estos tro da mono por mi, vi povos fari per la resto, kion vi volas."

Kaj dirante tion, li elverŝis la tutan enhavon de la saketo sur la tablon kaj eĉ turnis ĝian tutan internon eksteren. Willem ŝajnis paliĝi. La juvelo estis malaperinta!

“Ĉiu espero estas vana: la kapitano mortis,” diris la kuracisto. “Mia arto estas neutila ĉi tie. Alia malsanulo atendas miajn zorgojn. Adiaŭ!”

Post kiam la kuracisto eliris la domon, Willem ankoraŭ staris ĉe la lito kun la okuloj direktitaj teren kvazaŭ en profunda pripensado.

“Mi ne volas, ke oni prenu min por kadavropriŝtelisto,” grumblis mastro Cools. “Estu mia atestanto, Sinjoro, ke en la saketo estas sepdek kvar malnovaj ŝildoj. Ili kuŝas tie bone nombritaj. Mi donos klarigon pri tio al la viroj de la amano. Sed kiu povos forpreni ilin de mi, tiu estos ruzulo. Sepdek kvar malnovaj ŝildoj!”

“Sed traserĉu liajn vestaĵojn, mi petas,” diris Willem, “eble li havas ankoraŭ kaŝitajn saketojn en siaj vestaĵoj. Mi scias, ke li posedis ian altvaloran juvelon.”

“Ĉu altvaloran juvelon?” ekkriis la plombisto. “Mi ne kredas tion, Sinjoro, ĉar se li iam estus posedinta juvelon, li estus lombardinta aŭ forludinta ĝin jam la morgaŭon. Nu, nu, ni riskos nenion serĉante ĝin. Kiu scias, eble ni trovos kelkajn pliajn ŝildojn.”

Kaj dirante tiujn vortojn, li traserĉis ĉiujn vestaĵojn de la mortinto.

“Neniam moneron!” li diris. “De kiu li havas tiujn sepdek kvar ŝildojn, tio scias la diablo. Li certe havis bonsanĉon ĉe la ludo: tio okazis al li malofte. Koncerne la juvelon, Sinjoro: se li iam parolis pri ĝi al vi, vi povas kredi, ke li nur fanfaronis. La kapitano ne hezitis mensogi, se li povis akiri monon tiamaniere.”

“Jes, li verŝajne nur blufis al mi,” balbutis Willem, timante, ke li jam diris tro multe al la babilema viro. “Mi iras nun informi mian patron pri la mizera morto dela kapitano. Vi, mastro Cools, sendu iun al armeestro Van Reigersvliet, por ke li enterigu la kapitanon kun la konvena honoro. Ĝis revido!”

La plombisto akompanis lin ĝis la pordo, ankoraŭ demandante lin:

“Vi atestos, ke estis sepdek kvar ŝildoj en la saketo kaj nenio alia, ĉu ne, Sinjoro?”

“Jes, jes, estu trankvila.”

“Kaj ĉar la kapitano ŝuldas ankoraŭ pli al mi, oni ne forprenos ilin al mi?”

“Verŝajne ne.”

“La povra kapitano mortis tiel juna. Mia edzino kuŝas sur la lito pro malĝojo kaj malespero. Sed ke ni ne perdos nian monon, certe konsolos ŝin iomete. Nu, Dio gardu vin, Sinjoro.”

Willem ekpaŝis sur la straton kaj devis perforte puŝi al si vojon tra la homamason, kiu ariĝis antaŭ la butikoj. Sed turniĝante post la

angulo de la malsanulejo Ter Arcken, li malrapidigis siajn paŝojn kaj, terurita, komencis pensi pri la nova situacio, kiu povus estiĝi por li el la morto de la kapitano.

Kien do malaperis la juvelo? Goffredo diris, ke li reirigos ĝin en surpriza maniero en la manojn de la amano. Se tiu terura malfeliĉo ne rompis la efikecon de la talismano, la altvalora objekto reiros do per si mem en la posedon de lia patro, kaj li ne devos konfesi, ke li forprenis ĝin kiel ŝtelisto el la dormoĉambro. Samtempe Everard kaj Sabina estos plene subigitaj al la influo de la mirakla objekto, kaj li, Willem, dankeme repensos pri la povra kapitano, al kiu li estis ŝuldonta tutan vivon de amo kaj feliĉeco.

Kvankam retenitaj larmoj brilis en la okuloj de la junulo, tiu ĉi lasta konsidero moderigis lian malĝojon pro la terura morto de Goffredo.

De tempo al tempo li ankoraŭ tremis pensante, ke la altvalora talismano povus resti perdita. Ĉu en tiu kazo li diros al sia patro, kiu rabis ĝin el lia juvelkesto? Ho, tion li neniam kuraĝus fari! Kaj al kio tio utilis? Se la promesoj de la kapitano restus neplenunitaj, estus pli bone por ĉiuj, se tiu neeksplikebla afero restus kaŝita en la plej profunda sekreto.

Tiel Willem proksimiĝis al sia loĝejo. Apenaŭ li paŝis tra la pordego, maljuna servisto kuris al li kun levitaj manoj kaj diris plendante:

“Ho, Willem, ĉu vi scias, kio okazis ĉi tie? Ĉi-nokte oni ŝtelis el la ĉambro de via patro altvaloran juvelon! La amano koleras...”

“Kie estas mia patro?” demandis la junulo, paliĝante. “Mi havas ankoraŭ pli teruran novaĵon komunikenda al li.”

“Ankoraŭ pli teruran, Sinjoro?”

“Kapitano Goffredo, vi ja konas lin: tiu kiu venis tiel ofte ĉi tien.”

“Kiu ne konas tiun gajan kapitanon?... Nu, Sinjoro?”

“Li batalis en duelo kaj estis mortigita...”

“Dio, ho Dio mia, ĉu estas eble?” plendis la servisto. “Tie, tie en la saloneto estas via patro... Hieraŭ ankoraŭ tiel sana, tiel sprita, tiel gaja, kaj nun jam kadavro! Kio do estas la homa vivo?”

Sen aŭskulti pli longe la plendojn de la servisto, Willem malfermis la pordon de la indikita saloneto kaj, dum larmoj fluis sur liaj vangoj, li ekkriis:

“Ho patro, mi estas mesaĝisto de malfeliĉo! Goffredo batalis en duelo kontraŭ kapitano Bossart sur la monteto Alboem ĉi-matene.”

“Kaj ĉu li estis vundita?” interrompis lin la amano.

“Li estas mortigita, patro. Spadopiko tra lia brusto. Ve, mia koro rompiĝas pro malĝojo. Li estis tiel bona amiko por ni, kaj li faris al mi tiel multajn servojn.”

“Ĉu la kapitano mortigita?” ripetis la amano, frapante al si la frunton per la mano. “Tio estas la plej granda malfeliĉo kiu povis okazi al mi en tiu ĉi momento! Ĉu vi estas certa, ke la kapitano estas senviva?”

“Ve, mi vidis lin morti, patro. Lia kadavro kuŝas en la loĝejo de mastro Cools, la plombisto.”

“Kaj ĉu kapitano Bossart trapikis Goffredon?” grumblis la amano. “La armeestro certe ne lasos tiun murdon nepunita. La okupaciaj trupoj ne apartenas al mia jurisdikcio, alie... ! Sed kion mi diras? Se la batalo okazis honeste... Eble Goffredo mem estis la defianto. Ĉiaokaze leĝo, kia ajn ĝi estas, ne redonos la vivon al la povra Goffredo. Kia fatala tago! Vi ankoraŭ ne scias, Willem, sed ĉi-nokte oni plenumis ŝtelon en nia domo. La juvelkesteto en mia dormoĉambro estis malfermita. La juvelo kiun mi antaŭe aĉetis de sinjoro Van Reigersvliet, malaperis. Mi ne komprenas, kiel tio eblis. Ĉu iu el la invititoj faraĉis tiun krimon dum nia vesperfesto? Certe la ŝtelisto devas esti iu kiu sciis, ke mi posedas la juvelon kaj konis la lokon, kie mi gardis ĝin. Tion sciis neniu el niaj servistoj. Nur al Goffredo mi iam montris ĝin. La kapitano estis pasia monludisto. Por ekhavi monon li eĉ vendus sian animon. Malgraŭ lia fideleco al mi, en mia menso ekestas la suspekto, ke la kapitano...”

“Sed, patro, tio ne eblas!” suspiris la junulo.

“Tion mi ankaŭ diris al mi mem,” daŭrigis la amano, “sed pripensu, mia filo: hieraŭ vespere la kapitano perdis sian tutan monon, eĉ la monon kiun pruntis al li Everard t’Serclaes. Kelkan tempon poste mi forlasis la kompanion por preni mem iom da mono en mia ĉambro, ĉar ankaŭ mi perdis ĉe la ludo. Mi trovis Goffredon en preskaŭ malluma ĉambro antaŭ mia dormoĉambro, kaj li, surprizita, diris al mi, ke li serĉas Everard-on t’Serclaes, kaj demandis, ĉu mi ne vidis lin.”

“Nura hazardo, patro. Goffredo vere serĉis Everard-on t’Serclaes. Ĉu ni ĉiuj ne estis mirigitaj pro la neeksplikebla malapero de la juna t’Serclaes?”

“Jes, sed Goffredo forrestis pli ol horon, kaj li revenis, la manojn plenajn je malnovaj ŝildoj. De kie li ekhavis ilin? Ni ja scias, ke la kapitano ne havis monon.”

“Kredu min, patro. Goffredo ne kapablis agi tiel malhoneste,” murmuris la junulo kun esprimo de timo. “Nun li estas senviva, la povrulo! La memoro pri li ne estu makulita per tia maljusta suspekto!”

“Ĉiakaze, Willem, mi kredas, ke mi baldaŭ konos la veron. Mi elsendis du aŭ tri el miaj plej lertaj servistoj. Se tiu juvelo estis forprenita

de monludisto, ĝi certe baldaŭ estis lombardita aŭ vendita... Ĉu Goffredo kulpas aŭ ne kulpas, lia morto ĉagrenas min pli ol la perdo de deko da tiaj juveloj. Li promesis al mi plenumi iujn gravegajn taskojn. Nun, tiu ĉi okazaĵo pensigas min, ke... Sed kio estas tio? Mastro Scoens, sen anonco?”

Unu el la servistoj de la amano aperis en la saloneto.

“Sinjoro,” li diris, “mi estas certa, ke vi pardonos min: mi havas bonan novaĵon rakontenda al vi. Ni retrovis la juvelon!”

“Vi retrovis la juvelon?” ripetis Van Heetvelde, surprizita. “Ĉu vi estas certa?”

“Mi vidis ĝin, Sinjoro Amano. Mi tenis ĝin en miaj manoj: iu stranga ronda objekto kvazaŭ radeto kun diamantoj kaj ruĝaj kaj verdaj ŝtonoj.”

“Ha, jes, tia ĝi estas!” ekkriis Willem kun ĝoja rideto.

La junulo kredis vidi en tio la realigo de la antaŭdiro de Goffredo. Nun la talismano estis reironta tute sole en la manojn de lia patro, sen ke li devos konfesi sian aŭdacan agon.

“Kaj kie vi trovis la juvelon?” demandis la amano.

Sed la servisto silentis kaj fiksas siajn okulojn kun komprenebla rigardo sur la junulo.

“Nu?” murmuris Van Heetvelde.

“Sinjoro Amano,” estis la respondo, “tio, kion mi devas malkaŝi al vi, estas tiel grava, tiel miriga sekreto, ke mi rigardas kiel mian devon komuniki tion nur al vi sola.”

“Ĉu vi aŭdas tion, Willem?” demandis lia patro. “Iru al via ĉambro. Bedaŭru la morton de la kapitano, sed ne lasu tiun malfeliĉon, kiel ajn granda ĝi estas, fari vin senkonsola. Ne estas nia kulpa, kaj nia ĉagreno ne povas ripari ĝin.”

Willem jam ekstaris kaj atingis la pordon, kiam lia patro diris la lastajn vortojn. Tiam la amano denove turnis sin al sia servisto.

“Kion gravegan do vi scias?” li demandis.

“Sinjoro, vi apenaŭ povos kredi tion”, respondis la servisto per retenita voĉo. “La juvelo estis lombardita hieraŭ vespere inter la naŭa kaj la deka ĉe lombardisto Niceforo en la Kattengang por cent malnovaj ŝildoj...”

“Hieraŭ je la naŭa, do dum mia vesperfestoj!” ekkriis Van Heetvelde. “Mia suspekto estas do bonmotiva! La deponinto de la garantiaĵo estis neniu alia ol kapitano Goffredo, ĉu ne?”

“Tute ne, Sinjoro. Vi neniam povus diveni tion, eĉ se vi serĉus cent jarojn.”

“Vi timigas min. Ho, kia penso!”

Kaj dum liaj haroj ekstaris, sonis el lia raŭka gorĝo la vortoj:

“Ĉu mia filo?”

La servisto proksimiĝis al li kaj mallaŭtigante sian voĉon, li diris:

“Ne, Sinjoro: la ŝtelisto, la deponinto de la garantiaĵo, de la juvelo estas sinjoro Everard t'Serclaes.”

“Kion vi diras?” ekkriis la amano poste-niĝante. “Ĉu t'Serclaes, Everard t'Serclaes? Neeble. Oni trompis vin!”

“Certe, Sinjoro, estas nekredeble, kaj ankaŭ mi ne volis kredi tion, sed la lombardisto montris al mi folieton el pargameno kun la deklaro de Everard t'Serclaes, en kiu tiu rekonas doni la juvelon kiel garantiaĵon.”

“Kaj tiu deklaro estas subskribita?”

“Subskribita propramane, Sinjoro.”

Konsternita per tiu novaĵo, la amano falis sur seĝon kaj dum momento fikse rigardis la plankon. Rapide restariĝinte, li diris:

“Lasu min kelkajn momentojn sola, mastro Scoens. Mi tuj rekompencos vin pro via diligenteo. Iru en la antaŭĉambro kaj atendu mian ordonon. Diru al neniu, kion vi eksciis. Nenian vorton, al nenia homo, ĉu vi komprenas min?”

Kiam la servisto estis forlasinta la salonon, la amano, kvazaŭ maltrankviligita per timigaj pensoj, komencis promeni tien kaj reen. Fine venis klareco en lian menson. Li haltis kaj, dum rideto de feliĉeco prilumis lian vizaĝon, li murmuris al si mem:

“Everard t'Serclaes priŝtelis min: la lombardisto posedas la nerefuteblan pruvon de lia krimo! Dio, kiel forta vi faras min kontraŭ mia malamiko! Kian sorĉbastonon vi metas en mian manon! Kiel nun ĉio fleksiĝos kaj faldiĝos laŭ mia volo! Sed se la maljuna t'Serclaes eksciis tiun teruran sekreton? Se li reaĉetus la deklaron per mono? Ho, ne, ne, mi devas posedi ĝin. Nenia talismano povus estis pli potenca sur la tero! Mi havas nenion pli timenda: al mi la venko!”

Dirante tion, li forlasis la salonon.

VII

Povis esti ĉirkaŭ la naŭa. La nokto estis tiel malluma, ke estis neeble distingi eĉ tre grandajn objektojn sur la stratoj de Bruselo. Dum la lastaj tagoj oni ĝuis eksterordinare belegan veteron, sed nun la vento subite turniĝis nordokcidenten, kaj opaka, malvarma nebulo plenigis la aeron. La bonaj civitanoj jam antaŭlonge enlitiĝis, kaj en la urbo regis morta kvieteco. Nur tie kaj tie ĉi en la domoj oni vidis ankoraŭ la flamon de lampo, sed ĝi flagris senbrile kaj malvige kiel lampiro.

En tiu momento nigra vira ombro, volvita en bruna mantelo kun kapuĉo sur la kapo, ŝteliris tra la nokto preter la urba pesilo al la rivero

Zeno, transiris la ponton kaj singarde proksimiĝis al la strato Borgwal, mallarĝa strato, kiu kondukis al la akvomuelejo de mastro Grijspeert, la doĵano de la fulistoj. Alveninte ĉe angulo de la strato, li subite haltis, kliniĝis kvazaŭ por povi pli bone rigardi tra la mallumo kaj murmuris al si mem:

“Tie estas iu! Ĉu amiko aŭ malamiko? Ni rigardu. Mia tranĉilo troviĝas malfermita en mia poŝo... Kaj se tio estas spiono de la amano...”

Li daŭrigis en la direkto de la preĝejo Sankta-Goriko, de kie li ankoraŭ aŭdis la brueton de alproksimiĝantaj paŝoj. Sed verŝajne ankaŭ la alia promenanto timis esti spionata aŭ rekonita, ĉar ĉiuj bruetoj ĉesis, kaj kiel ajn la unua aŭskultis kaj per superstreĉitaj pupiloj ĉirkaŭrigardis ĝis eĉ sur la tombejo ĉirkaŭ la preĝejo Sankta-Goriko, li aŭdis nenion plu.

“Ĉu li sinkis en la grundon?” li grumblis. “Ĉu mi efektive estas spionata? Ho, se mi estus certa pri tio kaj ekhavis lin inter miaj manoj ...! Tiel certe kiel mi estas la doĵano de la buĉistoj...!”

Post momento da pensado li transiris la ponton de la Judoj en sia maldekstra flanko, eniris la strato Ververs kaj do revenis laŭ la saman vojon. Aŭdante nenion plu, li ĉirkaŭiris la angulon de la strato Borgwal kaj volis frapi sur la pordon de la folmuelejo de mastro Grijspeert ĉe la fino de la strato, kiam li aŭdis denove iun malantaŭ sia dorso kaj vidis malrapide proksimiĝi nigran ombron ŝtelirantan preter la domojn.

Grumblante pro malpacienca kaj kolero, li iris, kun la mano sur la tranĉilo, rekte al la nekonato kaj demandis lin per retenita voĉo, sed en decidema, ordona tono:

“Kiu muelas tie?”

“La vento,” oni respondis.

“Kiel do, vi mastro Lankhals?”

“Jes, mastro Pex, estas mi.”

“Feliĉe, ke vi estas amiko. Mi jam havis mian tranĉilon en la mano.”

“Ĉu vian tranĉilon? Estus danĝere uzi ĝin en tiu ĉi strateto. Ni devas resti trankvilaj. Jam estas malfrue. Venu amiko Pex, ni eniru.”

Ili proksimiĝis al la pordego de la folmuelejo kaj frapis trifojon.

“Kiu muelas ĉi tie?” oni demandis tre mallaŭte tra la spiontruo.

“La vento.”

“Mastro Lankhals, la doĵano de la forĝistoj,” estis la respondo, kaj la pordego ŝajnis malfermiĝi kaj refermiĝi per si mem, ĉar la servisto tenis sin kaŝita en la mallumo kaj restis senparola.

Malgranda noktlumo, kiu flagretis en la fino de longa koridoro, montris al ili la direkton en kiu ili devas iri. Survoje Lankhals retenis sian kunulon kaj demandis lin:

“Mastro Pex, ĉu vi ankoraŭ vidis sinjoron t’Serclaes post la lasta kunveno?”

“Dufoje.”

“Ĉu li parolis al sinjoro Clutinc?”

“Jes. Sinjoro Clutinc akceptis kaj donis sian parolon de honoro.”

“Despli malbone. Ni bedaŭros tiun decidon poste, amiko Pex. Ni, metiistoj kaj komercistoj, ne estus devintaj allasi kavalirojn en nian rondon, almenaŭ ne en nian sekretan konsilantaron.”

“Vi ja pravas, mastro Lankhals. Mi kontraŭstaris la proponon tute kiel vi, sed t’Serclaes faris ĝin, kaj kion t’Serclaes deziras, tion, la aliaj akceptas kun sklava submetiĝo.”

“Kiel humiliga tio estas por ni! Tiu malkuraĝo profunde ofendas min. La membroj de la gentoj estas niaj denaskaj malamiko, sed en gravaj aferoj ni povas fari nenion alian ol obei ilin. Ĉu ni ne meritas esti malestimataj kaj subpremataj de tiuj homoj pro tiu malkuraĝeco? Kaj kial oni ĉiam elektas tiun t’Serclaes? Ĉu do ne estas inteligentaj kaj saĝaj viroj en la metioj?”

“Certe, vi mem, mastro Lankhals...”

“Mi ne parolas pri mi mem. Sed estas honto, ke ni ĉiam devas esti kondukataj per la nazo kiel etaj knaboj fare de la gentoj. Ekzemple, mastro Pex, ĉu ni bezonas kavalirojn por konduki nin al la batalo? Kiu el ili estas pli kuraĝa ol vi?”

“Ke mi posteniĝos antaŭ nenia danĝero, ĉiuj scias. Sed koncerne t’Serclaes, ni devas toleri lin, ĉar sen li ni povas fari nenion.”

“Ĉu vi parolas serioze? Tio estas malĝusta penso.”

“Sed ne: t’Serclaes havas grandan aŭtoritaton ĉe la popolo kaj eĉ ĉe la doĵanoj de la metioj.”

“Ili estas senprudentaj!” grumblis Lankhals. “Ĉiam ili metas sin sub la komandon de membroj de la gentoj, kvankam ili scias proprasparte, ke tiuj orgojlaj homoj finfine peridos la popolon... Kaj tute ne mirigus min, se t’Serclaes mem... Oni frapas sur la pordegon. Ni ne estas la lastaj. Ni eniru.”

Je la fino de la longa koridoro ili eniris vastan ĉambron, specon de magazeno, kiu estis prilumata nur per eta lampo, kies radioj apenaŭ atingis la angulojn de la ĉambroj. Ĉiuflanke oni vidis pakoj de drapo amasigitaj kontraŭ la nudaj muroj. En la anguloj pelmele kuŝis lignaj kadroj kaj folista ilaro. Ĉe la tablo el malglata kverka ligno dudeko da viroj sidis sur benkoj aŭ drapopakoj, kiujn oni aranĝis kiel sidejojn. Sendube oni prenis tiujn antaŭrimedojn, por ke, se la konspirantoj devus fuĝi tra Zeno en kazo de surprizo, en tiu magazeno restu nenia rekonebla spuro de ilia ĉeestado.

La ĉeestantoj estis plej ofte doĵanoj de la metioj aŭ aliaj gravaj viroj, kiu apartenis al la rango de la laboristoj aŭ la komercista burĝaro. Krom la maljunan t’Serclaes oni vidis nenian membron de la gentoj. t’Serclaes sidis en ilia mezo, eksplikante al ili la rezulton de sia misio apud sinjoro Clutinc, kiam eniris Pex kaj Lankhals. Li rekomencis sian eksplikadon kaj, kvankam Lankhals kelkfoje interrompis lin per malproba grumblado, la aliaj akceptis lian paroladon per aplaŭdo.

“Mi diras, ke ni plenumis stultan nesingardaĵon,” murmuris la doĵano de la forĝistoj. “Memoru, Sinjoroj, ke mi voĉdonis kontraŭ la dungo de sinjoro Clutinc. Konfidi niajn sekretojn, nian vivon al membro de la gentoj, al hereda malamiko de la burĝaro!”

“Sed kiu donas al vi la rajton tiel paroli?” severe replikis t’Serclaes. “Ĉu ne estas inter la gentoj multaj viroj kiuj neniam hezitis verŝi sian sangon por nia lando kaj nia duko?”

“Kondiĉe, ke ili restu la mastroj kaj ne la sklavo!”

“Tio estas vera,” konfirmis Pex.

“Sed ĉu mi do ne estas membro de la gentoj?” demandis t’Serclaes.

“Jes, sed tio estas tute alia afero,” respondis la doĵano de la forĝistoj. “Nu, ni vidos, kiel tio finiĝos. Sinjoro Clutinc ne estas ĉi tie, kaj li posedas nian sekreton!”

“Post nelonge li aperos en tiu ĉi kunveno,” diris t’Serclaes. “Mi parolis al li ankoraŭ antaŭhieraŭ, konsilante lin veni iomete pli malfrue, por ke ni ĉiuj estu ĉi tie ĉe lia eniro. Li estas lojala kaj laborema viro, kiu en mallonga tempo ricevis de deko da kavaliroj la promeson, ke ili batalos kun siaj viroj en la solena momento de la liberigo de Brabanto.”

“Promesoj de kavaliroj! Ĉu ni apogu nin sur ilin?” murmuris Lankhals. “Kaj se ni estus perdiditaj...?”

“Ha, amikoj, ni ne estu malgrandanimaj!” interrompis lin t’Serclaes, ĉagrenita. “Ni direktu la rigardon ne preter la celo, sed al la celo mem. Ke dum normalaj tempoj vi luktas kontraŭ la gentoj por kontesti al ili certajn privilegiojn, tion oni povas kompreni. Sed ĉi tie ne temas pri pli malgranda aŭ pli granda supereco de la gentoj. Ni liberigos nian patrimon kaj redonos al la filino de nia antaŭa duko la tronon de ŝia patro, kiu estis forrabita al ŝi per perfido kaj perforto. Tio estas nia sola celo, kaj kiu volas kunlabori kun ni por atingi ĝin, li estu kavaliro, burĝo aŭ metiisto, li devas esti bonvena ĉe ni. Certe, tro facila kaj tro granda fido povas malutili, sed ne malpli paraliza estas malracia kaj malsaneca malfido, kiu vidas ĉie kaj en ĉiu viro perfidon kaj perfidonton.”

Lankhals kaj Pex ŝajnis malkontentaj pri tiu

admono, kiu – ili sciiis tion – estis direktita kontraŭ ili. Ankaŭ doĵano Grijspeert murmuris malaprobe, sed la aliaj membroj de la kunveno klare montris, ke ili konsentas kun la vortoj de t'Serclaes.

“Ni ne disputu pri tiaj bagatelaĵoj,” diris tiu ĉi, “kaj ni plue provu unuanime alŝtrebi la liberigon de nia gepatra urbo. Pasintfoje ni ne kuraĝis aŭ ne kapablis fiksi tiun grandan tagon. Nun ni reprenu la interkonsiliĝon pri tiu grava temo, ĉar nur tial ni kunvenis hodiaŭ. Je kiu tago kaj kiu horo ni entreprenu tiun decidan provon? Kiu demandas la parolon?”

“Mi deziras paroli, Sinjoro Prezidanto,” diris dikventra bierfaristo. “Depost la antaŭa kunveno estas denove pasinta pli ol semajno. Niaj viroj akuzas nin pri malkuraĝo. Ĉiu tago valoras pli ol oro por ni. Oni ne scias, kio povos okazi. Mi do diras: ju pli frue, des pli bone.”

“Post du aŭ tri tagoj,” konfirmis Pex.

“Tio estas nur vanaj vortoj,” rimarkis la doĵano de la bakistoj. “La metioj estas ankoraŭ nesufiĉe preparitaj. La pasto estas ankoraŭ nematura.”

“Tro matura, multe tro matura, vi volas diri” rediris la bierfaristo. “La biero estas forte fermentanta. Se oni faros nenion baldaŭ, la kruĉo krevos. Se la popolo ribelus sen atendi nian ordonon, ĉio perdiĝus.”

“Nun ĉiuj niaj viroj estas plenaj je fervoro kaj sopiras je la batalosignalo,” aldonis la doĵano de la forĝistoj. “Oni devas forĝi la feraĵon, kiam ĝi estas varmega, sed se oni lasas ĝin malvarmiĝi...”

“Vi troigas la malpaciencon de la metioj, kaj krome, ni ankoraŭ ne estas pretaj,” diris drapkomercisto.

“Ĉu ne pretaj?” interrompis Lankhals. “Kio ankoraŭ necesas por tio? Vi certe volas atendi, ĝis kiam la grafo reiros por streĉi iomete pli la pendumilŝnuro ĉirkaŭ via kolo!”

“La grafo ne revenos dum longa tempo,” rediris la drapkomercisto. “Sen sufiĉa nombro da armiloj, sen almenaŭ tricent aŭ kvarcent arbalestoj estus tro riska doni la signalon de la ribelo. Ni do atendu ĝis kiam ni estos havigintaj al ni la necesajn armilojn. Konsideru, ke ni povos nur unufoje riski tion. Se ni maltrafos la venkon, nia afero estos perdita por ĉiam. Por batali nokte kontraŭ bone trejnitaj militistoj, ni nepre devos havi sufiĉan nombron da arbalestoj. Se ne, la soldatoj pafmortigos niajn virojn jam de for, antaŭ ol ni povos proksimiĝi.”

“Kaj kian prokraston vi rekomendas al ni?” demandis voĉo.

“Prokraston de almenaŭ tri semajnoj,” estis la respondo.

Ridoj kaj murmuroj estiĝis en la flanko de la tablo, kie sidis Lankhals kaj siaj amikoj.

“Tri semajnojn!” ili kriis. “Tiam la grafo certe estos reveninta!”

“Se mi ne konus pli bone Jacob-on Grols, mokis Pex, “mi pensus, ke la amano parolas tra lia buŝo. Tri semajnojn! Tiam ni same tiel bone metos la manojn sur la genuojn por ĉiam.”

“Li esperas, ke intertempe nia duko Venceslao estos reveninta el Limburgo kun armeo,” diris la teksisto.

“Mi konfesas, ke estus la plej bona solvo,” konfirmis la drapkomercisto. “Tiel ni estus certaj pri nia afero. La duko ekstere, la metioj interne, kaj la malamiko premata inter du armeoj.”

“Sed estas naive ĉiam reveni kun la sama espero,” murmuris Grijspeert. “Ni ja scias, ke nia duko ne venos. Li jam konsideros sin feliĉa, se li povos defendi Limburgon kontraŭ la Lieĝanoj kaj la grafo de Namuro.”

“Permesu min alparoli kvin minutojn, amikoj,” diris t'Serclaes. “Ni efektive ankoraŭ ne estas tute pretaj, sed post kelkaj tagoj ni havos sufiĉe da armiloj. Sur diversaj lokoj estas kaŝitaj proksimume ducent arbalestoj. Per ili ni kapabligos nian avangardon kontraŭstari la malamikajn pafistojn. Aliajn armilojn oni povas facile fari. En ĉiuj forĝejoj, en ĉiuj ĉarpentejoj kiuj estas kun ni, ŝajne estas farataj diversformaj bariloj. Sed tiuj bariloj fakte estas pikstangoj, lancoj, klaboj kaj glavoj, kiujn disponigos al ni la tranĉilfaristoj. Krome estas la armiloj, kiujn multaj el ni kaŝis por eskapigi ilin al la traserĉadoj de la domoj. Mi trovas, ke koncerne tiun ĉi punkton ni povos estis tute trankvilaj”

“Nu do, ĝis postmorgaŭ!” kriis Lankhals.

“Lasu min daŭrigi,” rediris t'Serclaes. “De nia indulgema dukino ni ne povas atendi ian helpon. Ke la grafo de Flandrio povus reveni el Fancio post mallonge, mi ne kredas. Sed mi scias, ke la amano suspektas nian sekretan aktivecon. Se ni ne rajtas riski fari la grandan baton, antaŭ ol ni estas pretaj, ni ankaŭ ne rajtas endanĝerigi ĝin, donante per nia hezitado kaj prokrastado al niaj malamikoj la tempon, malsukcesigi nian provon. Kelkaj el ni esperas je helpo de ekstere kaj volas atendi nedefinitan tempon. Tiu estas tre danĝera opinio. Mi volas fari al vi prononon, kiu povas kontentigi ĉiujn. Hodiaŭ ni estas la 16-an de la monato. Post ok tagoj estos la festo de sankta Krispeno. La antaŭvesperon la metioj de la ŝufaristoj, la rimentranĉistoj, la tanistoj kaj la aliaj viroj de la leda gildo celebros la jarfeston de sia patrono. Tiel estos vigleco en kelkaj kvartaloj de la urbo, sen ke tio vekos la atenton de la amano kaj de la okupaciantaj trupoj. Tiam la grafaj soldatoj jam delonge dormos. –

Do mi petas vin nun trankvile interkonsiliĝi pri tiu propono.”

La granda plimulto de la membroj konigis sian aprobon per laŭta ĝojkriado, sed ĉe la du finoj de la tablo oni murmuris malkontente. Lankhals kaj liaj amikoj trovis prokraston de ok tagoj tro longa. La drapkomercisto kaj la doĵano de la bakistoj opiniis, ke estas tro aŭdaca kaj danĝera riski la baton antaŭ ol ili estos tute pretaj.

“Pri tiu ĉi punkto oni jam diris ĉion eblan dum la lasta kunveno! Ni estas sufiĉe informitaj. Nia prezidanto pravos. Balotadon, balotadon!” kriadis multaj membroj.

T’Serclaes submetis la proponon al balotado. La rezultato estis, ke dek kvar membroj deklaris sin por kaj ses kontraŭ. La propono estis do nerevekeble akceptita.

“Nun, amikoj,” diris t’Serclaes, “mi nun mallonge priskribos al vi la manieron, kiel mia opinio ni povos organizi nian decidan provon en tiu granda tago. Ĉiuj niaj viroj estos avertitaj de la membroj de tiu ĉi kunveno kaj al aliaj fidindaj viroj ni donos la signalon en la antaŭvespero de la festo de sankta Krispeno. Tiu signalo estos alarmsonorado per la sonoriloj de la preĝejo Sankta-Nikolao. Ĉiuj aliaj preĝejoj kaj monaĥejoj respondos ĝin. La feston de la ŝufaristoj, tanistoj kaj rimentrancistoj ĉeestos multaj membroj de la metioj – multe pli ol kutime. Ili scias, kie en la ĉirkaŭaĵo estas kaŝitaj armiloj por ili. La aliaj metiistoj staros pretaj en ĉiuj kvartaloj de la urbo. Subite la sonoriloj eksonoros la alarmon, trumpetoj ekresonos. Ĉiuj armitaj viroj kuros al la Granda Vendoplaco kaj superfortos la skabendomon. Ni okupos kaj baros la stratojn ĉirkaŭ la Granda Vendoplaco, kiu do fariĝos nia fortreso. Ni sendos fortajn trupojn en ĉiuj direktoj por forpeli la grafajn trupojn, kiuj alkuros...”

Subite liaj eksplikoj estis interrompitaj per la apero de Hugo Clutinc. Salutinte la kunvenon kaj haste preminte la manon de la doĵanoj kiujn li konis, li laŭte diris al t’Serclaes.

“Mi frapis sur la pordon de via domo iomete post la naŭa. Vi jam eliris. Mi estis rapidanta ĉi tien, kiam mi renkontis ĉe la preĝejo Sankta-Nikolao du amikojn-kavalirojn, kiuj pasigis la vesperon ie en bona societo. Ili volis scii, kien mi iras kaj rifuzis forlasi min. Mi timis veki ilian suspekton kaj nur kun peno sukcesis liberigi min de ili post longa promenado, ĉar ili estis tre gajaj. Tio estas la kaŭzo, kial mi iomete malfruas.”

Li metis la manon en sian poŝon kaj eligis el ĝi fermitan leteron, dirante:

“Sinjoro t’Serclaes, mi havas urĝan mesaĝon por vi. Apenaŭ vi forlasis vian domon, urba kuriero alportis tiun ĉi leteron kun la reko-

mendo serĉi vin kaj enmanigi ĝin al vi. La afero ŝajnas tre grava, kaj via servisto multe konfuziĝis. Ĉar mi estis venonta ĉi tien, mi akceptis porti la leteron al vi. Estas mirige, ke la amano sendas ĝin al vi.”

“La amano!” ekkriis ĉiuj, mirigitaj. “Kion tio signifas?”

Pex kaj liaj amikoj rigardis unuj la aliajn murmurante, kaj iliaj fiksjaj rigardoj atestis, ke en iliaj mensoj tuj ekestis grava suspekto. Ĉu t’Serclaes estis en sekretaj rilatoj kun la amano? Aŭ ĉu la skribaĵo estis nur provo persvadi lin plenumi perfidon?

Ilia malfido ankoraŭ pligrandiĝis, kiam ili vidis, ke t’Serclaes hezitas malfermi la leteron.

“Legu ĝin laŭvoĉe. Ni volas scii, kion la amano diras al vi!” ekkriis la doĵano de la forĝistoj.

“Jes, jes, laŭvoĉe!” ripetis multaj voĉoj.

“Estas mia intenco, amikoj, informi vin pri la enhavo de tiu ĉi letero, kies sendo mirigas min pli ol vin,” respondis t’Serclaes, rompante la sigelon. “Ekde la malfeliĉo de nia patrio, tio ĉi estas la unua vorto kiun mi ricevas de la amano. Sendube estas falsa ŝnurkaptilo... Vi aŭdos tion: aŭskultu.”

Kaj malrapide kaj kun emfazo li legis jenajn vortojn:

“Mi, la Amano de Bruselon, petas Sinjoron t’Serclaes, la patron, veni al mia domo morgaŭ frumatene antaŭ la oka. Mi devas komuniki al li ekstreme gravan kaj teruran sekreton. Se li venos, mi dankos lin. Se li ne venos, li eterne bedaŭros tion.”

Ion alian la letero ne enhavis.

Iom da tempo regis profunda silento en la kunveno, kaj ĉiuj rigardadis unuj la aliajn kun granda miro.

“Teruran sekreton! Kio tio povas esti?... La amano kiu pretas fari servon al sinjoro t’Serclaes? Ĉu ili denove fariĝis amikoj?” oni murmuris.

“Nu, ĉu la Sinjoro Prezidanto ne devas ekspliki ion al ni?” demandis Lankhals en akra tono.

“Ĉu ekspliki ion?” respondis t’Serclaes. “Mi scias absolute nenion. Certe estas trompo. Kio alia povus veni de tiu malica viro, kiu vendis Brabanton kaj ĝiajn legitimajn princojn por fariĝi amano de Bruselo?”

“Ĉu vi iras morgaŭ al li?” demandis Pex.

“Ne. Nur la penso, ke mi troviĝus en la ĉeesto de tiu malkuraĝa perfidulo de la patrio igas min tremi pro indigno.”

“Ĉu mi povus preni la parolon?” demandis Clutinc. “Mi opinias, Sinjoroj, ke vi malpravos. Anstataŭ malhelpi sinjoron t’Serclaes iri al la amano, mi petus lin fari tiun malagrablan viziton por la bono de nia afero. Kiu povas scii, ĉu la amano mem, eĉ se li volus trompi

t'Serclaes, ne rivelus al li aferojn, kiuj povus utili nin? Kaj ĉu ni ne eterne bedaŭrus, se tio estus tiel, ke ni neglektis uzi la falsecon de la malamiko por malkovri liajn kaŝitajn celojn? Oni murmuris en mia maldekstra flanko. Ĉu oni malfidas sinjoron t'Serclaes? Mi indignas pro tia maljusteco. Kiu asertas ami pli arde ol li siajn landon kaj dukinon? Ke li parolu laŭvoĉe! Kvankam nur ĉi-vespere unue allasita al tiu ĉi kunveno, mi esprimas mian opinion kiel libera viro. Mi proponas, ke la kunveno petu, kaj se necese ordonu al sinjoro t'Serclaes, iri morgaŭ al al amano."

"Li provos tenti lin," krude diris Lankhals.

"Ĉu vi rigardas sinjoron t'Serclaes kiel infanon?" rediris Clutinc. "Inteligenta kiel li estas, li certe ne permesos al la amano kapti lin. Inter ili estos lukto de saĝeco kaj lerteco. Ne estas dubo, almenaŭ ne por mi, kiu gajnos tiun lukton. Tiam ni plene konos la gravan kaj teruran sekreton, pri kiu parolas la amano, kaj povos tiri nian profiton el ĝi, dum la nescio en kiu nin vivas nun, povos esti fatala por nia afero."

Komence t'Serclaes petegis la kunvenon ne ordoni lin viziti la amanon. Van Heetvelde estis lia nerepacigebla malamiko: li timis la malicajn ruzojn de la perfidulo. Tiu legitima antipatio, kiun li sentis kontraŭ la landvendisto, eble forprenus al li ĉiun saĝecon kaj kvietecon. Sed li fine rekonis, ke Clutinc kaj la aliaj, kiu provis konvinki lin fari tiun viziton al la amano, eble pravas, kaj cedante al iliaj petoj, li deklaris sin preta fari tiun malagrablan kaj eĉ dolorigan paŝon, se la kunveno ordonos lin fari ĝin.

Post kiam oni parolis ankoraŭ kelkan tempon pri la propono de Clutinc, iu petis balotadon. Malgraŭ la kontraŭstaro de Pex kaj liaj kunpartianoj, oni decidis per preskaŭ plena unuanimeco de la voĉoj, ke morgaŭ matene t'Serclaes direktu sin al la amano.

"Tiel estu, mi obeos," diris t'Serclaes. "Tiu punkto estas do pritraktita. Ni daŭrigu niajn diskutojn. Dum la ok tagoj kiuj ankoraŭ apartigas nin de la antaŭvespero de la festo de sankta Krispeno, ni devas ankoraŭ decidi pri centoj da malgrandaj, sed gravaj aferoj. Tiu kunveno ne povas esti kunvokata ĉiutage. Tio estus tro danĝera. Tial mi opinias, ke estus bone, ke vi elektu el via medio tri personojn kaj donu al ili plenan potencon decidi kaj ordoni en via nomo. Tio estas, mia opinio, la sola maniero ebligi nin disvolvi grandan aktivecon kaj doni firman unuecon al nia provo liberigi la patruon."

La propono estis aplaŭdita de ĉiuj, kaj kelkaj voĉoj kriis:

"La sinjoroj t'Serclaes kaj Clutinc! – Mastro Grols! – Varinx! – De Bruin! – Lankhals!"

"Jes, jes, vi nur faru!" Pex kolere ekkriis. "Mi ja vidas, kion vi denove elpensaĉis! Inter la ses

membroj, kiuj ordonos nin kiel veraj armeestroj, vi nomumos du kavalirojn! Estas kvazaŭ vi farus tion intence por inspiri malfidon al la metioj kaj amarigi ilin! Sinjoro Clutinc eble koleriĝos kontraŭ mi, sed mi nur plenumas mian devon kontraŭ la patrio sentime. Li do permesu min diri, ke li estas ankoraŭ tro nova en nia grupo, kaj niaj viroj tre malvolonte ricevus ordonojn el lia buŝo!"

"Vi pravas, mastro Pex," respondis Clutinc. "La membrojn kiuj prononcis mian nomon, mi elkore dankas pro ilia amikeco, sed mi deklaras, ke mi estas konvinkita, ke inter ni ĉiuj mi estas la malplej taŭga por esti unu el viaj plenpotenculoj!"

"Sufiĉas! Ni balotu! Ni balotu!" kriis la plimulto.

"Mi petas la parolon!" kriis Lankhals.

Kaj sen atendi, ke oni donu al li la parolon, li diris tre akrate:

"Mi kontraŭas ĉian balotadon! Ni ĉiam havos sufiĉe da tempo plenumi fatalan stultecon. Vi decidis, ke morgaŭ nia prezidanto vizitos la amanon. Ni ne scias, kio estos dirita aŭ pritraktita inter ili. Ĉiakaze tiu vizito povus havi kiel sekvon, ke ni devos ŝanĝi nian tutan aktivecon kaj eble plifruigi aŭ ankoraŭ pli prokrasti la tagon de nia granda provo. En tia nescio estas antaŭtempe kaj vane fari ian ajn decidon. Krom tio, nia prezidanto devos raporti al ni ĉion kion li aŭdos ĉe la amano. La aliaj povas esti trankvilaj. Mi do proponas ĉesigi tiun kunvenon kaj decidi, ke morgaŭ je la sama horo ni denove kunvenu ĉi tie en la fulmuelejo de mastro Grijspeert. Tuj kiam sinjoro t'Serclaes estos rakontinta al ni sian interparoladon kun la amano, ni povos repreni niajn interkonsiliĝojn, bone konante tiam la situacion kaj konkludi, kio estos la plej bona kaj utila solvo nia opinie."

Ĉi-foje la plej multaj membroj, kaj ankaŭ t'Serclaes kaj Clutinc, esprimis sian konsenton kun Lankhals. Per baloto la kunveno unuanime akceptis lian proponon.

"Estas do decidite," diris t'Serclaes, "ke ni denove kunvenu ĉi tien morgaŭ. Tio estas saĝa aranĝo laŭ mi. La sekreto kiun la perfidulo konfidis al mi, povus premi pezege kaj dolorige sur mian koron. Mi dankas mastron Lankhals, ke li donis al mi la eblecon malŝarĝi min de ĝi en via ĉeesto... Ni nun finu la kunvenon kaj forlasu la loĝejon de mastro Grijspeert en la kutima maniero, t.e. unu post la alia kun mallongaj intervaloj. Ĉiu el ni scias je kiu flanko de la urbo transiri Zenon sur la ponto ĉe la Kraan. Tiuj antaŭrimedoj estas necesaj, Sinjoro Clutinc, por ne vekti suspekton kaj teni kaŝita la sekreton de niaj kunvenoj. Nun, amikoj, lasu min foriri la unua. Mi kore dankas kaj salutas vin ĉiujn. Ĝis morgaŭ!"

Li ĵetis sian mantelon sur la ŝultrojn kaj forlasis la kunvenejon.

VIII

Post nokto, perturbata per impulsoj de kolero kaj maltrankvileco, la maljuna t'Serclaes ellitiĝis ĉe la taĝigo.

Ankoraŭ ne estis la sepa matene, kiam li, kun mantelo sur la ŝultroj, forlasis sian domon por fari al la amano la viziton komisiitan al li.

Li paŝis preter la monteto Sankta-Miĥaelo kaj supreniris la straton Berg. Ĝis tiam rideto ŝvebis sur liaj lipoj, sed nun lia vizaĝo sombrigiĝis. Ankoraŭ kelkajn momentojn kaj li estis aperonta antaŭ sia malamiko, antaŭ la vendinto de Brabanto, antaŭ la viro kiun li malestimis kaj kiu malamis lin. Kion la amano estus dironta al li? Ĉu li volus streĉi kaptilon al li aŭ per ruzoj logi el lia buŝo la plej gravajn sekretojn? Certe estus stulte voli esti sincera al la falsulo, kaj li, t'Serclaes, ne hezitus, se necese, mem trompi la trompanton.

Kiam li atingis la Putterij kaj de for ekvidis la domon de Van Heetvelde, liaj okuloj ekbrilis. Amara mokrido plena je malestimo faldis siajn lipojn, kaj li levis la kapon kvazaŭ sento de fiereco subite ŝveligus lian bruston.

Li klare rememoris la orgojlon de la amano, kaj sian propran timon, ke tiu ĉi eble volos humiligi lin, igis lin armi sin anticipe kontraŭ tio.

Li eniris la domon kaj ordonis al servisto anonci lin al sia mastro. Sed verŝajne la servisto jam estis ricevinta ordonojn, ĉar li malfermis la pordon de la salono, dum li kriis per laŭta voĉo:

“Sinjoro t'Serclaes!”

Subite ambaŭ viroj staris unu kontraŭ la alia, preskaŭ nevideble kliniĝante kaj preskaŭ neaŭdeble salutante sin. Ambaŭ faris kelkajn paŝojn antaŭen, rigardante en la okulojn de la alia: t'Serclaes per fiero, malvarmeta rigardo, Van Heetvelde per la brila rigardo de venkinto kaj kun mistera rideto sur la lipoj, vizaĝesprimoj en kiu oni povus legi malamikecon kaj moko.

t'Serclaes la unua rompis la silenton.

“La Sinjoro Amano deziris, ke mi vizitu lin. Jen mi estas. Kion gravan li volas komuniki al mi?”

“Bonvolu sidiĝi, Sinjoro t'Serclaes,” diris Van Heetvelde, antaŭenŝovante seĝon.

“Via ĝentileco al mi estas superflua,” murmuris t'Serclaes. “Konversacio inter ni povas daŭri nur momenton.”

“En tio vi eraras, kaj vi tuj rekonos tion. Do, bonvolu preni seĝon kiel mi.”

Kiam ili estis sidiĝintaj unu kontraŭ la alia, t'Serclaes grumblis, malkontenta.

“Tiel estu. Sed mi petas vin: estu konciza. Mi ne havas multan tempon perdenda.”

“Jam delonge ni estas malamikoj, mi ja scias,” diris la amano. “Niaj opinioj ege malsamas, kaj se vi povus fari malbonon al mi, grandan malbonon, vi ne hezitus fari tion. Sed dum la vivo de homo povas esti ĉirkonstancoj tiel teruraj kaj tiel dolorigaj, ke, se nia plej granda malamiko fariĝus ilia viktimo, ni sentus kompaton pro lia sorto, kiom ajn...”

“Vi dure elprovas mian paciencon!” interrompis lin t'Serclaes. “Lasu tiujn ĉirkaŭvojojn aŭ mi forlasos vian domon.”

“Restu trankvila, mia povra t'Serclaes. Kio mi havas direnda al vi, trafos vin tiel kruele en ĉio kion vi plej amas sur la tero, ke pro kompatoj mi volus prepari vin al kuraĝa ricevo de la terurega bato.”

Dum li diris tiujn vortojn, li tenis siajn okulojn fiksita sur la vizaĝo de t'Serclaes kun esprimo de sekreta ĝojo, kvazaŭ tigro ludanta per sia viktimo antaŭ ol vori ĝin.

T'Serclaes ekstaris per salto, kriante:

“Viaj vortoj ne estas seriozaj, amano. Vi primokas min. Tion oni ne povas fari! Parolu di koncize kaj klare, aŭ mi tuj diras adiaŭ al vi.”

“Ankoraŭ ĉiam same fiero!” diris Van Heetvelde. “Vi miskonas mian grandanimecon. Nu, tiel estu! Aŭskultu do! Antaŭhieraŭ mi donis vesperfeston. Dum tiu festo oni malfermis juvelkeston en mia dormĉambro kaj ŝtelis el ĝi tre altvaloran juvelon, kiu estas kovrita per diamantoj, rubenoj kaj smeraldoj kaj valoras almenaŭ kvincent malnovajn ŝildojn.”

“Kial mi devas scii tion?” grumblis t'Serclaes. “Estas do unu el viaj gastoj, kiu ŝtelis la juvelon.”

“Estas kiel vi diras.”

“Se vi invitas homojn, kies honestecon oni ne povas fidi...”

“Ne, ŝercu, t'Serclaes. Tiu kiu, utiligante la mallumon, penetris en mian dormoĉambro... Kiel mi nomos lin?... La ŝtelisto! – Li iris lombardi la juvelon en la sama vespero al lombardisto en la Kattengang. Vi ja konas lin: estas Niceforo. Kiam vi estis skabeno, li aperis dufoje antaŭ nia tribunalo pro uzuro, kaj ni...”

“Ĉu vi konas la ŝteliston?” interrompis t'Serclaes. “Nu, kondamnu kaj pendigu lin kiel li meritas. Sed per kio tiu afero koncernas min?”

“Mi devas komuniki al vi la nomon de la ŝtelisto. Mia koro estas tuŝita de kompatoj. Mi preskaŭ ne kuraĝas diri lian nomon!” diris la amano kaj ŝajnigita ĉagreno.

“Jen, jen, vi ludas priridindan ludon per mi!” murmuris t'Serclaes. “Ĉu vi havas nenian alian

sekreton rivelenda al mi ol la nomon de tiu malestimenda fripono? Tiam diru ĝin, por ke mi povu foriri!”

“Tiu nomon, malfeliĉa patro, mi hezitas, mi timas diri, ĉar vi kiu amas vian filon kiel la lumon de viaj okuloj... Aĥ, Dio protektu vin kontraŭ tiu kruela bato!... Tiu nomo estas Everard t’Serclaes!”

Dum longa momento regis en la salono morta silento. Ambaŭ malamikoj interŝanĝis profundan, penetrantan rigardon. Van Heetvelde ĝuis anticipe la mortigan ĉagrenon de t’Serclaes, kaj tiu ŝajnis stultiĝinta, kvazaŭ li ne komprenis, kion la amano diris al li. Sed subite li eksplodis en longan ridegon.

“Mia filo, mia filo estus la ŝtelisto?” li ekkriis. “Mia filo, tiu bona, honesta, malavara knabo, estus ŝtelinta vian juvelon? Ha, ha, ha! Vi frenezas! Li estus ŝtelinta ĝin por kelkcent malnovaj ŝildoj, li kiu posedas plurajn milojn da ili el sia patrina heredaĵo? Mi estas lia trezoristo! Li bezonas nur peti min. Kia stultaĵo! Kaj vi, Van Heetvelde, vi kuraĝas kredi tian kalumnion? Mia filo, mia nobla Everard? Ha, ha, ha! Vi igas min morti pro ridado!”

Estis io nervoza, io malsaneta en la troigita ridado de t’Serclaes. La amano lasis lin momenton moki kaj tiam diris:

“Mi komprenas, ke via patra koro rifuzas kredi je tia terura revelo, sed mi diras al vi la veron. Via filo Everard estas la ŝtelisto. Li, kaj nur li, rabis la juvelon el mia propra dormoĉambro.”

“Jen, jen, via prudento konfuziĝis, amano. Se vi dirus al mi, ke kolombo forflugis kun la turo de la preĝejo Sankta-Gudula, mi kredus tion pli facile, ol ke mia filo estus alpropriginta al si malhoneste unu solan florenon.”

“Sed ekzistas pruvoj,” murmuris Van Heetvelde, “nererefuteblaj pruvoj!”

“Ĉu ekzistas pruvoj?” ripetis t’Serclaes kun esprimo de moka nekredo.

“La lombardisto igis subskribi deklaron fare de la garantianto de la juvelo. Mi havas tiu deklaron en mia mansako kaj tuj montros ĝin al vi... Sur tiu ĉi peco de pergameno, kiun mi tenas ĉi tie en mia mano, estas skribita jeno: ‘Mi, Everard t’Serclaes, konfesas, ke mi deponis ĉe mastro Niceforo kiel garantiaĵon unu juvelon, kovritan per diamantoj, rubenoj kaj smeraldoj, kaj ke mi ricevis interŝanĝe por ĝi cent malnovajn ŝildojn.’”

“Kaj la deklaro estas subskribita?”

“Jen! Rigardu vi mem la subskribon. Ĉu vi ne rekonas la subskribon de via filo?”

T’Serclaes mallonge tenis la rigardon fiksita sur la pergameno kaj videble paliĝis. La okuloj de la amano brilis pro triumfa ĝojo.

“Vi ja vidas, ke via filo subskribis tiun ĉi deklaron!” li diris.

“Sed ne!” ekkriis t’Serclaes, liberigante sin de la pezo de la dubo, “ne, la neebleco ne povas fariĝi ebla. La subskribo estas efektive bone imitita. Tio estas falsa, krima, infera ruzo, kiu ne sukcesos. Mia nobla infano staras ĉielalte super tia falsa suspekto! Ha, ha, jen do la sekreto kiun vi deziris konfidi al mi!”

“Trankviliĝu, mi petas, t’Serclaes,” diris la amano. “Mi volas helpi vin savi la honoron de via filo. Aŭskultu do bonvole miajn vortojn. Vi restas libera agi laŭvole. Kiel amano mi estas devigita persekuti, nome de mia indulgema senjoro, la grafo de Flandrio, ĉiujn krimulojn, kaj mi devas, havante en la manoj dokumenton kiel tiu ĉi, tuj arestigi vian filon kaj prononciigi mortjuĝon kontraŭ li!”

“Li estas senkulpa, mi diras al vi!”

“Ni supozu tion dum momento. Mi tamen devas arestigi kaj enkarcerigi lin ĝis kiam lia senkulpeco estos pruvita!... Kaj tiu sola fakto, t’Serclaes, makulus vian nomon kaj la lian per malhonoro, kiu estos neforviŝebla, eĉ per favora juĝo. Vi scias tion!”

t’Serclaes rigardis la amanon momenton en la okulojn. Li trapenetris la malicecon de sia malamiko, kaj li komprenis kun timo, kiun povon tiu ŝajna pruvo donis al la amano por doni al lia filo kaj al li mem mortigan baton. Tiu konvinkon rompita lian fierecon.

“Sed, amano,” li murmuris preskaŭ petegante, “vi ne estas sufiĉe maljusta kaj malhumana por arestigi mian filon kaj akuzi lin publike, antaŭ ol vi estos tute certe, ke oni ne trompas vin!”

“Estas efektive mia celo provizore teni la aferon sekreta, kaj mi eĉ severe ordonis al la lombardisto kaj al la justicservisto silenti. Sed ĉu via filo estos arestita kaj kondamnita nun dependas tute de vi, t’Serclaes.”

“Ĉu de mi, amano? Kion vi volas diri?”

“Mi volas proponi al vi miajn kondiĉojn. Ĉar ni estas malamikoj – ni tre bone scias tion –, ni flankenlasu ĉian sekretecon kaj ŝajnigon. Parto de la burĝaro kaj de la metioj sekrete preparas sin al sangeca ribelo kontraŭ la grafo de Flandrio kaj kontraŭ mi... Vi levas la ŝultrojn? Kompreneble, mi ne estas via konfesprenanto, kaj vi estas sufiĉe lerta por ne fari al mi konfeson koncerne tion. Sed mi diras: vi, t’Serclaes, estas la animo de la popola movado. Ĉiakaze via influo kaj aŭtoritato ĉe la metioj estas senlimaj, kaj eĉ se vi partoprenus en tiuj malkuraĝaj intrigoj, unu vorto via sufiĉus por kvietigi la popolon kaj igi ĝin rezigni pri ĉia perforta entrepreno. Mi ja komprenas, ke vi preferas vidi, ke mi, kaj kiuj ajn subtenas la grafon, estu murditaj de la popolo ol helpi nun plenumi nian devon. Sed nun mi posedas potencegan rimedon devigi vin. Mi respondecigos vin pri ĉio ajn kio povos okazi. Tuj

kiam la popolo aperos armita sur la stratojn kaj provos komenci ribelon, kiel ajn malgrava ĝi estos, mi elsendos virojn por aresti vian filon... Kaj se li forlasos la urbon, des pli bone, ĉar tiam lia fuĝo egalos al konfeso de kulpo, kaj li estos kondamnita al morto. La malhonoro estus pli granda, ĉar tiam neniu plendus lin aŭ dubus pri lia krimo... Ĉu vi grumblas, ĉu vi volas rifuzi mian proponon, t'Serclaes? Neutile! Tiu ĉi pergameno ests ŝtala brido, per kiu mi povas devigi vin obei min kaj faldiĝi sub mia volo. Kial vi murmuris pri falseco kaj insido? Kial? Vi volas pereigi min, eble murdigi min fare de la erarigita popolo... Kaj nun, ke la sorto donas al mi la rimedon malhelpi vin fari tion, mi ne rajtus uzi ĝin? Diru do, kiu el ni du estas pli priridinda?"

Ĝis tiam t'Serclaes aŭdis kun kolera malpacieno la vortojn de la amano kaj nur interrompis lin de tempo al tempo per objetoj. Sed verŝajne la terura ĝeno de lia situacio forprenis al li sian tutan kuraĝon, ĉar li diris en dolora tono, eĉ kun humileĉo:

"Sed, Sinjoro Amano, vi eraras pri mia aŭtoritato ĉe la popolo. Se vi vere havus kaŭzojn timi ribelojn, estus tamen kruele respondecigi min pri ili!"

"Tio estas nur vanaj vortoj! Vi konas miajn kondiĉojn. Mi konservas ilin neŝanĝitaj. Ĉia ŝajnigo viaflanke estas superflua."

"Ho, granda ĉielo! Se do okazos io, vi vere arestigis mian senkulpan filon por nuligi per tiu ŝajna suspekto lian honoron kaj feliĉon por ĉiam?"

"Via filo kulpas."

"Tio estas tute nebla, Sinjoro Amano, kaj vi scias tion!"

"Ĉu la pergameno ne portas lian subskribon?"

"Sed ĝi estas falsa! Flasa trompisto imitis tiun subskribon. Mia filo estas honesta, li estas la honesteco mem. Pli noblan koron ol li neniu havas. Ekspliki tiun ĉi kriman intrigon en tiu ĉi momento mi ne povas. Sed mi petas vin, Sinjoro Amano, donu al mi tempon paroli kun mia filo kaj preni kelkajn informojn. Mi estas certa, ke mi povos pruvi al vi, ke oni trompis vin."

"Tiom da tempo, kiom vi volas. Sed ne forgesu miajn kondiĉojn. Koncerne ilin mi estas senindulga."

"Kaj se mi pruvus, ke mia filo estas senkulpa?"

"Se vi povus pruvi al mi, ke via filo ne subskribis propramane tiun ĉi pergamenon," respondis la amano kun mokrideto, "mi disŝirus tiun ĉi pergamenon antaŭ viaj okuloj."

"Nu, Sinjoro, mi forlasas vian domon por serĉi tiujn pruvojn. Ĉu vi permesas al mi prezenti ilin al vi, tuj kiam mi estos trovinta ilin?"

"Certe, certe, t'Serclaes, mi akceptus vin kun, plezuro. Sed intertempe ne forgesu miajn kondiĉojn!"

"Adiaŭ do, ĝis revido," balbutis la povra t'Serclaes humiligita, konsternita kaj kun arda hontoruĝo sur la vangoj.

Kiam li denove troviĝis sur la strato, li haltis momenton kaj nerveze frotis sian frunton per la mano kvazaŭ por klarigi sian menson. Dum li fikse rigardis la grundon, estis kvazaŭ antaŭ liaj okuloj malfermiĝis senfunda abismo de malfeliĉeco kaj malhonoro. Estis terure! Li estis venkita! Ligita kiel viktimo, li kuŝis senpova kiel sklavo sub la piedoj de sia malamikego, la perfidinto de sia patrio. Lia filo ne povis esti kulpa! Pruvi tion senkontraŭdire eble estas neeble... sed nur tiam la amano disŝiris la fatalan pergamenon...

Sed kien li direktu siajn paŝojn? Kio povus helpi, se li nun irus paroli kun sia filo? Verŝajne Everard sciis nenion. La sola atestanto, kies nomon li konis, estis Niceforo, la lombardisto. Eble li povus ricevi de li informojn, kiuj povus gvidi lin al la spuroj de la trompintoj. La unuan kion li devus fari, estus do fari viziton al la lombardisto.

Instigita de tiu penso t'Serclaes ekiris per rapidaj paŝoj. Li tamen estis tiel profunde absorbata en siaj pensoj, ke li ŝanceliĝis kaj eĉ koliziis kontraŭ kelkajn burĝojn. Plurfoje dolora suspiro eskapis el sia brusto, kaj li skuis la kapon senkuraĝe. Sed tiam liaj okuloj denove ekbrilis, kaj li ridetis ĝoje, kvazaŭ li estus certa de la venko. Efektive, ĉu li ne estis konvinkita, same forte kiel pri sia ekzisto sur la tero, pri la senkulpeco de sia filo? Everard ne povis esti la ŝtelinto. Sed kiel pruvi tion nerefuteble? Ĉu la amano ne estis malica kaj senkonscia viro, kapabla je ĉio?

Kaj tiam denove dubo ŝteliris kiel serpento en la koron de la povra t'Serclaes, kaj sinkis lia kapo sur la bruston. Se la popola ribelo ne sukcesus, lia filo estus kaptita kaj kondamnita... lia bona, nobla Everard... iu t'Serclaes sur la eŝafodo!... Sed ne, tio estas delirkapa revo, terurega koŝmaro!... Tamen, kiu povus scii, kiel tiu dramo finiĝos?

ANKORAŬ TUTE SUB LA IMPRESO DE TIUJ LASTAJ konsideroj, t'Serclaes frapis kontraŭ la pordon de la loĝejo de la lombardisto kaj estis enirigita de maljuna virino.

Lombardisto Niceforo, kiu estis pesanta orajn monerojn, ekstaris kaj balbutis, suprizita kaj timigita:

"Ĉu Sinjoro t'Serclaes en mia humila loĝejo? Kio do donas al mi la supermezuran honoron de tia vizito?"

"Vi ja suspektas tion," diris t'Serclaes. "Ne levu la ŝultrojn. Estas neutile ŝajnigi al mi!"

"Vere, Sinjoro, mi ne komprenas vin."

”Atentu, mastro Niceforo, mi ne estas viro, kiun oni povas trompi sendanĝere!” diris t’Serclaes ordone. ”Respondu min... Antaŭhieraŭ vespere oni donis ĉi tie al vi kiel garantiaĵon por cent malnovaj ŝildoj juvelon, kiu estis kovrita per diamantoj, rubenoj kaj smeraldoj. Ĉu vi neas tion?”

”Mi vere ne scias, kion vi volas diri, Sinjoro,” respondis la lombardisto. ”Antaŭhieraŭ mi enlitiĝis je la oka kaj mi dormis ĝis la mateno.”

”Kaj ĉu neniu ĝenis vian ripozon por alporti al vi garantiaĵon?”

”Neniu, Sinjoro.”

”Ha, Niceforo, vi mensogas!” kriis t’Serclaes. ”Mi scias tion, kaj eĉ se mi ne scius tion, mi legus tion en viaj okuloj. Mi komprenas, ke vi volas teni kaŝita la sekreton de la garantiprintintoj, tiel longe, ke vi ne havas intereson riveli ĝin...”

Li eligis kelkajn malnovajn ŝildojn el sia poŝo kaj, metante ilin sur la tablon, li diris:

”Tio estas la rimedo malligi vian langon, ĉu ne?”

”La lombardisto kaptis la monon, sed restis silenta.

”Nu do,” demandis t’Serclaes, ”ĉu vi konfesas, ke vi ricevis la juvelon?”

”Aĥ, kompatu min, Sinjoro!” suspiris Niceforo. ”La amano malpermesis min je korpopuno paroli al ia ajn vivanta homo pri la grandvalora juvelo.”

”Sed mi venas de la amano. Li mem rakontis al mi la aferon kun ĉiuj cirkonstancoj, kaj de vi mi volas nur ekscii, ĉu oni diris al mi la veron. Tiurilate vi povas do esti trankvila, mastro Niceforo. Diru nun al mi senhezite: kiu estas la persono, kiu donis la juvelon al vi kiel garantiaĵon?”

”Sed vi jam scias tion, Sinjoro.”

”Estas egale. El vi buŝo mi deziras aŭdi tion.”

”Mi tremetas, mi ne kuraĝas, Sinjoro, ĉar se vi ankoraŭ ne scius tion...”

”Ĉu vi parolos? Mi ordonos al vi paroli! Diru al mi, kiu estis la garantiprintinto!”

”Aĥ, vi perfortas min, Sinjoro! La garantiprintinto estas via filo Everard!”

”Mia filo, mia filo Everard!” ripetis t’Serclaes kun raŭka gorĝosono. ”Ho, granda Dio, en kian inferan ŝnurkaptilon mi falis. Kia abomena intrigo!”

Kaj la ŝokita patro falis sur fotelon.

Niceforo, pensante, ke lia vizitanto estis svenonta, kaptis karafon kun akvo. Sed t’Serclaes reeksaltis kaj, regante sian konsternecon, diris:

”Ĉu ne estas eble, ke oni trompis vin, Niceforo? Ĉu vi konas mian filon?”

”Mi neniam vidis lin antaŭe, Sinjoro.”

”Ha!... Kaj kiuspeca viro estis la garantiprintinto? Ĉu vi bone rigardis lin?”

”Mi tenis nur malgrandan noktolampeton en la mano. Estis malmulta heleco en la ĉambro. La garantiprintinto ŝajnis al mi belaspekta juna kavaliro.”

”Lia aĝo?”

”Mi ne scias: dudek kvin, tridek aŭ tridek kvin... de altekreska staturo kun malhelaj brilaj okuloj kaj sufiĉe granda, sed beleformita nazo.”

”Malvarma timŝvito perlis sur la fronto de t’Serclaes. Ĉu tio ne estis la kompleta bildo de lia filo? En tiu skizo estis nenio kion oni ne povus apliki al la aspekto de lia fio.

”Ve, ve, kia turmento!” plendis t’Serclaes en si mem. ”Tia kruela dubo en la koro de patro! Eĉ la infero estas malpli terura! – Lia hararo, kiu estas la koloro de liaj haroj?” li kriis senesepere.

”Liajn harojn mi ne povis vidi, Sinjoro. Li estis tirinta la kapuĉon super la kapon!”

”Kaj liaj vestaĵoj? Kiel li estis vestita?”

”Tion ankaŭ mi ne povis vidi, Sinjoro. Lia tuta korpo estis kaŝita sub mantelo de ruĝa veluro...”

”Dankon, dankon, ho ĉielo!” jubilis t’Serclaes, levante la manojn. ”Li estas mia filo! Ha! Kia malpezigo por mia koro!... Lia mantelo estis ruĝa... ruĝa... ĉu ne, mastro Niceforo?”

”Jes, Sinjoro, fajre ruĝa.”

t’Serclaes ridis, liaj okuloj briletis triumfe, kaj en sia ĝojo li premis la manon de la lombardisto, dirante al li:

”Mi dankas vin, mastro Niceforo. Viaj lastaj vortoj feliĉigas min. Plu konservu la sekreton kontraŭ ĉiuj homoj, kiel ordonis la amano. Tuj kiam tiu ĉi afero estos solvita, mi malvarma rekompencos vin.”

”Sed, sed,” murmuris la lombardisto, mirigita, ”ĉu la Sinjoro ne pridemandis sian filon pri tiu afero? Li povos pli bone ol iu ajn deklari, ĉu li estis en mia domo antaŭhieraŭ aŭ ne.”

Efektive, mi estus devinta paroli unue kun li. Tio estus ŝparinta al mi multan ĉagrenon. – Nu, adiaŭ, eble vi revidos min baldaŭ. Vi devos atesti, ke la garantiprintinto portis ruĝan mantelon. Mia filo portis ekde sia infaneco nur nigrajn aŭ malhelverdajn mantelojn. Adiaŭ! Adiaŭ!”

Kaj prononcinte tiun vortojn, li forlasis la loĝejon de la lombardisto kaj iris per malpezaj paŝoj, ĝis li atingis la finon de Kattengang kaj troviĝis en la strato Eike.

Li frotis siajn manojn kaj murmuris ĝojajn vortojn al si mem, dum samtempe iam kaj iam fajreroj de kolero aŭ indigno sagis el liaj okuloj. Kian dialecan intrigon oni forĝis por puŝi lin kaj lian filon en abismon de malhonoro! Por ĵeti lin kiel obeeman sklavon antaŭ la piedojn de la amano kaj igi Sabinan malami kaj malestimigi Everard-on. Sed, laŭdato estu la Dio, ĝi ne

estis sukcesonta! Jam nun li havis la pruvon, ke alia ol lia filo donis garantie la juvelon. Tio estis gvidilo, kiu kondukos lin sendube al la spuro de la dokumentfalsinto. Nun li emis kredi, ke la amano mem estis trompita. Li igos atesti la pergamenon kontraŭ la vera kulpulo aŭ diŝsiri ĝin, kaj tiel tiu minaca malfeliĉo estis forturnita! Pensante tiamaniere li paŝis trans la vendoplacon Pongel kaj murmuris al si mem: "Ruĝa mantelo! Ruĝa, velura mantelo!" kiam subite surpriza lumo fulmis tra sia menso. Krio eskapis ellia buŝo, kaj li haltis.

"Ruĝa mantelo!" li diris, frapante sian frunton per la amano. "Sed mi jam vidis du- aŭ trifoje tian mantelon sur la ŝultroj de kapitano Goffredo. Kial mi ne memoris tion pli frue? Jen la sekreto! Efektive, kiu alia ol li estus povinta imiti la subskribon de mia filo tiel akurate? Goffredo, kiu metis sin mem kiel mesaĝiston inter Everard-on kaj Sabinan, posedis leterojn de mia filo... Nun, bedaŭrinde, la krima dokumentfalsinto estis mortinta kaj enterigita... Sed se mi kondukus la lombardiston en la ĉeeston de mia filo kaj se tiu ĉi atestus, ke li neniam antaŭe vidis mian filon? Kaj tiam la fakto de la ruĝa mantelo? Nu, nu, mia timo estas senbaza. Nun mi volas paroli kun Everard pri la afero. Li eble metos min sur la vojon al ekhavo de kompletaj pruvoj."

Kaj tiel ĉiam pripensante kaj murmurante al si mem, li supreniris la strato Berg kaj baldaŭ atingis sian domon.

De sia servisto li eksciis kun ĝojo, ke lia filo estis ankoraŭ hejme, kaj sen perdi tempon li eniris la ĉambron, kie tiu ĉi troviĝis.

Kun disetenditaj brakoj li iris al li kaj kriis tre emociita kaj kun larmoj en la okuloj:

"Kara Everard, lasu min ĉirkaŭbraki vin! Mi tiom ĝojas!"

"Efektive, patro, vi ŝajnas al mi tre feliĉal!" diris la junulo, mirigita kaj emociita pro espero. "Ĉu vi alportas bonan novaĵon? Ĉu Sabina...?"

"Ne, mia filo. Sed ekde hodiaŭ matene glavo pendas super niaj kapoj. Mi kaj vi estas minacataj per pereco kaj honto. Nun, Dio estu benata: tiu terura danĝero estas pasinta. Vi ne povos kredi, kion mi diros al vi, sed estas tamen vere. Antaŭhieraŭ oni ŝtelis grandvaloran juvelon en la domo de la amano. Oni aŭdacis akuzi vin, asertante, ke vi ŝtelis tiun objekton. Ha, ha, ha, kia stulteco, ĉu ne?"

Ambaŭ, patro kaj filo, ekridis.

"Ĉu mi, ŝteli?" mokis Everard. "Sed ili estas do malprudentaj aŭ frenezaj? Kiu do ekhavis tian absurdan ideon?"

"La ŝajno estas kontraŭ vi, mia filo: skribo-falsinto donis la ŝtelitan juvelon kiel garantiaĵon al lombardisto Niceforo, en la Kattengang, kaj sur la deklaro de la garanti-pruntinto li imitis

vian subskribon. Tiun ŝajnan pruvon posedas la amano, kaj tial li volis persekutigi vin per la justico."

"Sed ĉio ĉi estas miskompreno, patro," diris la junulo, ĉiam ankoraŭ ridetante. "Efektive estas mi, kiu donis la juvelon kiel garantiaĵon al Niceforo por cent malnovaj ŝildoj..."

"Ĉu vi, mia filo?" ekkriis t'Serclaes, pala kiel tolaĵo. "Ho, Dio mia! Kaj vi subskribis la fatalan pergamenon?"

"Jes, patro, pro amikeco al..."

Sed kun ekkrio de malespero kaj peze anhelante, la maljunulo falis sur seĝon.

"Malfeliĉulo, kion vi faris?" li suspiris. "Ni estas senhonorigitaj, perditaj por ĉiam! Ve, kial mi devis vivi ĝis tiu ĉi tago?"

Forte timigita pro la nekomprenebla emocio kaj la morta paleco de sia patro, Everard kaptis liajn manojn kaj rapide diris kun larmoj en la okuloj:

"Patro, kara patro, trankviliĝu do! Oni trompis vin. Kion mi faris, ne estas krimo: estis nur indulgemo por kapitano Goffredo, malgranda servo, kiun mi faris al li. Mi eksplikos al vi la aferon, kaj vi vidos, ke vi malprave lasas vin konsterni..."

Kaj li komencis tre detale rakonti al li, kiel Goffredo, kiu perdis multan monon dum la vesperfestoj de la amano, petis lin porti por li la juvelon kiel garantiaĵon al mastro Niceforo. La kapitano asertis, ke li mem ricevis la grandvaloran juvelon kiel parton de la rabaĵo ĉe la priabado de urbo en Fancio. Li, Everard, komence hezitis fari tion kaj eĉ ektimis, kiam la lombardisto prezentis al li la deklaron por subskribo, sed tiam li jam ne povis retiriĝi. Kio miriga estis do en la okazaĵo? Ĉu oni povus rigardi kiel krimon la fakton devigi amikon, kapitanon de la grafaj trupoj, per tiu servo?

"Konsideru, patro," li fine diris, "kion Goffredo faris por mi dum la lastaj tagoj. Ne nur li konsentis fariĝi fidela mesaĝisto inter mi kaj Sabina, sed li ankaŭ organizis renkonton inter mi kaj Sabina kaj ŝia patrino en la Nova Arbaro kaj eĉ sukcesis konvinki la amanon inviti min al ties vesperfestoj. "Kion signifis tiu portado de garantiaĵo por havigi al li monon kompare kun la servoj faritaj de Goffredo al mi? Ĉu mi povus rifuzi? Vi kapneas! Ha, vi rekonas tion, patro: sur mia loko kaj en similaj cirkonstancoj vi estus farinta la samon, ĉu ne?"

Komence t'Serclaes aŭskultis sian filon senparole kaj kun malespero en la koro, sed iom post iom li rekuraĝiĝis, kaj radio de espero prilumis sian sombran menson, konvinkita, ke lia povra filo pleje kulpis pro iu sengardaĵo. Jes, li devis rekoni al si mem, ke ĉiu estus aginta sammaniere en tiaj cirkonstancoj, ĉar kiu estus suspektinta la kapitanon pri ŝtelo?

“Sed la lombardisto diris al mi, ke la garantiaĵdoninto surhavis ruĝan mantelon,” li murmuris, pensante

“Efektive, patro,” respondis la junulo. “Mi estis sekvinta sinjorinon Van der Aa kaj Sabinan ĝis antaŭ la pordego de la amana domo. La vespera malvarmo igis min tremeti. Tial Goffredo metis sian mantelon ĉirkaŭ miajn ŝultrojn.”

“Terura dubo!” suspiris t’Serclaes. “Oni certe ne povas imputi al vi veran kulpon, mia filo, sed kia mallumo en tiu mistera afero! Ĉu vi estas la ludilo de la hazardo aŭ la viktimo de infera komploto? Ĉu Goffredo estis la helpanto de la amano, aŭ ĉu lia sola celo estis havigi al si monon per honta ŝtelo?”

“Mi ne scias, patro,” murmuris la junulo. “Turniĝas al mi la kapo pro pripensado. Estas nepenetrebla enigmo. Se la kapitano vere ŝtelis la juvelon, li certe faris tion pro blinda pasio al ludado kaj pro drinkemo... Sed, patro, kial vi estas tiel trista? Kial vi teruriĝas? Rakontu al la amano, kiel la afero okazis. Ĉar la kulpulo, kuŝante en tombo, eskapas al ĉia persekuto: la tribunalo havas neniun kiun ĝi povus puni. Ni redonos al la lombardisto siajn cent malnovajn ŝildojn, kaj ĉar la juvelo estis redonita al la amano, ĉio estas riparita.”

“Jes, jes, povu tio tiel finiĝi!” murmuris t’Serclaes, skuante la kapon. “Sed vi ne konas nian amanon, mia filo. Li estas malica, venĝema kaj falsa. Via deklaro en lia mano estas potenca armilo kontraŭ ni. Li ne donos ĝin. Ve! Kion mi povus fari, se li vere tenus tiun ŝajnan pruvon kiel glavon super mia kapo?... Kaj vi, mia povra filo, vi devus en tia kazo rezigni pri la espero de via vivo, ĉar vi sendube perdus Sabinan!”

“Granda ĉielo, patro, kion vi diras?” ekkriis la junulo, timigita. “Ĉu mi perdus Sabinan?”

“La amano povas devigi vin rezigni pri ŝia mano. Li povas igi Sabinan dubi pri via honesteco.”

“Sed tio estas neebla, patro. Via menso estas profunde ŝokita kaj konsternita. Vi vidas la aferojn tiel timige nigraj...”

“Aĥ, mi esperas, ke vi pravos, mia filo! Sed ne forgesu, ke la amano posedas la deklaron de la lombardisto subskribita per via mano. Se li ne volas kredi aŭ ŝajniĝas ne kredi tion kion vi ĵus rakontis al mi, kiel ni tiam pruvos, ke vi diris la veron? Goffredo, la kulpulo, la sola atestanto, estas mortinta... Jes, estas ankoraŭ dua atestanto: lombardisto Niceforo. Sed tiu povas nur deklari, ke vi, mia filo, donis kiel garantiaĵon la ŝtelitan juvelon kaj ricevis cent malnovajn ŝildojn por ĝi. De tie la konkludo, ke vi devas esti la ŝtelisto...”

“O, kara ĉielo, patro, vi igas min tremi!” ekkriis Everard. “Sed ne, mi timiĝas senkiale:

kiu kredus, ke via filo kapablos plenumi tian malnoblan, malestimindan faron? Ĉu ĉiuj ne scias, ke ni ambaŭ estas tro riĉaj por avidi alies monon? La amano ne estas diablo, ne estas monstro de falseco. Li estas homo kaj patro. Mi tuj iros al li kaj eksplikos al li, kio okazis. Vi vidos, ke li rekonos mian senkulpecon kaj lasos la aferon sen sekvo. Estu kuraĝa kaj konsolita. Mi revenos kun la certeco, ke vi maltrankviliĝis senkaŭze.”

“Jes, kuraĝon ni bezonas en nia malĝoja situacio,” diris t’Serclaes kun dolora suspiro. “Mi iros mem al la amano, mia filo. Mi promes tion al li. Faru la kompatema Dio, ke via espero realiĝos! Nun, restu kaj atendu kun fido mian revenon. Eble mi eraras en mia timo. Ankoraŭ hodiaŭ ni scios tion.”

Kaj prononcante tiujn vortojn, li foriĝis kaj forlasis sian domon.

Komence li paŝis sufiĉe rapide, sed apenaŭ preteririnte la monteton Sankta-Miĥaelo, lia paŝado malrapidiĝis, kaj fine li iraciis plu, la kapon klinitan sur la brusto, kvazaŭ liaj kruroj rifuzis porti lin al la loko, kie atendis lin ĉagreno, humiligo kaj honto. Li jam ne estis la fiera viro, kies okuloj fajreris pro fiereco kelkajn horojn antaŭe ĉe la penso, ke li estas aperonto antaŭ sia malamiko, la falsa landvendisto. Nun lia koro batis time, kaj la vortoj kiujn li formis pensante, estis preĝo pri kompatato. En sia menso li petegis pri graco por lia povra filo, kies feliĉeco kaj honoro tute dependis nun de la volo de la amano.

Tiel alveninte ĉe la domo de Van Heetvelde, li humile petis la serviston anonci lin ĉe sia mastro.

Same kiel la unuan fojon, li ŝajnis esti atendata, ĉar la servisto tuj kondukis lin en la salonon.

“Nu, kiun novaĵon, t’Serclaes?” demandis Van Heetvelde. “Ĉu ne estas via filo, kiu subskribis la garantiaĵdonan deklaron?”

“Ve, jes, Sinjoro Amano,” respondis t’Serclaes.

“Mi ja sciis tion. Estas granda malfeliĉo por vi, kiu tiom amas vian unikan filon.”

“Sed, Sinjoro Amano, oni tame erarigis vin, almenaŭ la ŝajno erarigis vin. Mia filo ricevis tiun juvelon de kapitano Goffredo, kaj je ties peto, li lombardigis ĝin por fari al li servon.”

“Nu, nu, kion vi diras!” murmuris Van Heetvelde kun rideto de nekredo.

“Bonvolu aŭskulti min, Sinjoro Amano. Mi detale rakontos al vi, kiel tio okazis, kaj el la detaloj vi ĉerpos la konvinkon, ke mi diras al la puran veron.”

“Sed prenu ŝegon: mi aŭskultos,” diris la amano en ofenda tono, kiu kruise tuŝis t’Serclaes-on kaj igis lin perdi ĉian esperon pri pozitiva rezultato. Li tamen kolektis siajn men-

sajn fortojn kaj ripetis vorton post vorto, kion Everard rakontis al li rilate la lombardigon de la juvelo. Ĉe la fino li petegis la amanon, kiu nun devis esti konvenkita pri la senkulpeco de lia filo, faligi la kazon kaj eĉ malhelpi, ke la malnova, renoma nomo t'Serclaes estu makulita per kalumnia suspekto.

Kun akra moko en la rigardo Van Heetvelde respondis:

“Ha! La kapitano, kiu nun jam kuŝas en la tero, ŝtelis la juvelon! Li certe ne neos tion. La ekspliko estas bone trovita.”

“Sed, Sinjoro Amano,” diris t'Serclaes, tremante pro tio, “vi do ne kredas mia deklaron? Ĉu vi vere opinias min kapabla je tia malhonesteco? Ke vi malamas min, tiel estu! Sed ke vi tiel profunde malestimus min, tio estas neebla!”

“Mi ne akuzas vin, t'Serclaes,” respondis Van Heetvelde. “Kontraŭe, mi multe kompatas vin. Ĉu patro, kiam li vidas sian filon minacatan de eterna malhonoro, jes, per hontoplena morto, ne alkroĉiĝus al la plej malgranda savtabulo? Kaj ĉu en tiu kazo mensogo ne estus legitima?”

“Dio mia, Dio mia, ĉu vi forlasas min?” ekkriis t'Serclaes, levante la manojn. “Aĥ, Sinjoro Amano, kompatu mian ĉagrenon, mian timon! Ĉu vi volas akuzi mian povran filon pri ŝtelo antaŭ la skabenbenko?”

“Ĉu mi? Certe ne, t'Serclaes. Vi eraras. Ĉu via filo kulpas aŭ ne, mi deziras nenion pli arde ol lasi morti la aferon en la plej granda sekreto. Tio dependas nur de vi.”

“Kaj kion vi postulas de mi por tio?”

“Vi ja scias: miaj kondiĉoj estas ĉiam la samaj, sed ĉar vi ŝajnas esti forgesinta ilin, mi volonte ripetos ili al vi. Tiel longe ke la Brusela popola restos trankvila, neniu aŭdos ion ajn pri la afero de la juvelo. Sed tuj kiam ia ribelo okazos, tuj kiam mi malkovros, ke vi incitas kavalirojn, burĝanojn aŭ metiistojn kontraŭ mi, mi akuzos vian filon ĉe la skabenbenko pro nokta ŝtelo kaj igos kondamni lin al la pendumilo aŭ eŝafodo!”

“Aĥ, estas daŭra torturo por mi!” suspiris t'Serclaes, larmojn en la okulojn. “Ĉu mi do devas timi, Sinjoro Amano, ke vi plenumos vian teruran minacon, tuj kiam ekestos nura disputo inter la metiistoj kaj soldatoj de la grafo?”

“Ne, tute ne. Mi scipovos distingi, ĉu temas pri grava provo de ribelo aŭ tumulto. Mian celon vi konas: malhelpi vin daŭrigi viajn intrigojn kontraŭ mi. – Vi eble kredas, ke timo igas min aranĝi ĉiujn tiujn antaŭrimedojn, kaj vi esperas, ke popola ribelo povos venki en Bruselo. Tiam mi estus via viktimo, kaj Everard liberiĝis de ĉia persekuto. Sed tio estas vana supozo. Ni ja scias, kio estas sekrete planata

de la metioj, kaj ni estas singardaj. Ĉe la plej malgranda popola movo ni por ĉiam sufokos en la sango de la kulpuloj ĉian emon ribeli. Sed ĝuste tial – por eviti verŝi sangan de regatoj de mia princo – mi volos malhelpi, ke komenciĝu ribelo, kaj cele al tio mi disponas nun pri celtrafa rimedo. La slipeto, sur kiu via filo skribis sian nomon, estas pendumŝnuro ĉirkaŭ via kolo. Mi tenas ĝian finaĵon per mia mano kaj ne ellasos ĝin ĝis post la reveno de mia indulgema senjoro, la grafo de Flandrio. Se ĝis tiam ĉio restos trankvila, mi donacos al vi tiun grandvaloran pecon de pergamento kiel rekompenco por via submetiĝo. Se male vi daŭrigos viajn sekretajn intrigojn kaj la metiistoj kaptos siajn armilojn, tiam ne ekzistos indulgemo por via filo: lia kapo ruliĝos de la eŝafodo sur la Granda Vendoplaco!... Foriru nun, t'Serclaes, vi konas miajn kondiĉojn. Se vi estos bonvola, se vi utiligos vian influon por kvietigi la popolon, tiam estu senzorga. Sed vi scias, ke mi povas pruvi nerefuteble, ke via filo ŝtelis la juvelon el mia dormoĉambro kaj ke la ekzekutisto atendas la viktimon!... Fartu bone kaj ĝis revido!...”

Duone senprudenta pro timo kaj malespero t'Serclaes estis aŭdinta la kruelan paroladon de la amano. Kun pendanta kapo, li klopodis reteni la larmofluon kiu volis ekfonti el siaj okuloj. Tute venkita kaj senkuraĝigita li retroiris sen saluto kaj ŝanceliĝante forlasis la salonon.

Van Heetvelde akompanis lin ĝis la pordo kaj postrigardis lin kun triumfanta rideto. Kiam la amano volis reiri en la salonon, li vidis tie stari lian filon Willem, kiu estis enirinta tra flankpordo.

“Nu, Willem, kion vi faras ĉi tie, kaj kial tiu malĝoja vizaĝo?” li demandis. “Oni dirus, ke timo konsternas vin.”

“Ho, patro, estu indulgema por mi!” la junulo respondis, petegante. “Mia blinda amo al Sabina igis min plenumi malbonan, temeraran faron. Mi apenaŭ kuraĝas konfesi ĝin al vi. Sed ĉar vi volas puni senkulpulon sur mia loko...”

“Sed kion vi do fuŝparolas ĉi tie, mia filo? Mi ne havas tempon nun aŭskulti viajn amplendojn. Diru per tri vortoj, kion vi havas sur la koro.”

“Patro, mi malsupreniris por peti ion de vi, kaj mi staris kun la mano sur la pordanso preta malfermi ĝin. Tiam mi subite aŭdis vin diri la nomon t'Serclaes. Mi konkludis, ke t'Serclaes estas ĉe vi. Mi aŭskultis: vi parolis pri eŝafodo kaj ekzekutisto. Timigita, mi komprenis, ke vi alparolas la maljunan t'Serclaes, minacante lin, ke vi persekutigos lian filon kiel ŝteliston de la juvelo, kiu malaperis en via dormoĉambro. Everard estas mia amivalo, kaj mi prave malamas lin, ĉar li estas la sola obstaklo al mia feliĉeco. Sed lasi lin akuzi kiel ŝtelisto, mal-

honorigi kaj kondamni lin eble al hontoplena morto, tion mi ne povas permesi. Ne, Dio punus min pro tio. La sola kulpulo estas mi, patro.”

“Ĉu vi do estas la sola kulpulo?” mokis la amano. “Kia konfuzo, kia nekomprenebla afero! Vi tamen ne volas aserti, mia filo, ke vi forprenis la juvelon el mia dormoĉambro?”

“Jes ja, patro, mi kaj neniu alia!”

“Granda ĉielo? Ĉu tio estas ebla?” ekkriis la amano, terurigita. “Malfeliĉulo, neniam diru tion al iu ajn sur la tero, aŭ vi fariĝas la kaŭzo de mia perejo... eble de mia morto!”

“Mia kara patro, pardonu min, mi petegas vin. Nur mia amo, mia amo sola...”

“Ĉi tie ne povas esti demando pri pardono aŭ amo. Silenti, silenti vi devas, aŭ mia kolero trafos vin por ĉiam! Nek vi, nek mi, nek iu alia rajtas scii, ke Everard t’Serclaes ne ŝtelis la juvelon!”

“Kaj ĉu vi igos lin kondamni, patro?” balbutis Willem?

“Ne, se vi gardos tiun sekreton, li havos nenion timenda. Se mi minacis lian patron per ŝajnigita krueleco, mi faris tion nur por malhelpi lin instigi la popolon, de Bruselo al ribelo.”

“Vi ja prave kolerus kontraŭ mi, patro. Tio kion mi aŭdacis fari, estas kulpa temerareco. Aĥ, kaj mi eble perdigis al vi la altvaloran juvelon.”

“Ba, la juvelo tute ne estas perdita, kaj ĉiaokaze mi farus al mi malmulte da zorgoj pro ĝi, mia filo,” respondis Van Heetvelde, movata de tute aliaj konsideroj. “Mi efektive devus koleri kontraŭ vi, sed ĉar vi nesciante faris al mi netakseblan servon, mi pli emas laŭdi kaj danki vin.”

“Kaj vi ne petas eksplikojn de mi, patro? Tio estas stranga.”

“Nu, jes, diru al mi, kio instigis vin forpreni la juvelon? Tamen ne monavideco, mi opinias.”

“Ne, patro. Goffredo instigis min al tiu freneza faro. Li asertis, ke la juvelo estas talismano, per kiu li povus inspiri al Sabina amon al mi.”

La junulo rakontis al sia patro, kiel li subaŭskultis Everard-on kaj Sabinan en la Nova Arbaro; kiel li, plorante pro amĉagreno kaj malespero, renkontis Goffredo, kaj ke tiu ĉi por konvinki lin forpreni la juvelon, promesis lin, ke Sabina, sub la influo de sorĉilo, ricevos nevenkeblan antipation kontraŭ Everard t’Serclaes.

“Mi kredas tion: li diris la veron!” murmuris Van Heetvelde.

“Ĉu Goffredo diris la veron?... Ĉu la juvelo donacis al mi la amon de Sabina, patro?”

Sed li ne ricevis respondon. La amano estis videble enpensigita. Liaj okuloj brilis pro ĝojo kaj admiro. Verŝajne li pensis pri tio, kion Goffredo promesis al li kaj lia filo. Jes, estis

nekompreneble, kiel la kapitano povis antaŭvidi ĉi tion. Ĉiuj liaj vortoj efektiviĝis. Ĉu la maljuna t’Serclaes, la fera kaj potenca popolgvidisto, ne kuŝis kiel sklavo ĉe liaj piedoj? Ĉu li ne estis peteginta lin per levitaj manoj kaj larmantoj okuloj pri kompato kaj favoro? Kaj ĉu Sabina, se li, Van Heetvelde, uzus la kulpigan, dokumenton, povus gardi unu plian momenton amon por iu, kies nomo kaj gento estus malhonorigita per tia hontoplena faro?

“Ha, mia filo,” li diris, vekiginte el siaj konsideroj, “kapitano Goffredo estis granda mensso, vera genio, kaj se li ankoraŭ vivus, mi certe provus konvinki nian indulgeman senjoron, la grafon de Flandrio, fari el Goffredo sian plej intiman konsilanton. Sed li estas mortinta, kaj kion posedas la tombo, ĝi neniam redonos. Willem, se vi povos silenti kaj diros nenion pri la juvelo al iu ajn, Sabina certe fariĝos via novelzino. Pacienciĝu ankoraŭ iomete. Antaŭ ol decidi pri tio, nia indulgema princo devas esti reveninta el Francio.”

Servisto aperis ĉe la enirejo de la salono kaj kriis:

“Ameestro Van Reigersvliet!”

“Ho, la armeestron mi ne rajtas atendigi, mia filo,” diris la amano, “ne forgesu, kion mi diris al vi.”

Willem rapide salutis sian patron kaj malaperis tra la flankpordo.

IX

La vesperon de la sama tago, inter la oka kaj la naŭa, t’Serclaes sidis, la kapon inter la manoj, ĉe malgranda lampo en sia dormoĉambro.

Ĉio estis trankvila en lia domo. Lia koro batadis malorde – jen malrapide, jen impete – kaj iam kaj iam malvarma tremeto kuris tra liaj membroj, laŭ tio ke alproksimiĝis la timata horo, je kiu li devis iri al la kunveno de siaj kunjurintoj por raporti al ili pri sia vizito al la amano.

Kiel li estis tenonta sin en la ĉeesto de siaj amikoj? La teruran sekreton de la ŝtelita juvelo kaj de la lombarddeklaro subskribita de sia filo li ne povis komuniki al ili. Li eĉ ne rajtis prononci vorton kiu povis supozigi la ekziston de tiaj malhonoriganta akuzo.

Kion li diros?

Sed eĉ tiu konsidero, kiel ajn ĝi aperigis malvarman ŝviton sur lia frunto, ne estis la plej doloriga.

Ĉu li estis eksplodigonta la popolan ribelon esperante, ke la venko protektos lian filon kontraŭ ĉia maljusta persekuto? Sed ve, timo

forprenis al li ĉian konfidon. La amano estis ĉiam atenta kaj singarda. Provo de ribelo estus tuj subpremita... kaj jam la morgaŭon lia senkulpa filo estus arestita. La lombarddeklaro atestus kontraŭ li: mortverdikto estus prononcita kontraŭ li. Lia bonkora nobla Everard grimpus sur la eŝafon... La ekzekutisto farus sian laboron, kaj eterna malhonoro makulus la nomon de lia gento!

Ĉe tiuj pensoj, kiuj dudekfoje denove hantadis lian menson, t'Serclaes tremetadis, kaj doloraj suspiroj eskapis el lia brusto.

Tiam li turmentis sian menson, konvinkante sin, ke la popola ribelo ne povos sukcesi, kaj ke do estos temerare kaj tro riskeme nun povi liberigi Bruselon. Sed mistera interna voĉo, kiu verŝajne eliris el lia konscienco, akuzis lin, ke li ekpensas tiajn kialojn, nur por povi oferi la liberigon de la patrio al la savo de sia filo.

Terurega situacio! Li, t'Serclaes, kiu naskis la popolan movadon kaj incitis ĝin dum monatoj, nun estis retenonta kaj estingonta ĝin en unu momento, kiam ĉio estis preta por grandega kaj decidiga provo... Kaj se la venko vere fariĝus la rekompenco de la amo al libereco de la metioj, li estus malhelpinta tiun venkon, li estus perfidinta sian patron kaj destininta siajn principojn al eterna ekzilo!

Ĉu li konus ankoraŭ unu horon da paco aŭ plezuro kun tiu ronĝanta vermo en sia konscienco?

Sed kion do fari, granda ĉielo? Ĉu liveri sian unikan filon kiel senkulpan viktimon al la malamo de la amano, vidi ruliĝi lian kapon sur la eŝafodo, malhonorigi sian memoron? Ho, tion li ne kapablas fari!... Aliflanke perfidi sian patron kaj sian dukon? Tion li ankaŭ ne povus fari.

Tiamaniere t'Serclaes floris inter du neeblecoj sur la sovaĝa maro de la dubo, kaj kiom ajn li gratis siajn tempiojn per la fingroj kaj streĉis sian penskapablon por veni al decido, li restis same tiel senkonsila.

Nun li kredis subite aŭdi brueton de paŝaj super sia kapo. Li ŝajnis ektremeti kaj rigardis supren. Sed post momenton la brueto malaperis, kaj li murmuris al si mem:

"Ankoraŭ ne en la lito! Mia povra Everard! Li estas profunde maltrankviligita pro mia konsterneco kaj timas, ke mi malsaniĝos. Tio efektive ne estus miriga... Kiel amplene li klopodis konsoli min! Li pensas, ke la amano ne povas esti sufiĉe falsa kaj malica por akuzi lin antaŭ la skabenbenko, kaj trovas mian timon troigita. Ho, se li sciis en kia situacio troviĝas lia malfeliĉa patro!... Sed kial diri tion al li? Mi ne rajtas riveli al li la sekreton de la konspirantoj, kaj per kio li povus helpi min? Per nenio. Oferante sin mem, li pelus min al terura decido... Ve, kien mi turnos min? Ne estas

eliro, ne estas espero... Kompatema Sinjoro Dio, kompatu mi en mia terurega sorto: prilumo mian konfuzan menson!"

Denove li sinkigis la kapon sur la manojn kaj tre longe fikse rigardis la plankon.

Dolĉe la pordo de la ĉambro estis malfermita, maljuna servisto eniris per mallaŭtaj paŝoj kaj diris:

"Sinjoro, vi diris al mi, ke vi volas eliri antaŭ la naŭa. Mi venas averti vin, ke jam estas la naŭa."

t'Serclaes saltleviĝis kun krieto de surprizo.

"Kie do estas mia prudento?" li suspiris. "Andries, rapide, donu mian mantelon!... Ne faru bruon. Mia filo ne rajtas scii, ke mi ankoraŭ eliras tiel malfrue."

La servisto metis la mantelon sur liajn ŝultrojn kaj akompanis lin ĝis la pordego, kiun li tre malrapide kaj singarde malfermis por eviti, ke la hinĝoj grincu.

Estis tre mallume sur la stratoj. T'Serclaes povis rapidi antaŭen sen ia timo esti ekvidata

Survoje denove ĉiaspecaj konsideroj sturmis lian menson, sed la torturanta dubo daŭris. Nur kiam li demandis sin konsternita, ĉu ne estas lia devo vid-al-vid de la patrio oferi sian filon, en la mallumo antaŭ liaj okuloj aperis eŝafodo, ekzekutisto kun levita glavo, surgenua junulo, kapo ruliĝanta en sango... Kaj tiam en sia patreca timo li eligis doloran suspiron, kaj li murmuris:

"Neniam! Neniam! La honoro kaj la vivo de mia povra filo estas pli gravaj ol necerta ŝanco pri venko. Jes, necerta ŝanco, ĉar la amano konas niajn planojn... Ho ve! Mia bona Everard surgenua sur eŝafodo! Ne, tion mi neniam permesos. Tio ne eblas..."

Tiuj vortoj signifis, ke en tiu momento li faris decidon, kvankam li mem ankoraŭ ne tute klare konsciis pri tio. Finfine li atingis la fulmuelejon de mastro Grijspeert. La pordego malfermiĝis, post kiam li flustris la signalvorton tra la spiontruo.

En la koridoro li haltis ankoraŭfoje, hezitante. Kion estis dirontaj la kunĵurintoj? Nenia respondo. Li ektremetis kaj ekpaliĝis. Jam estis malfrue, kaj ene oni devis miri pri lia longa forrestado. Halucina situacio! Sed ne estis rime-do eskapi al ĝi!

Per tremanta mano li malfermis la pordon de la magazeno. Ĝenerala krio de surprizo, riproĉa murmurado de iuj, gaja jubilado de aliaj salutis lian aperon. Konsternita, li haltis, trafite de kvardek brilajn okulojn, kiuj estis fiksitaj al li demandante kaj eble akuzante lin.

La esprimo sur ĉies vizaĝo tamen tuj ŝanĝiĝis, kiam ili rimarkis, kiel pala kaj profunde konsternita aspektis t'Serclaes. Sendube li estis eksciinta ian grandan kaj teruran sekreton. Scivolemo kaj iu nekonscia timo estingis

en tiu momento ĉiun alian senton en iliaj koroj, kaj ili kreis lokon ĉe la tablon por permesi al t'Serclaes sidiĝi en la prezidantan brakseĝon.

Hugo Clutinc proksimiĝis al li kaj premis lian manon, demandante en afabla tono:

“Sed, t'Serclaes, kio estas al vi? Vi estas tiel pala! Ĉu vi estas malsana?”

“Ĉu malsana?” balbutis t'Serclaes. “Ĉu malsana? Mi ne scias... Ne, ne, tio pasos.”

“Venu, eksidu kaj ripozu iomete antaŭ ol paroli.” Kaj Clutinc kondukis sian konsternitan amikon al la brakseĝo ĉe la mezo de la tablo.

Kelkaj momentoj ankoraŭ pasis en profunda silento. t'Serclaes videble hezitis kaj frotis al si la vizaĝon kvazaŭ por revenigi la rememoron.

Lankhals prenis la parolon kaj diris:

“Ni ĉiuj brulas pro malpacienco por ekscii, kion nia sinjoro prezidanto havas komunikenda al ni pri sia vizito al la amano. Koncerne min kaj miajn amikojn, ni forte kontraŭstaris tiun viziton, kaj ni plue asertas, ke estas danĝera decido meti nian prezidanton en rilaton kun la perfidinto de la patrio. Kiun sekreto la amano deziris malkaŝi al vi? Parolu, Sinjoro t'Serclaes!... Vi ŝajnas posteniĝi antaŭ la komunikado, kiun vi devas fari al ni, viaj amikoj, viaj kunĵurintoj! Devas do esti io terura... Dio protektu nin kontraŭ insidoj kaj perfido... Sed parolu, Sinjoro t'Serclaes!”

“Jes, parolu! Kion misteran diris al vi la amano?” kriis multaj voĉoj.

“Kion la amano diris al mi?” ripetis t'Serclaes. “Aĥ, karaj amikoj, tion mi nek povas nek rajtas malkaŝi al vi!”

Murmuroj pro malkontenteco zumis tra la ĉambro, kaj la konspirantoj rigardis unuj la aliajn mirigite en la okuloj.

“Ĉu ni ne rajtas scii tion? Kion tio signifas, ho granda ĉielo?” oni murmuris.

“Estu komplezemaj por mi, mi petas vin, amikoj,” diris t'Serclaes, petegante. Mi troviĝas en situacio, kiu inspirus kompaton al vi, se vi scius, kiel malfeliĉa mi estas.”

“Sed la sekreto! La sekreto!” oni kriadis de ĉiuj flankoj.

“La sekreto koncernas nur min persone. Ĝi ne rilatas al nia patria afero. Devo, neevitebla devo devigas min silenti. Do ne provu ekscii ion de mi, Sinjoroj, ĉar tiu sekreto estas tia, ke mi ne malkaŝus ĝin, eĉ se pro tio min minacis morto.”

Tiuj vortoj estigis ŝtormon de murmuroj, precipe en la flanko, kie sidis Pex kaj liaj amikoj. La kunveno, senluziigite en sia incitita scivolemo, laŭtvoĉe atestis sian malkontentecon.

Kliniĝante sub la pezo de sia terura ĝeno, t'Serclaes ankoraŭ provis per konfuzaj vortoj kaj ideoj, ekspliki sian konduton kaj ekskuzi

sian silenton, sed mastro Lankhals interrompis lin kaj ekkriis ŝercante:

“Nun vi vidas la sekvon de via nesingarda decido! Nia prezidanto devis iri al la amano kaj fali en la ŝnurkaptilon, kiun la perfidulo pretigis por li. Eĉ se la falsulo ne atingis alian celon ol krei malfidon inter ni, ankaŭ tio estas neriparebla malfeliĉo. Kiel do, vi sendis nian prezidanton al la amano por ekscii de li gravan sekreto. Tiu danĝera vizito okazis, kaj nun ke ni petas nian sendinton raporti, kion la perfidulo diris al li, ni ricevas la respondo: ‘Vi ne rajtas scii tion!’ Oni do traktas nin kiel infanojn, kiuj devas rezigni en sia nescieco.”

“Sed, Sinjoroj, restu do trankvilaj kaj lasu nian prezidanton paroli,” intervenis Hugo Clutinc. “La amano malkaŝis tute personan sekreto al sinjoro t'Serclaes. Kiun rajton ni havas, se tiu sekreto ne koncernas nian provon liberigi la patrion, perforte eligi ĝin el li? Mi devas konfesi, Sinjoro, ke tiu afero, kia ĝi prezentas sin, estas surpriza kaj stranga. Sed ni aŭskultu kun trankvileco la eksplikojn de sinjoro t'Serclaes. Mi estas certa, ke nenia sento de malfido longe ekzistos en tiu ĉi salono. Lia ofte provita amo al la patrio kaj la fiereco de lia koro estas por ni firmaj garantioj de lia sincereco.”

“Nu, li parolu! Ni aŭskultas!” ekkriis mastro Grijspeert.

“Mi devas silenti, silenti,” suspiris t'Serclaes.

“Do pri via vizito al la amano vi havas nenion komunikenda al ni?” moke kaj kolere demandis Lankhals. “Eĉ ne la plej malgrandan eksplikon vi ne havas donenda? Ĉu vi parolis kun la amano pri la malbela vetero aŭ pri la multekosteco de la greno? Ĉu nenia vorto estis dirita inter vi pri la situacio en Bruselo kaj Brabanto? Kaj ĉu vi opinias, ke ni povas kredi tion?”

“Mi estas malsana. Mia menso estas konsternita. Vi ne lasas al mi la tempon necesan por ordigi miajn pensojn,” plendis t'Serclaes. “Jes, la amano ankaŭ parolis al mi pri aferoj de nia lando, kaj pri tio mi povas komuniki al vi senretene, kion li diris al mi.”

“Aŭskultu! Aŭskultu!” murmuris la konspirantoj kun granda scivolemo.

“Kion mi diros al vi estas malĝojiga novaĵo, amikoj,” reprenis t'Serclaes, hezitante kaj kun videbla timego. “La amano diris al mi..., pruvis al mi, ke li scias ĉion..., ke li konas niajn planojn eksplodigi ribelon kontraŭ li, kaj ke li observas nin... Li riproĉis al mi, ke mi preparas popolan ribelon... Li diris, ke li estas informita pri ĉio, kio estas sekrete projektata de la metioj, kaj li tenas sin preta por estingi en sango la plej malgrandan provon de ribelo. Tiuj informoj, amikoj, estas tiaj, mi opinias, ke ni

devas rekoni, ke estas konsileble prokrasti nian decidan provon al pli favora momento...”

“Ha, ha, ha, nun ni scias ĉion!” ekkriis mastro Pex. “La amano kaptis nian prezidanton en siaj retoj: li timigis lin kaj forprenis al li ĉiun fidon kaj kuraĝon!”

“Se ne estas pli grave!” grumblis mastro Grijspeert duonvoĉe. “Mi sentas perfidon en la aero.”

“Nu, nu. Sinjoro t’Serclaes, kiu ĉiam instigadis nin plirapidigi nian provon, nun opinias, ke ni devas prokrasti la ribelon ĝis en malpli malfavora momento!” diris Lankhals, amare ridetante. “Kion li volas diri per ‘pli favora momento’? Ĉu li volas atendi ĝis la grafo de Flandrio revenos kun novaj, freŝaj trupoj?”

“Ne, amikoj,” respondis t’Serclaes, “nur ĝis nia duko Venceslao sendos helpon al ni el Limburgo.”

“Tiam ni prefere delasu ĉian esperon kaj akceptu pacience nian sklavecon! Ne venos pli favora momento! Ĉu vi ne jam diris al ni dudekfoje, kaj tion vi diris ankaŭ hieraŭ, ke ni ne povas atendi helpon de la duko? Se ni ne rompos niajn ligojn antaŭ ol du semajnoj estos pasintaj, ni povos forgesi la liberigon de Brabanto por ĉiam!” ekkriis la dojeno de la ĉapelfaristoj.

“Lasu min meti unu demandon al nia prezidanto,” diris Lankhals. “Kion tiel surprizan la amano komunikis al li, ke tial ni devus ŝanĝi nian solene faritan decidon? La amano supozas, ke la popolo pretigas ian ribelon. Oni raportis al li, ke regas minaca fermentado en la metioj. Sed kiu en la urbo ne scias tion? La grava demando estas, ĉu la amano estas informita pri nia konspiro kaj niaj sekretaj kunvenoj, ĉu li scias, ke ni decidis doni la signalon de la ribelo la vesperon antaŭ la festo de sankta Krispeno. Mi deziras, mi postulas, ke sinjoro t’Serclaes respondu rekte kaj sincere al ambaŭ demandoj.”

“Pri nia konspiro... pri la tago de la ribelo,” balbutis t’Serclaes, kvazaŭ li hezitus respondi. “Pri tio la amano ne parolis al mi, mi kredas... Ne, ne, pri tio li scias nenion...”

“Nu, kio do ŝanĝiĝis en nia situacio? Ni havas tiom pli da kialoj persisti ĉe nia unua decido. Niaj malamikoj ne povas supozi, ke la ribelo, kiun ili timas, eksplodos tiel baldaŭ. Ni havas do la eblecon surprizi ilin. Se ni neglektos tiun favoran okazon, ĝi neniam plu revenos, kaj ni, malkuraĝuloj, estos kondamnintaj nian patrimon al eterna sklaveco. La amano eble per ruzaj vortoj timigis nian prezidanton, sed kion tio faras al ni? Mi opinias, mi havas la profundan konvinkon, ke ni devas konservi la antaŭvesperon de la festo de sankta Krispeno kiel momenton de nia decida provo.”

“Jes, jes, la antaŭvesperon de la festo de sankta Krispeno! Tio estas decidita kaj ne plu ŝanĝiĝu!” jubilis la pli multaj el la membroj kun entuziasmo.

“Mi esperas,” reprenis mastro Lankhals kun ofenda emfazo, “ke sinjoro t’Serclaes, tute kiel ĉiu el ni, submetos sin al la volo de la plimulto kaj kun ĉiuj siaj fortoj kaj laboremo helpos nin plenumi nian decidon.”

“Ve, mi ne povas, mi ne rajtas!” suspiris t’Serclaes.

“Kion ni aŭdas?” ekkriis mastro Grijspeert. “Kaj vian ĵuron vi volas rompi?”

“Mi devas rifuzi mian kunlaboron. Nevenkebla forto regas min. Aĥ, miaj amikoj, kompatu min en mia terura situacio!” diris t’Serclaes, petegante.

“Sed kion do signifas via nekomprenebla konduto?” ekkriis Lankhals, frapante sur la tablon. “Ĉu eble vi volas kontraŭagi nin? Ĉu perfidi nin? Granda ĉielo! Ĉu la amano sorĉis vin? Vi, kiu konas ĉiujn niajn sekretojn, estus nia perfidanto? Ne eblas, sed tamen...”

Ĝis tiam t’Serclaes sidis tie kvazaŭ kulpulo antaŭ siaj juĝistoj. Lia ronĝanta konscienco diris al li, ke li estas vere oferanta la liberigon de sia lando al persona avantaĝo. Sed lia timigita patra koro kriis ankoraŭ pli laŭte, ke li devas savi sian filon de hontoplena morto. Tiu interna lukto – unuflanke honto kaj pento, aliflanke timo kaj ĉagreno – forprenis al li ĉiun lian kuraĝon kaj mensan klarecon. Sed la vorto ‘perfidanto’, kiu traboris sian koron kiel arda aleno, igis lin kun ŝajno de kuraĝo aŭ indigno levi la kapon.

“Kiel kruelaj vi do estas por mi!” li diris. “Ĉu mi perfidanto de mia patrio? Vi scias, ke mi donus ĝis la lasta guto de mia sango por helpi liberigi Brabanton!”

“Sed ni ne petas tiom de vi,” rimarkis Pex, “nur vian sinceran kunlaboron.”

“Ek, t’Serclaes, mia amiko, estu pli prudenta,” diris al li Hugo Clutinc. “Ne rifuzu al ni vian helpon.”

“Sed mi devas rifuzi.”

“Kial do?”

“Donu al ni klarajn kialojn! Se vi kredas pravi, provu persvadi nin partumante vian opinion kun ni,” intervenis ledoprilaboristo, kiu ĝis tiam blinde konfidis t’Serclaes. “Vi, ĉiam tiel elokventa, ŝajnas nun posteniĝi antaŭ ĉia eksplikoj. Estas ne kompreneble.”

“Mi klarigis al vi miajn kialojn,” respondis t’Serclaes. “La amano estas informita pri niaj planoj. Mi opinias, ke la ribelo ne povos sukcesi nun.”

“Sed la pruvoj?” ekkriis Lankhals. “La amano diris nenion kion ni ne jam sciis... Vi silentas, t’Serclaes? Ha, li malkaŝis al vi sekreton, al vi persone, kiu neniel rilatas al nia patria afero!”

Sed ĉu ni ĉiuj ne vidas klare, ke sola tiu sekreto malhelpas vin paroli. Ke ĝi – se ĝi jam ne faris el vi perfidinton – igas vin agi kiel perfidanto?... Vi rifuzas al ni vian kunlaboron kaj do rompas vian ĵuron. Ĝis kie vi volas persisti en via malfideleco? Respondu min: ĉu vi kontraŭagos nin? Ĉu ni devos timi, ke vi rivelos nian sekreton?”

“Mi restos neaktiva, ĉar nevenkebla leĝo devigas min al tio,” murmuris t’Serclaes. “Nian sekreton mi gardos fermita en mia koro kiel en tombo... Sed, amikoj, mi petas vin, mi petegas vin, prokrastu do la ribelon! Tiu provo, se ĝi okazos la antaŭvesperon de la festo de sankta Krispeno, estos por mi... Ho, Dio mia, mi ne rajtas paroli! La sekreto, kiun la amanon konfidis al mi, devigas min al senlaboreco kaj samtempe devigas min peti vin prokrasti vian provon. Aĥ, faru tion pro kompato al mi... Ĉu vi rifuzas? Se vi scius tiun teruran sekreton!”

“Nu, malkaŝu ĝin al ni. Ĉu ni ne estas viaj amikoj? Donu al ni kialon, por ke ni povu juĝi.”

“Tio ne eblas! Tio ne eblas!” suspiris t’Serclaes, ŝrumpante en sia brakseĝo, elĉerpita kaj frakasita.

Lankhals kaj liaj amikoj – al kiuj nun aliĝis multaj aliaj antaŭe tre moderaj membroj – kunigis momenton la kapojn, interŝanĝante kolerajn vortojn. Ili ŝajnis alveni al rapida decido, ĉar Lankhals en solena tono prenis la parolon kaj diris:

“Tiu ĉi malfeliĉiga disputo devas finiĝi, Sinjoroj. Nia tempo estas tro kara por malŝpari ĝin tiamaniere. En la nomo de multaj el ni mi demandas al la kunveno: ĉu iu opinias, ke ni devas prokrasti la ribelon al nedifinita tempo?... Jes, t’Serclaes, vian opinion ni jam konas, sed tiun de la aliaj! Tiuj el vi kiuj volas konservi nian unuan decidon, leviĝu!”

Sola t’Serclaes restis sidanta. Estis strange, ke la vortoj de la amano, kiujn li transdonis, konvinkis ĉiujn, eĉ la malplej fervorajn, ke oni devos rapidi, kaj ke ĉia prokrasto estos fatala por la patrio.

“Do,” reprenis Lankhals, “ni estas unuanimaj en nia opinio, ke nia decida provo restos fiksita je la antaŭvespero de la festo de sankta Krispeno. Sinjoro t’Serclaes rifuzas al ni sian kunlaboron. Estu tiel! Sed ni povos sukcesi sen lia helpo, se li gardos niajn sekretojn. Nun ni devos diligente labori por sekurigi la sukceson de nia entrepreno. Sendube t’Serclaes mem sentas, ke li povas resti nek nia prezidanto nek nia komandanto. Mi proponas, ke ni procedu al la elekto de tri membroj, kiuj ricevos plenan potencan decidon pri ĉio dum nia foresto. Elektu, mi petas vin, prudentajn kaj kuraĝajn virojn, kapablajn plenumi la malfacilan taskon, kiun vi metos sur iliajn ŝultrojn.”

Multaj nomoj estis vokataj ĉiuflanke, precipe tiujn de la plej fervoraj membroj, kaj kiam oni fine povis klare distingi la volon de la kunveno, aperis Lankhals, Pex kaj Grijspeert, kiuj estis nomumitaj plenpotenculoj. Nur unu voĉo, tiu de sinjoro Clutinc, prononcis la nomon t’Serclaes, sed tio kaŭzis nur mokajn ridojn.

t’Serclaes rigardis tion ĉi enprofundiĝinte en pensojn kaj kun stultiĝinta rigardo, kiel iu kiu ne scias, kio okazas. Ĉu tiu ĉi mokridado estis nova piko tra sia koro, kies terura doloro rekonsciigis lin de lia situacio? Ĉiaokaze li leviĝis kaj diris:

“Sinjoroj, ne estas eble por mi resti ĉi tie pli longe. Viaj suspektoj kruele torturas min. Mankas al mi la forto pruvi al vi, ke vi devas prokrasti la planitan ribelon. Mi estas konvinkita, jes firme konvinkita, ke via provo malsukcesos. Ĉu vi ne posteniĝas antaŭ tia neutila sangoversado? Ĉu vi ne timiĝas ĉe la penso, ke per tiu antaŭtempa popolmovado vi malebligis la liberigon de Brabanto por ĉiam? Aĥ, mi petegas vin, trankvile interkonsiliĝi pri tio dum mia foresto! Mi ankoraŭ ne perdis ĉian esperon je via singardemo.”

Neniu repondis. La samaj mokantaj vizaĝoj grimacis al li.

Hugo Clutinc proksimiĝis al li kaj oferis al li akompani lin hejmen, ĉar li aspektis tre konsternita kaj malsaneta. Sed t’Serclaes diris, ke li ne bezonas lian afablan helpon kaj ke li preferas hejmeniĝi tute sola.

Murmurante konfuzan saluton kaj ŝanceliĝante, li forlasis la loĝejon de mastro Grijspeert. Sed tuj kiam la pordego fermiĝis post li, li plirapidigis sian paŝojn kaj iris tra la mallumaj stratoj kiel iu kiu sentas sin persekutata aŭ provas eskapi al granda danĝero.

Iom post iom li malrapidigis sian iradon. Li suspiradis, murmuradis plendojn, alvokadis la nomon de la Sinjoro kaj pluen iradis kiel ebrulo. La malfeliĉulo verŝis armaraĵajn larmojn en la mallumo.

Tiel li atingis sian domon kaj mallaŭte frapis sur la pordegon. La maljuna servisto, kiu maldormis malantaŭ ĝi, malfermis ĝin kaj diris:

“Sinjoro, via filo Everard sidas en via dormoĉambro, atendante vian revenon.”

“Kara ĉielo!” suspiris t’Serclaes, timigita. “Ĉu li do scias, ke mi eliris?”

“Li venis malsupren, Sinjoro, tuj post kiam vi forlasis la domon. Li asertis, ke li aŭdis, kiel oni malfermis la pordegon. Kiel ajn mi neis tion, li ne volis kredi min kaj eniris vian dormoĉambron por certigi sin, ke vi ne kuŝas sur la lito. Ne trovante vin, li eligis krion de timo kaj falis sur seĝon. Kio timigis lin, mi ne povis kompreni el liaj plendoj. Li ŝajnis kredi, ke grava danĝero minacas vin, ĉar li sangultis kaj

daŭre ripetis: 'Ho, Dio, protektu mian malfeliĉan patron'. Li ne volis forlasi vian dormoĉambron kaj ankoraŭ ĉiam sidas tie."

T'Serclaes interrompis la eksplikon de sia servisto per nenia vorto.

"Kia fremda konduto," flustris t'Serclaes al si mem.

"Mi dankas vin, Andries," li diris al la servisto. "Iru dormi. Mi ne plu bezonas viajn servojn hodiaŭ."

Kaj prononcante tiujn vortojn, li eniris la domon. Li direktis sin al sia dormoĉambro kaj malfermis ties perdon. Everard venis renkonte al li kun etenditaj brakoj kaj ĝoje kriis:

"Ha, dankon al Dio, ke estas vi, patro! Aĥ, kiel mi timis pro vi."

Li volis ĉirkaŭbraki sian patron, sed vidante la palecon de lia vizaĝo kaj la ruĝajn randojn ĉirkaŭ liaj okuloj, kiuj montris ankoraŭ spurojn de verŝitaj larmoj, li retenis sin. Li kaptis lian manon kaj suspiris:

"Patro, kien vi iris tiel malfrue en la nokto? Vi estas malsana, vi ploris! Kiel malfeliĉa vi devas esti!"

"Jes, mia filo," respondis t'Serclaes. "Mi estas mizera, hontoplena, malespera, frakasita sub la pezo de kruela sorto."

"Venu, patro, sidiĝu sur tiun ĉi seĝon... Tiel, kaj ripozu iomete... Ĉu timo pro la maliceco de la amano igas vin tiom suferi?"

"Tiu timo kaj ankoraŭ pli teruraj aferoj... Mia koro estas plena ĝisrompe, sed tamen mi ne povas paroli. Eĉ ĉe vi, mia bona filo, mi povas serĉi nek konsolon nek konsilon. Tiu situacio estas neeltenebla: la plej forta viro subfalus tute kiel mi. Sidiĝu tie apud mi kaj aŭskultu trankvile. Mi tuj rivelos al vi la sekreton de mia timo, honto kaj malespero. Tiel konfidante al vi parton de mia doloro, mi trovos eble iomete da malpeziĝo."

Forte emociita per la dolorplena tono de la patra voĉo, la junulo silentante sidiĝis antaŭ lin.

"Everard," diris t'Serclaes, "kion mi tuj komunikos al vi, estas sekreto, kiun mi ĵuris gardi. Konfidinte ĝin al vi, mia filo, mi nur rompus mian ĵuron, se ĝi eskapus al viaj lipoj. Promesu do al mi pro via amo al mi, ke vi neniam perfidos ĝin, nek libervole, nek pro nesin-gardeco."

"Mi promesas tion, patro," murmuris la junulo. "Via sekreto estas sekura ĉe mi."

"Nu do, aŭskultu. Mi jam rakontis al vi, ke la amano minacis min per tio, ke li arestigis kaj kondamnis vin, se la popolo ribelus kontraŭ li. Prijuĝu nun mian timon: jam estis decidite, ke post kelkaj tagoj eksplodos ĝenerala ribelo de la metioj. Mi vere estas, kiel la amano suspektas, la animo kaj la iniciatinto de tiu provo liberigi Brabanton kaj redoni al nia dukino Johana ŝian kronon. Sed ĉu timo

obskurigis mian juĝon, ĉu mia patra amo al vi igis min vidi la aferojn pli klare, mi ekhavis la dolorigan konvinkon, ke ni ne estas sufiĉe fortaj por entrepreni la ribelon kun ia ŝanco de sukceso. Per la ribelo mi donus al la amano la okazon plenumi sian minacon! Ho, Everard, mi jam vidis vin kondamnita kiel ŝtelisto, genuanta sur la eŝafodo... kaj la glavo de la ekzekutisto fulmanta super via kapo!"

"Mia povra patro!" suspiris Everard. "Kion mi faris al vi?"

"Nu, sciu, ke mi formis sekretan ĵurasocion kun dudeko da doĵenoj de la metioj kaj aliaj fervoraj patriamantaj amikoj por prepari la liberigon de nia patrio. Antaŭhieraŭ dum nokta kunveno ni decidis, ke la signalon de ĝenerala ribelo estos donita la vesperon antaŭ la festo de Sankta Krispeno, je la deka horo per sonorigo de ĉiuj sonoriloj, do ene de ok tagoj. Tiam mi ricevis leteron de la amano, en kiu la perfidulo invitis min viziti lin por aŭdi de li gravan sekreton. La kunveno ordonis al mi doni sekvon al tiu surpriza invito. Vi scias kian teruran sekreton la amano komunikis al mi, kaj kiel li ĵuris aperigi vin kiel ŝteliston antaŭ la skabenbenkon, tuj kiam la publika ordo en Bruselo estos restarigita. Ĉi-vespere okazis nova kunveno de la kunjurintoj, kaj mi devis raporti al ili pri mia konversacio kun la amano. La veran sekreton – la malhonoran suspekton pri ŝtelo kontraŭ vi – konfirmite per via deklaro, mi ne povis riveli al ili. Ili estis obstinaj kaj perfortemaj en sia amo al la patrio. Timo pro perfido faris ilis malfidaj... Kion do mi estus povinta diri al ili? Kaj mi ankaŭ devis konsili al ili prokrasti la ribelon por nedifinita tempo, kun la risko vidi la grafon de Flandrio reveni, kaj do por ĉiam rezigni pri ĉia espero je liberigo... Tion mi faris... kaj mia koro ankoraŭ sangadas! Everard, mia filo, kiom mi suferis kaj hontis: ili kovris min per insultaj akuzoj. Mi vidis brili la okulojn de miaj amikoj pro indigno. Per mokridado ili akceptis mian petegadon... La abomena vorto 'perfidanto' sonis en miaj oreloj kaj traboris kiel aleno mian koron."

Larmoj fluis sur liaj vangoj, la kapo sinkis sur lian bruston.

"Perfidanto oni nomis vin, perfidanto!" ekkriis la junulo. "Granda Dio, nun mi komprenas vian mortigan doloron, mia povra patro."

Liaj malbrilaj okuloj kaj tremantaj lipoj atestis pri lia emocio.

"Ne, vi troigas la sencon de miaj malĝojaj vortoj," reprenis t'Serclaes. "Ili ankoraŭ ne nomis min perfidanto, sed ili diris, ke, se mi estus perfidanto, mi ne agus alie. Tiun ofendon mi estus pacience elteninta, se nur la timo de via malhonorigo kaj via hontoplenta morto ne tiom regis min... Sed, ili ne volis aŭskulti min malgraŭ miaj petegoj kaj denove decidis, ke ili

komencos la ribelon kontraŭ la amano la antaŭvesperon de la festo de sankta Krispeno kaj tiel kondamnis vin. Nun ke mi ne plu rajtas kunlabori kun ili, estas certe, ke estiĝos malkonkordo en iliaj vicoj, ĉar la membroj de la gentoj rifuzos sian subtenon. Aĥ, ne estas espero, ke ili sukcesos! Estas terura situacio!... Eble mi estas perfidanto, sed tamen mi ne povas ne savi mian infanon! Ni jes estas tre malfeliĉaj, mia povra Everard!”

La junulo restis silenta kaj ŝajnis enprofundiĝinta en pensojn. Subite li levis la kapon kaj diris kun brilo de fajro en sia siaj okuloj:

“Patro, vi scias, ke mi amas, respektas kaj admiras vin. Ĉu mi povas paroli libere, sen voli malĝojigi aŭ ofendi vin?”

“Parolu, mia filo. Aŭdu vian voĉon estas konsolo por vmi.”

“Nu, patro, mia konvinko estas, ke vi eraras. Viaj amikoj pravas...”

“Ĉu ili pravas?” ekkriis t’Serclaes, mirigita.

“Lasu min klarigi mian opinion, mi petas, patro. Via amo al mi, via timo pro mia vivo kaj honoro mallumigis en vi vian devosenton. Vi incitis la kuraĝon kaj la venĝemon de la metioj kaj preparis ĉion al grandega popola ribelo. La tago estas fiksita, ĉiuj koroj batas pro espero kaj batalemo, kaj tuj antaŭ la momento en kiu la liberigo de la patrio realiĝos, vi, t’Serclaes, la fervora defendanto de la Brabanta princino, provas rompi la kuraĝon kaj decidemon de viaj amikoj kaj diras al ili: metu la manojn sur la genuojn kaj volonte klinu vin sub la jugo de sklaveco. Certe, tio estas eraro. Via patra amo konsternis kaj konfuzis vian menson. Refariĝu vi mem, rekonu vian devon.”

“Kion mi do devis fari?” balbutis t’Serclaes.

“Ho, patro, la penso, ke la amano povos malhonorigi nian nomon kaj eble mortigi min sur la eŝafodo, igis vin forgesi vian devon al la patrio. Sed la sorto kiun vi preparas al mi, estas multe pli grava malhonoro: la ekzisto de malkuraĝulo. Kiel do? Mi estus la kaŭzo de la sklaveco de Brabanto, la kaŭzo de la eterna ekzilo de nia malfeliĉa dukino... Kaj kun tiu pezo sur miaj ŝultroj, mi devus vivi? Ne, ne mi preferas la morton al tia vivo!”

“Vi pensas do, mia filo, ke mi devas senhezite lasi vin grimpi sur la eŝafodon?” murmuris t’Serclaes kun dolora ŝerco. “Ha, vi ne scias, kio estas patra koro.”

“Sed ne, patro,” respondis la junulo, fortigita kaj entuziasmigita per siaj propraj vortoj, “ekzistas alia kaj certa rimedo por eskapi al la eŝafodo. Aŭskultu min kun indulgemo: mi diros al vi, kion mi povas fari por liberigi vin de tiu timo, kiu senpovigas vin, kaj kion vi devas fari por resti fidela al via ĵuro kaj plenumi vian devon kontraŭ la dukino kaj nia lando. Morgaŭ

mi forlasos la urbon kaj iros al Maastricht, al nia dukino...”

“Sed la amano kondamnis vin!” surpris t’Serclaes.

“Ne, Dio protektos Brabanton: la popolo venkos!... Kaj krom tio, ne gravas, ke oni maljuste kondamnos min. Tie for mi informos nian dukinon pri la krimaj intrigoj, kiujn la falsa vendinto de Brabanto kombinis kontraŭ mi. Kio ajn okazos, iam la humiligo de Brabanto finiĝos. Tiam mi revenos kun niaj gedukoj, kaj anstataŭ esti malhonorigita en iliaj okuloj, ili honorigos kaj amos min pro tio kion mi suferis pro ili kaj kion vi, patro, estos farinta por ili. Kun respekto mi kuraĝas diri al vi: jen via devo. Jam morgaŭ vi iru viziti ĉiujn viajn kunĵurantojn. Konvinku ilin, ke vi ankoraŭ ĉiam same fervore amas la patrion, kaj certigu ilin de via senlima kunlaboro al la preparo de la granda tago. Kuraĝigu ĉiujn al fido kaj energion. En unu vorto, refariĝu t’Serclaes, la sentima, fiera t’Serclaes por vi mem kaj por la aliaj. Ili aplaudos vin kun ĝojo, ili dankos vin kaj honoros vin kiel antaŭe... Kaj se la popolo venkos – kiel mi kredas – via nomo estos skribita en la kronikoj kiel tiu de la liberigonto de la patrio, ĉar se Bruselo deskuos de si la fremdan jugon, la tuta Brabanto liberigos sin.”

Senvorte t’Serclaes metis la brakojn ĉirkaŭ la ŝultroj de Everard kaj kisis lin plorante. Sed la larmoj, kiujn li nun verŝis, estis larmoj de ĝojo kaj admiro. Efektive, la kuraĝaj vortoj de lia filo redonis al li liajn kutimajn kuraĝon kaj fidon.

“Dankon, dankon, Everard,” li murmuris. “Via patro estis sinkinta en senfundan abismon de ĉagreno kaj honto: vi iris lin el ĝi, montrante al li brilan lumon. Saĝeco parolis tra via buŝo. Jes, jes, mia filo, mi refariĝos t’Serclaes, digna je tia filo, kia vi estas, preta verŝi mian sangon por Brabanto. Ha, ha, ha, ni venkos! Kaj se ni devos morti, la historio menciu, ke ni falis virece pro la honoro kaj la libereco de nia lando!”

“Do, patro, vi aprobas mian decidon? Mi foriros morgaŭ.”

“Jes, antaŭ la tagiĝo mi ellitiĝos kaj sendos Andries-on antaŭen kun niaj du plej bonajn ĉevaloj. Vi foriros iomete pli malfrue kaj eliros tra la pordego Warmoes, kvazaŭ vi volus promeni tra la kampoj. Tiel vi atingos tra kelkaj nerektaj vojoj la grandan vojon al Loveno. Paŝu pluen ĝis sur la turnirkampo. Tie en la Gouden Leeuw vi trovos nian fidelan Andries-on kun la ĉevaloj... Estas mirakla la klareco en mia menso!... Sed eble vi scias ion pli bonan. Ĉu vi ne aprobas mian planon? Kial vi skuas la kapon, filo?”

“Estas vere, patro,” respondis la junulo, enpensiĝinta, “ke mi pensas pri Sabina. Forlasi ŝin tiel sen saluto, sen adiaŭo! Kaj se la amano

akuzus min antaŭ ŝi kaj montrus al ŝi la garantiajdonan deklaron? Ŝi eble dubus pri mia honesteco kaj malestimus min.”

“Ne timu pro tio, Everard. Sabina tro bone konas vin por fari ion tian.”

“Jes, patro, sed estus kruela miaflanke tia maniere elprovi la koron de Sabina. La forto de la homo ne estas senlima. Se ŝi eksciis, ke mi fuĝis sen adiaŭi ŝin, sen la plej malgranda averto... kiel vera kulpulo... Ne, ne, mi neniam permesos, ke tio okazu. Morgaŭ, antaŭ ol foriri, mi provos vidi Sabinan. Mi subaĉetos la servistojn per mono, se necese per multa mono, aŭ mi perforte penetros en la domon.”

“Sed se la amano aŭdus pri tio, li tuj kaptigus vin!”

“Certe ne, patro. Mi komprenas liajn interreson kaj rezonadon. Kontraŭe li volas teni la minacon de mia aresto kaj glavon super via kapo. Se li kaptus min, vi indulgus nenion plu kaj eĉ plirapidigus la ribelon por liberigi min el la malliberejo. Li scias tion kaj ne estas tiel stulta frakasi la ilon de sia imagata potenco.”

Tiel estu, mia filo, ĉar vi deziras tion. Adiaŭu Sabinan, se vi sukcesos vidi ŝin. Ĉu vi volas paroli al ŝi pri la ŝtelita juvelo kaj la subskribita garantiajdona deklaro? Faru tion singarde kaj diru neniun vorton kiu povus igi ŝin suspekti la sekreton de nia konspiro. Memoru, ke vi devas gardi tiun sekreton kontraŭ iu ajn persono.”

“Pri tio mi diros nenian vorton al ŝi, patro. Estu trankvila pri tio: granda amo ardas ja en mia koro, sed ĝi ne povos forgesigi al mi mian devon kontraŭ mia patro kaj mia patrio.”

“Jam estas tre malfrue,” diris t’Serclaes, “mi ja estas nun konsolita kaj ĝoja, sed la teruraj emocioj de tiu ĉi tago multe lacigis min. Mi devas ellitiĝi frue. Morgaŭ ni plu parolos pri via foriro. Lasu min ankoraŭfoje ĉirkaŭbraki kaj beni vin, mia bona kaj nobla filo, kaj tiam ni iru dormi.”

Ili arde premis sin reciproke inter la brakoj, kaj Everard forlasis la dormoĉambro de sia patro.

X

En la strato Stooft, proksime al la angulo de la strato Volders, inter la humilaj dometoj de la metiistoj kaj butikistoj, staris la imponaj turoj kaj krenelita fasado de firma kastelo. Sendube tiu ĉi konstruaĵo devis ricevi sian lumon de granda malantaŭa ĝardeno, ĉar je la stratflanko ĝi montris nur tri aŭ kvar malgrandajn fenestrojn je granda alteco, kiuj estis protektataj per feraj stangoj. Ankaŭ ĝia pordego estis

tiom kovrita per feraj latoj kaj dikkapaj najloj, ke ĝi aspektis kiel giganta ŝildo.

Sur tiun ĉi pordegon frapis Everard t’Serclaes iomete antaŭ la oka matene. Li estus preferinta veni pli frue, sed la necerteco, ĉu Sabina jam ellitiĝis aŭ ne, retenis lin. Li estis iomete maltrankvila kaj skuis dubante la kapon, dum li atendis, ke oni malfermis al li la pordegon.

Jam dudekfoje ekde unu monato li frapis sur tiun ĉi pordegon sen ricevi alian ol rifuzan respondon. Kial oni akceptus lin nun? Ĉu denove per la samaj kalkulitaj mensogoj? Sed estis necese, ke li vidu Sabinan kaj parolu kun ŝi nun, kiom ajn tio kostos. Uzi perforton, renversi la servistojn kaj penetri en la kastelon estis tre danĝera metodo, sed se li ne povus sukcesi alimaniere, li provus uzi perforton.

Li aŭdis la rigligon grinci kaj tenis sin preta.

La pordego estis singarde kaj nur duone malfermita, sed antaŭ ol la servisto povis preventi tion, Everard staris interne. La servisto rigardis lin mirigita kaj kolera, dirante sen atendi demandon:

“Sinjoro t’Serclaes, vi denove venas vane: sinjorino Van der Aa ne estas hejme, kaj ankaŭ ne la fraŭlino. Miaj mastrinoj kaj la sinjoro amano malpermesis, ke iu, kiu ajn li estas, estu enlasita tra la pordego de la kastelo. Oni punos min...”

“Ho, estu honesta ĉi-foje, mi petas,” interrompis lin Everard. “Viaj mastrinoj estas en la kastelo.”

“Certe ne. Hieraŭ matene ili foriris sur vagono. Kien, tion vi ne rajtas scii. Foriru nun, Sinjoro, mi havas urĝan laboron farendi.”

“Aŭskultu min,” diris Everard. “Mi alportas al sinjorino Van der Aa tre gravan mesaĝon, de kiu povus dependi ŝia feliĉeco. Se vi malhelpos min iri al ŝi, vi sendube fariĝos la kaŭzo de granda katastrofo”

“Nu, nu, grava mesaĝo! Vi certe volas superuzi min, Sinjoro.”

“Se vi anoncos min, ŝi certe donos al vi malavaran rekompencan kaj ankaŭ mi... Jen nur malgranda donaco kiel antaŭpago...”

Dirante tion, li metis tri malnovajn ŝildojn en la manon de la servisto. Mirigita, tiu ĉi rigardis la brilajn orajn monerojn kaj murmuris:

“Tio kion vi havas komunikenda al sinjorino Van der Aa, certe povus esti grava, Sinjoro... Sed kredu min, mi diris la veron: miaj mastrinoj ne estas hejme.”

“Ho ve, ili amare bedaŭrus, se mi ne povus paroli al ili hodiaŭ! Pro ilia feliĉeco mi petegas vin diri al mi, kie ili troviĝas! Mi nepre devas paroli al ili nun... Jen tri pliaj malnovaj ŝildoj!”

“Aŭskultu, Sinjoro,” flustris la servisto en lian oreilon, “sed neniu iam eksciis, de kiu vi scias

tion: miaj mastrinoj iris al la meso en la preĝejo de la Fratulinoj de Nia Sinjorino en la strato Eike. Agu kvazaŭ vi scius nenion, Promenu en tiu direkto: tiel vi certe renkontos ilin.”

“Estas bone, mi dankas vin.”

Kaj la junulo rapide forlasis la kastelon. Li paŝis tra la strato Stoof kaj turniĝis ĉirkaŭ la angulo de la strato Eike. Lia rigardo ĝuste trafis la grandan monaĥejon de la Fratulinoj de Nia Sinjorino, en la momento kiam la homamaso komencis elflui ĝin. Li haltis kaj rigardis.

La plej multaj kredantoj jam malaperis en diversaj direktoj, kaj li jam komencis timi, ke la servisto trompis lin, kiam li fine vidis alveni el la preĝejo sinjorinon Van der Aa kaj ŝian filinon, sekvatajn de geservistoj.

Sabina ridetis al li per okuloj radiantaj pro ĝoja surprizo kaj amo. Ŝia patrino kontraŭe rigardis lin per severa riproĉa rigardo, sed li senhezite proksimiĝis al ili, kliniĝis, rapide salutis ilin kaj diris sufiĉe mallaŭte, por ke la geservistoj ne aŭdu lin:

“Sinjorino, mi nepre devas tuj paroli al vi.”

“Ho, Sinjoro t’Serclaes, vi agas nesingarde kaj tro aŭdace,” li ricevis kiel respondo. “Vi forgesas viajn promesojn. Kial tiel inciti la amanon al kolero? Estu prudenta: lasu nin preteriri kaj daŭrigi nian vojiron...”

“Terura sorto, Sinjorino, devigas min malobei. Aŭskultu min do dum momento. Mi havas teruran sekreton malkaŝenda al vi.”

“Ĉu teruran sekreton? Granda ĉielo!” suspiris Sabina.

“Nu, mi aŭskultas,” diris sinjorino Van der Aa. “Rapidu, per kelkaj vortoj. Jam tro longe vi devigas nin halti. La geservistoj spionas nin...”

“Ĉi tie sur la strato mi ne povas paroli, Sinjorino. Lasu min sekvi sin en vian kastelon.”

“Ĉu en nian kastelon? Neeble! Neeble!”

“Estas tamen necese,” flustris Everard, decidema. “Mi baldaŭ foriros, mi devas fuĝi el miaj gepatra urbo kaj patrio. Malhonoro, eterna honto kaj eĉ morto minacas min! Kiu scias, ĉu mi iam revidos vin! Sabina kaj vi, Sinjorino, devas koni la kaŭzon de mia fuĝo. Almenaŭ en viaj okuloj mi ne volas esti senhonorigita.”

Kvankam profunda timo legeblis sur ŝia vizaĝo, la nobelino ankoraŭ hezitis. Sabina kunfaldis la manojn kaj petegis ŝin kun larmoj en la okuloj:

“Ho panjo, konsentu, mi petas vin. Ne lasu timon pro kolero de la amano retenigi vin. Everard devas fuĝi, minacata per morto! Ho, Dio, tio estas neeble!”

“Tiel estu, Sinjoro t’Serclaes, akompanu nin al nia kastelo,” murmuris sinjorino van der Aa, “kaj konfidu al ni tiun teruran sekreton. Aĥ, vi igas min tremi! Sabina, mia infano, al vi ne estas permesite havi feliĉan vivon!”

Ili ekpaŝis antaŭen sur la stato, ne plu interparolante. Kontraŭe la geservistoj kiuj sekvis siajn mastrinojn je mallonga distanco, vikle babiladis inter si.

“Jes, jes, estas sinjoro t’Serclaes,” diris la servisto. “Mi bone konas lin. Li jam ofte venis frapi sur nia pordego. Ke ni devas tiel zorge teni fermita la kastelon, estas nur por malhelpi lin renkonti fraŭlinon Sabina. Kiel koleros la sinjoro amano, kiam li ekscios tiun ĉi okazaĵon!”

“Sed li ne ekscios ĝin, Michiel.”

“Ne ekscios ĝin, Katelijne? Tuj kiam mi povos, mi forkuros kaj anoncos al li, kio okazis.”

“Fi, fi, tiamaniere ĉagreni nian povran fraŭlinon! Vi devus honti!”

“Mi scias, je kiuj kondiĉoj la amano metis min en la servon de sinjorino Van der Aa. Devo estas devo. Sed ĉu miaj okuloj ne trompas min? Ĉu sinjoro t’Serclaes eniris nian domon? Ho, se la amano ekscius tion!”

Je la granda miro de la geservistoj Everard efektive sekvis la nobelinojn tra la longa koridoro de la kastelo kaj eniris salonon kun ili. La pordo estis fermita de la interno.

“Parolu, Everard, parolu, mi petas vin!” ekkriis Sabina. “Kial vi devas fuĝi el la patrio? Aĥ, mi svenas pro ĉagreno kaj timo!”

“Jes, rapide rivelu al ni tiun malĝojigan sekreton kaj tiam tuj forlasu nian loĝejon,” aldiris ŝia patrino. “Donu Dio, ke ne estas tiel terure, kiel vi igas ŝajni.”

“Sidiĝu, Sinjorino,” diris Everard, “miaj eksplokoj postulas tempon. Ne tiel terure, vi diras. Mi devus plori kaj tremi, sed mia koro ribelas kontraŭ la maljusteco, la ruzeco kaj la kruela maliceco kiuj elektis min kiel sian viktimo. Pacienciĝu momenton: vi ekscios ĉion.”

Kiam li estis sidiĝinta inter Sabina kaj ŝia patrino, li komencis tre detale rakonti, kiel kapitano Goffredo konvinkis lin la vesperon de la festo iri en lia loko doni kiel garantiaĵon altvaloran juvelon, kaj kiel la lombardisto igis lin subskribi garantiaĵan deklaron.

Dum tiu longa rakonto ambaŭ nobelinoj aŭskultis lin kun pligrandiĝanta scivolemo. Ĝis tiam ili ne komprenis, kio terura estas en tiuj ordinaraj faktoj kaj esprimis sian miron pri tio. Sed tiam Everard, emociita, diris kun emfazo:

“Sed la juvelo estis ŝtelita! Dum la festo la ŝtelisto penetris en la dormoĉambron de la amano kaj rabis ĝin el la juvelujo.”

“Ĝi estis ŝtelita, kaj vi, Everard donis ĝin kiel garantiaĵon!” ekkriis sinjorino Van der Aa, kiu antaŭsentis la gravecon de la afero. “Ĉu Goffredo ŝtelis ĝin?”

“Ĉu Goffredo ŝtelisto? Tio estas nekredbla!”

suspiris Sabina. “Tiam Dio mem punis lin... Sed kiel do tio povus senhonorigi vin? Kion vi faris, estas favoro al amiko, al kapitano, kiun ĉiuj estimis.”

“Vi tuj aŭdos, kiel malhonesteco kaj malamo forĝis el tiuj eventoj armilon kontraŭ mi, kontraŭ vi kaj mia patro... La sekvan tagon la amano elsendis la plej lertajn servistojn serĉi la juvelon. Unu el ili trovis la juvelon ĉe lombardisto Niceforo, kaj la garantiaĵa deklaro, kiun mi subskribis, estis enmanigita al la amano. Tiu ĉi petis mian patron veni al sia kastelo, montris al li la subskribitan deklaron kaj asertis, ke mi certe estas la ŝtelisto, kiu rabis lian juvelon. Kial ajn mia patro provis rifuti tiun priiridindan suspekton, la amano plu akuzis min. La garantiaĵdona deklaro, li diris, estis nerifutebla pruvo de mia kulpo, kaj li, kiel estro de la grafa justico, estis devigita arestigi min.”

Ambaŭ nobelinoj estis tiel mirigitaj, kaj kion ili aŭdis, ŝajnis al ili tiel absurda, ke mokrideto aperis sur iliaj vizaĝoj. En la okuloj de Sabina samtempe ardis fajrero de indigno.

“Vi, Everard, ne estus kapabla plenumi tiel malnoblan faron!” ekkriis la fraŭlino. “Kaj la amano scias, ke tio ne povas esti vera. Li volas nur timigi vin, ĉagrenigi vin pro maliceco.”

“Efektive, Everard, ne lasu liajn vanajn supozojn konsterni vin,” diris sinjorino Van der Aa. “Ĉu arestigi vin? Sed li devus tuj konduki vin antaŭ la skabenbenkon. Kiu en Bruselo kredus, ke Everard t’Serclaes – tiel riĉa kaj tiel estimata – povos fariĝi ŝtelisto? La amano povus nur altiri sur sin la publikan malamon, kaj por li sola estus la honto. Ĉu estas timo pro tia priiridinda persekuto, kiu instigas vin forlasi la landon? Ho, tiam restu kun trankvileco.”

“Jes, restu, Everard, ne forlasu Bruselon. Vi devas timi nenion. La amano vere ne kuraĝos plenumi sian maljustan minacon.”

“Mi estas dankema al vi, profunde dankema,” respondis la junulo. “Tiel kalumnia suspekto kontraŭ mi ne povas eniri viajn korojn. Tio estas pro mi dolĉa konsolo kaj fonto de nevenkebla kuraĝo. Sed aŭskultu min ankoraŭ iomete trankvile. Viaj puraj mensoj ne povas imagi, kiel soifo al vengo povas regi despotan viron. La amano diris, ke li arestigos kaj kondamigos min fare de la skabenbenko al la eŝafodo, al la hontoplena morto de la noktaj ŝtelistoj. Mia patro kaj mi mem komence ridis pri tiu vana minaco, sed post serioza konsidero ĝia terura graveco timigis nin. Goffredo, la sola persono kiu povus pruvi mian senkulpecon, estis mortigita. La subskribita deklaro atestas kontraŭ mi. La skabenoj estas fervoraj partianoj de la amano kaj blindaj iloj en liaj manoj. Mia kondamno, se mi nun aperus antaŭ la skabenbenko, estus neevitebla.”

Sabina eligis doloran suspiron kaj komencis plori.

“Sed ne, vi eraras,” replikis sinjorino Van der Aa. “Mi bone konas la amanon. Li estas efektive kruela, kaj li maldelikate elektas la rimedojn por atingi sian celon. Sed ĉia sento de honesteco ne estas fremda al li. Ke li minacas vin, tion ne mirigas min. Sed ke kun la tempo li fariĝus kapabla je tia neaŭdita falseco, tio ŝajnas al mi nekredebla!”

“Ne forgesu, Sinjorino, ke la amano havas trioblan kaj por si tre gravan celon atingenda. Jam de jaroj li estas la morta malamiko de mia patro. Prave aŭ malprave – ne decas, ke mi ekzameni tion – li kredas, ke mia patro incitas la popolon kontraŭ li kaj la grafo de Flandrio. Li volas venĝi sin je mia patro, trafante la patron tra lia filo, kaj per la senhorigo de lia postulearo rabi al li ĉian influon kaj aŭtoritaton ĉe la popolo. Kovrante min per honto kaj makulante mian nomon por ĉiam, li volas malebligi la geedziĝon de Sabina kaj mi. Ĉu tio ne sufiĉas al falsa homo kiel la amano por decidi lin al la plej malnobla atenco?”

“Estas terure!” ekkriis sinjorino Van der Aa, nun konvinkita, ke la amano efektive povus esti sufiĉe falsa por plenumi siajn minacojn por atingi siajn celojn..

“Ho, mia povra Everard!” lamentis Sabina, abunde plorante. “Ekde la malfeliĉo kiu trafis niajn gedukojn, nia vivo estas nur timo kaj sufero. Vi antaŭ la skabenbenko! Vi kondamnita kiel ŝtelisto! Tio ne povas okazi! Mi ne postvivus tion...”

La junulo kaptis ŝian manon kaj diris en konsola tono:

“Kio torturis kaj timigis min en tio ĉi, Sabina, estas la penso, ke vi kaj via patrino eble dubus pri mia honesteco. Ĉio atestas kontraŭ mi, kaj kalumnio estas kiel serpento, kiu scias verŝi nerimarkite sian venenon en la plej noblajn korojn. Sed nun ke mi povis paroli kun vi, mi estas konvinkita, ke tiu krima akuzo ne pri-rabos min de via estimo kaj afekcio...”

“Vi suferas, Everard, ĉar vi amas min,” interrompis lin la fraŭlino. “Tiu malica persekuto igas vin duoble kara kaj digna al mi. Se la amano intencas disŝiri nin unu de la alia per tiu kalumnio, li eraras: mi restos fidela al vi malgraŭ ĉio ĝis mia morto!”

“Dankon, mia kara amikino... Kaj vi, Sinjorino, ĉu vi povus rifuzi al mi la manon de Sabina, ĉar falsa akuzo estus ĵetinta makulon sur mian nomon? Respondu min, mi petas. Mi bezonas kuraĝon por ne kliniĝi sub mia amara sorto.”

“Ho, Everard, vi staras super tia sensenca kalumnio,” diris sinjorino Van der Aa. “Mi sentos por vi la saman estimon kiel antaŭe, kaj

mi ĉiam rigardos kiel honoron kaj feliĉecon povi rigardi vin kiel la novedzon de mia infano kaj rajti nomi vin mia filo.”

“Ha, tiuj bonaj certigoj igas min forta!” ekkriis la junulo. “Estu do ambaŭ konsolitaj! Dio protektos min. Li dure elprovas nin, sed Li ne lasos venki maliceco. Ankoraŭ venos feliĉaj tagoj por ni. Havu fidon kaj ne malĝoju pri mia foresto. Se mi forlasas nun Bruselon kaj Brabanton, tio estas por malebligi al la amano arestigi kaj enkarcerigi min. Mi iras al Limburgo al nia dukino Johana. Mi eksplikos ĉion al niaj gedukoj. Se mi konservas iliajn favoron kaj estimon, mi ne bezonas maltrankviliĝi pri la sentoj de la malamikoj de mia patrio. Mi restos ĉe nia dukino, ĝis ŝi revenos al Bruselo... Nu, ne ploru tiel amare, Sabina. Ne lasu la adiaŭo timigi vin: mia ekzilo ne daŭros longe... – Sed kian bruon mi aŭdas? Kio signifas tio? Tiu voĉo?” li demandis, aŭskultante surprizita, leviĝante de sia seĝo.

“Ho, Dio, la amano en nia domo!” murmuris sinjorino Van der Aa, paliĝante.

“Fuĝu, Everard! Rapide, kaŝu vin!” kriis Sabina, kurante al al pordo.

“Kaŝi min? Ho ne, neniam!”

“Niaj geservistoj perdigis vin!” suspiris sinjorino Van der Aa. Restu trankvila, Everard, regu vin, ne kolerigu lin!”

“Mi certe estos trankvila, Sinjorino, estas devo por mi, sed ne diru al li, ke mi volas forlasi la urbon...”

“Jen, jen li venas, ho granda ĉielo!”

La pordo efektive malfermiĝis, kaj Van Heetvelde eniris kun fajrerantaj okuloj.

La junulo profunde klinis sin antaŭ li kaj rigardis lin senvorte, sen ofenda fiereco, sed ankaŭ sen timo.

“Via trokuraĝeco kaj via nesingardemo mirigas min, Sinjoro t’Serclaes,” diris la amano, iel regante sin pro la trankvileco de la junulo. “Vi scias, ke trovi vin ĉi tie treege incitas mian koleron. Malgraŭ via situacio vi kuraĝas instigi min al venĝon! Estas nekredeble! Kion vi faras ĉi tie?”

“Maltrankvileco pri mia honoro decidigis min penetri en tiun ĉi domon, eĉ perforte, Sinjoro Amano,” respondis Everard kun malvarmeta neŝancebleco. “Oni povus akuzi min ĉi tie. Mi volis antaŭi la kalumnion.”

“Kiel? Ĉu vi estis sufiĉe temerara por paroli pri la juvelo antaŭ tiuj ĉi nobelinoj?”

“Mi eksplikis ĉion al ili.”

“Nu, nu,” mokis la amano. “Ili do scias nun, ke dum mia festo grandvalora juvelo estis ŝtelita el mia dormoĉambro, kaj ke estas vi kiu, ankaŭ la saman vesperon, lombardigis la juvelon por cent malnovaj ŝildoj ĉe lombardisto?”

“Jes, Sinjoro Amano, kaj ili scias ankaŭ, ke kapitano Goffredo petis min lombardigi la juvelon por li...”

“Nenio pravas tion. La garantiaĵa deklaro kontraŭe...”

“Ho, Van Heetvelde, kiel estas eble!” ekkriis la maljuna nobelino, levante la brakojn. “Ĉu vi kuraĝas aserti, ke vi kredas je la kulpo de sinjoro t’Serclaes? Ne, vi estas konvinkita, tute kiel ni, ke Goffredo forprenis la juvelon.”

“Pri tio mi tute ne estas konvinkita, Sinjorino!”

“Kaj ĉu vi kredas, ke Everard t’Serclaes estas...? Tiu penso estas malica kalumnio.”

“Estas abomena maliceco!” ekkriis Sabina kun fajro de indigno en siaj larmantaj okuloj.

“Feliĉe, Sinjoro, Dio povas legi en niaj konsciencoj!” murmuris la junulo.

Tiuj temeraj vortoj ofendis la amanon. Kun falsa rideto kaj duone mokante, li respondis:

“Ne estas al mi ekzameni tion pli profunde. La garantiaĵa deklaro estas nerefutabla atestaĵo kontraŭ li. Por kontentigi vin, mi diras, ke la suspekto estas tre grava. Mia persona opinio valoras nenion en tiu afero. Nome de nia indulgema princo mi devas postuli justicon kontraŭ la krimuloj, sed mi ne estas la sola juĝisto. Kiu ajn estas la kulpulo, mia devo postulas, ke mi kondukigu sinjoron t’Serclaes antaŭ la skabenbenkon. Ĝis nun mi hezitis, sed oni ne incitu mian paciencon, se ne, mi fariĝos senkompata! La subskribita garantiaĵa deklaro neniel permesas min dubi pri la juĝon kiun la skabenbenko prononcos. La eŝafodo, la ekzekutisto, lia nomo por ĉiam makulita per malhonoro...”

Tiuj vortoj igis tremi Sabinan kiel kano kaj forŝiris al ŝi la koro de timo. Ŝi venkis la antipation kiun ŝi sentis por sia kruela subpremanto, iris al li, lasis sin fali sur la genuojn antaŭ liaj piedoj kaj komencis kun levitaj brakoj petegi lin esti justa kaj kompatema. Sed ŝiaj petegoj elspiris tiom da tenereco kaj arda amo al Everard, ke anstataŭ mildigi Van Heetvelde-n, ili kolerigis lin ankoraŭ pli.

Ŝia patrino aligis sin al ŝi kaj ambaŭ provis per dolorplenaj plendoj kaj humilaj petegoj trafi lian koron favore al Everard.

“Indulgon, indulgon, li estas senkulpa! Ho, ne konduku lin antaŭ la skabenbenkon!” ili kriadis, plorante abundajn larmojn.

Senpacience la amano forturnis sin de ili kaj, turnante sin al la junulo, li demandis malafable:

“Ĉu vi scias, kion mi diris al via patro?”

“Jes, Sinjoro, mi scias ĉion,” estis la trankvila respondo.

“Kiel do vi kuraĝas veni ĉi tien kalumnii min kaj timigi tiujn ĉi naivajn virinojn senutile? Jes, mi devus arestigi kaj kondamni vin. Sed kion kontraŭe mi faras? Mi oferas al vi celtrafan,

rimedon forteni de vi ĉian suspekton kaj eĉ detruai la garantiaĵan deklaron. Via sorto estas en viaj manoj, almenaŭ en la manoj de via patro. Mi estas certa, ke vi akuzis min antaŭ tiuj ĉi nobelinoj pri falseco, maliceco kaj venĝemo, dum mi, kiu posedas la rimedon humiligi vin kaj vian patron por ĉiam, konsentas ne kapti tiun okazon por savi vian nomon de ĉia malhonoro! Ĉu vi ankaŭ diris, kiuj estas miaj kondiĉoj?”

La junulo nee skuis la kapon, dum la nobelinoj rigardis lin kun miro kaj dubo.

“Tiam mi malkaŝos ilin al ili”, diris la amano. “Sinjorino Van der Aa kaj ŝia filino juĝos, kiu el ni ambaŭ devas esti rigardata kiel sincera kaj honesta. Jam de multaj jaroj, Sinjoro, via patro estas fervora malamiko por mi. Mi scias ke, utiligante la foreston de la grafo, li sekrete incitas la popolon kontraŭ nia duko kaj mi. Agante tiel, li esperas, ke li povos persuadi la metiojn al armita ribelo kaj venkinte senkapigi min sur la eŝafodo kiel perfidisto – ĉu ne, kiel perfidisto de Brabanto! Mi montris al li la garantiaĵan deklaron subskribitan de vi, dirante al li: ‘La sorton kiun vi kredas prepari por mi, mi povas suferigi al via filo. Nun, mi konsentas kredi je lia senkulpeco, kaj se vi gardos la metiojn trankvilaj ĝis la reveno de la nia indulgema senjoro grafo, mi detruos la garantiaĵan deklaron sub viaj okuloj. Sed se la metioj komencos ribelon, se ili venos armitaj sur la stratojn, tiam mi venĝos min al vi kaj, obeante la leĝojn, mi arestigos kaj kondukigos vian filon kiel ŝteliston antaŭ la skabenbenkon’. Vi ja vidas, Sinjorinoj, ke mi estas nek kruela nek falsa, kiel oni volas kredigi al vi. Ĉu mi ne havas la rajton, kaj ĉu ne estas mia sankta devo defendi mian propran vivon kaj la kronon de mia princo? La maljuna t’Serclaes havas potencegan influon sur la popolon. Se do lia filo aperos antaŭ la skabenbenko kaj estos trafita per senhonoriga juĝo, kiu kulpos pro tio? Ĉu mi? Neniel! Nur li, la obstina maljuna sinjoro t’Serclaes, estos volinta tion!”

Dubigite per tiuj vortoj, sinjorino Van der Aa rigardis la junulon kun demandaj okuloj. Sed li, ne kuraĝante paroli pro timo endanĝerigi la sekreton de sia patro, skuis la kapon kun malĝoja rideto sur la lipoj.

Tiu silento ŝajnis eĉ mirigi Sabinan.

“Kaj nun ke tiuj nobelinoj scias ĉion, kion vi kaj mi havis direnda al ili,” reprenis Van Heetvelde, “nun mi petas vin tuj forlasi tiun ĉi domon, kaj mi malpermesas vin eksplicite iam ajn remeti la piedojn trans ĝia sojlo, se ne, vi devos timi ĉion de mia kolerio!”

Everard jam estis retroirinta kelkajn paŝojn kaj volis diri lastan ‘adiaŭ’ al Sabina kaj ŝia patrino, sed la amano haltigis lin per signo, dirante:

Ankoraŭ unu vorton tamen. Portu la sekvan mesaĝon al via patro: oni rapotris al mi, ke li daŭrigas sekretajn rilatojn kun nia eksa duko Venceslao. Ankoraŭ hieraŭ kuriero lia foriris al Limburgo. Me komprenas: li estas tre sagaca kaj volas trompi min. Li tenos la popolon trankvila, sed ankaŭ preta ĝis Venceslao povos sendi armitajn trupojn al Brabanto. Tiam la metioj povus ribeli kaj eble venki, ĉu ne? Via patro lasas sin gvidi per falsa espero! La grafo de Namuro kaj la Lieĝanoj sendis novajn trupojn al la batalkampoj kaj antaŭ nelonge dufoje rebatis la dukan armeon. Venceslao vidas siajn soldatojn transkuri al la malamiko, ĉar li ne povas pagi ilin. La pruntedonistoj gardas sian monujon fermita por li kaj neniu volas ankoraŭ prunti ion al li. Li eĉ ne plu povas kontentigi siajn proprajn bezonojn. Post nelonge li devos ĉesigi ĉian provon kaj cedi pro monomanko. Kiel do oni povus kredi, ke li entreprenos ion por rekonkeri sian perditan dukaĵon? Diru tion al via patro kaj konsilu lin rezigni pri ĉiuj vanaj projektoj. Se li faros tion sincere, vi povos resti senzorga kaj eskapos al la terura danĝero, kiu pendas super via kapo. Nun foriru kaj ne temerare malestimu miajn grandanimajn vortojn, se ne, tuj sekvos puno!”

“Sionjorino,” diris la junulo, “nur respekto al mia patro kaj mia deziro ne amarigi la sinjoron amanon malhelpas min fari objektojn. Sufiĉas al mi, ke el la vortoj de sinjoro Van Heetvelde mem evidentiĝas mia senkulpeco. Cetere mi apelacias al la justico de Dio kaj al la via. Ricevu mian adiaŭon! Ĝis revido!”

Kun severa rigardo Van Heetvelde montris al li la pordon.

Sabina volis ankoraŭ kuri al li, sendube por premi ankoraŭfoje lian manon, sed li retenis ŝin per gesto, kaj ŝi haltis, la okulojn plenajn je larmoj.

“Via patro tenas en siaj manoj viajn vivon kaj honoron: mi insistas, ke li ne forgesu tion!” kriis la amano post li.

Everard t’Serclaes forlasis la ŝtondon kaj rapide direktis siajn paŝojn al la Vendoplaco. Kiam li alvenis ĉe la fino de la strato Heuvel kaj proksimiĝis al la strato Spiegel, li malrapidigis sian iron kaj sinkis la rigardon kiel iu kiu estas profunde enpensiĝinta. Tiu mensa foresto tamen ne daŭris longe. Esprimo de kuraĝo kaj fido denove prilumis lian vizaĝon, kaj preskaŭ kurante li supreniris la straton Berg kaj fine atingis sian ŝtondon ĉe la fino de la Eetengat.

Kiam li eniris la salonon, lia patro venis renkonte al li, dirante:

“Everard, kiel longe vi forestis! Ĉu vi vidis Sabinan?”

“Jes, patro, sed ankaŭ la amanon.”

“Ĉu ankaŭ la amanon? Kie?”

“En la ŝtondomo de sinjorino Van der Aa.”
“Kaj kion li diris al vi?”
“Sabina kaj ŝia patrino nun scias ĉion. Kio ajn okazos, Sabina restos fidela al mi: la kalumnio ne influos ŝin.”
“Sed la amano? Ĉu li parolis pri la juvelo?”
“Jes, patro. En la ĉeesto de sinjorino Van der Aa kaj ŝia filino li ripetis la minacojn kiujn li prononcis kontraŭ vi.”
“Ĉu li volas akuzi vin antaŭ la skabenbenko?”
“Se la popolo ne restos trankvila.”
“Ho, vi devas baldaŭ foriri, mia filo.”
“Ne, patro, ne necesas, ke mi tiom rapidu. La amano ankoraŭ ne intencas arestiĝi min. Li komisiis min per mesaĝo al vi.”
“Ĉu per mesaĝo al mi? De li mem?”
“La amano asertis scii, ke vi tenas sekretajn rilatojn kun nia duko Venceslao.”
“Tio estas vera, mia filo.”
“Kaj li kredas, ke vi tenas la popolon trankvila ĝis nia duko aperos en Brabanto. Sed laŭ la amano tiu espero estas vana, pro tio ke niaj gedukoj estas tute senpovaj pro monomanko kaj mem suferas de malabundeco. Iliaj nepagitaj soldatoj transkuras al la malamiko, kaj antaŭ nelonge ilia malforta armeo estis dufoje rebatita.”
“Ne kredu tiujn malbonajn informojn, mia filo,” murmuris la maljuna t'Serclaes kun videbla deprimiteco. “La amano multe troigas la malfacilaĵojn de la duko. Almenaŭ al li ne mankas mono. Tiel malbona ankoraŭ ne estas la situacio.”
“Kial ajn, patro,” Everard respondis, “la vortoj de la amano estigis ĉe mi decidon, kion vi certe aprobos. Nia povra dukino Johana, nia bonfartistino kaj mia protektantino kiam ŝi vivis ankoraŭ en prospereco, eble nun estas en danĝero. Mi estas riĉa kaj posedas el mia patrino heredaĵo konsiderindajn proprajojn. Mi volas oferti, lombardigi kaj monigi ĉion por helpi niajn geprincojn.”
“Sed, mia filo,” rimarkis t'Serclaes, “la amano ne diris al vi la veron. Niaj geprincoj persone spertas nenian malabundecon. Al ili mankas nur monon por pagi la soldatojn kaj precipe por akiri sufiĉe grandan armeon.”
“Estas egale, patro. Tiam mi dediĉas miajn posedaĵojn al la akirado de novaj trupoj en Limburgo mem kaj ĉe la limoj de Germanio. Mi demandas la konsenton de la duko kaj metos min mem ĉe la kapo de miaj soldatoj. Mi marŝos kontraŭ la malamikon, mi riskos mian vivon centfoje kaj mi instigos la dukon al energio. Ni batos la grafon de Namuro kaj la Lieĝanojn kaj forpelos ilin el Limburgo... Kaj tiam, ĉu la ribelo malsukcesis ĉi tie, ĉu oni ankoraŭ ne komencis ĝin, ni venos triumfante al Bruselo kaj liberigos Bruselon...”

T'Serclaes rigardis sian filon per okuloj kiuj brilis de admiro kaj entuziasmo. Lia patra zorgemo tamen malhelpis lin lasi erarigi sin per tiuj favoraj antaŭdiroj.

“Sed mia filo,” li murmuris, “se nia duko malgajnos tiun militon, via patrino heredaĵo perdiĝus!”

“Efektive, patro. Nu, en tiu kazo mi partumas la sorton de niaj gedukoj. Kuraĝe batalinte por ili, mi pacience suferus kun ili, ĉiam esperante je la liberigo de Brabanto.”

T'Serclaes enpenŝiĝinta skuis la kapon, kvankam hela rideto prilumis lian vizaĝon.

“Ĉu vi malaprobos mian planon, patro?” murmuris Everard

“Certe ne, mia filo,” respondis t'Serclaes. “Mi eĉ volus partopreni en tiu glora entrepreno kaj serĉas en mia kapo la rimedojn helpi plenumi ĝin.”

“Tiuj rimedoj estas tre simplaj, patro. Mi kunprenos ĉiujn proprietaktojn de miaj posedaĵoj al Limburgo. La potenca monŝanĝisto Eberstein, kiu sekvis niaj gedukojn al Maastricht, pruntos al mi por certaj sekuraj garantiaĵoj tiom kiom mi volas.”

“Jes, efektive, tiu estas la plej bona rimedo, kaj mi donos al vi leteron por la germana monŝanĝisto Eberstein, kiu bone konas min. Tiel li eĉ akceptos parton de miaj proprajoj kiel garantiaĵon. Vi pravus, mia filo. Estas nia devo agi tiamaniere. Ni riskas ne nur la feliĉecon de niaj gedukoj kaj la liberecon de nia patrio, sed ankaŭ niajn proprajn honoron kaj vivon. Fordoni por tio nian sangon kaj havaĵon ne estas tro multe... Jen la ŝlosilo de mia kesto. En ĝi vi trovos la proprietaktojn. Kunprenu tiom da oro kiom vi povos kaŝi sur vi... Dume mi skribos leteron al monŝanĝisto Eberstein. Iru, mia filo, kaj rapidu, ĉar jam estas plena tago. La tempo foriri urĝas por vi.”

Everard prenis la ŝlosilojn kaj forlasis la salonon.

t'Serclaes skribis mallongan leteron kaj sigelis ĝin. Li ĵus finis ĝin, kiam Everard revenis en la salonon sen ia pako kaj kun leĝera mantelo sur la ŝultroj, ĉar li devis komenci sian vojaĝon, kiel iu kiu iras promeni.

“Jen la letero,” diris t'Serclaes. “Mi mem rapide serĉos ankoraŭ monon en Bruselo kaj sendos ĝin al vi. En la kortego de la gedukoj vi trovos sinjoron Van Beersel. Se vi havas ion komunikenda al mi, fidu lin. Li konas sekuran vojon por sekrete venigi al mi mesaĝojn kaj leterojn... Donu Dio, ke sukcesu nia provo je la antaŭvespero de la festo de sankta Krispeno. Sed se ĝi malsukcesas aŭ se estus neeble riski la ribelon, tiam, mia filo, nia tuta espero ripozus sur vi!”

“Mi faros tion, kio estas mia devo, patro,”

diris la junulo. "Estu trankvila, vi aŭdos paroli pri mi! Ho, se mi povus fariĝi grava kaŭzo de la liberigo de Brabanto, kiel fiera vi estus pri mi! Mi provos ĉion, patro, kaj retropaŝos antaŭ nenio: nek antaŭ la forto de la malamiko, nek antaŭ la danĝeroj, nek antaŭ la morto!"

"Venu, Everard, mia filo, ke mi ankoraŭfoje premu vin sur mian koron por adiaŭi vin."

Ili ĵetis sin inter la brakojn unu de la alia kaj longe restis en silenta ĉirkaŭbrako kaj tiam interŝanĝis lastan, timoplenan adiaŭan kison. Dum larmoj brilis en iliaj okuloj, ili ankoraŭ murmuris:

"Dio protektu vin, kara patro!"

"Li konduku vin, mia filo, kaj baldaŭ revenigu vin al Bruselo kun la gedukoj!"

"Adiaŭ!"

"Adiaŭ!"

Kaj Everard rapide forlasis la salonon por komenci sian danĝeran vojaĝon al Limburgo. Lia patro ne sekvis lin, sed postrigardis lin suspirante.

XI

Finfine alvenis la antaŭvespero de Sankta Krispeno. Ankoraŭ unu horo estis pasonta antaŭ ol resonos tra la mallumo en la tuta urbo la signalo de la ĝenerala ribelo.

t'Serclaes staris en salono de sia ŝtondomo, tenante longan spadon en la manoj. Liaj okuloj brilis pro ĝojo. Ridetante li rigardis la brilantan armilon kaj ŝajnis tute sinkinta en belan revon.

Leĝera frapo sur la pordo surprizis lin en liaj konsideroj. Li metis la spadon apud sian maŝkirason, kiu kuŝis sur la tablo. Viro eniris la salonon. Verŝajne li venis de ekstere, ĉar li estis tute volvita en brunan mantelon kaj ĉiam havis la kapuĉon sur la kapo.

"Nu, Roelof, kiel statas la aferoj?" demandis t'Serclaes. "Ĉu ĉiam prospere?"

"Prosperege, Sinjoro," respondis la alia kun kliniĝo. "Mi ne forrestis tre longe, kaj tamen mi sukcesis plenumi mian tutan taskon."

"Ĉu vi parolis kun Jan, la oraĵisto?"

"Jes, kaj ankaŭ al Pieter, la forĝisto. Ekde ĉi-matene iliaj kompanoj fariĝis tiel grandnombraj, ke pro manko je spadoj kaj lancoj, oni armis ilin per hakiloj, tranĉilegoj kaj eĉ per feraj stangoj. Ĉiuj tenas sin pretaj kaj je la unua sono de la sonoriloj de la preĝejo Sankto- Nikolao, ili kuros al la granda vendoplaco. Tie ili lokos sin antaŭ la Wilden Ever kaj tie atendos vian alvenon aŭ viaj ordonojn."

"Ĉu vi scias, ke la Bruselanoj, por rekoni unuj la aliajn, devas krei: 'Sankta Miĥaelo! Sankta Miĥaelo!'?"

"Ili scias tion, Sinjoro, kaj ili eligos tiun krimon kun tiom da forto, ke la urbo tremos. Ha! Ili flagras pro kuraĝo kaj batalemo! Estu certa, Sinjoro, ke ili ne ŝparos sian sangon, ... Brave! Brave! Ankoraŭ hodiaŭ Bruselo liberigosis!"

"Trankviliĝu, mia bona Roelof," diris t'Serclaes, emociita per la entuziasmo de sia servisto.

"Kiel nun aspektas la urbo? Ĉu ĉio estas kvieta?"

"Mi iris al la festeno de la ŝufaristoj," estis la respondo. "La kompanio tie estas eksterordinare grandnombra. Antaŭ la pordo de la gildodomo staras multaj scivolemuloj kaj inter tiuj eĉ kelkaj grafaj soldatoj, kiuj alrigardas kaj ridas. Kompatindaj soldatoj de la fremda uzurpinto! Ili tute ne vidas la sangmakulitan spadon, kiu pendas super iliaj kapoj... Mi estis en la domo dum kelkaj momentoj. Oni kantas kaj dancas tie, kvazaŭ nenio estus okazonta. Sed je la unua sonorado sur la turo de la preĝejo Sankta-Nikolao la festenantoj diskuros kvazaŭ sorĉe, kaj ĉiuj kaptos siajn armilojn."

"Ni do povas esperi, ke nia sekreto konserviĝis, kaj ke la amano suspektas nenion pri nia plano."

"Nenion li suspektas, Sinjoro. Revenante mi iris preter la palacon de la amano, la pordego Sankta-Gudula kaj la pordego Warmoes. Nenie staras pli da gardistoj ol kutime. Nenie ia moviĝado. La soldatoj, kiuj ne staras garde, dormas en siaj kazernoj."

"Dankon pro via fideleco kaj diligenteco por la patrio," diris t' Serlaes. "Jes, Roelof, morgaŭ Bruselo estos libera! La fakto, ke vi kontribuis al la liberigo de nia lando ĉiam honoros kaj feliĉigos vin. Via fideleco ankaŭ al mi ne restos nerekompencita. Iru nun kaj diru al Lukas, ke li grimpu sur la turo de la domo kaj bone aŭskultu por povi averti min, ĉar en tiu ĉi salono mi eble ne bone aŭdos la batadon de la sonoriloj. Vi, Roelof, reiru en la urbon kaj promenu tra la stratoj. Se vi ekscios ion suspektan aŭ specialan, venu komuniki tion al mi. La aliaj servistoj devos, je la unua signalo, ĉiu laŭ sia vojo, direkti sin kiel eble plej rapide kaj nevidate al al Vendoplaco kun la armilo kaŝita sub la mantelo. Ĉu vi bone komprenis min?"

"Estu trankvila, Sinjoro, viaj ordonoj estos akurate plenumitaj," repondis Roelof, post kio li forlasis la salonon

Profunde emociita per la bonaj novaĵoj, t'Serclaes denove sidiĝis sur seĝo. Ridetante li rigardis la plankon kaj ĝoje murmuris:

"Ha, la amano suspektas nenion! La perfidulo estas nun trankvila: li kredas, ke li tiel volvis min en la reton de sia falseco, ke mi ne plu povas moviĝi kaj estas tute senpova. Verŝajne li nun pripensas, kiel li povos kon-

damnigi mian filon kaj senhorigi nian familion. Danke al Dio, la maliculo eraras! Se li eskapas al la venĝemo de la popolo, kiun li vendis, li morgaŭ kuŝos katenita en la malliberejo, kaj la sorto, kiun li preparis por mia filo, trafos lin mem kiel rekompenco de sia krimo. Loveno estas preta. Antverpeno, la malbone traktata urbo ĉe Skeldo, estas kiel eksplodonta vulkano... Ni volos, ke revenu niaj gedukoj, kaj sendos armeon renkonte al ili. Everard nun estas jam kvar aŭ kvin tagojn ĉe li. Li estos enmaniginta al ili granda montrezoron. Eble li jam marŝis kun nova armeo kontraŭ la Lieĝanoj... Kompatema Dio, ŝparu al li la vivon! Kiel li benos vian sanktan nomon, eksciante, ke nia urbo Bruselo estas liberigita, la malnoblaj intrigoj de la amano malsukcesigitaj, lia honoro, lia vivo kaj lia amo al Sabina savitaj. Kaj li mem, reveninte kun nia dukino Johana kaj duko Vencelao, estos ricevita de la kruele elprovita Sabina, lia dolĉa, fidela fianĉino!"

Eble t'Serclaes estus ankoraŭ longe daŭriginta tiun glorplenan revon, sed nun servisto malfermis la pordon kaj anoncis la alvenon de sinjoro Hugo Clutinc.

La kavaliro tuj eniris la salonon kaj metis sian mantelon sur seĝon. Lia brilanta maŝkiraso kaj la longa spado ĉe lia flanko vidigis, ke li estas batalpreta.

"Mi ĵus ricevis strangan ordonon de mastro Lankhals," li diris post la salutado. "Sekreta mesaĝisto alportis al mi slipon de papero, sur kiu estas skribita, ke ĉe la sonorigo de la sonoriloj mi ne povas forlasi mian loĝejon kaj devas atendi specialan ordonon de mastro Lankhals. Ĉu vi scias, kion tio signifas, t'Serclaes?"

"Tute ne, Clutinc. Ĉu la mesaĝisto ne donis al vi eksplikojn?"

"Al mia demando li respondis: 'Tio estas la volo de la armeestro. Vi devas obei, kiel ni ĉiuj'. Ion alian mi ne povis eldiri el li."

"Li pravas, mia amiko... Kaj tamen vi forlasis vian domon?"

"Ba, ni ankoraŭ ne tiagrade estas la sklavoj de tiuj maldelikataj viroj!" grumblis Clutinc. "Je la naŭa mi estos en mia loĝejo kaj atendos la ordonon de mastro Lankhals. Estas tre humilge por ni, t'Serclaes, devi obei al ulo kiel Lankhals, Pex aŭ Grijspeert, kiuj, ŝvelintaj per sia efemera potenco, kuraĝas trakti nin kvazaŭ ni estus iliaj subuloj aŭ servistoj. Ekde nia lasta kunveno en la fulmuejo ili envolvas sin en la plej grandan misterecon, petas nenies konsilon, disdonante nur ordonojn. Ni estas iliaj humilaj laboriloj kaj scias nenion."

"Sed, mia amiko," interrompis t'Serclaes, "vi malpravas, parolante tiel. La neeksplikita mesaĝo ofendas vin iomete, mi bone kom-

prenas tion. Sed estas verŝajne, ke oni volas komisi vin per grava tasko aŭ konfidi al specialan ordonon, ekzemple gardi aŭ sturmi la palacon de la amano. Ĉiaokaze, pro devosento kaj patriamo ni devas obei al la superuloj, kiujn ni elektis laŭ plimulto de la voĉoj. Ĉu ne estis mi kiu proponis nomumi inter la kunĵurintoj tri membrojn kaj vesti ilin per nia plenpotenco? Ke mi ne estis elektita, pro tio kulpas nur mi, vi scias tion. Nia forto kuŝas en la sekretigo de niaj planitaj aranĝoj. Mi estus aginta tute kiel mastro Lankhals. Ĉio kion ni devas scii pri la taktiko, estas sciigita al ni. Poste, ĉe la unua signalo de la sonorilo de la preĝejo Sankta-Nikolao, ni ĉiuj direktos nin el ĉiuj partoj de la urbo al la Granda Vendoplaco"

"Kaj tiam, t'Serclaes?"

"Kaj tiam ni kondutos laŭ la ordonoj de mastro Lankhals."

"Lankhals, forĝisto, estas nia armeestro!" grumblis Clutinc, malgaje ŝercante. "Pex estas buĉisto, Grijspeert fulisto, tamen niaj armeestroj!"

"Per kio gravas, ke ili ne apartenas al la gentoj?" replikis t'Serclaes. "Kiel doĵenoj de siaj metioj ili havas grandan influon sur konsiderindan parton de la popolo. Ili estas energiaj kaj sentimaj viroj, kiuj ne hezitos verŝi sian sangon por la liberigo de sia naskiĝurbo. Mi devus esti ilia armeestro, mi ja scias. Sed por mi estas egale kiel kaj de kiu la katenoj de la patrio estos rompita, se nur mi povos saluti ĝian liberecon... Nu, amiko, forpelu tiujn mallumajn pensojn kaj lasu esperon plenigi vian koron. Ĉio iras laŭdezire: antaŭ ol sonos la noktomezo la Brabanta leono denove flirtos super le skabenejo."

"Dio donu, ke tiel estu!" diris Clutinc kun suspiro. "Se oni atendas nenion alian de mi ol batali kaj riski mian vivon por la patrio, mi plezure plenumos mian devon. Sed mi timas, t'Serclaes, ke al mi kaj eble al vi, ne estos permesite hodiaŭ elingigi nian spadon por la liberigo de la patrio."

"Kiel do? Kion vi volas diri?" ekkriis t'Serclaes.

"Ni estas membroj de la gentoj. Ĉu vi ne aŭdis per la vortoj de Lankhals kaj liaj amikoj, ke eĉ ĉe la proksimiĝo de nia decida provo, ili ne povas subpremi sian malamon kontraŭ la gentoj? Se ili kuraĝus, ili laŭte krius, ke ili malfidas nin kaj kredas nin kapablaj je perfido. Se do la ordono de Lankhals estus nur rimedo por restigi min kiel kaptiton en mia loĝejo dum la ribelo?"

"Kia penso! Ne, ne, vi tute eraras. Estu certa, amiko Clutinc, ke oni volos ŝarĝi vin per speciala tasko. Vi vidos. Ĉu mi ne estas membro de la gentoj? Nu, kvankam mi donis al ili gravajn motivojn por esti malkontentaj, ili

konfidis al mi la komandon super la farbistoj, la sekrazistoj, la blankigistoj kaj la ĉarpentistoj. Aldonu al tio iun nombron da viroj el mia kvartalo. Mi pensas, ke mi gvidos almenaŭ kvincent virojn... Ha, Clutinc, la ŝarĝo de la jaroj komencas pezi sur miaj ŝultroj, sed la espero, jes la certeco, ke ni stariĝos gloraj el la sklaveco, rejunigas min kaj rehardas la muskolan forton de miaj brakoj! Nia lando libera, nia bona dukino Johana ree sur la trono de ŝiaj prapatroj, la fremda uzurpinto for de nia grundo, la vendistoj de Brabanto punitaj..., ĉu tio celo ne estas nobla, ne estas sufiĉe grandioza por paŝi trans kelkajn malgrandajn malfacilaĵojn? Ek, mia amiko, ni plenumu nian devon sen maltrankviliĝi pri io alia ol nia devo kaj la liberigo de nia naskiĝurbo!... Reiru do al via domo, Clutinc."

"Mi havas ankoraŭ duonan horon..."

"Ne, verŝajne estas pli malfrue. Se la mesaĝisto de Lankhals ne trovos vin hejme, oni povus akuzi vin pri ĵurrompo, ĉar ni estas, kiel vi mem diras, devigitaj blinde obei al niaj plenpotenculoj."

"Tiel estu! Mi reiras al mia domo," murmuris Clutinc, skuante la kapon. "Vi ŝajnas fidoplena, t'Serclaes, ho, mi esperas, ke vi ne eraras! Se nia patrio reakiros sian sendependecon, mi sentos min iomete konsolita por la miskono de niaj rajtoj. Adiaŭ do, ĝis post nelonge aŭ ĝis morgaŭ."

t'Serclaes akompanis sian amikon ĝis la pordo de la salono kaj kore premis lian manon. Reveninte al la tablo, li haltis momenton kun klinita kapo kaj murmuris al si mem:

"Mi ja scias, kio maltrankviligas vin, amiko Clutinc. Vi timas, ke post la venko la metioj postulos malpliigon de la privilegioj de la gentoj. Ili volas, ke parto de la skabenoj estu elektata el ilia medio. Kia granda malbono tio estus? Cetere, mi gardis sufiĉe da influo sur la popolo kaj sur la gedukoj por malhelpi plenumon de maljusteco..."

Tiel li daŭrigis ankoraŭ kelkajn momentojn sian pripensadon, kaj tiam li diris:

"Sendube la horo proksimiĝas: ni ne lasu nin surprizi per la sonoj de la sonoriloj."

Li agitis la tintileton, kaj viro, kiu portis kavalirspadon ĉe sia flanko, kvankam li estis vestita kiel servisto, aperis en la pordo.

"Christiaan, la signalo tuj resonos," diris t'Serclaes.

"Restas ankoraŭ kvaronhoro, Sinjoro," estis la respondo.

"En tio ni povas erari. Vi mem jam estas armita. Venu, Christiaan, helpu min surmeti mian maŝkirason."

La servisto proksimiĝis, malfaldis la maŝkirason, ĵetis ĝi super la kapo de sia mas-

tro kaj aranĝis ĝin ĉirkaŭ la korpo. Li estis ankoraŭ faranta tion, kiam alia servisto aperis.

"Sinjoro," li diris, "unu aŭ pluraj viroj, kiujn mi ne povis rekoni tra la spiontruo pro la mallumo, frapis sur la pordegon. Ili alportas tre urĝan mesaĝon."

"Ĉu ili scias la pasvorton?"

"Jes, Sinjoro, kaj ili venas de mastro Lankhals."

"Tiam tuj malfermu al ili la pordegon kaj konduku ilin en tiun ĉi salonon."

"Ĉu minacas ia danĝero?" murmuris t'Serclaes. "Mi ne scias, Christiaan, sed mia koro batas timeme. Mi timas, ke venas malbona novaĵo. Ĉu la amano estus sciigita pri nia provo? Ĉu oni venas diri al ni, ke la ribelo estas prokrastita? La ĉielo protektu nin kontraŭ tia malfeliĉo."

"Neeble, Sinjoro," respondis lia servisto kun neperturbbla fido. "Oni certe alportas al vi ordonojn koncerne la maniero je kiu oni procedos... Tie mi jam aŭdas la mesaĝistojn en la antaŭĉambro. Vi tuj ekscios."

La pordo estis malfermita. Dek ĝis dudek fortikaj viroj kun sovaĝa rigardo kaj diverse armitaj penetris en la salonon. La plej multaj estis buĉistoj kaj forĝistoj. Tion oni povis vidi per iliaj nudaj brakoj kaj nigraj pugnoj aŭ per la haktranĉiloj, kiuj brilis en iliaj manoj.

Unu el ili, kiu portis spadon kaj ŝajnis esti ilia gvidanto aŭ komandanto, farinte signon al siaj viroj, antaŭeniris kaj tendis paperslipon al la mirigita t'Serclaes.

Tiu ĉi komencis legi, sed apenaŭ li ĵetis rigardon sur ĝin, li paliĝis kaj ektremis. Subite li faligis la papereton, portis la manojn al la kapo kaj eligante krion sinkis sur fotelon.

"Ho, Dio mia, tiun lastan baton mi ne meritis!" li plendis, levante la manojn. "Mi arestita? Ne partopreni en la batalo? Scii, ke sango fluos por la liberigo de Brabanto, aŭdi la bruojn de la lukto, kaj sidi ĉi tie sur seĝo kiel malkuraĝulo aŭ perfidulo? Ne, ne, al tia ekstrema honto mia malobeco ne povos konduki min! Christiaan, ili trompas nin: mian spadon, mian spadon!"

Kaj li eksaltis kun fajrerantaj okuloj, volante kapti sian spadon. Sed tuj kvin aŭ ses viroj ĉirkaŭis lin kaj devigis lin al senmoveco, la aliaj senarmigis sian serviston kaj trenis lin el la salono. T'Serclaes provis ankoraŭ lukti kontraŭ la perforto, tordante sian membrojn kun malespera forto por eskapi el la manoj de siaj gardistoj. Li ŝajnis freneza, lia hararo estis malaranĝita kaj li grincis per la dentoj pro kolero.

"Lukas, Godfried, Stoffel, Reinier, miaj fidelaj servistoj!" li kriis. "Helpu min! Helpu min!"

Sed la ĉefo de la trupo metis manon sur lian buŝon kaj diris:

“Tenu vin trankvila, Sinjoro t’Serclaes. Ĉiuj viaj klopodoj estas vanaj. La pordego de via ŝtondomo estas okupita de miaj viroj. Viaj servistoj jam estas enfermitaj kaj gardataj en speciala ĉambro.”

“Ho, granda ĉielo, ĉu tio estas terurega sonĝo?” ĝemis t’Serclaes “Mi ne rajtas riski mian vivon por la patrio! Se Bruselo akiros sian liberecon, oni povos diri, ke mi ne kunlaboris por ĝia liberigo! Ve, ve, kia doloro, kia eterna honto!”

“Estas ordono de mastro Lankhals. Estu fidela al via ĵuro kaj obeu sen kontraŭdiro, se ne, tiu ĉi haktranĉilo devigos vin al tio,” krude diris buĉisto al li.

“Sed vi ne scias, amikoj, ke mia ĉeesto estas necesega sur la Granda Vendoplaco. Mi devas komandi grupon de kvincent viroj. Se tiuj ĉi restos sen ĉefo, ni povus maltrafi la venkon!”

“En tio jam estas provizite,” respondis la ĉefo. “Mastro Halijn, la dojeno de la teksistoj, komandos ilin... Trankviliĝu, Sinjoro t’Serclaes, pacience submetu vin al la ordono de la armeestro, kaj ne okazos al vi la pli malgranda malbono. Ne esperu, ke vi povos forlasi vian domon antaŭ la fino de la lukto. Ni, same kiel vi, estas ligitaj per nia ĵuro al blinda obeo. Multe ĉagrenus nin, se ni devus malbone trakti eminentan sinjoron kiel vi. Sed por plenumi nian taskon, kiel oni postulas de ni, ni eĉ ne hezitus verŝi vian sangon.”

Tute senkuraĝigita, t’Serclaes refalis sur sian fotelon kaj metis la manojn antaŭ la okulojn, eligante doloran krimon.

Tiel li sidis kelkan tempon tute senmove. Tiam la ĉefo ordonis siajn virojn retroiri kelkajn paŝojn, prenis mem seĝon kaj sidiĝis apud t’Serclaes.

Subite la aero ekstrems sub la rapida sonorado de iu sonorilo.

“Ek, ek, la signalo de la ribelo! Sankta Miĥaelo! Sankta Miĥaelo!” kriis la gardistoj kune, suprensvingante siajn armilojn, kvazaŭ ili estus trafitaj per bato.

“Ho, amikoj, nome de la patrio, nome de nia libereco, lasu min foriri! Mi volas batali por la liberigo de Brabanto! Mi petas vin: ne malhelpu min fari tion!”

Denove la haktranĉilo de la sovaĝa buĉisto minace ekbrilis antaŭ liaj okuloj. La ĉefo kaptis lin per la ŝultroj kaj devigis lin sidiĝi, dirante sufiĉe krude:

“Trankviliĝu, Sinjoro, ne moviĝu: niaj ordonoj estas senkompataj.”

“Sed diru al mi: kiu esta la kialo por tiu perforto?” murmuris t’Serclaes. “Ĉu mi ne senĉese donis ekde mia frua juneco pruvojn de mia arda amo al nia patrio kaj nia popolo? Kion do mi misfaris?”

“Ek, ek, estas nur ruzo!” ekkriis la buĉisto moke. “Vi ne iras ĝuste en viaj ŝuoj! Jam unufoje vi volis vendi nin al la amano. Kiu scias, ke vi ne intencas perfidi nin nun?”

Tranĉanta krio eliĝis el la buŝo de t’Serclaes.

“Ĉu vendi? Ĉu perfidi?” li kriis kiel mortige vundita besto. “Oni timas mian falsecon? Jen do la vorto: mi estas perfidulo! Povu mi morti sub tiu terura bato! Lasu min morti, ho Dio mia!”

Li lasis sinki la kapon sur la tablon, kvazaŭ li estus perdinta ĉian esperon kaj kuraĝon, kaj ne plu moviĝis. Se la pezaj anheloj de lia brusto ne pruvus, ke li vivas kaj suferas, liaj gardistoj certe estus kredintaj, ke la ĉielo elaŭdis lian senesperan preĝon.

Intertempe ĉiam kreskadis la forto de la sonorado de la sonoriloj, kaj ĉar la vento blovis de la urbo al la domo de t’Serclaes, oni povis tre bone aŭdi, kiel multaj preĝejoj unuj post la aliaj partoprenis en la alarmsonorado.

Kelkan tempon poste aliĝis al tio la blekantaj tonoj de klarionoj kaj trumpetoj kaj la mil konfuzaj bruoj de furioza luktado. Fojfoje la gardistoj de la malfeliĉa t’Serclaes kredis eĉ aŭdi la longan, imponan krimon de la Bruselanoj: “Sankta Miĥaelo! Sankta Miĥaelo!” Kaj pensante, ke iliaj kompanoj tiamaniere jubilis pri la retiro de la malamiko, ili ĝoje svingis siajn armilojn tra la aero aŭ entuziasme premis la manojn unujn al aliaj.

T’Serclaes, frakasita per honto, sinkinta en malesperon, estis metinta la kapon sur manon kaj fikse rigardis la plankon. Sendube li aŭdis, same kiel liaj gardistoj, la instigantan batadon de la sonoriloj kaj la bradon de la lukto, ĉar iam kaj iam tremeto trakis liajn membrojn.

La ĉefo de liaj gardistoj eĉ provis iomete kuraĝigi lin, dirante al li, ke, se li estus suspektata senkaŭze, lia konscienco devus levi lin super tia maljustaĵo. Se la patrio estus liberigita sen lia helpo, tiu tute nelibervola senfareco ne povus esti imputita al li. Sed tute nesentema al tia konsolo, t’Serclaes eĉ ne respondis.

Kredante, ke ilia kaptito ne plu pensis pri rezisto aŭ eskapo el sia domo, la gardistoj preskaŭ ne plu atentis pri li kaj aŭskultadis la bruojn, kiuj muĝadis kvazaŭ ventego tra la aero super la urbo. Per mallaŭta voĉo ili interkomunikis siajn impresojn.

“Aŭdu resoni la kriojn!” ili diris unuj al aliaj. “Estas certe, ke niaj viroj sturmadis la palacon sur la Coudenberg. – Ne, tio ne povas veni de tiel for. Oni fortege batalas nun sur Kalsijde, apud la Cantersteen, estu certaj – la bruo donas supreniras! Niaj viroj pelas la soldatojn sur Kalsijde-n. – Aŭdu tiun frapetadon! Estas la piedfrapado de ĉevaloj! La kavalerio

miksiĝas en la ludon! – Niun ĉio silentiĝas. Ĉu ni jam atingis la venkon? – Neeble! La urba tremegus pro niaj triumfkrioj! – Ha! Tio jam rekomenciĝas kun duobligita forto!”

Kaj tiel ili aŭskultadis kaj babiladis dum duona horo, ĝis kiam subite la sonoriloj unu post la alia ĉesis sonori kaj la bruoj iam post iam malfortiĝis kaj fine estingiĝis.

Tiam ili komencis timiĝi. Kio signifis tiu stranga silento? Kial il ne aŭdis triumfkriojn? Dum ili rigardis sin reciproke en la okulojn, la pordo malfermiĝis kaj unu el iliaj kompanoj eniris.

“Mastro,” li diris al la ĉefo, “antaŭ la pordego staras viro, kiu asertas esti vundita kaj veni de la Granda Vendoplaco. Li scias, kiel statas la aferoj, kaj petas, ke oni malfermu la pordegon por li.”

“Novaĵoj! Novaĵoj! Ho, lasu lin eniri!” kriis la viroj, kiuj estis en la salono.

“Ĉu li scias la pasvorton?” demandis la ĉefo.

“Jes, mastro.”

“Nu, forprenu lian armilon kaj konduku lin en mian ĉeeston.”

“Ĉiuj atendis kun tima scivolemo la decidan novaĵon. Eĉ t’Serclaes rektiĝis.

Tiam en la salonon eniris viro, kies maldekstra vango estis makulita per sango.

“Veni ĉi tien kaj diru, kion vi scias,” ordonis la ĉefo.

“Ĉu vi, Roelof, mia fidela servisto, vundita?” ekkriis t’Serclaes.

Sen atenti pri la ordono de la ĉefo Roelof iris ĝis antaŭ sia mastro kaj tiam ĝemis kun levitaj manoj:

“Ho, mia povra mastro, ĉio estas perdita!”

“Ĉu perdita, vi diras, Roelof? Granda Dio, ĉu la fremdulo venkis? La amano, la malica falsa perfidulo, triumfis?”

Roelof ploris kaj ŝajnis ne plu povi paroli. Sed la ĉefo ordonis al li, klare ekspliki, kion li scias. Kun kelkaj interrompoj la servisto rakontis:

“Kelkaj momentoj post kiam la sonoriloj komencis sonori, abundis armitaj metiistoj sur la tuta Granda Vendoplaco, kaj la krioj ‘Sankta Miĥaelo! Sankta Miĥaelo!’ igis, se tiel diri, tremi la aeron. Ni, kiel eble plej rapide, kuris al niaj lokoj, ĝis ĉiu metio staris sur sia indikita loko. Kio tiam okazis, mi ne bone scias. Oni diris, ke ekestis disputo inter niaj armeestroj, ĉar ili malsamopiniis pri la maniero agi nun. Ŝajnas, ke mastro Grijspeert rifuzis obei la ordonojn de mastro Lankhals. Kiel ajn estis, ni staradis tre longe sur la Granda Vendoplaco sen fari paŝon... Intertempe niaj krioj, kaj ankoraŭ pli la sonoriloj, estis vekintaj niajn malamikojn. Nia fatala hezitado donis al ili la tempon armi sin kaj kuniĝi. Ĉie niaj viroj koliziis kontraŭ grandnombrajn trupojn de la malamiko. Ni estis

devontaj surprizi ilin, kaj nun ili surprizis kaj atakis nin. Kio okazis aliloke, mi ne scias. Sed la trupo, al kiu mi apartenis, proksimume kvincent viroj, direktis sin sub la gvido de la dojeno de la teksistoj al Kalsijde por sturmi la dukan palacon. Sed apenaŭ ni alvenis apud Cantersteen, nuboj da sagoj faligis multajn el niaj viroj... Kun la krio ‘Sankta Miĥaelo! Sankta Miĥaelo!’ ni sturmis sur la monteton, dum ankoraŭ ĉiam sagoj amase trafis nin. Ni intencis superforti kaj renversi la malamikajn pafistojn, sed ni trovis la vojon baritan per tiel densaj kaj profundaj trupoj, ke, sturminte ilin kvar- aŭ kvinfoje, ni devis rekoni nian senpovecon kaj ricevis la ordonon retiriĝi batalante. Nombre tre malfortigita, ni atingis la Grandan Vendoplaco tra la strato Heuvel, kiun ni batalante barikadis per vagonoj, ĉaroj, litoj kaj kion ajn ni povis akapari... La samo okazis al la aliaj metioj. Multaj jam estis revenintaj sur la Grandan Vendoplaco esperplenaj kiel ni, kaj la lastaj venis iom da tempo post ni serĉi tie rifugejon. Ĉiuj elirejojn de la Vendoplaco estis barikaditaj ĝis profundeco de dudek piedoj, kaj la plej kuraĝaj viroj, precipe niaj malmultaj arbalestoj, lokitaj malantaŭ la barikadojn por rebati la malamikojn. Intertempe granda malordo regis sur la Granda Vendoplaco. Neniu volis plu obei la ordonojn de la ĉefoj, kiujn oni akuzis pri nekapableco, jes eĉ pri perfido. Oni diris, ke Lankhals estis mortigita kaj Grijspeert kuŝas vundita en la Wilden Ever. Tiam la metiistoj komencis kriadi: ‘t’Serclaes! t’Serclaes!’ Ho jes, Sinjoro, ili ja konscias pri tio: se vi estus gvidinta la popolon, nun ĝojaj trimfkrioj resonus super nia povra urbo... Sed vi ne estis tie!... Tiam mastro Pex prenis sur sin la komandon, kaj li sukcesis obeigi sin de multaj... Tiel, sieĝataj sur la Granda Vendoplaco, ni ne plu povis rezisti tre longe, kvankam ni ofte sukcesis rebati la atakojn de niaj malamikoj kontraŭ niajn barikadojn, ĉar la soldatoj estis grimptaj sur la tegmentoj de la domoj, kaj de tie ili pafis sagojn sur nin, sen ke ni povis defendi nin kontraŭ ili. Tiam nia armeestro Pex decidis forlasi la Grandan Vendoplaco kun la plej bonaj viroj por, se eble, ataki la malamikon en la dorso. Mi estis inter tiuj viroj, kiujn li destinis al tiu ekstrema provo. Subite ni ren-versis nian barikadon en la strato Heuvel kaj rompitis tra ĝi el la Granda Vendoplaco. La malamiko estis rebatita ĝis la komenco de la strato Berg, sed tie ni estis atakataj de malantaŭe de forta trupo, kiu malspureneris Kalsijde-n. Tiel enfermitaj inter du potencoj, ni estis disbatitaj kaj dispecigitaj. Mi kuris en la straton Berg, kaj kvankam mi estis persekutata dum kelka tempo, mi eskapis al la morto. Jen la rakonto de nia malfeliĉo. Verŝajne la malamiko jam

estas konkerinta la Grandan Vendoplacon kaj ĉio estas finita!”

T’Serclaes saltis kelkajn paŝojn antaŭen al la pordo, sed la ĉefo kaptis kaj haltigis lin.

“Ho, lasu min kuri al la Granda Vendoplacon!” li petegis kun larmoj en la okuloj. “La metioj vokas min. Ĉiuj obeas min. Vi ĉiuj venu kun mi. Eble ni povos ankoraŭ savi nian patrion!”

“Sidiĝu kaj restu trankvila!” ordonis la ĉefo. “Se tiu ĉi viro diris la veron, vi eĉ ne povos atingi la Grandan Vendoplacon. Sed tre verŝajne timo igis lin troigi la situacion. Ĉio ankoraŭ ne estas finita. La ŝanco povas turniĝi... Aŭskultu, eble tio jam okazas. Tiu bruoj, tiuj novaj krioj, ne tre for de ĉi tie... eble ĉe la pordego Warmoes... Niaj viroj verŝajne superfortas la pordegojn! Ha, ha, jam estas espero!”

Ĉiuj streĉis siajn orelojn kaj aŭskultadis kun radianta rido en la okuloj. Sed iom post iom dubo denove ekokupis iliajn konsternitajn korojn. Kvankam en la konfuzaj krioj ili ne povis distingi, kion oni kriadis, ili tamen rekonis, ke tio ne estas ilia militkrio ‘Sankta Miĥaelo!’, kiu traboris la aeron.

Sur ĉies vizaĝo legeblis la demando, ĉu tiu bruado ne anoncas al ili, ke la venkanta malamiko proksimiĝas al la domo de t’Serclaes.

Sed la krioj iom post iom foriĝis, kaj finfine oni aŭdis nenion plu ol neklaran bruetadon, kvazaŭ de malproksima maro. La espero formortis en ĉies koro, la kapoj sinkis, silentiĝis en la salono kiel en tombo.

t’Serclaes, refalinte sur sian seĝon, fikse rigardis la plankon. Larmoj fluis el liaj okuloj, dum li murmuris neaŭdeble al si mem:

“Perdita! La gloro de Brabanto, la libereco de Brabanto estas perdita! La amano triumfas... Nun li akuzos mian povran Everard-on antaŭ la skabenbenko. La skabenoj – liaj sklavecraj iloj, malkuraĝaj servistoj de fremda mastro – kondamnos mian filon kiel ŝteliston, kiel noktan ŝteliston!... La garantia deklaro, ho granda ĉielo! Ĉu tiu makulo ne gluiĝos neforviŝeble sur nia nomo, sur nia gento? Tio estas terure! Kalumnio estas multkapa monstro, kiun oni neniam povos tute mortigi. Ho ve! Kial mi ne rajtis morti en la lukto? Vivi, vivi por lamenti pri la honto de mia infano, pri la sklaveco de mia venkita patrio!”

Ĉe tiu ĉi lasta penso forta nervofebro ŝajnis ataki lin. Mallonge li konvulsie tordis siajn membrojn eligante dolorajn ĝemojn. Kaj tiam li refalis en la plej kompletan senmovecon.

Dume la ĉefo kaj ties kunuloj, emociitaj de nova espero, aŭskultis la bruojn, kiuj denove kun duobligita forto leviĝis super la urbon. Ho, certe la lukto estis rekomenciĝinta: la metioj

luktis ankoraŭ kuraĝe. Kiu povas koni la rezulton? Eble ili estis trimfontaj.

Sed post iom da tempo la bruado de nove tiel malfortiĝis, ke ili jam ne estis certaj, ĉu ili ankoraŭ aŭdis ion. Denove regis longa morta silento en la salono...

Tiam la bruado rekomenciĝis, kreskis kaj alproksimiĝis. Ĝi evidente proksimiĝis al la domo de t’Serclaes!

Ĉu la malamiko?

“Kaptu viajn armilojn!” kriis la ĉefo. “Se ni estos atakitaj, montru vin kuraĝaj. Ni ne kapitulacos, tiel longe kiel iu el ni vivos!... Sed kion mi aŭdas? La krio ‘Brabanto la granda duko’ ne estas la batalkrio de la metioj... Ĉu mi ne aŭdas malfermiĝi la pordego? Kion tio signifas?”

Dum li estis ankoraŭ parolanta, kelkaj voĉoj en la domo komencis ĝoje jubili, kaj ĝis en la salonon resonis la kriego.

“Brabanto la granda duko! Vivu, vivu Everard t’Serclaes! Al ni la venko!”

La ĉefo kaj liaj viroj volis kuri eksteren, sed nun multaj viroj penetris en la salonon, kaj unu el ili, kurinte ĝis antaŭ t’Serclaes, ekkriis:

“Dio estu benata, mia nobla mastro! Ni venkis! La fremduloj, batitaj, renversitaj, fuĝis el la urbo tra la pordego Sankta-Katarina. Oni ankoraŭ persekutas ilin. Bruselo estas liberigita, kaj tiu kiu redonis al ĝi la liberecon estas via kuraĝa filo Everard!”

“Jes, jes, Sinjoro, li estas nia savinto! Vivu, vivu Everard t’Serclaes!” jubilis, la manojn supren, la metiistoj, kiuj estis plenigintaj la salonon.

“Aĥ, ĉu mi songas?” ĝemis la maljuna t’Serclaes. “Ĉu tio eblas? Kiel bela tio estus, granda ĉielo?”

“Ne dubu, Sinjoro, estas tiel,” haste diris Andries. “Vi sendis nin al Limburgo por peti helpon, ĉu ne? Mia mastro Everard tie tuj dungis trupon da kuraĝaj viroj. La duko eĉ permesis al li elekti la plej aŭdacajn el lia gvardio. Mia mastro sciis, ke oni batalos en Bruselo ĉi-nokte. Li kondukis nin tra la mallumo kaj arbaroj al Brabanto, kaj tiel ni atingis, nevidataj, la muregojn de Bruselo. Kelkaj el ni grimpis sur la muregon apud la pordego Warmoes, surprizatakis la gardistaron kaj lasis nin ĉiujn eniri¹⁴. Ni kuris al la Granda Vendo-

¹⁴ Kavaliro elektita
En Bruselo naskita
Kaj nomita Everard
Te Serclaes...

Tiel li alvenis nokte
Ĉe la fosoj de Bruselo
Sur la lok’ al li konata
Kun la nomo Wermoesbroec (Legommarĉo).

placo, atakis la malamikon en la dorso apud la strato Heuvel kun la krio 'Brabanto la granda duko!', kaj forpelis lin. Tiam la metioj sturmis de la Granda Vendoplaco, kaj tuj nenio povis plu rezisti al niaj unuigintaj fortoj..."

Nova jubilado ekestis apud la pordego de la ŝtondomo. La krioj 'Vivu, vivu la liberiginto de Bruselo! Vivu, vivu Everard t'Serclaes!' tremetigis la aeron.

La maljuna t'Serclaes etendis la brakojn, kriante:

"Everard! Everard, mia bona filo!"

Kaj efektive, lia filo ĉirkaŭbrakis la patron, kaj ambaŭ ploris pro ĝojo, flustrante kun emociita voĉo inter si pri la liberigo de la patrio, la reveno de dukino Johana, kaj la fidela Sabina...

Ankaŭ la ĉirkaŭstarantoj ploris pro simpatio kaj emocio.

La maljuna t'Serclaes la unua liberigis sin el la longa ĉirkaŭbrako kaj levis la brakojn supren.

"Ho Dio," li ekkriis. "Via sankta nomo estu benata! Vi montris al ni vian kompaton. Ne nur vi redonis liberecon al nia patrio, sed vi ankaŭ elektis mian filon kiel ilon de via graco. Dankon! Dankon!"

"Venu, mia bona patro, sekvu min," diris Everard. "Ĉio ankoraŭ ne estas finita. Ni devas certigi la fruktojn de tiu ĉi venko. La popolo bezonas gvidantojn. Venĝemo povas inciti al malordaĵoj, eĉ al krimoj. La leĝo devas havi siajn reprezentantojn, kaj tuj. Vin, kiu estas tiel saĝa kaj sperta, oni bezonas nun. Venu, venu al la skabenejo!"

Sub la daŭra jubilado de la homoj, kiuj akompanis ilin, ili eliris sian ŝtondomon kaj eniris la straton Berg. Everard donis al sia emociita patro ankoraŭ kelkajn eksplikojn pri la miriga maniero je kiu li sukcesis liberigi Bruselon, ĝuste en la momento, kiam ĉio ŝajnis perdita.

Je kelka distanco ili vidis nubojn de fumo supreniri al la ĉielo kaj la ĉielon tute ruĝe farbata.

"Ve!" suspiris Everard. "Tiel la popolo fuŝas justan aferon, bruligante, prirabante, senhonorigante la liberecon en sango kaj fajro."

"La ŝtondomo de Van Heetvelde estas brulanta!" kriis viro, kiu supreniris la strato Berg. "La buĉistoj kaptis la amanon. Ili volas pendumi lin. Mi ne volas vidi tion kaj tial mi forkuris."

"Rapide, patro, rapide!" diris Everard. "Nia liberigo ne estu malhonorigita per murdo. Kiel ajn kulpata estas la amano, nur leĝaj juĝistoj

juĝos lin. La lukto estas finita: ne plu neutila sangoverŝado!"

Ĉe la fino de la strato Berg ili vidis amason da viroj kun torĉoj. El iliaj sovaĝaj venkokrioj oni povis kompreni, ke ili trenas viktimon al la morto.

"Al la Granda Vendoplaco! Al la pendumilo la perfidiston! Morti, morti devas la vendisto de Brabanto!" oni malorde kriadis, dum dudeko da hakiloj kaj haktranĉiloj estis svingataj en la lumo de la torĉoj.

Everard penetris ĝis en la mezo de la furioza homamaso kaj repelis la kriaĉantajn buĉistojn. La amano kaj lia filo Willem, ligitaj unu al la alia per ŝnuroj, estis kruele batataj, piedfrapataj kaj trenaĉataj. Ili vestaĵoj estis disŝiritaj. Ili tremis, kaj morta timo videblis sur iliaj vizaĝoj.

Kiam Van Heetvelde ekvidis la junan t'Serclaes-on kaj ties patron, li perforte ektiregis je la ŝnuroj kaj falis teren sur la genuojn.

"Mi kulpas, mi faris al vi malbonon," li ĝemis, "sed kompatu nin! Gracon! Gracon!"

Vidante sian malamikon tiel malfeliĉa kaj humiligata, t'Serclaes eksentis iom da kompatato, sed lia malamo al la perfidinto estis tro forta: li forturnis la kapon kaj retroiris kelkajn paŝojn. Sed Everard senhezite saltis al la mizerulo kaj tranĉis la ŝnurojn per sia spado.

"Restarigu, Sinjoro Van Heetvelde," li diris. "Estu trankvila kaj ne timu pro via vivo. Al la unua kiu tuŝos vin sen mia ordono, mi fendos la kapon... Andries, Andries, kie vi estas?"

"Jen mi estas, Sinjoro," oni respondis al li.

"Kunprenu dekon de niaj Limburgaj kunuloj kaj konduku tiujn sinjorojn al la malliberejo ĉe la pordego Steen. Gardu ilin tie ĝis mi anstataŭigos vin. Oni ne tuŝu haron sur iliaj kapoj."

Kelkaj Limburgaj kunuloj prezentis sin, kaj Andries diris al la kapitoj:

"Sekvu min, Sinjoroj. Ne provu eskapi. Ni protektos vin kontraŭ ĉia insulto kaj malbona traktado."

En la momento kiam oni estis forkondukanta Van Heetvelde-n, tiu ĉi metis la manon en sian kirason kaj diris al Everard, dum li ŝajnis doni ion al li:

"Via bonkoreco estas granda, Sinjoro t'Serclaes. En mia mizera situacio mi povas montri mian dankemon al vi nur donante al vi tiun ĉi pecon de pergameno. Dankon! Dankon!"

Kaj li sekvis siajn gvidantojn, kiuj supreniris Kalsijde-n.

Tremante pro ĝojo Everard rigardis momenton la pecon de pergameno. Li proksimiĝis al sia patro, montris ĝin al li kaj jubilis per mallaŭta voĉo:

"Mia garantiata deklaro! Kia feliĉo! La timo pro kalumnio kaj malhonoro estas forturnita de ni... Mi detruos tiun kaŭzon de mia malĝojo kaj via doloro."

Kaj sekvigante la faron post la parolo li diŝsis la folieton de pergameno en cent pecetojn kaj ĵetis ilin en la venton.

Kiam ili alvenis sur la Granda Vendoplaco, ili trovis tie maron da jubillantaj homoj, inter kiuj multaj portis brulantajn torĉojn. Oni ĝuste estis replantanta la Brabantan leonflagon sur la skabenejon, kaj la homamaso salutis tiun signon de libereco per freneza ĝojeksplodo.

Tuj kiam oni rekonis Everard-on t'Serclaes, la kriado ŝanĝiĝis en longa vivuadon honore al la liberiginto de Bruselo. Al tiuj kiuj staris ĉirkaŭ li, li signis, ke li deziras paroli, kaj kiam la amaso estis sufiĉe kvietiĝinta, li diris:

“Amikoj, Bruselanoj, la fremda uzurpinto estas ja forpelita el nia urbo, sed same tiel danĝera malamiko povas forpreni al ni la fruktojn de nia venko. Efektive, malordo kaj sendisplineco estas certaj murdistoj de libereco. Ni ne plu havas amanon nek skabenojn. La urbo ne havas gvidanton. Tamen iu devas havi la rajton igi regi la leĝon ĝis la reveno de la dukino.”

“Jes, jes, estu vi la kapo de nia komunumo!” oni kriis.

“Ne, tio ne estus prudenta,” replikis Everard. “Mi estas juna kaj nesperta. La viron, kiu de multaj jaroj kutimis regi nian urbon, la viron, kiu en ĉiuj cirkonstancoj montris la plej sinceran amon al la popolo de Bruselo, kiu estas laŭdata pro sia saĝeco kaj amata pro sia justeco, tiun viron, vian maljunan amikon, mian honorindan patron, ni devas peti meti la manon sur la stirilon kaj protekti la boaton de nia libereco kontraŭ la ŝtormo de sendisplineco.”

“Vivu, vivu t'Serclaes! Li estu nia kapo, lin ni volas obei. Al la skabenejo, al la skabenejo!” kriadis la ĉirkaŭstaranta homamaso.

La maljuna t'Serclaes ŝajnis voli rifuzi tiun altan, malfacilan taskon kaj rezistis iom da tempo. Sed kelkaj fortaj viroj levis lin de la grundo kaj portis lin sur siaj ŝultroj al la skabendomo, dum de ĉie sur ilia vojo tondra jubilado supreniris kaj la nomo t'Serclaes kvazaŭ trumfkrio resonadis super la tuta Granda Vendoplaco.

Kun fiereco Everard rigardis kelkan tempon tiun imponan kaj solenan spektaklon. Kiam la jubilado malpliĝis kaj li konvinkiĝis, ke lia patro, estis solene enoficigita en la skabenejo, li transiris la Grandan Vendoplacon sen atenti pri la aklamoj de la homoj, kaj eniris la straton Stoof.

Febra malpacienco pelis lin antaŭen, ĉar li paŝis tre haste, ĝis li atingis la ŝtondomon de sinjorino Van der Aa. Li ne dubis, ĉu la bruoj de la lukto kaj timo malhelpis la homojn en tiu domo enlitiĝi. Efektive, kiam li frapis sur la pordegon, tiu ĉi estis nur iomete malfermita.

“Ĉu sinjorino Van der Aa kaj fraŭlino Sabina ankoraŭ sidas en la loĝoĉambro?” li demandis.

“Ho, granda ĉielo, ĉu estas vi, Sinjoro t'Serclaes, vi, la savinto de Bruselo?” ekkriis la servisto, vaste malfermante la pordegon kaj profunde klinante sin. “Eniru do, Sinjoro. Miaj mastrinoj ankoraŭ maldormas. Ili scias ĉion. Kiel feliĉaj ambaŭ estos, revidante vin. Sekvu min, sekvu min!”

Momenton poste Sabina kaj ŝia patrino ĉirkaŭbrakis Everard-on, verŝante larmojn de feliĉeco kaj entuziasmo sur lian koron.

La sukceso de la ribelo de la Bruselanoj incitis la aliajn urbojn de Brabanto forpeli la Flandrajn trupojn. Baldaŭ la tuta Brabanto estis denove libera.

Ok tagojn post la liberigo de Bruselo duko Venceslao kaj dukino Johana faris sian solenan reeniron en sian liberigitan ĉefurbon. Iom poste en ilia ĉeesto Everard t'Serclaes kaj Sabina Van der Aa estis kunigitaj per la geedziĝa bendo. Por la tuta urbo tio estis okazo festi.

Ke la gedukoj kaj la popolo de Bruselo estis dankemaj al la kuraĝa liberiginto de Bruselo atestas la sekvaj versoj el la malnovaj kronikoj, la *Brabantse Yeesten (Brabantaj Heroaĵoj)*:

Tian dignon kaj honoron
Al sinjoro Everardo
Duko Vencesla' oferis
Kaj Johana la dukino
Kaj la tuta loĝantaro,
Ke priskribi ĝin ne eblas.
Tial tion mi rezignas.

FINO